


La 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj



Libro por BET-ano

Kaunas
5-13 julio 2025

Libro pri la tradicia esperantista aranĝo

Baltiaj Esperanto-Tagoj

Eldonita okaze de la 59-a BET en Litovio.

Celoj kaj taskoj: studi problemojn de la Esperanto-movado, elstarigi ĝiajn ĉefajn taskojn, interŝanĝi spertojn pri esperantista agado, perfektigi en Esperanto, enhavoriĉe pasigi la tempon.

Sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio.

Libro por BET-ano



Kaŭno
5–13 Julio 2025

© Litova Esperanto-Asocio, 2025

Redaktoro:

Stano Marček,

Kompilintoj:

Stano Marček,

Povilas Jegorovas,

Aleksander Korjenkov

Fontoj: La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/bet>

Retejo de BET: www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=bet59

Enpaĝigo: Stano Marček

Korektoj: Utho Maier

Kovrilo © Vladimiras Beresniovos

Presita en Litovio

Leidinio bibliogra nē informacija pateikiama
Lietuvos nacionalinės Martyno Mažvydo bibliotekos
Nacionalinės bibliogra jos duomenų banke (NBDB).
ISBN 9955-609-95087-8-8

Enhavo

De la Libro por BET-ano de BET-59 en Kaunas



Salutmesaĝoj

Juozas Olekas, – Alta Protektanto de BET-59	8
Kęstutis Budrys, Ministro pri eksterlandaj aferoj de la Respubliko Litovio	9
Raminta Popovienė, Ministrino pri Edukado, Scienco kaj Sporto	10
Šarūnas Birutis, Ministro pri Kulturo de la Respubliko Litovio	11
Prof. d-ro Juozas Augutis, Rektoro de la Universitato Vytautas La Granda	12
Visvaldas Matijošaitis, Urbestro de la urbo Kaŭno	13
Duncan Charters, Prezidanto de UEA al BET-59 en Kaŭno, 2025	14
D-ro Seán Ó Riain, Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio	15
Povilas Jegorovas, Prezidanto de la Organiza Komitato	16
La Organiza komitato de BET-59	17
10 interesaj faktoj pri Kaŭno	18
Historia tabelo de BET-oj	20
Aspiranto kaj Esperanto; Diagramo de BET-oj	21
Historio de BET-oj: BET-informiloj	25
Kial Kunfluo? Paweł Fischer-Kotowski redaktos la ĉiutagan gazeton de BET-59	26
Himno de Litoviaj BET-oj: Al Litovio	27
Nacia kaj ŝtata himno de Litovio	28
Kaŭnaj Esperanto-objektoj	29
Kaptu la okazon por trovi la urbon Kaŭno	30
De sukcenaj ĝis steloj: La jaro de Čiurlionis	34
Promenado tra Esperanta Kaŭno	36
Koncize pri Litovio	57
Bazaj scioj pri la litova lingvo	59
Informilo N-ro 2 pri BET-59. Gravaj praktikaj kaj teknikaj informoj	64

Historio de BET-oj

Historio de la unua BET kaj la 60-jara jubileo	66
ĈET-3 en Molėtai (1961)	70
BET-6 en Veisiejai (1964)	72
BET-9 en Vilno (1967)	74
BET-12 en Kretinga (1970)	76
BET-17 en Viekšniai (1976)	79
BET-20 apud Kaŭno (1983)	81
BET-23: Amase en malgranda urbeto (1986)	84
BET-26: La plej granda BET kun pli ol 600 partoprenantoj (1989)	87

La plej nekutima BET, aŭ SAT-kongreso en Litovio	89
BET-31 en Girionys (1995)	92
BET-34 en Veisiejai (1998)	93
BET-37 apud Kaŭno (2001)	95
BET-40 en Birštonas (2004)	97
BET-43 en Šiauliai: la plej granda BET ĉi-jarmile	99
BET-46 en Visaginas: la plej nova urbo de Litovio	100
BET-49 (2013): Interesaj kaj agrablaj tagoj en Utena	103
BET-52: Pli ol tricent verdstelanoj en la verda urbo	106
BET-55: “Malgranda UK” en Litovio	110
BET-56 en Klaipėda, Litovio	112
Programo de BET-59	115
Scienc-teknika programo de BET-59	119
Instruado dum BET-59	123
Kleriga kaj eduka programoj	
Mark Fettes. Prelegserio “Lingvo kaj mondo: Kelkaj meditoj el esperantista angulo”. Invit’ al interlingvistiko	127
Poezia angulo: La sonetoj al Orfeo de Rainer Maria Rilke	128
Aida Čižikaitė. Gediminas Degėsys	128
Chajm Antonia Hillel Langholf . Tim Owen	129
Kultura programo de BET-59:	
Lucio Avitabile. Liaj spertoj en la artista kampo Lucio Avitabile mem prezentas sian koncerton	130
ĴomArt kaj Nataša koncertos en BET-59	130
Arno Lagrange (biografio).....	131
Ed Robertson (biografio).....	131
jOmO BETumos en Kaŭno	132
Kjara koncertos en BET-59!	133
Suzana kaj Mirek koncertos en Kaŭno	134
Sakari Kauppinen prelegos pri Tove Jansson	134
Ulrich Matthias prelegos pri „Esperanto en Afriko“ kaj „Esperanto kaj anima frateco“	135
Konatigu kun Giorgio Silfer	135
Konatigu kun Perla Martinelli	135

Birutė Prekevičiūtė kaj ŝia spektaklo „Litovio de Barbara“	137
Konatiĝu kun Eŭheno Kovtonjuk	137
Sigita Railaitė-Sičiūnienė koncertos en Kaŭno	138
Spektu “Doktoron Esperanto” de Mario Migliucci	138
Konatiĝu kun Valdas Striužas	139
Miksita ĥoro “Gintaras” koncertos en BET-59	139
Konatiĝu kun Kristin Tytgat	140
Konatiĝu kun Manfred Westermayer	140
Nijolė Žambaitė: „Mitoj pri diplomatio kaj diplomato	141

Ekskursa programo BET-59

Duontagaj ekskursoj:

I. Panoramoj de Kaŭno. II. Ensemblo de la Palaco Raudondvaris	142
III. La monaĥejo de Pažaislis. IV. La Padoj de Anĝeloj	143

Tuttagoj ekskursoj:

I. Regiono Vilkaviškis, kie Esperanta Glaciaĵo estas produktata	143
II. Trakai – la malnova ĉefurbo de Litovio	144
Utilaj informoj por la BET-partoprenantoj	145
Laŭlanda statistiko de la aliĝintoj al BET-59	147
Krucenigma konkurso	150

Salutmesaĝoj

Juozas Olekas – Alta Protektanto de BET-59



Estimataj partoprenantoj, organizantoj kaj gastoj el la tuta mondo de la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj,

mi elkore salutas vin ĉiujn, kunvenintajn en ĉi tiu speciala internacia evento, okazanta en Litovio – ĉe la Universitato Vytautas la Granda, kiu ĉi-jare fariĝas centro de kultura kaj lingvistika kunlaboro.

La lingvo Esperanto, kreita por la ideo de homa unuiĝo, hodiaŭ estas pli aktuala ol iam ajn por la mondo, kiu serĉas komunan lingvon – kaj laŭvorte, kaj metafore. Via komunumo atestas, ke dialogo, respekto al kultura diverseco kaj paca kunlaboro inter nacioj estas eblaj kaj necesaj.

Ni fieras, ke Litovio povas esti la hejmo de ĉi tiu sencoplana renkontiĝo. La ĉi-jara kunveno iĝu ne nur bonega okazo por interŝanĝi spertojn, sed ankaŭ ebleco por refoje plifortigi pontojn inter homoj, nacioj kaj ideoj.

Mi deziras al vi inspirajn diskutojn, novajn konatiĝojn kaj sencoplanan kuneston!

Kun respekto kaj sinceraj bondeziroj,

Juozas Olekas

Unua Vicprezidanto de la Sejmo de Litova Respubliko



Ministro pri Eksterlandaj Aferoj de Litovio Kęstutis Budrys



Estimataj gesinjoroj,

nia mondo estas komuna. Ĉi tiun esperantistan idealon – unu mondo – atestas ĉiu el vi, kunvenintaj al la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Kaŭno, en la urbo, kiun vizitis ankaŭ la kreinto de Esperanto, Ludoviko Lazaro Zamenhof kaj kie lia ideo, kunligi malsamajn popolojn per ponto de neŭtrala lingvo, estis akceptita.

La lingvo kreita de la fama litvaka* humanisto ne estas nur lingvistika eksperimento, ĝi estas vivanta vizio de reciproka kompreno kaj universala harmonio. Ĝi estas lingvo de espero, kiu malfermas la eblecon transpaŝi lingvajn kaj kulturajn barojn, komuniki egalece kaj pace.

La nobla kredo de Zamenhof – de Doktoro Esperanto – je interkomprena kaj paca mondo estas aparte aktuala en la kunteksto de la hodiaŭaj geopolitikaj defioj. Ĉiutage mi vidas, kiom gravas la strebado krei komunan lingvon de valoroj, kiu preventus konfliktojn kaj helpus solvi ilin.

La strebado al paco, reciproka kompreno kaj dialogo inter popoloj neniam perdos sian valoron. UNESKO jam dufoje inkluzivis L. Zamenhof en la listojn de la plej famaj homoj en la mondo, emfazante la specialan signifon de ĉi tiu lingvo en la kampo de internaciaj kulturaj kaj intelektaj interŝanĝoj.

La heredaĵo de Zamenhof, kiun vi zorgeme flegas, inspiras ĉiam novajn generaciojn de parolantoj kaj certigas, ke Esperanto kaj de ĝi naskita filozofio de kunekzistado restu vivantaj kaj signifoplenaj.

Parafrazante la propran penson de Zamenhof, kiu sonis en la Unua Monda Kongreso de Esperantistoj, mi deziras, ke en Litovio ne renkontiĝu la reprezentantoj de diversaj naciecoj, sed unue - homoj kun homoj. Mi esperas, ke ĉi tiuj kunvenoj estos informaj kaj inspiraj. Bonvenon al Litovio!

Ministro pri Eksterlandaj Aferoj de la Respubliko Litovio
Kęstutis Budrys



*) Litvaka: jiddevena esprimo
(https://eo.wikipedia.org/wiki/Litoviaj_judoj)

Ministrino pri Edukado, Scienco kaj Sporto Raminta Popovienė

Estimataj,

mi sincere salutas ĉiujn partoprenantojn de la aranĝo, kiuj kunvenis por la antaŭjubileaj 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj. Por ni, Litovio, kiu estas forte ligita kun Ludoviko Zamenhof, estas honoro akcepti tiom da gastoj, entuziasmoj kaj amikoj de ĉi tiu lingvo.


Estas mirinde, ke la Esperanto ankaŭ hodiaŭ restas lingvo de paco, forta ponto de espero, kiu ligas landojn kaj homojn. Ĉi tiuj Baltiaj Esperanto-Tagoj ankoraŭ pli forte unuiĝos la ŝatantojn de Esperanto el diversaj landoj, ebligos profundigi la lingvajn sciojn, krei varmajn amikajn rilatojn, inspiros novajn ideojn kaj agojn.

Mia granda danko iras al la litovaj esperantistoj pro ilia tre aktiva kaj sencoplana multjara agado, pro la intense flegataj internaciaj rilatoj kaj pro la famigo de la nomo de Litovio.

Mi dankas la organizantojn de ĉi tiu evento – la Litovan Esperanton-Asocion, la Universitaton Vytautas la Granda, kaj la Mondan Centron de Litovoj – pro la gastema bonvenigo de la partoprenantoj, la enhavoriĉa kaj respondece preparita programo, kiu ebligas al la partoprenantoj plibonigi siajn esperantajn lingvokapablojn, agrable interkomuniki kaj konatiĝi kun Litovio.

Bonan, kreivan laboron, signifoplenajn kaj amikajn diskutojn, agrablajn impresojn al ĉiuj.

*Sincere **Raminta Popovienė**,
Ministrino pri Edukado, Scienco kaj Sporto*



Ministro pri Kulturo de la Respubliko Litovio Šarūnas Birutis

Estimataj partoprenantoj kaj gastoj de la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj,

mi sincere salutas Vin en ĉi tiu signifa internacia festo, kiu kunigas entuziasmulojn el pli ol 30 landoj de la mondo, unuigitajn per la unika fenomeno de Esperanto.

Litovio fieras pri siaj historiaj ligoj kun Esperanto. Ĝuste ĉi tie, en Kaŭno antaŭ pli ol jarcento, naskiĝis kaj fortiĝis la Litova Esperanto-Asocio. Ĝia agado ankaŭ hodiaŭ estas vigla kaj grava por la tutmonda esperantista komunumo. Mi precipe volas emfazi la kontribuon de prof. Adomas Jakštas-Aleksandras Dambrauskas, la unua esperantisto en Litovio, al la disvastigo de ĉi tiu lingvo.

Hodiaŭ la Litova Esperanto-Asocio estas forta kaj respektata organizaĵo, kiu aktive kontribuas al interkultura kunlaboro, proksimigo de popoloj, diskonigo de la nomo de nia lando kaj disvolvigo de kulturo en la mondo. Viaj iniciatoj atestas grandan entuziasmon kaj sindediĉon al la ideo de Esperanto kaj ĝiaj humanismaj valoroj.

La 59-aj Baltiaj Esperanto -Tagoj estas bonega okazo por daŭrigi ĉi tiujn belajn tradiciojn, interŝanĝi spertojn, krei novajn ligojn kaj kaj samtempe fortigi la esperantlingvan komunumon. Mi kredas, ke la programo de la aranĝo estos interesa kaj utila por ĉiu partoprenanto – eĉ por tiu, kiu unuafoje aŭdos pri Esperanto.

Mi deziras al Vi sukcesajn kaj memorindajn momentojn, novajn malkovrojn, inspirajn diskutojn kaj varman kuneston. La lingvo Esperanto daŭre servu kiel ponto, kiu konektas homojn, kulturojn kaj ideojn tra la mondo!

Šarūnas Birutis,

Ministro pri Kulturo de la Respubliko Litovio



Rektoro de la Universitato Vytautas La Granda Prof. d-ro Juozas Augutis



Estimataj partoprenantoj de la Baltiaj Esperantaj Tagoj,

mi salutas la tutan esperantistan komunumon, kiu kunvenis sub la volboj de la universitato Vytautas La Granda al sia tradicia, jam 59-an fojon okazanta aranĝo. La scio de lingvoj kunligas diversajn popolojn kaj ŝtatojn, certigas reciprokan respekton kaj toleremon, konstruas pontojn inter homoj de diversaj kulturoj. Kaj ĝuste la lingvo Esperanto estis kreita kun la celo faciligi komunikadon kaj kompreniĝon inter popoloj, ĝi estas unika fenomeno de la monda kulturo. Estas ĝojige, ke Litovio kaj Kaŭno ludas tre gravan rolon en la historio de la apero kaj evoluo de Esperanto. Por litovoj Esperanto estas eĉ pli kara, ĉar ĝin kreis homo de nia regiono, la mondfama litvako Ludoviko Zamenhof. Estas tre grave havi komunumojn, kiuj sincere zorgas pri la evoluo kaj antaŭenigo de la lingvo kaj kapablas unuigi samideanojn el diversaj landoj de la mondo. Subtenante ĉi tiun tradicion, vi kreas eblecojn por rekta komunikado en la internacia lingvo kaj por ĝia popularigo. Mi deziras al via komunumo fieri pri ĉi tiu kultura heredaĵo, ankoraŭ pli zorgeme flegi Esperanton kaj evoluigi la internacian esperantistan movadon, konservi la senton de komuneco, kiun vi kreis dum la tuta ekzistoperiodo de Esperanto. Nur dank' al via komunumo kaj via entuziasmo la famo pri Esperanto disvastiĝas tra la tuta mondo kaj allogas pli kaj pli da homoj. La universitato, ene de kies muroj ni ĉiuj troviĝas, estas malferma al diversaj ideoj kaj iniciatoj. Ĝuste tial ni subtenas Esperanton kaj por tiu celo ni subskribis kunlaboran kontrakton kun la Litova Esperanto-Asocio. La Baltiaj Esperanto-Tagoj estas eble la unua ekzemplo de tiu kunlaboro. Mi kredas, ke via ĉeesto en Kaŭno, ĉe la universitato Vytautas La Granda, donos al vi novajn ideojn kaj instigos vin al novaj agadoj en via sencohava kaj profunde humanisma laboro.

Prof. d-ro Juozas Augutis, Rektoro de la Universitato Vytautas La Granda



Urbestro de la urbo Kaŭno Visvaldas Matijošaitis



Estimataj partoprenantoj de la Baltiaj Esperanto-Tagoj,

estas por mi ĝojo bonvenigi vin al Kaŭno – urbo, kiu gardas malnovajn tradiciojn kaj instigas novajn ideojn kaj internacian kunlaboradon.

Por ni estas granda honoro, ke ĉi-jare ĝuste ĉi tie kunvenis via komunumo el homoj de diversaj landoj, unuigitaj per komuna lingvo kaj komunaj valoroj.

Mi deziras, ke ĉi tiuj tagoj en nia urbo fariĝu memorindaj por vi. Tiu ĉi tempo pli-fortigu la ligojn, instigu novajn dialogojn kaj permesu al vi sperti la gastamon de Kaŭno.

Mi deziras al vi enhavoriĉan, inspiroplenan kaj amuzan tempon!

*Urbestro de Kaŭno
Visvaldas Matijošaitis*



Salutmesaĝo de la prezidanto de UEA al BET-59 en Kaŭno, 2025

Estimataj Kongresanoj de BET-59,

estas ĉiam plezuro kaj privilegio por prezidanto de UEA saluti la renkontiĝon de BET, ĉi-jare la 59-an de la internacie konataj Baltiaj Esperanto-Tagoj. Universala Esperanto-Asocio ĝojas aŭspicii eventon, kiu atestas pri la vigleco de la regiona agado kaj specife tiu de la gastiganta lando. Revenis la vico de Litovio tri jarojn post kiam mi vizitis BET-56 kun mia edzino, kie en la havenurbo Klaipėda ni ĝuis sammonate semajnon kiu montris modelon de ĝuinda festado de la Esperanto-kulturo, kun sciencaj kaj aliaj edukaj programoj kies organizado ripetigas por daŭre klerigi la ĉeestantojn.

En la nova Strategia Laborplano de UEA reliefigas la bezono plifortigi kaj la Landajn Asociojn kaj la reciprokan kunlaboradon en regionaj planoj kaj renkontiĝoj. Ju pli ni sukcesas kunlabori por atentigi la publikon kaj decidofarantojn pri la valoro de nia lingvo, samtempe ĝuante la kunestadon, kiun faciligas nia lingvo, des pli ni povas proksimigi la popolojn al la paca kunvivado, kiun ili meritas. Ni ne nur sopiru, sed espereme insistu, ke la natura evoluo de la homaro forigu konfliktojn kaj perfortadon favore al komunikado, kiu per sia justa egaleco spegulas la plej altajn aspirojn de la homaro.

Vi havos la okazon konatiĝi kun Kaŭno, sidejo de la Litova Esperanto-Asocio kaj centro de agado por nia lingvo, historie markita kun stratnomo de la familio Zamenhof. Via amase vizitata evento garantias la daŭrigon de tiu laŭdinda tradicio, kiu kunportas la torĉon de tiu paciga donaco de d-ro Zamenhof, pri kiu ni ĉiuj rajtas fieri, kondiĉe ke

ni mem dediĉos nin al progresigo de lia klarvida ideo loke, regione, kaj transnacie. Kiel? Interalie per individua subteno de la ĉiam kreskanta agado de UEA, kuniganta individuan kaj regionan agadon. Nepre adaptiĝanta al la bezonoj de mondo, kiu ne havas alternativon ol evoluo en ĉiam pli pacan direkton, per rekta komunikado inter individuoj kaj popoloj. Por tion atingi, ni lernu labori preter la limoj de nacia politiko, generacioj, kulturaj kaj konduktaj diferencoj, konfliktaj personaj opinioj — kaj ĝuu tiun diversecon!

Profitu la donacojn de viaj gast-prelegantoj, kaj montru al la mondo, ke ni scias celtrafe kaj ĝoje kunpilgrimi al celo, kiu benos la tutan homaron.

*Prof. d-ro Duncan Charters,
Prezidanto de UEA*



BET-59 – salutmesaĝo de la Prezidanto de EEU



Kiel Prezidanto de EEU estas denove mia honoro kaj plezuro sendi varmajn salutojn kaj gratulojn al la 59a BET. Viaj landoj havas riĉegan Esperanto-tradicion kaj mi tre ĝojas, ke via eminenta agado daŭras jaron post jaro.

Ofte estas dirata, ke guto da oficiala agnosko fare de ŝtato egalas al tuno de unuopula civitana agado. Pro tio, la strategia celo de EEU nuntempe estas, ke pli kaj pli multaj EU-landoj oficiale agnosku Esperanton kiel portanton de kulturo, kaj nacia kaj eŭropa kulturo. Pollando oficiale agnoskis Esperanton en 2014, kaj Kroatio faris tion en 2019.

Litovio, kiel naskiĝlando de Klara Zamenhof kaj kie laboris Ludwig Zamenhof, estas en aparte bona pozicio por oficiale agnoski Esperanton kiel parton de sia nemateria kultura heredaĵo.

EEU deziras al niaj litovaj kolegoj fruan sukceson en viaj klopodoj atingi oficialan litovan agnoskon por Esperanto. Kiam tri landoj donos tiun ĉi oficialan agnoskon, UNESKO estos en pozicio agnoski Esperanton kiel parton de la kultura heredaĵo de la mondo. Ĉi tio estos grandega helpo por pli popularigi nian lingvon.

Samideane via

D-ro Seán Ó Riain
Prezidanto de EEU



Salutmesaĝo de la Prezidanto de la Organiza Komitato por la partprenantoj de BET-59

Karaj partoprenantoj de BET-59!

Bonvenon al nia tradicia esperantista aranĝo, kiu ĉi-jare okazas en la dua urbo de Litovio Kaunas – ĉefurbo de Esperanto-movado en Litovio. Urbo, kie Esperanto-movado ĉiam estis aktiva. Ne laste ankaŭ pro tio, ke Kaunas estas forte ligita kun apero de Esperanto ĝenerale kaj kun la vivo de Zamenhofa familio konkrete.

Baltiaj Esperanto-Tagoj estas unika fenomeno en la internacia Esperanto-movado, funkcia jam dum pli ol 60 jaroj. Aperinte en 1959 dank' al iniciato de tiutempaj junaj esperantistoj – studentoj kiel modesta renkontiĝo, ĝi tuj evoluis al amasa kaj tiutempe preskaŭ sola esperantista aranĝo en la tuta tiutempa Sovetunio. Kaj post sendependiĝo de Baltaj ŝtatoj ĝi ne nur konservis sian tradicion kaj identecon, sed laŭ geografio de la partoprenantoj ĝi etendiĝis tra tuta Eŭropo kaj eĉ pli foren. BET kiel historia fenomeno eltenis influon de la tempo kaj de la esencaj politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj, ĉar ĝi en si mem havas iaspecan internan forton, altirantan multajn homojn kaj post vasta internaciigo ĝi ekhavis multajn novajn kolorojn kaj aspektojn.

Ĉi-jara BET vere elstaras pro tre riĉa, interesa, diversflanka, streĉa kaj intensa programo, en kiu ĉiu povas trovi ion interesan por si.

Litovio nur antaŭ iom pli ol 35 jaroj revenis al la politika mapo de egalrajtaj nacioj kaj ŝtatoj. Tamen Litovio havas longan historion, antikvan lingvon, unikan kulturon, belegan naturon. Mi esperas, ke la partoprenantoj de BET-59 ĉion tion ekvidos kaj ekspertos senpere kaj revenos hejmen pli riĉaj kulture kaj spirite. Des pli, ke ni estas en la urbo, kie Esperanto kaj bela ideo de interpopola kunlaboro kaj amikeco ne estas fremda.

Bovenon al Litovio! Bonvenon al Kaunas! Belegajn, interesajn kaj utilajn tagojn !

*Povilas Jegorovas, Prezidanto
de Litova Esperanto-Asocio*



Organiza Komitato de BET-59



Definitiviĝis la konsisto de la organiza komitato (OK) de la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-59), kiuj okazos de la 5-a ĝis la 13-a de Julio 2025 en la Litovia urbo Kaŭno.

Povilas Jegorovas: prezidanto, kunordigo, ĝenerala gvidado, informado.

Dr. Vilma Bijeikienė: vicrektoro pri komunikado de la universitato Vytautas La Granda.

Dr. Teresė Ringailienė: direktorino de la Instituto pri fremdaj lingvoj de la universitato.

Valdas Kubilius: direktoro de la Monda Centro de litovoj.

Agnė Augonė: estrino de la kultura fako de la urba administracio de Kaŭno.

Asta Nastaravičiūtė: respondeca sekretario de Litova Esperanto-Asocio.

Aida Čižikaitė: prelegserio pri la litovaj lingvo kaj kulturo.

Gražina Opulskienė: instruado de Esperanto.

Dalia Pileckienė: kultura programo.

Aušrinė Tamošiūnaitė: junulara programo.

Ada Navickienė: administrado de la kongresejo.

Virginija Jokubkaitė: arta aranĝado de BET-59.

Vladimiras Beresniovas: artaj aferoj.

Aleksander Korĵenkov: informado pri BET-59.

Taesok Choe: retejo de BET-59.

Paweł Fischer-Kotowski: *Kunfluo*, la ĉiutaga gazeto de BET-59.

Irena Jagminaitė: libroservo, financoj.

Antanas Visockas: ekskursoj.

Gražvydas Jurgelevičius: fotoservo.

Jolanta Bulotė: registrado, informado.

Olga Strojėva: registrado, informado.

Vera Valentaitė: registrado, informado.

Vita Petronytė: registrado, informado.

Inesa Balaikienė: registrado, informado.

Jolita Ružauskienė: registrado, informado.

Solveiga Sadauskaitė: registrado, informado.

Darius Kubilius: mastrumaj kaj teknikaj aferoj.

Ramūnas Narbutas: mastrumaj kaj teknikaj aferoj.

Sigitas Sidaravičius: mastrumaj kaj teknikaj aferoj.

*Povilas Jegorovas,
prezidanto de Litova Esperanto-Asocio
prez. de la organiza komitato de BET-59*

10 interesaj faktoj pri Kaŭno

1. Nekredeble, sed estas vero – Kaŭno havis la plej longan ponton en la mondo. En la 19-a jarcento kaj ĝis la komenco de la 20-a jarcento, ĉi tiu iama ligna kaj pontona ponto trans la rivero Nemuno (nuntempe ponto de Vytautas la Granda) estis „la plej longa” en la mondo. Tiel ĝin nomis la lokaj loĝantoj, ĉar por transiri ĝin de unu bordo de Nemuno al la alia, necesis eĉ 13 tagoj. Ja tiam ĉe la maldekstra bordo de Nemuno situis Aleksotas, kiu troviĝis en la teritorio de Prusio, kaj ĉe la dekstra – Kaŭno, kiu tiam apartenis al cara Rusio. En Prusio validis la gregoria kalendaro, dum en la okupaciita de Rusio centra Kaŭno – la Julia kalendaro. La diferenco inter ĉi tiuj kalendaroj estas 13 tagoj.

2. La germana fizikisto Albert Einstein estis unu el la lernantoj de la fama matematikisto kaj fizikisto Hermann Minkowski, kiu naskiĝis en Aleksotas, Kaŭno.

3. La portreto de la fama israela verkistino, poetino kaj esploristino de literaturo Lea Goldberg (1911–1970) troviĝas sur la averso de la 100-ŝekela israela monbileto. Lea Goldberg pasigis sian infanaĝon kaj junecon en Kaŭno. En 1935 ŝi forveturis al Palestino. Por la plej multaj ŝiaj poemoj estis komponita muziko, kaj ili fariĝis kvazaŭ parto de la popolararto, transdonataj de generacio al generacio. En 2020, la projekto de strata arto en Kaŭno vekis de forgeso la faman poetinon. La murpentraĵon kun ŝia portreto eblas vidi sur domo ĉe Keŝtuĉio, strato 16B (aŭtoro: la artisto Linas Kaziulionis).

4. La 21-an de Majo 1939 en Kaŭno estis malfermita sportohalo (kun 3.500 sidlokoj, entute povis gastigi 11 mil spektantojn) – ĝi estis la unua konstruaĵo en Eŭropo speciale destinita por korbopilko. Samjare la vira teamo de Litovio gajnis la Eŭropan ĉampionecon la duan fojon.

5. Post kiam la poloj okupis la regionon de Vilno kaj la urbon mem, Kaŭno fariĝis provizora ĉefurbo de Litovio. La transformiĝo de la urbo egalas al miraklo. La identeco



de Kaŭno radikale ŝanĝiĝis: dum malpli ol 20 jaroj la urbo kun lignaj kabanoj ĝi transformiĝis en modernan. Inter la mondmilitoj Kaŭno estis nomata „la eta Parizo”. En 1935 en la ĉefa strato de la urbo – Laisvės aleo – estis 10 bankoj, 7 hoteloj, 5 restoracioj, 6 kafejoj, 9 manĝejoj, 5 kinejoj, 11 librovendejoj. La konkurenco inter densaj modernismaj konstruaĵoj de la urbo estis unika fenomeno en la tuta Eŭropo, reflektanta la tiutempajn stilajn tendencojn. En 2023 la konstruaĵoj de Kaŭno, ilia diverseco kaj kunliga optimismo estis rekonitaj kiel esceptaj ne nur en Litovio, Eŭropo, sed ankaŭ en la tuta mondo. La modernisma arkitekturo de Kaŭno ricevis la statuson de UNESKO-heredaĵo.

6. Situant en la centro de la kvartalo Žaliakalnis, parko Ažuolynas (Kverkaro), estas la plej granda parko en Eŭropo, konsistanta ekskluzive el kverkoj.

7. En 1931 en Kaŭno estis kreita la unua plenlonga litova filmo „Onytė kaj Jonelis” („Anjo kaj Joĉjo”), kies premiero okazis en la tiutempe plej moderna kinejo de Kaŭno – „Forum” (nun ĉe Laisvės al. 46A).

8. En 1970 en Kaŭno ekestis la unuaj diskotekoj ne nur en Litovio, sed en la tuta Sovetunio. Ili estis ligitaj kun la kulta rokgrupo „Raganiai” („Sorĉistoj”) kaj kun iliaj samideanoj – la popklubo „Smūtkeliai” („Zorgantoj”).

9. Dum la soveta tempo sub la granda altaro de la preĝejo de Sankta Francisko Ksaverio (jezuito) en Kaŭno estis instalita finna saŭno, kiun uzis la sovetaĵ nomenklaturaj (privilegiitaj partianaj) oficistoj de la urbo.

10. En 1936 la urba administracio de Kaŭno instalas apartan fermitan areon en la plaĝo de Panemunė ĉe Nemuno, nomatan „Sunaj bankuvoj”, kie viroj kaj virinoj povis sunbruniĝi nudaj kontraŭ pago de 20 cendoj.

Antanas Visockas

Organizanto de ekskursoj BET-2025



**La murpentraĵo
de la fama israela verkistino
Lea Goldberg.**



Ažuolynas, la plej granda parko el kverkoj en Eŭropo.

Baltiaj Esperanto-Tagoj: Historia tabelo

Dum la Sovetunia periodo la Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET) por la esperantistoj de USSR anstataŭis la Universalajn Kongresojn de Esperanto, kiujn sovetunianoj preskaŭ ne povis partopreni.

Komence la aranĝoj nomiĝis Ĉebaltaj Esperantistaj Tendaroj (ĈET), poste Baltiaj Esperanto-Tendaroj (BET) kaj fine Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET). La plej unua ĈET okazis la 1-an – 14-an de Aŭgusto 1959 en Baltezers (Latvio) kun nur 48 partoprenantoj. Ekde tiam ĈET/BET estis okazigata laŭvice en Latvio, Estonio kaj Litovio.

BEToj ankaŭ iusence anstataŭis Baltiajn Esperanto-asociojn, kiujn ne eblis fondi en Sovetunio, kaj servis kiel organiza kaj kunlabora forumo por esperantistoj de la tiutempaj Baltiaj respublikoj de Sovetunio.

BEToj ne okazis en 1973 kaj dum 1979-1982, ĉar tiutempaj Sovetuniaj instancoj ne permesis organizi ilin. En 1992 en Litovio BET ne okazis, ĉar tiujare Litoviaj esperantistoj gastigis la 65-an kongreson de SAT, tamen ĉi tiu kongreso enhavis ĉiujn ĉefajn programerojn de BEToj, kaj eblas konstati, ke la tradicio ne estis rompita. Pro la koronvira pandemio BET-56, planita por Latvio, ne povis okazi en 2020 kaj 2021, kaj ĝi okazis en Julio 2022 en la Litovia havenurbo Klaipėdo.

Necesas menci, ke el BEToj evoluis ankaŭ la famaj SEJToj (Sovetiaj Esperantistaj Junularaj Tendaroj). SEJToj komencis sian vivon en Litovio – en 1967 BET-9 okazis en Vilno, kaj samtempe junuloj okazigis en la Litovia urbeto Kaltanėnai la unuan junularan tendaron, kiu ricevis la titolon SEJT-9. BET tre rapide kreskis al tutsovetia aranĝo, kaj post la sendependiĝo de la tri Baltiaj landoj ĝi iĝis internacia kongreso, kiun partoprenas esperantistoj el pluraj Eŭropaj landoj.

Apude estas la diagramo kaj tabelo de BEToj, preparita de Petras Čeliaskas. Ĝi antaŭ kelkaj jaroj aperis en Litova Stelo, kiun Čeliaskas redaktis, kaj nun ĝi reaperas en ĝisdatigita formo. En la postsovetunia periodo la plej amasaj estis tiuj BEToj, kiuj okazis en Litovio. Nur unu fojon (BET-46 en 2010) BET en Litovio havis malpli ol 200 partoprenantojn. Tiu tendenco estas facile klarigebla — la Esperanto-movado en Litovio estas pli amasa kaj pli vigla ol en Latvio kaj Estonio.

Povilas Jęgorovas

N-ro	Jaro	Loko	Lando	Part.
ĈET-1	1959	Baltezers	Latvio	48
ĈET-2	1960	Kääriku	Estonio	107
ĈET-3	1961	Molėtai	Litovio	204
ĈET-4	1962	Drabeši	Latvio	238
BET-5	1963	Vārskā	Estonio	288
BET-6	1964	Veisiejai	Litovio	153
BET-7	1965	Saulaine	Latvio	171
BET-8	1966	Pärnu	Estonio	117
BET-9	1967	Vilnius	Litovio	337
BET-10	1968	Ruba	Latvio	194
BET-11	1969	Viljandi	Estonio	400
BET-12	1970	Kretinga	Litovio	316
BET-13	1971	Smiltene	Latvio	189
BET-14	1972	Häädemeeste	Estonio	170
BET-15	1974	Rīga	Latvio	102
BET-16	1975	Helme	Estonio	222
BET-17	1976	Viekšņiai	Litovio	241
BET-18	1977	Rēzekne	Latvio	223
BET-19	1978	Kehra	Estonio	174
BET-20	1983	Noreikiškės	Litovio	358
BET-21	1984	Kuldīga	Latvio	299
BET-22	1985	Kose	Estonio	450
BET-23	1986	Smalininkai	Litovio	472

BET-24	1987	Saulaine	Latvio	406
BET-25	1988	Tallinn	Estonio	350
BET-26	1989	Noreikiškės	Litovio	608
BEK-27	1990	Jelgava	Latvio	435
BET-28	1991	Tartu	Estonio	422
SAT-65	1992	Noreikiškės	Litovio	452
BET-29	1993	Priekuli	Latvio	50
BET-30	1994	Pärnu	Estonio	100
BET-31	1995	Girionys	Litovio	203
BET-32	1996	Jūrmala	Latvio	208
BET-33	1997	Haapsalu	Estonio	162
BET-34	1998	Veisiejai	Litovio	253
BET-35	1999	Liepāja	Latvio	163
BET-36	2000	Tallinn	Estonio	201
BET-37	2001	Noreikiškės	Litovio	303
BET-38	2002	Rīga	Latvio	182
BET-39	2003	Tartu	Estonio	76
BET-40	2004	Birštonas	Litovio	257
BET-41	2005	Rīga	Latvio	150
BET-42	2006	Kuresaare	Estonio	137
BET-43	2007	Šiauliai	Litovio	322
BET-44	2008	Ventspils	Latvio	151
BET-45	2009	Paikuse	Estonio	121
BET-46	2010	Visaginas	Litovio	185
BET-47	2011	Malpils	Latvio	115
BET-48	2012	Pala	Estonio	44
BET-49	2013	Utena	Litovio	216
BET-50	2014	Jūrmala	Latvio	172
BET-51	2015	Tallinn	Estonio	74
BET-52	2016	Birštonas	Litovio	334
BET-53	2017	Liepāja	Latvio	203
BET-54	2018	Pärnu	Estonio	70
BET-55	2019	Panevėžys	Litovio	450
BET-56	2022	Klaipėda	Litovio	263
BET-57	2023	Ventspils	Latvio	117
BET-58	2024	Tartu	Estonio	55
BET-59	2025	Kaunas	Litovio	256



Aspiranto kaj Esperanto

Tio okazis antaŭ longe, antaŭ 53 jaroj. Mi hejmenvenis post servado en Sovetia armeo (tie mi havis rondeton por lernado de Esperanto).

Mi tuj daŭrigis mian interrompitan lernadon en vespera mezlernejo kaj eklaboris kiel simpla laboristo en granda Vilna uzino.

Komenciĝis somero. Post kelkaj semajnoj devis okazi Esperanto-tendaro en Estonio. Kiel mi ricevu ferion por iri al ĝi? Laŭ tiutempa ordo tio eblis nur post unujara laborado, sed mi staĝis nur duonjaron. Mi turnis min al mia senpera estro. Li ne kontraŭis, sed... Necesis iri al la uzina etatestro, kiu diru la decidan verdikton. Li estis malklera malnova komunisto, tre lojala al la soveta reĝimo. Mi iris al li kaj klarigis la situacion:


– Baldaŭ okazos Esperanto-tendaro en Estonio. Mi devas iri al ĝi, mia estro ne kontraŭas, ke mi ricevu ferion tiucele.

– Ĉu vi estas aspiranto!? – la etatestro ekmiris.

Laŭ tiutempa sciencista gradado, litovlingve kaj ruslingve, “aspiranto” estis magistro. Senreage al “aspiranto”, mi daŭrigis:

– La tendaro okazos en la somerumejo de la Tartua universitato.

– Vi, tia juna, jam estas aspiranto! Veturu, nepre veturu! – konsentis la estro. ►



Tiel mi la unuan fojon venis al esperantista renkontiĝo. Ĝi estis la dua Baltia Esperanto-Tendaro – BET. Nun la siglon BET oni deĉifras jene: Baltiaj Esperanto-Tagoj.

BET-oj penis servi kiel kompenso al la Sovetiaj esperantistoj, kiuj, krom kelkaj elektitoj, ne povis iri al Universalaj Kongresoj (UK) de UEA. BET-oj ĉiam pli kaj pli provis imiti la tagordon de UK, konservante ĉiam pli demokratian kaj pli amikecan medion ol tiu en UK.

En la dua BET okazis la unua Somera Universitato, ne tute simila al la Internacia Kongresa Universitato de UK. Ne similis la Somera Universitato de mia unua BET al serioza aranĝo: ĝi okazis en subĉiela sportista naĝejo, la aŭskultantaro kuŝis aŭ sidis preskaŭ senveste, la preleganto (vestita!) lokiĝis antaŭ ĝi en boato. Prelegis, ŝajne, nur tri personoj: unu estono, unu litovo kaj Boris Kolker, kiu nun estas membro de la Akademio de Esperanto. La Somera Universitato en BET iĝis tradicio. Prelegas tie ne nepre doktorgradaj prelegantoj, plej ofte – kompetentaj fakuloj.



◀ BET-2 en Kääriku (Estonio, 1960). Boris Kolker prelegas en la Somera Universitato.

Mia unua BET, malgraŭ sia modesteco, estas neforgesebla. Oni atribuis al mi la titolon “direktoro de Esperanto-teatro” kaj mi devis tuj organizi artvesperon. La koncerton partoprenis ĉiuj, kiuj kapablis kanti, muziki, deklami. En la sekva, la tria BET ni, la organizantoj, anticipe avertis partoprenontojn pri ebleco prezenti

siajn artnumerojn. Okazis litova vespero, dum kiu koncertis litovaj partoprenantoj (kompreneble, nur en Esperanto) kaj tiu de aliuloj. Tio por longe iĝis tradicio – koncerto de la mastraj kaj koncerto de la gastaj partoprenantoj. Kompreneble, la arta nivelo ne estis alta, sed ja ni koncertis por ni mem! Koncertis nur en Esperanto! BET-oj evoluis, kaj jam longe por esperantistoj koncertas lokaj profesiaj aŭ amatoraj artistoj, kiuj tiel diskonigas la landan kulturon. Foje oni povas de ili surprize aŭdi ankaŭ ion esperantlingve. Ĉi-jara BET-49 en la Litovia urbo Utena elstaros inter multaj BET-oj precipe pro la riĉa kultura programo kun multaj koncertoj esperantistaj kaj folkloraj prezentadoj de artistoj litovaj. Krome, unu vespero estos dediĉita al renkontiĝo kun urbanoj ĉe subĉiela scenejo apud la urba lago, kie dumvespere fajras koloraj fontanoj.

BET-4 okazis en la 1962-a jaro en Drabeši ▶ apud la urbo Cesis (Latvio). Laŭ la iniciato de Valdas Banaitis (dekstre kun glavo) en kaverna naturo estis prezentita la dramo *Amo estas pli forta ol morto* de la latva klasikulo Janis Rainis. Centre, kun bastono staras la tradukinto, malnova latva esperantisto Ints Čāče.

En BET-2 estonaj esperantistoj okazigis busan ekskurson tra vidindaj lokoj de Estonio. Sed kutime la organizantoj de BET-oj kontentiĝis pri piedekskursoj tra ĉirkaŭaĵoj. Lastatempe, imite al UK, en la programo de BET ekestis plena ekskursita tago. Ĉi-jare BET-49 ofertos kelkajn itinerojn tra pitoreskaj lokoj de la litova lando. Kaj ne nur –



dum unu el la ekskursoj oni konatiĝos kun bierfarado kaj gustumos diversajn bierojn. Se vi ŝatas bongustan (kaj nemultekostan!) bieron – Utena estas la urbo por vi! Kaj ne trinku bieron hejme, unusola, ĉar en Utena vi trovos samideanojn! Kiujn eblojn proponos, kien invitos sekvaj BET-oj – ĉu flugi al Luno? Mi ne riskas prognozi...



BET-6 en Veisiejai, Litovio, 1964. Kunveno.

BET ĉiam estis lingva praktikejo. Kaj ne nur. BET funkcias ankaŭ kiel novaĵagentejo. Primovadaj kaj prilingvaj prelegoj, fantazioj kaj realaj antaŭvido, diskutoj kaj kvizoj. En BET vi havos eblecon ekscii multe da kial?

Unu el la tradiciaĵoj de BET estas komuna manĝado en samloka manĝejo (vere, kiuj havas specialajn bezonojn povas nutri sin en iu apudejo). Komuna manĝado, same kiel komuna kantado (kiu nun malofte okazas) unuigas homojn. Ĝi prezentas bonan okazon por senĝena konversaciado, bonan ŝancon al junularo pli proksime konatiĝi kun samaĝuloj.

Alia tradicio de BET estas strebo de ĉiuj parolemuloj praktiki la lingvon, helpi al eksterlandanaj partoprenatoj kompreni la lokan kulturon. La plaĉa litova esperantistino Gražina Opulskienė rememoris jenan kuriozan okazintaĵon:

“Tuj antaŭ koncerto al nia grupeto venis du latvoj kiujn mi ne konis, ja estis nur mia dua BET. Ili aspektis simpatiaj uloj. Unu estis Aivars, la dua estis Janis, tion mi vidis sur iliaj ŝildo, kaj ambaŭ estis pli-malpli en mia aĝo. Ni tuj ekbabilis, kvazaŭ ni estus delonge konataj, kaj dum paŭzetoj inter la kantoj de folkloro trupo mi klopodis traduki al Esperanto, pri kio en tiu kanto temis. Aivars aŭskultis kaj komentis, Janis nur bele, ĝentile ridetis. Kiam la kantoj finiĝis, la muzikistoj invitis al dancado, sed neniu kuraĝis esti la unua paro. Janis rigardante min kun daŭre afabla rideto en bela litova lingvo diris: “Gražina, ni iru danci”. Mi miris pri la litova, sed ja ankaŭ mi kapablas eĉ japane diri “je via sano”, ni esperantistoj ja estas minipoliglotoj. Por iom puni lin pro la provo ŝoki min, mi respondis ankaŭ litove: “Mi ne kuraĝas kiel la unua paro”. Tio estis vera. Samtempe mi certis ke la latvo ne povos daŭrigi en la litova kaj konfesos, ke li ne komprenis, ĉu mi dancos aŭ ne... “Ankaŭ mi ne kuraĝas, sed iu devas esti la unua paro” – la latvo daŭrigis per la bela litova, iom kun latva akcento... “Diable!” – mi kriis. – “Ĉu vi, fiuloj, ambaŭ parolas la litovan kaj mi, stultulino, tradukadis al vi la kantojn dum la tuta koncerto?” Aivars ridegis, Janis kaptis min por danci. Nur post kelkaj jaroj mi ekscis, ke Janis bone parolas la litovan ekde sia junaĝo, kaj Aivars havas litovan edzinon kaj en lia familio la litova estas egalrajta lingvo kun la latva.”

En iu BET okazis prezentado de anekdotoj. Diverslandaj esperantistoj rakontis sialandajn anekdotojn. Novajn kaj ne tre novajn. Estis gaje. La programo de BET-49 ŝajne ne antaŭvidas ion similan. Tamen la vivo tute neatendite kreas anekdotajn situaciojn. En Esperantujo ekzistas speciala kategorio de lingvaj anekdotoj, kies herooj estas komencantoj. Ekzemple, en unu BET, kiun partoprenis pola familio, mi aŭdis, ke knabo laŭte vokis sian panjon: “Mamo, mamoo!” En la pola lingvo tio signifas “panjo”. Mi ŝerce interesiĝis: “ĉu via dekjarulo ankoraŭ bezonas mamon?” La polino ekridis, invitis la knabon kaj klarigis al la konfuzebla knabeto la diferencon inter panjo kaj mamoo.

Alia okazo estis kun alloga mezaĝulino. Komencanta rusa junulo, ŝajne, deziris amindumi ŝin. Li demandis ŝin: “kiom da langoj vi konas?” (En la rusa lingvo al la Esperantaj vortoj “lingvo” kaj “lango” respondas la sola vorto “jazyk”). Al la drasta demando la plaĉulino respondis krude: “piĉekulojn mi ne kalkulas!”

Dum ĉiu Esperanto-renkontiĝo oni konstatas, ke ne ĉiuj esperantistoj estas la samaj, ekzistas du specoj de esperantistoj – tiuj de la tradicia (Zamenhofa) orientiĝo kaj tiuj de netradicia. La tradiciuloj ĉie kaj ĉiam parolas Esperanton. Iuj eĉ sonĝas en Esperanto (post mia unua BET mi dum du noktoj sonĝis nur en Esperanto!). Esperantistoj de netradicia orientiĝo (malnovlingve: eternaj krokodiloj) dum Esperanto-aranĝoj interparolas nacilingve, ofte eĉ tre laŭte. Kial ili ne povas tion fari flustre eksterarange, kial oni penas restarigi la lingvan Babelturon – eĉ la ĉionscia Dio ne scias. Ili provas alkitimigi nin al krokodilado. Ni eble alkitimiĝus kaj... konkludus, ke Esperanto estas superflua en ĉi tiu moderna anglolingva mondo. Kiel ni iru la vojon celitan por ke la netradiciaj aspirantoj malvenku? Ni esperu kaj esperu, neniam laciĝe, ke Esperanto venkos en la mondo. Sed prefere ni aspiru al disvastiĝo de Esperanto. Komence ĝi venku en UK-oj kaj en BET-oj!

Iam, ankoraŭ en Sovetunio, kontraŭ esperantistoj de la netradicia orientiĝo batalis Verda polico – la kaptitaj netradiciuloj devis pagi punon al la tendara kaso. En la BET-oj de la 21-a jarcento oni likvidis la policon. Sed tio tute ne signifas, ke oni rajtas veni al BET por praktiki la anglan, la francan, la hispanan aŭ iun lokan lingvon (malgraŭ la egalrajteco de ĉiuj lingvoj!). Se tiun intencon vi havas, vi ne iru al BET-49! Kaj ankoraŭ. Oni rimarkis, ke en la 21a jarcento ĉion decidas mono. Jen Vilna esperantisto, kuracisto pri ĉina kaj korea medicino, Alfredas Maruška en la reklamfolio de sia kliniko anoncis, ke al ĉiuj, kiuj komprenas Esperanton, li donos 10-procentan rabaton. Al tiuj, kiuj Esperanton parolas – 20-procentan rabaton. Antaŭ nelonge venis al lia kliniko pacientino (ne esperantistino), kiu en Esperanto salutis la kuraciston kaj petis: “helpu min, sinjoro kuracisto”; ĉi tiel ŝi ricevis la anoncitan rabaton de parolanto. Tial, ŝajnas al mi, venontaj al BET tradiciaj esperantistoj havu similan aliĝrabaton! Vi ne insistas pri rabato?

La unua BET okazis en 1959, vere en tendoj, apud la Latvia ĉefurbo Rigo. Ekde tiam ĝi rondiras tra la tri Baltmaraj landoj – Latvio, Estonio, Litovio. La plej etnombra estis la unua: nur 48 partoprenantoj (kun dimanĉaj vizitantoj). La plej multnombraj estis: la Latvia BET-27 (1990) en Jelgava kun 435 partoprenantoj, la Estonia BET-22 (1985) en Kose kun 450 partoprenantoj, kaj la Litovia BET-26 (1989) en Noreikiškės kun 608 partoprenantoj. Al la lasta Litovia BET-46 (2010) en Visaginas venis 150 esperantistoj el 18 landoj. Oni diras, ke BET-49 en Utena estos pli multenombra ol tiu en Visaginas. Ĝi pretendas esti la plej impona BET en Litovio. Ĉu ĝi estos ankaŭ la plej utila BET, dependas ne nur de la organizantoj, sed ankaŭ de la partoprenantoj mem.

Kiam oni invitas min vojaĝi al esperantista renkontiĝo, mi hezitas kaj rezistas. Tiom da preparo... Elspezoj... Prefere mi restu hejme kun la edzino kaj televidilo – malpli da



problemoj. La duboj ne forlasas min eĉ kiam mi jam sidas en buso aŭ en aviadilo. Kiam mi atingas la celon, mi revenas hejmen kontenta – tamen mi estis tie! Nu, mi ne agitas vin. Vi decidu mem – iri al la ◀ kongreseto BET en Utena! Sciu tamen, ne vi estas la unua, kaj ne vi estos la lasta. Post vi al BET aliĝos ankoraŭ multaj, por ke vi ne estu la lasta!

Vytautas Šilas

BET-informiloj

Baltiaj Esperanto-Tendaroj (BET) siatempe estis mini-kongresoj de Esperanto en Sovetio. Okazante laŭvice en tri Baltaj Respublikoj, ili kunvenigis centojn da gesamideanoj el la tuta Esperanta landego.

Kiam mildiĝis la kontrolo kaj plifaciliĝis aliro al multoblīga tekniko, aperis la ebleco eldoni ĉiutagajn tendarajn gazetojn.

La nomo por la informilo estis elektata tiel, ke ĝi asociu kun la loko, kie BET okazis. Ekzemple, *BETulo* asociis kun betulo, ĉar BET okazis en lernejo de arbaristoj; *LAGA ONDO* memorigis pri la lagoj, kiuj ĉirkaŭas la urbeton Veisiejai; *MEANDRO* – pri meandroj de Nemano apud Birŝtonas; *BALENIDO* ornamas blazonon de Birŝtonas k.s. Tiuj ĉiutagaj gazetoj bone respegulas programon, etoson de la renkontiĝoj kaj statistikon de la partoprenintoj.

Jen listo de ĉiuj BET-informiloj, memori-gantaj amikajn kunflugojn de samideanoj en Litovio.

BET-folio, informilo de BET-26 (Noreikiškės, 1989). Aperis 7 kvarpaĝaj n-roj (A4), red. P. Čeliauskas, eldonkvanto 500 ekz.

Kongresvoĉo, ĉiutaga informilo de la 65-a SAT-Kongreso, okazinta en Kaŭno (1992). [Tiujare aparta BET ne okazis.] Aperis 11 kvarpaĝaj n-roj (formato A5). Red. P. Čeliauskas, eldonkvanto 500 ekz.

BETulo, informilo de BET-31 (Girionys, 1995). Aperis 7 dupaĝaj n-roj (A4), red. P. Čeliauskas, eldonkvanto 200 ekz.

Laga Ondo, informilo de BET-34 (Veisiejai, 1998). Aperis 7 dupaĝaj n-roj (A4), red. P. Čeliauskas, eldonkvanto 300 ekz.

BETago, informilo de BET-37 (Noreikiškės, 2001). Aperis 8 kvarpaĝaj n-roj (A4), red. P. Čeliauskas, eldonkvanto 300 ekz.

Meandro, informilo de BET-40 (Birŝtonas, 2004). Aperis 7 kvarpaĝaj n-roj (A4), red. P. Čeliauskas, eldonkvanto 300 ekz.

Sagisto, informilo de BET-43 (Šiauliai, 2007). Aperis 7 kvarpaĝaj n-roj (A4), red. Choe Taesok, eldonkvanto 400 ekz.

La Arĝenta Gruo, informilo de BET-46 (Visaginas, 2010). Aperis 7 kvarpaĝaj koloraj n-roj (A4), red. V. Šidlauskas, eldonkvanto 200 ekz.

Heroldo de Utena, informilo de BET-49 (Utena, 2013). Aperis 8 kvarpaĝaj koloraj n-roj (A4), red. V. Šilas, eldonkvanto 200 ekz.

Balenido, informilo de BET-52 (Birŝtonas, 2016). Aperis 8 kvarpaĝaj koloraj n-roj (A4), red. S. Marček, eldonkvanto 350 ekz.

Abelo, informilo de BET-55 (Panevėžys, 2019). Aperis 8 kvarpaĝaj koloraj n-roj (A4), red. S. Marček, edonkvanto 400 ekz.

Lumturo, informilo de BET-56 (Klaipėda, 2022). Aperis 8 kvarpaĝaj koloraj n-roj (A4), red. T. Choe.

Kunfluo, informilo de BET-59 (Kaunas, 2025). Aperis 8 4-paĝaj koloraj n-roj (A4), red. Paweł Fischer-Kotowski, eldonkvanto 300 ekz.



Kial “Kunfluo”?



Se vi ĵetas rigardon al la mapo de Kaŭno, vi tuj povas rimarki, ke la urbo troviĝas en la kunfluejo de du gravaj riveroj: okcidente de la urbocentro *Neris* enfluas en la pli grandan *Nemunas* (Nemano/Nemuno). Tiel la urbo markas la kunfluejon de la du riveroj.

Ni esperas, ke ankaŭ la ĉi-jara BET donos spacon por kunfluo. Ni venas al Kaunas el preskaŭ tridek landoj, kun malsamaj kulturoj, lingvoj, kutimoj. Sed dank’ al Esperanto ni povas kuniĝi – renkontiĝi kaj interkomunikiĝi – kaj krei kunfluejon de kulturoj kaj ideoj.

La riĉeco de tiuj interŝanĝoj respeguliĝos en la kutima ĉiutaga informilo de BET, ĉi-jare kun la nomo *Kunfluo*. Vi trovos en ĝi lastajn novaĵojn, informojn pri eventualaj programŝanĝoj, priskribojn de unuopaj programeroj, anoncojn, raportojn kaj... – ĉu eble ankaŭ vian propran kontribuadon?

Ankaŭ vi povas kontribui al *Kunfluo*! Viajn tekstojn kaj/aŭ fotojn vi povas sendi retpoŝte, per poŝtelefona aplikaĵoj (WhatsApp, Signal, Telegram) aŭ meti ilin en la redakcian leterkeston ĉe la akceptejo. La kontakt-informojn serĉu en la unua numero de la informilo.

Paweł Fischer-Kotowski

Paweł Fischer-Kotowski redaktos la ĉiutagan gazeton de BET-59



Paweł Fischer-Kotowski naskiĝis en 1990 kaj esperantistiĝis en 2005. Ekde 2010 li aktivas en la internacia Esperanto-movado, interalie kiel komitatano de UEA kaj ĝenerala sekretario de TEJO. En 2015 li volontulis plentempe en la Centra Oficejo de UEA.

En la jaroj 2009–2013 Paweł studis interlingvistikon en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznań (Pollando). Li redaktis la Jarlibron de UEA en 2016 kaj 2018, ekde 2018 ĝis nun li estas vicredaktoro de “La Ondo de Esperanto” kaj en la jaroj 2021–22 li redaktis la soci-kulturan revuon “Kontakto”.

Ekde 2019 Paweł Fischer-Kotowski instruas Esperanton, precipe en la reto (ekzemple en *Ekparolu!* de *edukado.net* kaj en la kursaro de Londona Esperanto-Klubo) kaj ankaŭ dum diversaj Esperanto-aranĝoj (en Grésillon, studsemajnfinoj en Nederlando kaj Belgio, kongresoj k. a.). Paweł helpas en la organizado de la KER-ekzamenoj, ankaŭ kiel ekzamenanto.

Profesie bibliotekisto kaj bibliografo, en la jaroj 2018–20 li laboris en la Nacia Biblioteko de Pollando. Ekde 2022 li vivas en Nederlando, kie li laboras en la Reĝa Biblioteko en Hago. Ekde 2024 Paweł redaktas la nederlandan Esperanto-revuon “Fenikso”.

Dum BET-59 Paweł Fischer-Kotowski redaktos la ĉiutagan kongresan gazeton *Kunfluo*.

Al Litovio

La unuan fojon la kanto „Al Litovio“, verkita de Mikaelo Bronŝtejn, sonis en BET-49 en Utena. Dum BET-52 en Birŝtonas ĝi sonis kelkfoje kaj fariĝis iaspeca himno de Litoviaj BET-oj. Jen estas vortoj kaj notoj de tiu kanto.

1. Dor-mas la-gej la-gej en' un' ar-ba-ru ha-re-mi-hi-ale
 fru-go-land. Jen la spa-co pa-ca, la te-ro la-ro por ti
 pa-zo-de-lu-va-gant', a-mi-bi-mi-mi-a kaj a-mi-li-na-
 ni ri-pe-las al' al' sen' kant', la-ty-mi fe-il-con en a-a
 al-mo La-bas va-ha-ras, Lie-lu-val La-bas va-ha-ras, la-bas
 va-ha-ras, la-bas va-ha-ras, Lie-lu-val

2. Mi flarbela ce la unua veni
 kaplis sencon de via ĉarm'.
 Kaj en koro mia loĝis bene
 milda ero de l' fera rarm'.

La vagojdo gajnas dum fruej fortas,
 sed post mia dumtira vag'
 la ripozo pacu hui es kantoj las
 Labas vakaras, l'elstas!

3. Denorau! borloja prebestas graco—
 en la purnu ne elbas ven'
 sed memora mia plu montras via, ne
 gardas sin ni ĉu mia en'.

Impetigas min la lauzita spiro,
 kaj denove kiu juna vant'
 vortojn simplajn kantas mi kiu aŭmro:
 Labas vakaras, l'elstas!

Nacia kaj ŝtata himno de Litovio

La 6-an de Julio estas ŝtata festo de Litovio. Laŭ la multjara tradicio la 6-an de Julio vespere je la 21-a horo en la tuta mondo litovoj kantas ĝin. Ni kantos ĝin ankaŭ dum la inaŭguro tago de BET-59. Tial ni publikigas ĝin en “Libro por BET-ano” kaj ankaŭ en la unua numero de “Kunfluo”.

Nacia glorkanto

*Litovi', patrujo nia,
lando de gloragoj!
Viaj filoj ĉerpu forton
el pasintaj tagoj.
Iru Via infanaro
nur laŭ virta vojo.
Ĝi laboru por bonfarto
kaj por homa ĝojo.
Hela sun' de Litovi',
obskurecon pelu for!
Por klerec' kaj justec'
age ni fervoru.
Amo al litova ter'
brulu ĉiam en la kor'.
Kaj por Vi, Litovi',
unueco floru!*

Tradukis: Petras Čeliasukas



Oni kantis
himnon en
la inaŭguro
de BET 37
en Kaŭno.
(Foto:
Gražvydas
Jurgelevi-
čius)

Tautiška giesmė
Nacia himno.

Vincas Kudirkas

Majestically

Lie tu va, Tė vy ne mū sū, tu did vy riū. Že me, iš pra ei ties. Tė vo sū nūs
Tė gul ta vo vai kai ei nā, vien tā kapi dō ry bės, tė gul dir bā. Tė vo nau dāi

1. tie stip ry bė se mīa. 2. ir žmo nių gė ry bėi. Tė gul sau lė Lie tu voj tam su mas pra
Tė gul mei le Lie tu vos de ga mū sū

1. Ša li na, ir švie sa, ir tie sa mūs žings nius te ly di
šir dį se, var dan tok Lie tu vos vie ry bė te žy di

Kaŭnaj Esperanto-objektoj



Mapo de Esperanto-lokoj en Kaŭno (Kaunas)

1. Urbodomo, Rotušės a. 2. Domo de A. Dambraskas, Rotušės a. 23. 3. Arkikatedro, Vilniaus g. 1. 4. Tombo de A. Dambraskas, Vilniaus g. 1. 5. Luterana kirko, Karaliaus Mindaugo pr. 3. 6. Zamenhofa strato, inter Vilniaus g. kaj Karaliaus Mindaugo pr. 7. Hejmdomo de Zirbernik, L. Zamenhof g. 5. 8. Est. Sinagogo, L. Zamenhofo g. 7. 9. LEA kongresejo, Vilniaus g. 42. 10. Prezidentejo, Vilniaus g. 23. 11. Eruditula liceo, J. Gruodžio g. 9. 12. Gimnazio, Laisvės al. 95. 13. Urbestra monumento, Laisvės al. 101. 14. Versalo, Laisvės al. 88. 15. Domo de Kocin, Laisvės al. 82. 16. Nobela klubo, Maironio g. 11. 17. Metropolo, Laisvės al. 68. 18. Vytautas-Universitato, S. Daukanto d. 28. 19. Litova Universitato, A. Mickevičiaus g. 23. 20. Laborpalaco kulturklubo, Laisvės al. 42. 21. Oficira domo, A. Mickevičiaus g. 19. 22. Terkultura Akademio, Kęstučio g. 18. 23. Loĝdomo de P. Medem, Grunvaldo g. 18. 24. Rusa gimnazio, Vytauto pr. 79. 25. Sindikata kulturpalaco, Vytauto pr. 79. 26. Jablonskis-Lernejo, Aušros g. 3.



Kaptu la okazon por trovi la urbon Kaŭno



La plur-jarcenta urbo Kaŭno (litove: Kaunas), kiu en 2022 estis la Eŭropa Kultura Ĉefurbo, en 2025 gastigos la 59ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn.

Veni al Kaŭno indas, eĉ endas ne nur pro BET mem. Estas tri gravaj kialoj, pro kiuj vi venu kaj konatiĝu kun la neordinara urbo Kaŭno. La unua, kompreneble, pro Esperanto mem, ja Kaŭno estas la koro de Litova Esperantujo. La dua – pro interesaj muzeoj kaj subĉielaj vidindaĵoj. La tria – pro tio, ke la Hereda Komitato de UNESCO dum sia sesio de 2023 aprobis la Petskribon de Litovio “Moderneca Kaŭno: optimisma arkitekturo, 1919-1939”. Tial 44 plej elstaraj konstruaĵoj de la intermilita Kaŭno ekhavis la statuson de Tutmonda Heredaĵo.

Ne ĉiuj esperantistoj scias, ordinaraĵoj turistoj des pli, ke Esperanto kiel reala internacia lingvo naskiĝis dank’ al financa subteno de kaŭnana Zilbernik, ke la biografio de L. L. Zamenhof estas ligita kun Kaŭno, ke en la urbo estas pli ol 30 konstruaĵoj, ligitaj kun la agado de esperantistoj, kaj vi povos ilin viziti mem, kiam ajn.

La skriba historio de la urbo Kaŭno komenciĝis antaŭ 660 jaroj, kiam germana kronikisto priskribis gvan militmarŝon de krucmilitistoj en 1361 – tiam li menciis la Kaŭnan kastelon (Castrum Kauenen). La urbonomo oni originas de la (famili)nomo Kaunas, eble, la unua kastelmastro estis iu Kaunas. Cetere, en Litovio pli ol 100 familioj havas ĉi tiun nomon. Laŭ popola etimologio la urbonomo devenas de la adjektivo “kaunus” (batalema).



Kastelo: Vi ekvidos la restaĵon de la Kaŭna kastelo ĉe la kunfluejo de la du plej grandaj litovaj riveroj Nemunas kaj Neris. La kastelon atakadis germana krucmilitista ordeno, eĉ kelkfoje detruis ĝin. Litovoj ĉiam rekonstruis ĝin. Nun la kastelo reprezentas la plej malnovan en Litovio gotikstilan ŝtonan fortikaĵon el la mezo de la 14-a jarcento.

La batalan pasintecon ilustras starigita

en 2018 apud la kastelo impona skulptaĵo de la litova **Rajdbatalanto** (forpelanto). ► La sama, kiun vi povas ekvidi sur la blazono de Litovio.

Kaŭno: La pli ol centjaran bataladon kontraŭ la kruckavaliroj sukcesis fini la litova regnestro grandduko Vytautas la Granda (baptonome – Aleksandro). Li multfoje vizitis la kastelurbon Kaŭno. Por li en 1990 en la ĉefstrato de la novurbo Laisvės alėja (Aleo de Libereco) aperis



elokventa monumento. Post li pri la landa kultura kaj ekonomia evoluo penis zorgi lia bonepo, grandduko Aleksandro (du jarojn antaŭ la morto li iĝis ankaŭ reĝo de Pollando). Tiu kelkfoje estis en Kaŭno kaj prezentis al ĝi kelkajn komercajn privilegiojn. Ankaŭ la grandduko Aleksandro estis honorita per impona monumento, starigita en 2024 ĉe la avenuo Vytautas. Pri la urba historio oni povas multon ekscii en la Kastela muzeo kaj en la Urbodoma muzeo, ankaŭ en la Milithistoria muzeo de Vytautas la Granda (vidu ĝin ĉi-sube).



Muzeo: En Kaŭno estas pli ol 40 muzeoj kaj muzeetoj. Ekzemple: Litovia Zoologia Ĝardeno (membro de Internacia Zooĝardena Asocio, 2166 animaloj de 232 specioj), Aviada, Popol-instrumenta, Medicina kaj Farmacia, Pupteatra, Botanika Ĝardeno, Sakrala (en preskaŭ 360-jara monaĥejo de Pažaislis). Dum BET vizitu almenaŭ unu el ili. Eble unusola en la mondo kaj tre vizitata estas la Diabla muzeo

de Žmuidzinavičius kun pli ol 3000 eksponaĵoj (la komencon por ĝi faris diableto, kiun al la fama pentristo donacis la ŝatata verkisto pastro Tumas-Vaižgantas, dirinte “por ke diabloj hantu vin dumvive”. Tamen, plej vizitendaj estu en la urbocentro situanta la Nacia Artmuzeo de Mikalojus Konstantinas Čiurlionis (lian 150an naskiĝdatrevenon oni festos en 2025), kaj la Litova Etnografia muzeo subĉiela, situanta je 20 km orienten de Kaŭno.

La Litova etnografia muzeo estas unu el la plej grandaj samspecaj muzeoj en Eŭropo. Ĝi estis malfermita en 1974, surborde de Kaŭna maro (rivera lago), apud la urbeto Rumšiškės. Nun en la 195-hektara areo lokiĝas 149 konstruaĵoj de popola arkitekturo, prezentantaj ĉiujn etnajn regionojn de Litovio. La muzeo eksponas ne nur lignajn konstruaĵojn de tradicia arkitekturo (ĉefe), sed ankaŭ teksaĵojn, meblaron, metiaĵojn, agroteknikaĵojn ktp. Entute 51 mil 420 eksponaĵojn. En la muzeo okazas diversaj tradiciaj kalendaraj festoj. Lastjare la muzeon vizitis pli ol 150 mil personoj. Ĝi estas la plej bona loko por ekkoni litovan etnan kulturon! Por ekvidi ĉion rezervu ne malpli ol duontagon.

La Nacia belarta muzeo de Čiurlionis, fondita en 1921, posedas pli ol 355 mil eksponaĵojn el popolarto, litova pentra kaj aplika arto, numismatiko. Tamen plej gravas, ke la muzeo estas la sola loko en la mondo, kie estas kolektita preskaŭ la tuta verkaro de la genia litova pentristo, simbolisto kaj komponisto Mikalojus Konstantinas Čiurlionis (1875-1911). En la Eŭropa kultura historio li eniris kiel kreanto, kiu kunigis pentroarton kaj muzikon. La muzea galerio eksponas liajn pentraĵojn kaj grafikajn artaĵojn. Eblas akiri bonajn reproduktitaĵojn de liaj bildoj. En la muzea muzika salono oni povas aŭskulti sonregistraĵojn de liaj muzikaj verkoj. Krom la konstanta ekspozicio de liaj verkoj, en la muzeo okazas ekspozicioj de aliaj kreantoj, diversaj koncertoj.

Post la Unua Mondmilito, kiam fiaskis du ambiciaj imperioj – la Germana kaj Ruslanda, Litovia lando, ĝis tiam okupata de Ruslanda Imperio, restarigis sian sendependecon. Tamen tuj la najbara Pollando (ĝis tiam aliancano!), subtenita de Francio kaj Granda

Britujo, kanajle militokupis la litovan ĉefurbon Vilno kaj la ĉirkaŭan teritorion. Tiam, januare 1919 la urbo Kaŭno iĝis provizora ĉefurbo de Litovio, ĝia spirita, kultura, kleriga kaj ekonomika centro. Nur dum 20-jaroj de tiu „provizoreco“ Kaŭno el postrestinta provinca rusimperia provinca urbo, kie dominis lignaj konstruaĵoj, subite transformiĝis al moderna Eŭropa ŝtona urbo! Tion grave kontribuis arkitekturo. En Kaŭno estis konstruitaj centoj da ekskluzivaj konstruaĵoj. Ilin projektis kapablaj arkitektoj, kiuj studis kaj ĉerpis arkitekturajn novaĵojn eksterlande.

En 2023, dum sesio de Hereda komitato de UNESKO, la tuto de Kaŭna moderneca kaj optimisma arkitekturo eniris la UNESKO-liston de Tutmonda Heredaĵo. Inter la plej memorindaj konstruaĵoj estas ankaŭ tiuj de Preĝejo Resurekto de Kristo, Oficira hejmo, Centra poŝtejo, lernejo Jablonskis kaj krome – la duopo galerio Ĉiurlonis kun Milithistoria muzeo. La liston eniras ankaŭ Kaŭna Sporta Halo, konstruita por la Eŭropa Korbopilka Ĉampioneco de 1939. La projektado daŭris 1,5 monatojn, la konstruado – nur kvin monatojn! Laŭ la aprezo de tiama Internacia Korbopilka Federacio ĝi estis “la plej bona korbopilka halo en Eŭropo”. Mi aldonu – tiam la litovia teamo iĝis la Eŭropa ĉampiono.

La historia parto de la urbo Kaŭno lokiĝas en malalta valo inter la riveroj Nemunas kaj Nèris. Pli novaj urbaj regionoj, la norda Žaliakalnis kaj la suda Aleksotas formiĝis altaĵe. Kiel unika transportilo por atingi tiujn du altaĵojn servas vagonaj tirleviloj funikularoj. La unua, tiu al Žaliakalnis, estis aranĝita en 1931. Ankaŭ uzu la okazon supreniĝi per ĝi al Žaliakalnis kaj iom paŝi al elstara modernisma arkitekturaĵo – la preĝejo Resurekto de Kristo kaj de ĝia surtegmenta teraso 43×15-metra por ĝui la vidon al la malnova kaj la nova urbo! Por tio uzu lifton aŭ 186-ŝtupan ŝtuparon ĉe la flanko enirejo de la preĝejo.

Kaŭno elstaras ankaŭ kiel studenta urbo, ve, somere vi tion apenaŭ eksentos. Tamen sciui – en ĝi funkcias pli ol dek universitatoj, en kiuj studas ne nur litovaj civitanoj. Plej multe da eksterlandanoj studas en la Kaŭna teknologia universitato – preskaŭ 1200 – kaj Litova sanscienca universitato – pli ol 500. Kaŭno estas tre litova urbo, sed ju pli vi de urbocentro proksimiĝos al la avenuo Vytauto, des pli ofte vi ekaŭdos nelitovlingvan parolon. Ja en la universitata komunloĝejo Baltija loĝas kelkcent eksterlandaj studentoj. Ne nur el Eŭropo, sed ankaŭ el Aziaj landoj Pakistano, Hindio, Honkongo, Vjetnamio. Kiel al ili plaĉas en Kaŭno? Kelkaj italinoj konfesis: “Ĉi tie al ni plaĉis pli multe, ol ni esperis”.



BET-59 okazas en la universitato Vytautas La Granda en Kaŭno.

Kaŭno estas ankaŭ sporta urbo – en ĝi funkcias Litova sporta universitato, en kiu studas studentoj el Germanio, Hispanio, Israelo, Finnlando, Turkio.

En Kaŭno okazas multaj internaciaj sportaj konkuroj. Ĝin oni nomas Litovia korbopilka ĉefurbo. La efektivigo de sportaj konkuroj en Kaŭno akiris altan aprezon de


internaciaj sportaj instancoj. Ĉiam pli ofte en Kaŭno okazas internaciaj konferencoj kaj aliaj aranĝoj. Kompreneble, ja kvanto de venantaj eksterlandaj turistoj senhalte kreskas. Plej multe da turistoj venas el najbaraj ŝtatoj – el Pollando kaj Latvio. Poste sekvas Granda Britujo, Germanio, Estonio kaj Nederlando. Trovas Kaŭnon ankaŭ turistoj el Skandinavaj landoj, eĉ el Japanio. Promene la plej vizitataj estas la Urba placo kaj la aleo Laisvės, sed vizitindaj lokoj estas ankaŭ ekster ili.



Post longa promenado tra Kaŭno vi laciĝos kaj malsatiĝos. Kie vi povus plej sate kaj plej bonguste manĝi? Nu, en Kaŭno funkcias multe da bonaj restoracioj kaj kafejoj (multaj el ili orientiĝas al eksterlandanoj kaj ornamis sin per anglalingvaj ŝildoj).

La organizantoj de BET informos vin pri apudaj lokoj, kie vi povus satiĝi. Mi, tamen, indiku du same proksimajn (de la centra kunvenejo) lokojn, kie vi povus ĝui litovajn manĝojn. Estas nemultekosta restoracio “Lietuviški patiekalai” (litovaj manĝaĵoj) en aleo Laisvės 21 (ĉe la preĝejo “Soboras”) kaj fajna kafejo “Bernelių užėiga” (Fraŭla gastejo) en strato Donelaičio 11. – Ĉu vi jam decidiĝis iri al Kaŭno, jes? Mi gratulas vin – vi faris ĝustan decidon!

Vytautas Šilas



De sukcenoj ĝis steloj: La jaro de Ĉiurlionis

La jubilean jaron de Mikalojus Konstantinas Čiurlionis, naskiĝinta antaŭ 150 jaroj, festos ne nur Litovio, sed la tuta mondo – diversaj jubileaj aranĝoj ondumos tra pluraj landoj de la mondo: de Suda Afriko ĝis Svedio, de Suda Koreio ĝis Hispanio.



Tamen la plej granda krea heredaĵo de Čiurlionis estas gardata en la Nacia artmuzeo de Čiurlionis, kiun okaze de la jubileo de la artisto oni kolorigis per la internacia ekspozicio: “De sukcenoj ĝis steloj: samtempuloj kaj samideanoj de M. K. Čiurlionis”.

M. K. Čiurlionis estis komponisto kaj artisto, kiu elprovis sin en literaturo kaj fotado; dum la mallonga sepjara periodo de kreado li kreis pli ol 300 pentraĵojn, pli ol 700 grafikaĵojn kaj skizojn, ĉirkaŭ 400 muzikajn verkojn, kiuj preskaŭ ĉiuj estas gardataj en la Nacia artmuzeo de M. K. Čiurlionis.

En la pentraĵoj de Čiurlionis estas rimarkebla tre klara siaspeca percepto de spaco, prezentanta impreson, kvazaŭ ĝi estis pentrita de birda flugo. Al pentraĵoj oni donas kromkoloron de kosma vido, profunda interna koncentriĝo. La artiston interesis demandoj pri la ekapero de la Universo, ĝia strukturo, spirito reganta la mondon, naturo kaj ĝiaj cikloj, esenco de la homa vivo, evoluo de psika stato kaj estado, eblo realigi principojn de muzika kreado en pentrado.

Muziko plenigis la vivon de Čiurlionis per plej diversaj formoj. Li aktive kreis eksterordinarajn verkojn, harmoniigis popolajn kantojn, gvidis korusojn, koncertis, verkis artikolojn.

Liaj grafikaj verkoj kaj skizoj helpas pli profunde kompreni lian pensofluon kaj motivojn, kiuj vekis liajn fluojn. Liaj inaj komponaĵoj elstaras pro virtuoza, preskaŭ juvelarta tekniko, riĉeco de strekoj kaj detalaj ornamaĵoj.

Čiurlionis estis scivolema kreanto, interesita ne nur pri filozofio, teozofio, kosmologio, diversaj religioj kaj mitoj, sed ankaŭ pri novaj sciencaj kaj teknikaj eltrovoj. Do, ne estas surprize, ke fotilo troviĝis en liaj manoj. Sur liaj fotoj estas kaptitaj momentojn de la somero 1905 pasigita en Kaŭkazo.



La jaro de Čiurlionis: de la marprofundoj ĝis la kosma infinito

En la Nacia artmuzeo de Čiurlionis estas prezentata internacia ekspozicio “De sukceso ĝis steloj: M. K. Čiurlionis, samtempuloj kaj samideanoj”, dediĉita al la 150a datreveno de la plej fama litova komponisto kaj pentristo Mikalojus Konstantinas Čiurlionis. Ĝi ebligas novmaniere rigardi la verkaron de la

artista kaj la rilaton inter liaj plej ŝatataj temoj – la maro kaj la kosmo. En la ekspozicio estas prezentataj verkoj de Ĉiurlionis, liaj samtempuloj kaj nuntempaj artistoj, por kiuj gravas tiuj du temoj, malkaŝantaj la interrilaton inter arto kaj scienco. La verkoj alvenis el la plej famaj eŭropaj muzeoj: Tate Galerio, Brita Muzeo, Musée d'Orsay, Centro Pompidou, Muzeo de Wenzel Hablik kaj aliaj. Vizitantoj vidos pli ol 100 artverkojn, instalaĵojn kaj objektojn. La ekspozicio montras la profundon kaj novigan spiriton de Ĉiurlionis: de la marprofundoj ĝis la kosma senlimo.

En la ekspozicio estas prezentataj ne nur la ĉefverkoj de Ĉiurlionis, inkluzive de ĝis nun neekspoziciitaj verkoj, sed ankaŭ verkoj de samtempuloj kaj nuntempaj artistoj. Ĝi traktas la signifon de scienco, kiu influis multajn verkojn tiutempe kaj nun. Kelkaj artistoj, inspiritaj de Ĉiurlionis, kreis verkojn speciale por ĉi tiu ekspozicio. Tio refoje konfirmas, ke liaj ideoj restas aktualaj, liaj temoj estas universalaj, sentempecaj kaj daŭre inspiraj por nuntempaj kreintoj. La ekspozicio funkcios ĝis la 12-a de Oktobro 2025.

La sola loko en la mondo, kie troviĝas la tuta krea heredaĵo de Ĉiurlionis

La Nacia artmuzeo de M. K. Ĉiurlionis, fondita en 1921, estas unu el la plej gravaj kulturaj institucioj de Litovio, dediĉita al konservado kaj diskonigo de la nacia arta heredaĵo. Ĝi estas unu el la plej impresaj ekzemploj de modernisma arkitekturo kaj en 2023 estis registrita en la listo de Monda Heredaĵo de Unesko. La muzeo situanta en Kaŭno enhavas ampleksan kolekton reprezentantan la historion de la litova kaj monda arto ekde antikveco ĝis nuntempo.



Ĉi tiu muzeo estas la sola loko en la mondo kie estas konservata preskaŭ la tuta krea heredaĵo de M. K. Ĉiurlionis – la plej fama litova pentristo, komponisto, verkisto kaj publika aganto: pentraĵoj, muzikaj komponaĵoj, grafikaj verkoj kaj persona arkivo. En la renovigita ekspozicio de 2025 oni prezentos ne nur liajn pentraĵojn, sed ankaŭ lian multflankan kreadon: muzikon, grafikaĵojn kaj fotoĵojn. La verkoj estas montrataj en nova, moderna lumo, apud la verkoj de famaj italaj geniuloj.

La muzeo prezentas preskaŭ 600 jarojn da malnova arto, reflektante la tendencojn de la litova arto kaj kulturo. En la ekspozicio “Litova arto de la 14a ĝis la 19a jarcentoj” vizitantoj malkovros mezepokajn trezorojn, legendojn, rarajn verkojn, morton, eklezion kaj la mondon de la riĉuloj... En la interna korto de la muzeo vi povas viziti la unikan ekspozicion “Litovio de Krucioj” pri la litova tradicio de krucofarado. La ekspozicio “Arĥaikeco: litova popolarto de la 18a ĝis la 20a jarcentoj” prezentas la plej malnovajn aŭ neŝanĝiĝintajn formojn de la popola kulturo, neinfluitaj de urbaj aŭ industriaj efikoj.

La Nacia artmuzeo de M. K. Ĉiurlionis estas dinamika spaco de artaj dialogoj, kun ekspozicioj, esploroj kaj edukaj programoj, fleganta la ligojn inter la kultura pasinteco de Litovio kaj la tutmonda arta scenejo. Zorgante pri la nacia kaj internacia kultura heredaĵo, la muzeo estas grava.

Vizitu la muzeon dum BET-59. Pli da informoj pri la muzeo kaj ĝiaj sekcioj: www.ciurlionis.lt. FB: *CiurlionioDailesMuziejus*. IG: *ciurlionis.lt*. LinkedIn: *ciurlionio-muziejus*. YouTube: *MKCiurlionis*. *Vida Labanauskienė*

Tradukis el la litova *Aida Čižikaitė* kaj *Gražina Opulskienė*. Fotoj: *Justė Mocevičiūtė*.

Promenado tra Esperanta Kaŭno

Kaŭno (litove *Kaunas*) estas la urbo, dank' al kiu la internacia lingvo Esperanto aperis kaj realiĝis kiel viva lingvo. Do indas kaj endas promene konatiĝi kun la lokoj, kiuj memoras aktivecojn de Kaŭnaj esperantistoj.

Ni vojiros, ĉefe, laŭ la centra strato de la malnova Kaŭno, la strato *Vilniaus* kaj la grava strato de la pasintjarcenta Kaŭno – la *Laisvės alėja* (aleo de Libereco). Nian promenon ni komencu de la urbodoma placo – *Rotušės aikštė*, kiun sendube vizitis ankaŭ la aŭtoro de Esperanto Lazaro Ludoviko Zamenhof.

1. Esperanto en la Kaŭna urbodomo, – sur la Urbodoma placo

Sur la urboplaco dominas la konstruaĵo el la mezo de la 19-a jarcento kun la 53-metra turo, aperinta nur meze de la 19-a jarcento. Ĝi estas la Kaŭna urbodomo! Ĝia riĉa historio estas ligita ankaŭ kun Esperanto.

La 21-an de Januaro 1910 en la luksa ejo de la gubernia Urbodomo la nova Kovna Esperantista Societo aranĝis Koncertan Vesperon kun E-programo. La urbodomo estis ornamita per la verdaj E-flagoj, vestiblo funkciis du kioskoj kun E-literaturo. La solenan parton ĉestis honoraj personoj kun guberniestro Petro Verevkin, simpatianta Esperanton, entute preskaŭ 200 personoj. La aranĝo donis eĉ 70-rublan profiton (ĉirkaŭ 1700 €)!

Postmilita, la 15-an de Majo 1919 en la Magistrata urbodomo pri Esperanto prelegis Paŭlo Medem, tiam grava magistratano. La 6-an de Julio 1919 ĉi tie okazis la refonda kunveno de la antaŭmilita Kovna Esperantista Societo (poste: Kaŭna filio de Litova Esperantista Asocio). La novan estraron eniris la antaŭaj prezidanto Paŭlo Medem kaj viceprezidanto Aleksandras Dambrauskas. Sekretario iĝis ĵurnalisto Juozas Mačernis. Aliaj estraranoj estis: bofratino de L. L. Zamenhof Tereza Kocin (Terezija Kocinienė) kaj instruisto Apolinaras Opulskis.

La 4-an de Junio 1923, laŭ propono de A. Dambrauskas la Kaŭna Magistrato decidis, ke la strato *Pažų* en la malnova urbo ekhavu la nomon Zamenhofo.

Ekde la 15-a de Novembro 2017 en Kaŭna urbodomo ĝis la jarfino funkciis solida ekspozicio pri la vivo kaj agado de Lazaro Ludoviko Zamenhof, la frukto de kunlaboro de Pola Instituto (en Vilno) kaj Litova Esperanto-Asocio.



2. La loĝdomo de la unua litova esperantisto, – Rotušės a. 23 / Jakšto g. 2

Sur la fasado de la angula Urboplaca domo (flanke de la Urbodomo) la 6-an de Majo 1998 oni fiksas litovlingvan memortabulon. Ni legu: En ĉi domo dum 1906-1938 loĝis kultura kaj socia aganto, verkisto, profesoro de Peterburga Eklezia Akademio kaj profesoro




en Universitato de Vytautas la Granda, prelato Aleksandras Dambrauskas-Adomas Jakštas. Ve, sen mencio pri esperantisteco de la unua litova esperantisto, akademiano de Esperanto Akademio.

Aleksandras Dambrauskas (literatura nomo Adomas Jakštas), studento de Sankt-Peterburga Katolika Eklezia Akademio, pri ĵus publikigita Internacia Lingvo (la nomon Esperanto ĝi akiris ne tuj) ekinteresiĝis somerfine de 1887. Tuj, jam en Septembro 1887(!), li en korekta Esperanto skribis poŝtkarton al la aŭtoro Lazaro Zamenhof kaj tiel iĝis la unua lia E-korespondanto. Somere 1887 A. Dambrauskas estis ekzilita al urbeto Ustjuĝna de Novgoroda gubernio. Tie li preparis la unuan lernolibron de Esperanto por litovoj kaj nelegale presigis ĝin eksterlande (en Tilžė, 1890). Ekde 1902 li lektoris en la Eklezia Akademio, sed en 1906 li forlasis la profesoran postenon (ankaŭ la antaŭjare akiritan prezidantan postenon en la esperantista Sankt-Peterburga societo „Espero“) kaj junie revenis Kaŭnon. Tiam la ĉefa lia zorgo estis establo de Sankt-Kazimira Societo (kiu zorgu pri eldonado kaj disvastgado de kleriga litovlingva katolika literaturo. La 17-an de Oktobro 1906 la Societo loĝiĝis en la Urboplaca domo kaj en ties dua etaĝo la gvidanto A. Dambrauskas mem.

A. Dambrauskas elstaris kiel teologo kaj filozofo, poeto kaj matematikisto, publicisto kaj literatura kritikisto. Por malnovaj esperantistoj li estis konata kiel prelato Aleksandro Dombrovski. Li estis unu el fondintoj kaj la unua prezidanto de Litova Esperantista Asocio. Ankaŭ redaktoro de la revuo Litova Stelo. Estis li meritoplena personeco kaj por tutlitova nacia renaskiĝo kaj por E-kulturo. Kiel homo li estis firmavola kaj principa, lanta kaj sopira, kompatema kaj korekta. Distingis lin justeco, devoteco, laboramo. Li frue iris dormi – je 7-8 vespere kaj tre frue leviĝis – je la 3-a / 4-a matene. Post sinordiĝo la prelato kun promenbastiono paŝetis al la apuda Baziliko. Nedaŭran matenmanĝon sekvis laboro super vasta korespondado, trarigardo de gazetaro, korektado de malnetoj kaj presprovaĵoj. Antaŭ vesperiĝo li kelkhore promedadis en apuda ĝardeneto, aŭ laŭborde de rivero Nemunas. Ofte kune kun verkisto Juozas Tumas-Vaižgantas, kiu okaze de lia 70-jariĝo notis: „Pastro Dambrauskas estas eldirinta multe da novaj ideoj en la lingvoj litova kaj Esperanto“.

La 19-an de Februaro 1938 la 77-jara prelato Dambrauskas en malsanulejo mortis. La 20-an de Februaro li estis revenigita por adiaŭo en la hejman gastoĉambron (ties du ĉeangulaj fenestroj vidalvidas al la Urbodomo). Sekvatage por adiaŭi lin venis la Ŝtatprezidento Antanas Smetona. Poste studentoj la ĉerkon kun la forpasinto forportis eksteren, por grandpublika adiaŭo. Je la 16-a horo prelato Dambrauskas estis forakompanita al la Baziliko.



Prof. prelato Aleksandras
Dambrauskas .



Memortabulo
por A. Dambrauskas,
fotis Gražvydas Jurgelevičius.

3. Esperanto kaj la Kaŭna Arkikatedro Baziliko

Vilniaus g. 1

Ĉe nordorienta angulo de la Urbodoma placo staras la plej granda malnova preĝejo de la urbo. Ĝi kreskis el la gotika preĝejo, pri kiu oni mencias jam en la jaro 1413! Ofte ĝin damaĝis militoj kaj brulegoj. Post rekonstruoj kaj alkonstruoj ĝi en 1771 akiris la nunan aspekton. En 1895 la Papo Leono XIII atribuis al ĝi la Katedralan titolon (nun – Arkikatedro Baziliko).

Estas almenaŭ du personecoj, kiuj ligas la Arkikatedralon Bazilikon kun Esperanto. Unu el ili estis bona konatulo de A. Dambrauskas, orgenisto, korusgvidanto kaj komponisto Juozas Naujalis. Dum 1892-1934 li ĉi tie orgenis, prizorgis katedralan koruson. En 1901 li verkis muzikon por la poemo de A. Dambrauskas *Nova kanto*. En 1912 ankoraŭ por tri E-vortaj tekstoj (du de A. Dambrauskas, unu de Maironis). Aŭguste 1937 en la Arkikatedro estis inaŭgurita bareliefa memortabulo por li.

La alia elstarulo estas prelato Aleksandras Dambrauskas mem. Li ĉiutage en la arkikatedro, krom la lastaj vivomonatoj, celebris la matenan voĉlegan meson. Matene la 21-an de Februaro 1938 la supera arkiepiskopo Juozas Skiveckas celebris funebran meson kaj posttagmeze la ĉerko kun la forpasinta A. Dambrauskas estis akompanita al la Baziliko. Kun la verdstela standardo lin akompanis ankaŭ esperantista grupo, gvidata de Antanas Poška (prezidanto de LEA). Pri la ordo zorgintaj studentoj, intencis forpuŝi la esperantistojn, kriante: „Komunistoj!“ Ili estis humiligitaj, ĉar ja la stelo estis ne ruĝa, sed verda! La 22-an de Februaro ĉe la Arkikatedro okazis la amaspublika adiaŭo kun li. Tiam, pro la forpaso de A. Dambrauskas la Litovia Ministra Kabineto proklamis tutlandan dutagan funebron (la 21-an kaj la 22-an de Februaro) kaj ordonis pendigon de funebraj standardoj tutlande.

4. La tombo de Aleksandras Dambrauskas.

Ĉe la Arkikatedralo, Vilniaus g. 1

La 22-an de Februaro 1938 (marde) je la 16-a horo la amaso da popolo: membroj de Litova registaro, universitataj profesoroj, verkistoj, ĵurnalistoj, studentoj, armeanoj kaj koruso de la Pastra Seminario forakompanis la elstaran aganton de litova nacia reviviĝo Aleksandras Dambrauskas-Jakŝtas el la Arkikatedralo por la eterna ripozo. Estis multaj funebraj asociaj standardoj, sed neniuj floroj (tia estis volo de la forpasinto!). Sonoris sonoriloj de ĉiuj Kaŭnaj preĝejoj. Super la malnova Kaŭno adiaŭe traflugis aviadiloj. Ĉiuj moviĝis laŭ la norda katedrala muro ĝis la Bazilika kriptoj, aranĝita sub la Baziliko.



Neniuĵ adiaŭaj paroloj (la volo de la forpasinto!). La korpon de la forpasinta eminentulo studentoj lokigis en la episkopan kripton. Lin tien akompanis arkiepiskopo kaj episkopoj. Lokigis provizore, ĉar la prelato deziris esti entombigita ne en la katedralo-baziliko, sed en katedrala korto. Sonis la preĝkanto *Benedictus* (Beata). La tombon de Aleksandro Dambrauskas, kiun esperantistoj vizitas ne nur dum gravaj aranĝoj, ni vidas ĉe okcidenta parto de la Arkikatedra norda muro. Ĉe la tomba slabo sub la bronza bareliefo tekstas lia testamenta epitafo: Ni ne per propra fajro glimas kaj ne por si mem la lumon ĉirkaŭe verŝas...

5. Ekumenaj E-mesoj en luterana kirko,

*Karaliaus Mindaugo pr. 3
/ Muitinės g. 8a*

El la strato *Vilniaus* ni turnu nin dekstren, al la la rivero *Nemunas*. Tutapude vi ekvidos stari barok-romantikstilan Evangelian luteranan kirkon, konstruitan en la jaro 1683. Pro la insistado de tiama katolika eklezio, ĝi longe restis sentura, nur kun enkorta eniro. En 1862 oni permesis alkonstrui la turon kun la eniro el ĉefstrato. Dekomence la preĝlingvo estis la germana (tiam estis sufiĉe granda germanlingva komunumo). Ekde 1930 la mesoj ekestis litovlingvaj. Soveta ŝtato la preĝejeton forprenis de la kredantoj kaj nur oktobre 1992, laŭ la decido de Kaŭna magistrato, la luterana komunumo reakiris ĝin. Post kelkaj jaroj en ĝi eksonis ankaŭ Esperanto.

Inter la 31-a de Julio kaj la 7-a de Aŭgusto 1995 en Kaŭno okazis la 11-a ekumena kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) kaj la 49-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE). Por ke ili okazu en Kaŭno multe klopodis la membro de KELI luterano Erikas Laiconas, studento de Teologia Centro de Klajpeda Universitato. En la kirko okazis ekumenaj matenaj kaj vesperaj Sanktaj mesoj, kiujn servis internacia pastro-teamo! El Germanio, Britujo, Koreo, Francio kaj Litovio (el Kaŭno mem). Kiu Kaŭnano oferis la meson? Verŝajne iu Kaŭna katolika sacerdoto aŭ/kaj E. Laiconas mem. Ja ĝuste al tiu tempo E. Laiconas estis ĵus konsekrita kiel diakono.

6. La unua en Litovio Zamenhof-strato,

*inter la stratoj Vilniaus
kaj Mindaugo g.*

La Zamenhof-strato estas unu el la stratoj, kiuj ligas la straton *Vilniaus* kun la bordo de rivero *Nemunas*. Ĝis la somero 1923 ĝi havis la nomon



Pažų (Paĝia) kaj pli frue – Paĵeskaja. La 23-an de Oktobro 1922 la Kaŭna urbestro Jonas Vileišis formis specialan Stratnoman Komisionon „por atribui stratnomojn al tiuj stratoj, kiuj estas sennomaj aŭ posedas maltaŭgajn nomojn“. Ĝin eniris ankaŭ prelato A. Dambrauskas-Jakštas. La 30-an de Majo 1923 la Komisiono prezentis al la Urba Konsilantaro la stratnomaron en kiu tiama strato Pažų ekhavis la stratnomon Zamenhof (la aprobo la 4-an de Junio 1923). Venintaj al Kaŭno nazioj forŝiris la tabuletojn kun la nomo Zamenhof. En 1942 la strato ricevis la neŭtralan titolon Alytaus, kiu postrestis ankaŭ dum la sovetjaroj.

Tamen, en 1959 la E-mondo solenis la 100-jaran naskiĝan jubileon de Zamenhof. Tiam la malnova Kaŭna esperantisto Albinas Vebeliūnas kun kelkaj novaj esperantistoj studentoj vizitis prezidanton de la urba Plenumkomitato V. Kučinskas kun dezirpeto – restarigi la stratnomon Zamenhof. Samtempe la Plenumkomitato jam atingis letero de iu maldekstro-koncepta esperantisto el Vieno kun indigniĝo, ke „la strato de monda humanulo Zamenhof ĝis nun portas la nomon Alytaus, kiun al ĝi atribuis nazioj“. Fine, la 21-an de Oktobro 1959, „responde al la 100-jara jubileo de d-ro Ludoviko Zamenhof“, la Plenumkomitato „restarigis la veron“ kaj la strato reakiris la nomon Zamenhofo.

7. Hejmdomo de pionira mecenato Zilbernik

(Litova Esperanto Domo), L. Zamenhofo g. 5


Kion rakontus al ni la domo ĉe la strato Zamenhofo 5, la antaŭa Paĝia 3? Ke ĝi estas konstruita en 1856 kaj en ĝi dum kelkaj jardekoj loĝis la unua kaj la ĉefa mecenato de Esperanto Aleksandro (Sender) Lejboviĉ Zilbernik? Kaj ankoraŭ? Ke en ĝi la 23-an de Septembro 1863 naskiĝis lia edzino Klara “Kejla” Zilbernik (ŝi mortis decembre 1924 en Varsovio). Ŝiaj gepatroj – la patro A. Zilbernik kaj la patrino Goda (Hadasa) Mejerovna Beloŭ al Kaŭno venis el Bjalistoko (lit. Balstogė), la naskiĝurbo de Zamenhof, antaŭ la jaro 1850. Ge-Zilbernikoj havis eĉ 9 infanojn (4 filojn kaj 5 filinojn). Ses el ili iĝis esperantistoj! Du filinoj, Kaŭnaninoj, Fani (kun la edzo Paŭlo Ivenski), Tereza (edziĝinte Kocin) kaj la filo Jozefo (tiam loĝinta en Novjorko) partoprenis kune en UK-7 (1911, Antverpeno).



Domo de la E-mecenato Zilbernik,
fotis Danutė Statkuvienė.

L. Zamenhof la bopatran hejmdomon vizitis kelfoje. Unue, finmarte 1887, tuj post svatiĝo en la samstrata sinagogo. En 1889 li ĉi tien akompanis sian gravedan edzinon Klara kune kun 1,5-jara fileto Adamo. Ĉi tie la 1-an de Decembro 1889 naskiĝis ilia filino Sofia (en la Kaŭna rabinata libro la patro estis indikita tiel: Lazarj Markoviĉ Zamenhof). Tereza, la fratino de Klara, konfirmis: „foje li pasigis ĉi tie eĉ 10 tagojn“. Notoj kiam okazis lia lasta Kaŭna vizito forestas.

A. Zilbernik ekde la jaro 1858 estis kunposedanto de sapa fabriketo kune kun iu J. Ŝcaranski (tiu poste laboris pare kun sapoproduktanto S. Vislicki). Do, A. Zilbernik estis sufiĉe bonhava por poste subvencii Esperanton: al sia bofilo Lazaro Zamenhof li dote atribuis 1000 rublojn (aŭ 28,8 mil €). La bopatro, estante preskaŭ 60-jara, ellernis



**Sender Zilbernik,
des. Roberta Pušklevič**

Esperanton, en 1895 abonis gazeton „La Esperantisto“, kun la bofilo kaj eksterlando korespondis esperantlingve. Printempe 1906 li kun la nepo Adamo, Kaŭna lerninto, forveturis al Varsovio. Tie li la 27-an de Marto, suferinta malsanon, en la aĝo 74-jara mortis kaj estis sepultita en Varsovia juda tombejo.

En la jaro 1992, laŭ la dekreto de tiama litova premiero G. Vagnorius, la domo en la strato L. Zamenhofo 5, kiel senpere ligita kun tutmonda kaj litova Esperanto-historio, estis transdonita por limigita posedo al Litova Esperantista Asocio (LEA).

La 11-an de Decembro 1993, post nepra riparo, la sojlon de la historia domo trapaŝis la nepo

de L. L. Zamenhof – Ludoviko Kristoforo Zelenski-Zamenhof, veninta el Francio. Pri ĉi tiu evento informis Litova Televido, ankaŭ litovaj gazetoj. En la sidejo de LEA okazadis Estraraj kunsidoj, E-kunvenoj, E-kursoj, funkciis E-biblioteko (kun 4000 libroj!). Ĝin vizitis multaj eksterlandaj gastoj. Ve, en la jaro 2016 la Litova Posedaĵa Fonduso, la historian konstruaĵon transprenis el la flegado de Kaŭna municipo kaj perjuĝe elloĝigis la Asocian! Septembre 2022 ĝi vendis la domon aŭkcione kontraŭ 382 mil Eŭroj al iu neafiŝita privatulo, ŝajne eksterlandano. LEA, malgraŭ la perdo de la sidejo, obstine daŭrigas sian agadon.



**Louis-Christophe
Zaleski-Zamenhof**

8. Zamenhof-strata sinagogo, Zamenhofo g. 7

Paĝia-strate (nun Zamenhof-strato) en 1850 estis konstruita romanstila sinagogo. Ĝi poste ligis la vivon de Lazaro Zamenhof (tiam ankoraŭ nur Lazaro, ne Ludoviko) kun la urbo Kaŭno. En 2003 la konstruaĵo estis renovigita kaj nun en ĝi funkcias konferenca salono de Famili-Rilata Instituto.

Sian estontan edzinon, Kaŭnaninon Klara Zirbernik, L. Zamenhof unue renkontis aŭtune 1886 ĉe sia Varsovia konatulo, komercisto Josef Levite, kiam Klara tie vizitis sian pli aĝan fratinon Rozalja, edziĝintan al li. Tamen, la bofratino de Lazaro Zamenhof, Kaŭnanino Tereza Zilbernik-Kocin asertis, ke „Lazaro kun Klara konatiĝis en Kaŭno“! Inter tiuj du veroj estas neniuj kontraŭdiro. Temis ja pri posta rita konatiĝo de Lazaro Zamenhof kun Klara Zilbernik kaj kun ŝiaj gepatroj, kiam por tio li venis al la Kaŭno. La sinagoga ritaro antaŭvidis du procedurojn:



**Sinagogo en Zamenhofa strato,
fotis Vytautas Šilas.**

svatiĝon (Ŝiduĥ) kaj gefianĉiĝon. Litvakoĵ (litvanaj judoj) ofte kunigadis tiujn ĉi du procedurojn. Zamenhofaj biografistoj notis, ke la gefianĉiĝo de Lazaro Zamenhof kaj Klara Zilbernik okazis la 30-an de Marto 1887, sen indiko de loko. Ni aldonu la lokon – la gefianĉiĝo de la 28-jara kvietaj revulo Lazaro kaj gajhumora spritulino la 23-jara Klara okazis en malnova Kaŭno!

9. Palaco de LEA, kongresoj kaj Zamenhof-tagoj, Vilniaus str. 42

Preskaŭ apud la Zamenhof-strato staras la palaco de *Hotela*, Komerca kaj Priserva fako de Kaŭna Centro de Instruado pri Nutraĵa Industrio kaj Komerco, ĉe kies eniro meze de Decembro ekflirtas la Verda standardo. Ekde 2008 litovaj esperantistoj ĉi tie okazigas Jarkongreson de LEA kaj festas Zamenhof-tagon. Litovio havas plurjaran tradicion en Decembro festi Zamenhofan naskiĝtagon, ja Zamenhof naskiĝis (la 15-an de Decembro 1859) en la randurbo de etna Litovio, en Bjalistoko-Balstogė. Ni ĉiam



memoras, ke Ludoviko Zamenhof en 1907 kaj en 1912 klare deklaris, ke lia naskiĝlando estas Litovujo! La unua celebrado de Zamenhofa naskiĝtago okazis en Decembro 1909 en Kaŭno! Inter du mondmilitoj Kaŭnaj esperantistoj tiun tagon festis neregule. Post finfina reviviĝo de E-movado en sovietigita Litovio – preskaŭ ĉiujare, same nun. La organizanto de la aranĝoj estas la Prezidanto de LEA Povilas Jegorovas kaj lia teamo. Progame unue okazas Kongreso de LEA, kiam P. Jegorovas prezentas jarraporton (pri E-eldonado, aliaj aktivecoj en Litovio). Poste sekvas prelegoj de E-aktivuloj, impresoj el diversaj someraj E-renkontiĝoj ktp. Ĉiam funkcias riĉa butikoj de E-literaturo. Al Zamenhof-tagoj venas ĉirkaŭ centoj da esperantistoj el kelkdek Litoviaj urboj. Foj-foje aperas eksterlandaj gastoj. La festan renkontiĝon kutime kronas iu arta programo.

Zamenhofage en 2018 la elstara litova esperantisto Petras Čeliaskas prezentis sian fundamentan laboron „La granda litova-Esperanta vortaro” (ĉirkaŭ 45.000 vortoj,



eldonkvanto 1000 ekz.)! Jam en 2023 ĝin sekvis alia lia verkego “La granda Esperanta-Litova vortaro” (ĉ. 5.2000-vorta, 1000 ekz.).



Komuna foto de LEA kongresanoj, fotis T. Ĉojus.

La 14-an kaj 15-an de Decembro 2019 Litovaj esperantistoj solenis la 100-jariĝon de Litova Esperanto-Asocio kaj la 160-an naskiĝtagon de Zamenhof. La Kongresan parton por la retejo de LEA filmis fotokronikisto Gražvydas Jurgelevičius. Vytautas Šilas tralegis prelegon „Homoj, kiuj kreis Litovan Esperanto-Asociacion“. Tiam estis prezentita ankaŭ litovlingve eldonita libro de Aleksander Korĵenkov „Zamenhof: biografia skizo“.

10. Rezideja palaco de guberniestroj kaj prezidentoj, Vilnius g. 33 (estinta Prezidento g. 8)

La historia duetaĝa palaco, konstruita en 1847, ekde 1869 servis kiel rezidejo de Kaŭna guberniestro. En jarfino de 1919, post kiam la jarcentan Litovian ĉefurbon Vilno militokupis agresema Pollando kaj la urbo Kaŭno iĝis provizora Litovia ĉefurbo, en la palaco ekrezidis Litoviaj prezidentoj. La rezideja palaco havas ligan ankaŭ kun Esperanto.

Dum la jaroj 1904-1912 ĉi tie rezidis la rusa guberniestro, liberalulo kaj reformulo Pjotr Verevkin. Kontraŭe al siaj antaŭuloj, li favore rilatis al agado de litovaj kulturaj organizaĵoj kaj al agado de esperantistoj. En 1910 li permesis al Kaŭna Esperantista Societo (KES) pendigi Esperantajn flagojn super la domo de la societo kaj super la libromagazeno de *Zavdski* (tiu enhavis E-literaturan fakon) kaj konfirmis la insignon de KES. La 12-an de Oktobro 1939 la Ŝtatprezidento de Litovio Antanas Smetona aŭdience akceptis prezidanton de Litova Esperantista Asocio Antanas Poška. Lia moŝto interesiĝis pri diskonigo de Esperanto en Litovio, atente trafolumis freŝajn numerojn de *Litova Stelo*, ankaŭ la specialan numeron de la revuo *Esperanto*, dediĉitan al Litovio kaj al la forpasinta prelato Aleksandro Dambrauskas.

Ekde 1955 (sovet-tempe) en la estinta Prezidentejo lokiĝis Kaŭna Instruista Domo. Ĉi tie la 23-an de Februaro 1966 la E-veterano, esperantisto ekde 1925, Albinas Vebeliūnas sukcesis establi la unuan E-organizaĵon en la postmilita Litovio – Kaŭnan E-klubon.



Litova Prezidentejo, fotis G. Jurgelevičius.


11. Historia kongreso, kiu restarigis LEA-n,

J. Gruodžio g. 9

Somere 1940 soveta reĝimo senleĝe kaj arogante likividis Litovan Eperantistan Asocion (LEA). Litovaj esperantistoj, tamen, sukcesis ĝin restarigi ankoraŭ dum la ekzistado de tiu reĝimo! Pri tio senvorte atestas la domo, konstruita preskaŭ antaŭ duonjarcento (en 1982). Tiam en ĝi funkciis Kulturdomo de Konstru-Ripara Trusto (litove: *Kauno Statybos remonto trestas*). Nun en la iom renovigita palaco funkcias privata (komerca) internacia lernejo Eruditula liceo (*Erudito licėjus*).



Eruditula liceo, restarigia de LEA, fotis V. Kailiūtė.



Advokato Povilas Jęgorovas, 1988.



Laurynas Skėpas, 1988.

Estis la 10-a de Decembro 1988, kiam Litovio ankoraŭ subiĝis al Moskvo. Tiam, E-aktivulo, juna juristo Povilas Jęgorovas, morale subtenita de multaj Litovaj esperantistoj, iniciatis kaj ĉi tie okazigis la Kongreson por Restarigo de LEA. Ĉar antaŭmilita jam estis okazintaj dudek kongresoj de LEA kaj sovetjare okazis tri landaj E-konferencoj, kiuj fakte egalas kongreson, ĉi tiu kongreso ricevis la 24-an vicnumeron. La multenombra kongreso (pli ol 300 partoprenantoj) sen kontraŭduboj restarigis la landan organizaĵon LEA-n kaj decidis renovigi eldonadon de la revuo *Litova Stelo*. LEA iĝis la dua en Litovio restarigita antaŭmilita organizaĵo (je unu tago pli frue oficialiĝis Litova Nacia Olimpika Komitato). La unua Prezidanto de la restarigita LEA iĝis lingvisto docento de Vilna universitato Algimantas Skėpas, la unua vicprezidanto – Kaŭna advokato Povilas Jęgorovas (ellaborinto de la Asocia Statuto, ekde 1993 kaj ĝis nun – prezidanto

de LEA). Finfare, dum la 74-a UK (1989, Brajtono), dank' al persistaj kaj insistaj penoj de P. Jegorovas kaj malgraŭ truda kontraŭado fare de Usona reprezentanto (!?), la Komitato de UEA akceptis LEAn – kiel membron kolektivan.

12. Kaŭna gimnazio „Aušros“,

Laisvės al. 95 / Kanto g.

Ĉi-loke antaŭ 1969 ankoraŭ staris la palaco de Virina gimnazio por altdevenaj knabinoj. En ĝi ekde 1918 funkciis la 1-a Kaŭna gimnazio, kiu en 1923 ricevis la nomon Aušros (la Tagiĝo). La konstruaĵo en la 1969 estis detruita kaj en 1972 samloke por la gimnazio estis konstruita nova 4-etaĝa palaco.

La 29-an de Septembro 1913 en la gimnazia salono okazis eksterordinara kunveno de Kovna Esperantista Societo, kiun gvidis la prezidanto Paŭlo Medem. Grandan parton de la programo okupis impresoj el la UK-9 (Bern, Svislando).

La 20-an de Majo 1919 vespere en la ejo de tiama Kaŭna gimnazio (tiam Laisvės al. 55) komenciĝis la unua en jam sendependa Litovio E-kurso. La kursgvidanto – ĵurnalisto Juozas Mačernis. La 27-an de Novembro 1921 en la gimnazia salono okazis publika ĝenerala kunveno de Litova Esperantista Asocio (LEA). Partoprenis ĉ. 100 personoj. La kunvenon prezidis deputito de la Fonda Sejmo instruisto Stasys Tijunaitis. Pri la agado raportis prezidanto de LEA prelato A. Dambrauskas. Sekvis prelegoj de la vicprezidanto de LEA, aŭtoro de populara E-lernolibro ĵurnalisto Adolfas Klimas – Nuntempa mondo kaj kaj bezono de internacia lingvo kaj de S. Tijunaitis pri Katolika kongreso en Graz. La prezidanto de Kaŭna Esperantista Societo P. Medem rakontis pri la 13-a UK (1921, Prago). Estis aprobita la propono de P. Klimas pri neceso eldonadi E-revuon *Litova Stelo*.

La 22-an de Oktobro 1922 en la gimnazia salono okazis la ĝenerala kunveno de LEA. Prezidis tiama sekretario de LEA J. Mačernis. Estis raportoj pri januara kontrakto kun ELTA por eldonado de la revuo Litova Stelo, pri paŝoj por enkonduko de Esperanto en lernejojn, pri ricevita ĝenerala permeso de la Popolkleriga ministerio por fondado de E-kursoj tra tuta Litovio. Oni notis fondon de novaj E-grupoj en urboj Dotnuva, Ukmergė, Svėkšna, Raseiniai.

13. Monumento por la urbestro

Jonas Vileišis, aleo Laisvės 101

Meze de la aleo Laisvės, antaŭ la estinta Kaŭna ĉefpoŝtejo vidu la monumenton por la unua Kaŭna urbestro, moderniginto de Kaŭno, unu el la signaturintoj de la Litova Akto pri Sendependeco, juristo Jonas Vileišis. J. Vileišis en 1923 subtenis la proponon de esperantisto Aleksandras Dambrauskas la straton Pažų en la malnova urboparto titoli kiel Zamenhofo.



Gimnazio Aušros, fotis V. Kailiūtė.



Kaŭna urbestro Vileišis, fotis V. Kailiūtė.

J. Vileišis kunlaboris kun alia E-aktivulo – kun Paŭlo Medem. Al la urbestro estis atribuita la titolo honora membro de Litova Esperantista Asocio. Cetere, la 3-an de Januaro 1925 la urbestro J. Vileišis diris adiaŭan vorton ĉe la tombo de la forpasinta P. Medem. La monumento, starigita en 2017 (skulptisto K. Balčiūnas) prezentas la urbestron iranta el sia hejmo ĉe la strato Putvinskio al sia laborloko, la urbodomo.

14. E-standardo super “Versalo”, E-oficejo de KES,

Aleo Laisvės 88 / Vasario 16-os 1-3

La stratangulan domon, konstruitan en 1897 ĉe la tiama prospekto Nikolajevskij kaj strato Novaja, nunaj kaŭnanoj konas kiel lokon de hotelo kaj de fama restoracio Versal (Kaŭna Versajlo). En ĝi intermilite ŝlagrojn kaj romanojn kantis Antanas Šabaniauskas kaj spritis la populara dueto Pupu Dédé kaj Dédienė. Ĝin ŝatis artistoj, aktoroj, literaturistoj, elitanoj, sed la restoracio mem, ŝajnas, al Esperanto havis neniun rilaton. Tamen, nur nemultaj

esperantistoj scias, ke ekde 1910 en la sama domo ĉe la konata Librejo-legejo de Zavadski (la posedanto estis Kazimir Rutskij) funkciis E-oficejo de Kaŭna Esperanta Societo (KES)! La legejon uzis ankaŭ esperantistoj. La librejo estis komisiisto de KES kaj okupiĝis ankaŭ pri vendado de E-literaturo kaj de esperantaĵoj. Ĉi tie oni povis registriĝi al pagataj E-kursoj, la membroj povis pagi sian membrokotizon, preni eldonitan numeron de societa revuo Kovno-Esperanto, akiri E-revuon “Ondo de Esperanto”.

En 1911 la gubernatoro Petro Verevkin permesis al KES pendigi super la librejo E-standardon (ĉu la unua oficiale en Litovio?).



Versalo E-oficejo de KES, fotis G.J.

15. La domo de esperantista familio Kocin,

Laisvės al. 82 / Maironio g.

La angula trietaĝa domo ĉe stratkruciĝo de aleo Laisvės kaj strato Maironio (antaŭe: Nikolajevskij pr. / Novaja ul.) post la ĵusa renovigo konservis sian antaŭan eksteran aspekton, sed ne la internon kaj la destinon. En ĝi antaŭ nelonge lokiĝis banko SEB kaj antaŭ la I-a mondmilito (en tiam duetaĝa domo) lokiĝis fotografejo, bakejo, konfitejo de A. Perkauskas (Perkovski). En tiu estis aranĝita propagando E-anguleto kaj eblis frandi freŝbakitajn biskvitojn “Esperanto” (la pakaĵeto kostis 10 kopekoj, nun - 2,4 €). En la dua etaĝo funkciis kinejo “Palas” (ekde 1919). La konstruaĵo apartenis (ekde 1910) al esperantista familio Isidor kaj Tereza Kocinoj. Tereza, laŭ la pasporto de 1920, estis Kocinienė–Zilbernikaitė. Tereza Kocin estis estraranino de Kaŭna Esperantista Societo (KES) kaj en 1931 ties honora prezidanto.



Domo de familio Kocin, fotis G. Jurgelevičius.

La 1-an de Februaro. 1910 al sia naskiĝurbo Kaŭno venis serenhumora Klara Zamenhof, la edzino de Lazaro Ludoviko Zamenhof, kaj haltis ĉe sia fratino Tereza. Post kelkaj tagoj ŝi (la 4-an de Februaro) iris al KES por donaci al ĝi grandan portreton de la Majstro. La sorto de tiu portreto restis senspura...

Aŭguste 1911 Tereza Kocin kune kun sia frato Jozefo Zilbernik (tiam prezidanto de Novjorka E-Societo) partoprenis en la 7-a UK (Antverpeno, Belgio). Tie ŝi denove revidis sian fratinon Klara, ankaŭ sian bofilinon Sofia Zamenhof.

Auguste 1919 Tereza kune kun aliaj fondis Litovan Esperantistan Asocion. En 1923 ŝi kun litova delegitaro partoprenis en la 15-a UK (Nurenbergo, Germanio). En la revuo *Litova Stelo* (1937, n-ro 4) ŝi publikigis rememorojn pri sia bofrato Lazaro Ludoviko Zamenhof.

La filo de Tereza, estonta juristo kaj ĵurnalisto, Boris Kocin (Kotzin, 1887-1858) estis la sola esperantisto el Kaŭno, kiu en 1905 (tiam 19-jara) partoprenis en la 1-a UK (Boulogne sur Mer, Francio). Verdire, kune kun la unua litova esperantisto Aleksandras Dambrauskas, kiu tiam reprezentis Sankt-Peterburgon. Dum 1910-1915 B. Kocin en Moskvo redaktis la revuon *Ondo de Esperanto*.

La patro – Isidor Kocin (1857-1929), privata kaj gimnazia kuracisto (en privata Kaŭna Virina gimnazio) ne estis aktiva esperantisto. En 1928 la geedzoj Kocin renovigis la domon, surkonstruis trian etaĝon, aranĝis 20 loĝejojn. Post la forpaso de la edzo, Tereza anstataŭ kinejo aranĝis hotelon kaj (en 1931) anstataŭ konfitejo kafejon Lituhanika. En 1936 anstataŭ ĝi – la popularan kafejon Monika (ties posedantoj estis infanoj de T. Kocinienė – Olga kaj Leonidas). La deklarita adreso de Tereza en 1904 estis “propra domo” en Peterburgskaja str. (komenco de nuna pr. Savanorių), sed poste: “propra domo” – Maironio str. 7. Kiam Tereza forpasis ne estas klare (ŝia eksterlanda pasporto validis ĝis 1941), povas esti, ŝi pereis kiam Litovion invadis nazioj.



16. Kaŭna Nobela Klubo, *Maironio g. 11, (estinta Novaja ul.)*

La palaco oficiale titoliĝis Kaŭna Nobela Kunveno (ruse: *Kovenskoje Blagorodnoje Sobranije*). Ekde 1901 ĝi apartenis al Kaŭna Bojara Societo, kies membroj estis altrangaj oficistoj, bojaroj kaj la Kaŭna guberniestro mem. Ĉi tie okazadis prestiĝaj aranĝoj, oficialaj akceptoj. Sur la dua palaca etaĝo funkciis vasta 128-loka teatra salono, biblioteko, bufedo kaj gasteĉambro. Kelkajn gravajn aranĝoj ĉi tie okazigis ankaŭ Kaŭna Esperantista Societo (KES).

Jen la 2-an de Oktobro 1911 ĉi tie okazis publika kunveno de KES, kaj la 19-an de Februaro 1912 – la jarkunveno de KES. La foriranta KES-prezidanto A. Nedoŝivin raportis pri sia vizito al Sankt-Peterburd, A. Dambrauskas pri Esperanto en scienca



literaturo. La nove elektitan estraron eniris: prezidanto – Paulo Medem, vicprezidanto – prof. Aleksandro Dombrovski (Dambrauskas), kasisto – N. Bičkov, membro – s-ino Emilija Janickaja (poste: Janickienė).

La 22-an de Septembro 1912 dum la eksterordonara kunveno de KES P. Medem kaj A. Nedošivin raportis pri Krakova UK, prelato A. Dambrovski rakontis pri Katolika kongreso en Budapeŝto.

En 1919 sur la 1-a etaĝo de la konstruaĵo lokiĝis privata Muzika lernejo de komponisto Jonas Naujalis (amiko de Esperanto), kiu en 1920 iĝis la ŝtata. Tie laboris invitita de J. Naujalis mem, profesoro pri pianludo E. Janickienė, vicprezidanto de Litova Esperanto-Asocio, la aŭtoro de muziko (en 1910) por la versaĵo de Lazaro Zamenhof “Ho mia kor’!”.

17. Metropolo – la fondoloko de Kovna Esperantista Societo,

Laisvės al. 68 / Daukanto g. 19

La domon, en kiu estis restoracio Metropolis (en la unua etaĝo), kaj la hotelon Metropolis (en la dua etaĝo) kaŭnanoj rememoras ne pro Esperanto. En la hotelo intermilite loĝis eksterlandaj diplomatoj (en 1940 savinto de judoj japana diplomato Ĉ. Sugihara). La restoracion tage ŝatvizitis la universitata profesoraro, ĵurnalistoj kaj literaturistoj. Vespere koncertis tie popolaraj kantistoj judo Danielo Donski (litovlingve!) kaj Antanas Šabaniauskas. Kun Esperanto la konstruaĵon Metropolis (Metropol) ligas nur ĉi-tiea fondiĝo de Kovna Esperantista Societo (Kaŭna Esperantista Societo).



Metropolo, la fondloko de KES.

Do, la 2-an de Decembro 1909 per klopodoj de Ŝtata konsilisto de Trezoreja Ĉambro Aleksandro Nedošivin, en la salono de hotelo Metropol okazis fonda kunveno de Kovna Esperantista Societo (KES). Tiam estis akceptita decido “malfermi en la urbo Kovno tute sendependan” (de S-Peterburga societo Espero) memstaran Esperantistan Societon. La kunvenintoj solene festis baldaŭan naskiĝtagon de d-ro L. Zamenhof kaj forsendis al la



Honora membro de Kovna Esperantista Societo
A. M. NEDOŠIVIN.

Majstro gratulan telegramon, lige al lia 50-jara jubileo. La societo estis enregistrita la 18-an de Decembro 1909. La unuan estraron de KES konsistigis: prezidanto – A. Nedošivin, vicprezidanto – A. Dambrauskas, estraranoj M. Tener, I. Dimenštejn. Dum la jaro 1910 la membraro kreskis de 42 ĝis 133 personoj. Por la jaro 1911 la societo abonis 12 Esperanto-gazetojn.

La 3-an de Januaro 1911 en la granda salono de Metropol okazis la unua publika kunveno de KES, kun ekspozicio de esperantaĵoj. Vesperan kunsidon malfermis la Estro de Urba Konsilantaro, aktiva membro de KES Aloiz Brjozovski. Li proponis per funebra leviĝo honori la memoron de la forpasinta verkisto, adepto de Esperanto, Leo Tolstoj. Pri rolo

de Esperanto parolis la prezidanto de KES A. Nedošivin, pri esenco de Esperanto el vidpunkto scienca kaj filologia – prof. A. Dambrauskas. La kunvenintoj aŭdis komunikon de A. Nedošovin pri lia vizito ĉe Zamenhof en Varsovio, pri UK-oj en Vaŝingtono kaj Aŭsburgo. Finkunvene oni elektis d-ron Zamenhof honora membro de KES.

18. Kunlaboro kun la Universitato de Vytautas la Granda, S. Daukanto g. 28

En la 21-a jarcento komenciĝis kontaktado de Litova Esperantista Asocio (LEA) kun la Universitato de Vytautas la Granda (UVG). Decembre 1999, 2000, 2001, 2003 kaj 2006, en la granda salono kun la ĉeesto de multnombraj eksterlandaj esperantistoj okazadis Kongresoj de LEA kaj Zamenhof-festoj. Precipe multnombra estis tiu de la jaro 1999.

Tiam al la aranĝo, dediĉita al 80-jariĝo de LEA, kunvenis eĉ 387 esperantistoj (kun 12 eksterlandanoj). Gratulleteron al la kongresanoj sendis la ŝtatsprezidento Valdas Adamkus.



**Ĉefpalaco de Universitato Vytautas la Granda,
fotis Danutė Staŭkuvienė.**



**La universitata rektoro kaj la LEA-prezidanto
subskribis la kontrakton.**

Inter la 8-a de Januaro kaj la 24-a de Februaro 2018, en la Biržiška-noma biblioteko de UVG, okazis ekspozicio “Zamenhof – la kreinto de Esperanto”.

Aprezante la unikecon kaj potencon de la internacia lingvo Esperanto, la Universitato de Vytautas la Granda kaj LEA la 6-an de Decembro 2023 en la universitata rektorejo konfirmis la Kontrakton pri la Kunlaboro.

Laŭ ĝi la universitato devigis sin enkonduki (kaj jam enkondukis) Esperanton kiel studobjekton, elekteblan en la programon de Universitata Instituto de Fremdaj Lingvoj (K. Donelaiĉio g. 52). Ankaŭ disponigi ejojn por bezonoj de LEA, konkrete, por Baltiaj Esperanto-Tagoj en 2025.

La kontrakton, en ĉeesto de 30 gravaj personoj, subskribis la rektoro prof. Dr. Juozas Augutis kaj la prezidanto de LEA Povilas Jegorovas (sur la bildo).

Aŭtune en la jaro 2024 LEA donacis al la universitata Biržiška-noma biblioteko sian valoran Esperanto-bibliotekon.

19. Esperanto en antaŭmilita Litova Universitato,

A. Mickevičiaus g. 37

La palaco, kiu ekde 1990 apartenas al Kaŭna Teknologia Universitato, estis konstruita en 1914 kiel nova lokalo por tiama Kaŭna Komerca lernejo. Dum la jaroj 1919-21 ĉi tie funkciis Supera Kurso (*Aukštieji kursai*), kiu en la jaro 1922 transformiĝis al Litova Universitato. Samjare al la elstara esperantisto prelato Aleksandras Dambrasukas, pro liaj porlitovaj meritoj, la universitato atribuis honoran doktoran kaj profesoran titolon.



La estinta Litova Universitato, fotis G. Jurgelevičius.

La enkonduka leciono de Esperanto, kiun en la universitato la 3-an de Decembro 1922 gvidis prezidanto de Kaŭna E-Societo Paŭlo Medem, faris la komencon por E-agado en la universitato. Tiam ĉeestis pli ol 300 gestudentoj kaj kelkaj profesoroj.

La 13-an de Majo kaj la 15-an de Julio 1923 (dimanĉe) en la 15-a universitata aŭditorio okazis ekzamenoj por dezirantoj aĵiri la ateston de Kleriga ministerio pri ilia kapablo kaj rajto instrui la lingvon Esperanto. Inter 15 trapasintoj estis studento filologo Vladas Butkus, kiu poste dum kelkaj jaroj gvidis E-kursojn en Kaŭno.

Litova Esperantista Asocio (LEA) la 14-an de 1924 en la universitata salono aranĝis celebradon de la 65-jara naskiĝtago de L. L. Zamenhof. Koruso kantis E-himnon, festparolis prezidanto de LEA prelato A. Dambrasukas, ĵurnalisto Adolfas Klimas, prezidanto de Kaŭna Esperantista societo Paŭlo Medem. Post la elokventa parolo li, P. Medem, kun tremanta voĉo kaj kun larmoj en la okuloj sciigis la multenombrian ĉeestantaron pri la ĵusa morto de Klara Zamenhof (Klara mortis la 6-an de Decembro 1924 en Varsovio). Neniu el la aŭskultantoj supozis, ke baldaŭ la parolanto mem sekvos ŝin. La unua en Litovio studenta esperantista organizaĵo – Studenta Esperantista Societo (prezidanto K. Valaŝinas?) fondiĝis en Litova Universitato printempe 1923. Ĝi la kunvenojn okazigadis ĉiudimanĉe. La 13-an de Decembro 1925 studentoj esperantistoj celebris Zamenhofan naskiĝtagon (en la 16-a aŭditorio). Oktobre 1926 la gazeto Lietuvos žinios publikigis du anoncojn pri tio, ke en la 15-a aŭditorio estas vokata ĝenerala kunveno de studentoj esperantistoj. La 1-an de Novembro 1928 okazis jarkunveno de la societo. La 1-an kaj la 2-an de Decembro 1929 okazis elekto de 40-membra Studenta Parlamento. Kvar esperantistoj iĝis parlamentanoj: P. Andrusevičius, L. Dambrasukas, L. Kalvelis kaj J. Kutra. En la universitato funkciis ankoraŭ du studentaj E-organizoj. La Kavalira Klubo de Verda Koko kaj Studenta Korporacio “Verda Stelo”. La klubo de sprituloj Kavalira Klubo de Verda Koko fondiĝis en 1925 kaj aktivis nur dum kelkaj jaroj (la gvidanto – ĵurnalisto Pulgis Andriušis). La Korporacio Verda Stelo fondiĝis la 9-an de Januaro 1930 kaj celis propagandi Esperanton kaj praktiki ĝin en la universitata medio. Por tio servis prelegoj, kunvenoj, ekskursoj. La prezidanto estis jura studento Pranas Šulaitis, vicprezidanto – Ĉeslovas Kaunas, sekretario – juristo Mykolas Dušanskis. La korporacio decembre 1930 en plenplena aŭditorio aranĝis sukcesan publikan feston (en la lingvoj litova kaj Esperanto) por naskiĝtago de L. L. Zamenhof.

20. Baltlanda E-konferenco en Laborpalaca kulturklubo,

Laisvės al 42 / Mickevičiaus g. 23

En la angula domo de aleo Laisvės kaj strato Mickevičiaus (tiama adreso al. Laisvės 28) ĝis la aŭtuna brulego de 1929 funkciis unu el la plej malnovaj Kaŭnaj kinejoj Oaza kaj en 1936 lokiĝis la Centra kulturklubo de ŝtata institucio Laborpalaco. Grave, la prezidanto de tiu institucio estis esperantisto, la juristo Pranas Šulaitis.

La 24-an de Julio 1938 en la kulturkluba salono okazis Ĝenerala kunveno de LEA. Estis elektita nova estraro. La 20-an de Novembro 1938 en la salono okazis publikaj prelegoj de E. Medišauskas "Kio estas Esperanto" kaj de A. Poška "Esperanto en mia praktiko" kun lumbilda akompanado. Ĉeestis ĉ. 200 personoj.

La 10-an de Junio en la jaro 1939 en la kulturpalaca salono okazis la Baltlanda E-konferenco. Partoprenis ĝin la elstara litovdevena pola esperantisto, medicina



**Loko de Baltlanda Esperanto-konferenco.
Fotis D. Valančiūtė.**



**Poetino Hilda Dresen,
en la jaro 1934.**

d-ro Odo Bujvid, latva poetino Ludmila Jevsejeva, estona poetino Hilda Dresen kaj aliaj gravaj esperantistoj. Vespere teatra trupo Espero el Tallinn prezentis teatraĵon de Kaloczay Li kiel ŝi. Kantoj kaj dancoj daŭris ĝis la dimanĉa mateno. La 11-an (dimanĉe) – okazis la Jubilea kongreso de Litovaj Esperantistoj (20 jaroj por LEA). La prelegon Historia skizo de Esperanto-movado en Litovujo, verkitan de LEA estrarano Pranas Enskaitis (verkisto, redaktoro de revuo Skautų aidas) tralegis alia LEA estrarano lituanisto Petras Lapienė. La 12-an okazis Ĝenerala kunveno de LEA. Estis elektita la lasta antaŭmilita estraro de LEA (junie 1940 la soveta registaro likvidis LEA).

Fine de la aranĝo okazis

grupopa vizito al la tombo de prof. A. Dambrauskas. La estraron de LEA eniris: mondvojaĝanto Antanas Poška (prezidanto), instruisto Edvardas Medišauskas-Medonis (vicprezidanto), K. Kesperavičius (sekretario), instruisto Karolis Valašinas (kasisto); membroj – ĵurnalisto Pranas Enskaitis, juristo Balys Giedra, instruisto Petras Lapienė, teatristo Leonas Kalvelis.



Poetino Ludmila Jevsejeva.

21. Esperanto anstataŭ la rusa. Kaŭna oficira hejmo, Micevičiaus g. 19

La 9-an – 10-an de Junio 1939 en la palaco de Kaŭna Oficira Hejmo okazis la 5-a Baltlanda Intelekta Kunlabora kongreso, la aranĝo neesperantista, sed kie aktivis esperantistoj. Kune kun litovoj estis 10 estonoj (la fratinoj Dresen, E. Linnuse, V. Mummelin, L. Merivoo kaj aliaj), 9 latvoj (L. Jevseeva, J. Krievs, E. Klavinš, L. Zalite kaj aliaj). Ili al la kongreso proponis: anstataŭ la lingvo rusa, kutima interkompreniga lingvo inter baltlandanoj, estonte ekuzi Esperanton. La propono estis arde aplaŭdita! La kongreso decidis – pristudi la uzooblecon de Esperanto kaj akceli la enkondukon de tiu internacia lingvo kiel instrufako (kiel falutativa) en la mezlernejojn. Tamen post jaro (ankaŭ junio) Litovion, Latvion kaj Estonion invadis la rusa Ruĝa armeo kaj tiel “la internacia lingvo” por tiuj tri baltmaraj landoj denove iĝis la lingvo rusa.

La 7-an kaj la 8-an en Decembro 2002 en la palaco (nun – Kaŭna Garnizona Oficira Klubo) okazis Kongreso de LEA kaj Zamenhof-taga festo.

Septembre 2023 eĉ 44 objektoj de Kaŭna moderneca arkitekturo eniris la UNESKO-liston de Tutmonda Heredaĵo. Unu el tiuj objektoj estis ankaŭ la palaco de Kaŭna Oficira Garnizono, inaŭgurita en 1937.



Oficira Hejmo, fotis G. Jurgelevičius.

22. Reviviga E-renkontiĝo en Kaŭna Terkultura Akademio, Kęstučio g. 27


La palaco de la Akademio estis konstruita en 1891 por la rusa Stabo de Kaŭna Fortikaĵejo. Estis tre longa duetaĝa konstruaĵo kun trietaĝa ĉefa enirejo. Dum 1937-1938 la palaco estis ampleksigita – oni alkonstruis ankoraŭ du etaĝojn. Dum la intermilita periodo 1919-1940 la konstruaĵo servis por la Litova Terkultura ministerio. En 1945 ĉi tien el la urbo Dotnuva estis tranlokigita la Terkultura Akademio.

La 28-an de Aprilo 1957 en la aŭditorio de Kaŭna Terkultura Akademio okazis la unua ost la II-a mondmilito Esperantista Renkontiĝo. La patrono de la Renkontiĝo estis profesoro de la Terkultura Akademio Viktoras Ruokis.

Kunvenis 60 gestudentoj (E-kursanoj el ses Litoviaj altlernejoj) kaj 12 antaŭmilitaj E-veteranoj. Inter ili: V. Ruokis mem, Edvardas Medonis, Albinas Vebeliūnas, Juozas Lazauskas, Povilas Stašys, Stasys Tijūnaitis, Ipolitas Cieška. La unua parto de la



Terkultura Akademio E-revivigo en 1959, fotis G. Jurgelevičius.



Akademiano V. Ruokis
(1885-1971).

renkontiĝo estis dediĉita al la 40-jara forpasa datreveno de L. Zamenhof kaj al proksimiĝanta 100-jara jubileo de Esperanto. Prelegis E. Medonis kaj pedagogia studentino Aušra Prapuolenytė (estonte Kijauskienė). En la scenejo pendis granda portreto de la Majstro, speciale pentrita de la ĉeestanta pentristo esperantisto Petras Tarabilda.

Dum la dua, labora parto de la renkontiĝo, estis elektita granda Iniciata Grupo pri estontaj E-aktivecoj. Kiel ties prezidanto – prof. V. Ruokis, vicprezidantoj – E-aktivulo Leonas Noreika (patro de kantisto Virgilijus Noreika) kaj studento A. Latonas (la teknika organizanto de la Renkontiĝo). Verdire, tiu Iniciata Grupo neniel manifestiĝis, tamen la Renkontiĝo mem akcelis la vigliĝon de litovaj esperantistoj. La partoprenatojn al ĉi tiu Renkontiĝo kunvokis entuziasma studento de Kaŭna Politeknika

Instituto Zenonas Sabalyš.

23. La fondoloko de LEA – loĝdomo de Paŭlo Medem, *Gedimino g. 2 / Griunvaldo g. 18*

Estas iam la angula domo ĉe stratoj Kijevskaja / Peŝĉanaja (poste – Gedimino / Smėlio 12), kiun en 1896 akiris germana kompanio “Fratoj Tillmans”. En ĝi ekde 1903 loĝis la geedza paro Paŭlo Medem (Povilas Medemas, Paulius v Medem) kaj Helene Tilmans (1879 en Kaŭno – 1967 en Berlino), la plej aĝa filino de R. Tilmans, laŭ litova pasporto Elena Medemienė-Tilmansaitė. La familio Tilmans okupis 8 ĉambrojn en la dua etaĝo. Unu ĉambron ili



Fondoloko de LEA en loĝdomo de Medem,
fotis G. Jurgelevičius.



E-Akademiano Paŭlo Medem,
foto el KRVA.

disponigis por sidejo de Kaŭna Esperantista Societo (KES). Komence la kunvenoj okazadis ĉiun duan mardon de monato, poste ĉiumarde (kun kantado de E-himno, ofte kun vespermanĝa regalo kaj muzika parto).

En la loĝdomo de gesinoroj Medem la 20-an de Aŭgusto 1919 estis fondita Litova Esperantista Asocio (registrata la 10-an de Decembro 1919). La fandan kunvenon partoprenis Aleksandras Dambrauskas, P. Medem mem, Emilija Janickienė, Tereza Zilbernikaitė-Kocinienė, Apolinaras Opulskis, Stasys Tijūnaitis, Leonas Alseika, entute 20 esperantistoj.

La elstarulo Paŭlo Medem pri Esperanto ekinteresiĝis en 1910. Li tre bone ekposedis ĝin kaj jam en 1912 estis

elektita Prezidanto de Kaŭna Esperantista Societo. Poste, en 1922 li estis elektita membro de internacia Lingva Komitato kaj en 1923 – jam membro de Esperanto-Akademio. Krome, li distingigis ankaŭ kiel melomano (muokamanto), perfekte ludanta violonĉelon kaj pianon, ankaŭ kiel amatora aktoro. Li estis financa subtenanto de gravaj E-periodaĵoj “Esperanto triumfonta” kaj “Literatura mondo”.

P. Medem naskiĝis la 8-an de Decembro 1892 en Kaŭno (en ĝia antaŭurbo Vilijampolė). Li finis Peterburgan Militan-Inĝenierian Akademion kaj multiservis en la 28-a artileria Brigado, lokigita en Kaŭna apudurbo Ŝanĉiai. En 1906 li finis la militservon kiel kolonelo leŭtenanto. En 1920 li kune kun aliaj fondis Litovan Komercan bankon kaj en 1921 Ĉokoladan kaj bombonan fabrikon “Tilka” kaj estis ties akciulo. P. Medem finance subtenis la eldonon de solida Litova Almanako (1923). Kune kun la edzino Helena (esperantistino) li partoprenis en UK-8 (Kraków, 1912), UK-9 (Berno, 1913), UK-13 (Praha, 1921), UK-15 (Nurenberg, 1923), UK-16 (Vieno, 1924).

Somere 1924 P. Medem, akompanita de sia edzino, kuraciĝis en Germanio pro malnovaj kormalsanaj problemoj. La 1-an de Januaro 1925 nokte je la 3-a P. Medem hejme post koratako mortis. Lian hejmon venis prelato Aleksandro Dambrauskas kaj adiaŭis lin laŭ kristana moro. La 3-an de Januaro P. Medem estis tre solene akompanita al la urba Evangelia-luterana tombejo. Pri lia forpaso skribis la litovaj gazetoj Rytas, Echo, Lietuva, Lietuvos žinios, revuo Litova Stelo, la eksterlandaj Heroldo de Esperanto (estinta Esperanto Triumfonta), revuo Esperanto. Lia planata veturo Parizon ne okazis – por preparoli kun prezidanto de Esperanto-Akademio franca lingvisto Th. Cart la organizan programon de la Akademio...

24. La 1-a Litova E-kongreso – en Kaŭna Rusa gimnazio, Vytauto pr. 20

Eĉ kvin E-aranĝojn LEA organizis en la privata Kaŭna rusa gimnazio, konstruita en 1925 (nun – Kaŭna Pedagoga Kvalifika Centro).

La 27-an de Novembro 1927 okazis ĝenerala kunveno de Litova Esperantista Asocio (LEA). Estis preparolitaj organizaj aferoj kaj elektita nova Estraro: Honora Prezidanto – Aleksandras Dambrauskas, prezidanto – Adolfas Klimas, vicprezidanto – Mykolas Dušanskis, sekretario – Petras Lapienė, kasisto – Leonas Kalvelis kaj estrarano – Antanas Paškevičius.

La 1-an de Oktobro 1929 je 15 h. esperantistoj en la apuda Evangelia-luterana tombejo vizitis la tombon de elstara esperantisto Paŭlo Medem kaj metis florkronon. Poste en la gimnazio komenciĝis kongreso de LEA. En la programo estis festado de la 20-jara jubileo de Kaŭna Esperantista Societo (P. Medem estis prezidanto de tiu societo).

La 29-30-an Junio 1934 en la gimnazio okazis la 1-a Litova E-kongreso, grava okazintaĵo de litova E-movado. Partoprenis 82 samideanoj. La referaĵojn legis: Liudas Alseika, Adolfas Klimas (Esperanto – la lingvo por Baltaj ŝtatoj), Antanas Prapuolenis, Mykolas Dušanskis. Laŭ iniciato de A. Klimas estis pridiskutita kaj akceptita nova aktualigita Statuto de LEA. Sekvis elekto de Estraro de LEA: Balyš Giedra (prezidanto), J. Lazauskas



(vicprezidanto), A. Prapuolenis (sekretario), Vl. Butkus, L. Alseika. B. Giedra proponis renovigi eldonadon de la revuo *Litova Stelo*. Raporta artikolo (de Paca batalanto – B. Giedra) pri la kongreso aperis en la 1-a numero (1935) de renovigita Litova Stelo. La 16-an de Decembro 1934 okazis solena Zamenhof-taga kunveno. Post la kunveno multaj partoprenantoj pasigis la tempon en laktejo Asta (estinta pr. Laisvės 52, nun pr. Laisvės 76).

La 29-an de Junio 1936 en la lerneja salono okazis Ĝenerala kunveno de LEA. Partoprenis 52 personoj. Anstataŭ J. Lazauskas, kiel prezidanto de LEA, estis elektita pli agema Petras Lapienė, kiel vicprezidanto – A. Prapuolenis. Funkciis E-ekspozicio (E-libroj, revuoj, afiŝoj, internacia korespondado kaj E-insignoj). Ĝin vizitis ĉirkaŭ 250 personoj.

25. Sindikata Kulturpalaco (estinta Laborpalaco), Vytauto pr 79 / Kęstučio g. 1 (estinta Vytauto 57)

La stratangula palaco, finkonstruita en 1939 komence de 1940 estis inaŭgurita kiel Popolhejmo (Tautos namai) de la ŝtata institucio Laborpalaco. Unu el la ĉeforganizantoj de la konstruado estis esperantisto Pranas Šulaitis. Dum milite, ve, ĉi tie loĝiĝis nazia gestapo. Ekde 1946 ĉi tie loĝiĝis soveta Sindikata kulturpalaco.

Verŝajne en 1972 ĉi tien el la malnova urbo translokiĝis E-klubo gvidata de Albinas Vebeliūnas. Li en Kaŭno organizis kelkajn diverslokajn Zamenhof-festojn, kelkajn E-ekspoziciojn, eĉ E-kursojn en la palaco mem (kiam ties ĉefoj tion ne kontraŭis). En la klubo aktivis malnovaj esperantistoj P. Stašys, I. Balčiūnas, P. Varkauskas (peranto de E-gazetaro), A. Baltrušaitienė. Aktivis la novuloj V. Skimundris, V. Ruževičius, J. Sakauskas, Z. Venskis. En 1978 en la Palaco okazis solena vespero dum kiu la “senlaca” kluba prezidanto Albinas Vebeliūnas estis honorigita okaze de sia 70-jariĝo. La 26-an de Februaro 1980 la prezidantecon de Kaŭna E-klubo transprenis pli juna Erikas Laiconas. A. Vebeliūnas estis elektita honora prezidanto de la klubo (forpasis en 1994).



26. E-kunvenejo – Jablonskis-noma lernejo, Aušros g. 3 / Žemaičių g.

Aŭtune 1931 ekfunkciis, nur dum unu jaro projektita kaj konstruita (!) prestiĝa Jablonskis-noma popollernejo (elementa lernejo). Ekde 2023 ankaŭ ĝi reprezentas la Kaŭnan modernistan arkitekturon en la UNESKO-listo de Tutmonda Heredaĵo. La elementa lernejo baldaŭ iĝis „kutima“ kunvenejo de antaŭmilitaj Kaŭnaj esperantistoj!. Dum la II mondmilito la lerneja konstruaĵo servis por milita malsanulejo. Nun ĉi tie funkcias Jablonskis-noma gimnazio.

La 26-an de Februaro 1933 okazis vica kunveno de KES (tiam, fakte, Kaŭna fako de LEA). Instruisto Vladas Butkus raportis kiel sukcesas E-kurso kun 50 aŭskultantoj,

Juozas Kazlauskas pri biblioteko de KES. La 30-an de Aprilo 1933 la KES memorigis pri la 16-jara forpaso de d-ro L. L. Zamenhof. Mesaĝojn prezentis V. Butkus, J. Kazlauskas kaj Ida Dektoraitė. Al la memortago venis ankaŭ Tereza Kocinienė, la bofratino de d-ro Zamenhof.

La 29-an de Oktobro 1934 KEA okazigis kunvenon, en kiu la viceprezidanto Emilija Janickienė rakontis impresojn el Ĉeĥoslovakio. La 28-an de Aprilo

1935 okazis Ĝenerala kunveno de LEA (32 personoj el 8 lokoj, kiuj reprezentis 204 membrojn de LEA kaj honora gasto, la bulgara ĵurnalisto G. Pamporov). Poste multaj iris al aparta salono de la kafejo-laktejo Asta por glaso da teo.

La 23-an de Februaro 1935 okazis Jarkunveno de LEA kunraporto de Centra Estraro kaj raportoj de lokaj grupo (unu delegito de 5 membroj).

La 14-an de Februaro 1937 okazis E-kunveno, dum kiu la reveninta el 8-jara mondvojaĝo Antanas Paškevičius-Poška prelegis laŭteme “Sub palma ombro ĉe rivero Gango” kaj Redaktoro de revuo “Litova Stelo” instruisto Petras Lapienė pri “E-poetoj Kaloĉaj kaj Baghy”. La 29-an de Februaro 1937 A. Poška publike prelegis pri la temo “El la vojaĝo tra mirakla Hindio” kaj demonstris 100 lumbildojn. Lernantoj kaj soldatoj enire devis pagi po 50 cendojn, ceteraj 1 Lidon. La 11-an de Aprilo 1937 okazis ĝenerala kunveno de LEA, dum kiu oni elektis novan estraron de LEA: Antanas Poška (prezidanto!), juristo Balys Giedra, ĵurnalisto Pranas Enskaitis (sekretario), geodezisto Liudas Alseika, aktoro Zigfridas Turnevičius kaj Mikas Cicėnas (milita oficisto?).

La 20-an de Februaro 1940 instruisto kaj ĵurnalisto Eduardas Medonis per litovlingva


prelego “Esperanto estas la vojo al la Mondo” komencis novan E-kurson. La unufoja porkursa pago estis 10 Lidoj, sed por lernantoj, studentoj kaj laboristoj – 5 Lidoj.

Ni vizitis la plimulton da vizitindaj Kaŭnaj lokoj, pri kies E-historio apenaŭ konscias ordinaraĵ Kaŭnanaĵoj.

Promenfine ni rememoru kaj memorfiksu la konfeson de la Aŭtoro de Esperanto pri nia lando: „Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi, kvankam mi forlasis vin kiel juna knabo,[...] vi, kiun nenia alia parto de la tero iam povos anstataŭi en mia koro.“ El la parolo en Londona urbodomo, 19.08.1907, post la UK-3 en Kembriĝo.



Jablonskis-noma lernejo, E-kunvenejo,
fotis G. Jurgelevičius.



Antanas Poška, antaŭmilita LEA-prezidanto.

Koncize pri Litovio

Geografiaj koordinatoj: norde 56°28' da norda latitudo, sude 53°54' da norda latitudo; okcidente 20°56' da orienta longitudo, oriente 26°51' da orienta longitudo. La distanco inter la plej norda kaj la plej suda punktoj 276 km, inter la plej okcidenta kaj la plej orienta 373 km.



Areo de la ŝtato: 65 300 kvadrataj kilometroj.

Landlimoj: norde kun Latvio 588 km, oriente kaj sude kun Belorusio 677 km, sude kun Pollando 104 km, sudokcidente kun Rusio 255 km, okcidente 90 km da Baltmara bordo. Entute 1732 km.

Tereno: apudmara ebenaĵo, nur en orienta parto aperas montetoj; la plej alta monteto Juozapinė (293,6 m super la marnivelo); la plej longaj riveroj: Nemunas (937 km, en Litovio 475 km), Neris (510 km, en Litovio 234 km), Venta (343 km, en Litovio 161 km). Estas 2830 lagoj pli grandaj ol 0,5 ha. Arbaroj kovras 30,9 % da teritorio.

Klimato: Meza jara temperaturo + 6,1° C. Plej malvarma monato estas januaro (– 4,9° C), plej varma – julio (+17° C). Rekorda registrita frosto –43° C, rekorda varmego + 37° C. Averaĝa kvanto de precipitaĵo 680 mm jare. Pli multe da precipitaĵo falas en novembro – februaro.


Loĝantoj: 2 944 500 homoj (2014). Laŭ naciecoj litovoj konsistigas 84,1 %, poloj – 6,6 %, rusoj – 5,8 %, belorusoj – 1,2 %, aliaj – 2,3 %. Denseco de loĝantoj estas 45,1 homoj en km².



Gražina Opulskienė parolas pri vizitindaj lokoj kun rilato al Zamenhof en Litovio:
www.youtube.com/watch?v=3ipEOFn_e4Q



Trakai estas historia urbeto kaj grava turisma allogaĵo apud Vilno:
<https://eo.wikipedia.org/wiki/Trakai>



Vivodaŭro: Averaĝa vivodaŭro en 2009 estis 74,9 jaroj (por viroj 69,98 jaroj, por virinoj 80,1 jaroj).

Klereco: 98,3 % da loĝantoj (10-jaraj kaj pli aĝaj) kapablas legi kaj skribi, 20 % havas superan klarecon.

Religio: plimulto da loĝantaro estas rom-katolikoj. Estas ankaŭ grandaj komunumoj de ortodoksuloj kaj protestantoj.

Ĉefurbo de la ŝtato: Vilnius (Vilno) kun 527 900 loĝantoj. Aliaj grandaj urboj estas: Kaunas (Kaŭno, 307 500), Klaipėda (158 900), Šiauliai 106 800), Panevėžys (97 600). Administra divido: 10 departementoj kaj 60 municipoj.



Ŝtata ordo: demokratia respubliko. La valida konstitucio, aprobita dum referendumo la 25-an de oktobro 1992. Gvidanto de la ŝtato – prezidento, elektata rekte de la civitanoj por 5 jaroj. Parlamento estas nomata Sejmo, ĝin konsistigas 141 membroj, elektataj por 4 jaroj.

Ŝtata lingvo estas la litova.

Ŝtata flago – trikoloro flava-verda-ruĝa, aprobita en 1918.

Ŝtata blazono:

kavaliro sur blanka rajdĉevalo en ruĝa fono, ekde la 14-a jarcento. La blazono nomiĝas „Vytis“ (kavaliro defendanta kontraŭ atakantoj).



Ŝtata himno: „Nacia glorkanto“, verkita de Vincas Kudirka.

Ŝtataj festotagoj:

1-a de januaro – La Nova jaro; tago de litovia flago;

16-a de februaro – tago de refondo de Litova Ŝtato (en 1918);

11-a de marto – tago de rekreo de la sendependeco (en 1990);

6-a de julio – tago de la ŝtato; kronado de Mindaugas (en 1253).

Vojoj: fervojoj – 1767 km, publikaj tervojoj – 82 911 km, akvovojoj – 800 km.

Nacia valuto: ĝis 2015-01-01 estis lido. Ekde tiu dato cirkulas la eŭropa valuto eŭro.

Tempo: Litovio apartenas al la dua hor-zono (Grenviĉa Meza Tempo + 2 horoj, aŭ Mez-Eŭropa Tempo + 1 horo).

Bazaj scioj pri la litova lingvo

Alfabeto. Litova lingvo uzas modifitan latinan alfabeton el 32 literoj:

A a, Ā ā, B b, C c, Č č, D d, E e, Ė ė, Ē ē, F f, G g, H h, I i, Į į, Y y, J j, K k, L l, M m, N n, O o, P p, R r, S s, Š š, T t, U u, Ū ū, V v, Z z, Ž ž.

Sonojn **f, h** kaj digramon **ch** [h] litova lingvo ne havas; tiuj literoj estas uzataj nur en fremdaj (internaciaj) vortoj, ekz. *fabrikas, filosofija, himnas, choras*.

Bazaj vokaloj **a, e, i, o, u** estas prononcataj kiel en Esperanto, nur vokalo **e** estas multe pli vasta, prononcata per vaste malfermita buŝo, kiel **a** en angla vorto *map* [mæp]. Litero **é** signifas malvastan sonon **e**, similan al germana *ä*, *eh* en vortoj *spät, mehr* aŭ al franca *é* en *café*.

Longajn vokalojn indikas literoj: **y** [i:], **ū** [u:]. Ili sonas simile al anglaj *see* [si:], *soon* [su:n] aŭ al germanaj *wie, Kuh*.

Nazaloj **ą, ę, į, ū** en antikveco sonis kiel *an, en, in, un*, sed nun estas prononcataj kiel simplaj **a, e, i, u**, nur iomete pli longaj. Ili servas ankaŭ kiel indikiloj de kazoj (singulara akuzativo kaj plurala genitivo).

Konsonantoj estas prononcataj kiel en Esperanto; **ĉ** = ĉ, **ŝ** = ŝ, **ĵ** = ĵ. Konsonantoj povas esti molaj kaj malmolaj. Malmolaj ili estas antaŭ vokaloj *a, q, o, u, y, ŭ*, ekz., *la, lo, lu, lū* kaj molaj – antaŭ *e, ė, ē, i, į, y*, ekz. *le, lê, li, ly*. Tamen konsonantoj povas esti molaj ankaŭ antaŭ *a, o, u, ŭ*. Tiam antaŭ tiuj vokaloj estas skribata *ne prononcata litero i*, servanta kiel moliga signo: *la* [„la” kun malmola „l”], *lia* [„la” kun mola „l”]. Provu laŭte prononci pare: *na – nia, sa – sia, ŝa – ŝia, ka – kia...* (Pri la neprononcata **i** ĉi-sube ni avertos vin substrekante ĝin.)

Interese, ke vokaloj *e, ė, i, y* moligas ne nur senpere antaŭan konsonanton, sed eĉ pli antaŭan, ekz. *alga* [alga’ kun malmola „l”], *Algis* [Al’gis kun mola „l”].

Diftongoj. Puraj diftongoj (nur el vokaloj) estas ses: *ai, au, ei, ui, ie, uo*. La unuaj kvar havas analogojn en Esperanto: *ai* [= aj], *au* [= aŭ], *ei* [= ej], *ui* [= uj]. Por *ie, uo* analogoj ne estas; ili estas prononcataj kiel *ie* (unu silabo), *ŭo*, ekzemple: *vienas* (vje’nas = unu), *duona* (dŭo’na = pano).

Kombinante vokalojn *a, e, i, u* kun *l, m, n, r* ni ricevas 16 duondiftongojn: *al, am, an, ar; el, em, en, er; il, im, in, ir; ul, um, un, ur*. Ankaŭ ili estas prononcataj kiel nedisigebla tuto en silabo.

Akcento. Litova lingvo ne havas konstantan akcenton kiel Esperanto aŭ la pola, la franca. Do litovoj mem sub influo de dialektoj ofte faras akcentajn erarojn.

En litova lingvo ekzistas trispeca akcento, pro tio la sama akcentita silabo, prononcita per diferenca tono, iam donas al la vorto tute alian signifon (kiel en la ĉina). La ekzemploj pli sube.

Mallongaj vokaloj estas indikataj per akcentosigno [ˈ] sur vokaloj **à, è, ì, ù**, ekzemple: *aŝ* (= mi), *kàs* (= kio, kiu), *kadà* (= kiam), *labà dienà* (= bonan tagon), *nè* (= ne), *ikì* (= ĝis), *sveikì* (svejki’ = saluton), *tù* (= ci), *gardù* (= bonguste).

Longaj vokaloj estas elparolataj dumaniere: kun descenda (falanta) tono kaj kun ascenda (supreniranta) tono.

La descenda tono estas nomata *komenĉforta*, ĉar oni substrekas komencon de la silabo, post kio la tono subite malsupreniras. Tian akcenton indikas signo [ˋ]

sur vokaloj **á, é, í, ó** ekzemple: *káina* (kaj'na = prezo), *kélti* (= levi), *pílmas* (= plena), *vókas* (= koverto).

La ascenda tono nomiĝas *finforta*, en ĝi oni pli substrekas finon de la silabo. La finfortan tonon indikas signo [~] super vokaloj **ā, ī, ō, ē, ŷ** aŭ super konsonantoj en duondiftongoj **añ, eñ, iñ, uñ...**, ekzemple: *āĉiŭ* (a'ĉu = dankon), *lābas vākaras* (= bonan vesperon), *iki pasimātymo* (= ĝis revido), *sudiē* (= adiaŭ), *laŭkas* (= kampo), *laŭkas* (= arko).

Jen kelkaj ekzemploj, kiam prononca tono ŝanĝas signifon de la vorto: *mēs* (li ĵetos) – *mēs* (ni); *māno* (mia) – *māno* (li opinias); *kāltas* (ĉizilo) – *kaŭltas* (kulpa); *sviēstas* (butero) – *sviēstas* (ĵetita). Oni diras, ke fremdlingvanoj ne povas ĝuste elparoli vortojn *pilkas viŭkas* (griza lupo); tio estas kvazaŭ litova ŝiboleto.

Substantivo havas gramatikan genron; ekz., *stālas* (tablo) estas virgenra, *dienā* (tago) – ingenra. Bedaŭrinde laŭ finaĵoj ne ĉiam eblas diveni, al kiu genro apartenas la vorto. Substantivaj finaĵoj **-as, -ys, -us, -uo** indikas viran genron (escepto: *sesuō* = fratino). Substantivoj kun finaĵoj **-a, -ĕ, -i** plejofte estas ingenraj; vortoj kun finaĵo **-is** povas esti virgenraj aŭ ingenraj. Neŭtra genro en litova lingvo ne ekzistas, sed estas sufiĉe multe da vortoj t.n. komungenraj; ili kvazaŭ hermafroditoj samtempe estas vir-genraj kaj ingenraj. Laŭ signifo ili ĉiuj havas negativan nuancon kaj taŭgas por insultoj, ekzemple: *dabitā* = dand(in)o, *kvāiša* = stultul(in)o, *saviŭmyla* = egoist(in)o... Ĉu temas pri viro aŭ virino, indikas genro de epiteto: *tikras kvāiša* (vera sultulo), *tikrā kvāiša* (vera stultulino).

Substantivoj havas 5 deklinaciojn kaj 7 kazojn: nominativo, genitivo, dativo, akuzativo, instrumentalo, lokativo, vokativo. Singulara akuzativo ĉiam finiĝas per nazala vokalo: -a, -e, -i, -u. Ankaŭ plurala genitivo ĉiam havas finaĵon -u. Dum deklinaciado la

akcento iam restas konstanta, sed plej ofte saltadas en la vorto de unu loko al la alia, ekz.: *rankā* (= mano), *raŭkos* (= de mano), *raŭkai* (= al mano), *raŭka* (= manon), *rankā* (= per mano), *raŭkoje* (= en mano), *raŭka* (= ho, mano!).

Estas kelkaj substantivoj, kiuj havas nur pluralan formon, eĉ kiam temas pri unu objekto, ekz.: *mētai* (= jaro), *dūrjs* (= pordo), *keĭnēs* (= pantalono), *marŝkiniaĭ* (= ĉemizo), *rōĝēs* (= sledo), *dūjos* (= gaso), *rytaĭ* (= oriento)... Por tiaj substantivoj ekzistas specialaj numeraloj, ekz. oni devas diri ne *dū mētai* (= du jaroj), sed *dveji mētai*. Ŝajnas, ke tiu numeralo formo (*dveji*, *treji*...) poiomete jam foriras el uzado.

Antaŭ kelkdek jaroj ankoraŭ estis uzata dualo – deklinacia nombro por du objektoj; oni diris *dū vaikū* (= du infanoj), sed nun oni jam uzas pluralon: *dū vaikaĭ*.

Adjektivo. Ankaŭ adjektivoj havas gramatikan genron kaj devas esti akordigataj kun substantivo laŭ genro, kazo kaj nombro. Sed ĉi tie estas pli facile diveni genron, ĉar genraj finaĵoj de adjektivoj estas konstantaj kaj regulaj: virgenraj havas finaĵojn **-as, -us, -is**, ingenraj respektive **-a, -i, -ĕ**, ekzemple:

gēras berniukas (= bona knabo), *gerā mergaitē* (= bona knabino); *gražūs rytas* (= bela mateno), *graži dienā* (= bela tago); *auksinis šaukštas* (= ora kulero), *auksinė monetā* (= ora monero).

Adjektivoj havas ankaŭ neŭtran genron. Por kio ĝi, se ne ekzistas neŭtra genro de substantivoj? Neŭtraj adjektivoj estas uzataj en senpersonaj frazoj, do ili neniam estas epitetoj ĉe substantivoj:

Mān labaĭ gēra (= al mi estas tre bone);
Kaĭp ĉiā gražū! (= kiel bele estas ĉi tie!).

Do en Esperanton ili estas tradukindaj kiel adverboj *bone, bele*.

Adjektivoj havas 3 deklinaciojn (laŭ finaĵoj

-as, -a; -us, -i; -is, -e). Samkiel substantivoj, singulara akuzativo rekonebla per finaĵoj -q, -e, -j, -u, kaj plurala genitivo – per finaĵo -u.

Komparativo estas farata per sufikso **-ĉsnis, -ĉsné:** *gerĉsnis, gerĉsné* (= pli bona), *gražĉsnis, gražĉsné* (= pli bela); superlativo – per sufikso **-iáusias, -iáusia:** *geriáusias, geriáusia* (= plej bona), *gražiáusias, gražiáusia* (= plej bela).

Kelkaj pronomoj:

ăš mi; tŭ ci; jŭs li; jŭ ŝi;

mĕs ni; jŭs vi; jiĉ ili (virgenra); jŭs ili (ingenra);

kàs kio, kiu; tàs, tà tiu; kóks, kokià kia; tóks, tokià tia; kuris, kuri kiu.

Verbo. Verba infinitivo ĉiam havas finaĵon **-ti:** *turėti* (= havi); *mylėti* (= ami), *norėti* (= voli), *válgyti* (= manĝi), *gérti* (= trinki). Infinitivo de refleksivaj verboj (ankaŭ de tiuj, kiuj direktas la agon al la aganto) finiĝas per **-tis:** *praŭstis* (= sin lavi), *siŭlytis* (= sin proponi), *linksmintis* (= amuziĝi). Verboj povas esprimi *daŭran* aŭ *finan* aspekton: *rašýti* (= skribi) – *parašýti* (= finskribi); *skaitýti* (= legi) – *pérskaityti* (= tralegi); *gérti* (= trinki) – *išgérti* (= eltrinki).

Verboj havas kvar simplajn tempojn: prezentcon, unufojan preteriton, multfojan preteriton kaj futuron. Ni konjugaciu la verbon *bŭti* (= esti):

Prezenco

ăš esŭ (mi estas)
tŭ esŭ (ci estas)
jŭs / jŭ yrà (li / ŝi ĝi estas)

mĕs ĉsam(e) (ni estas)
jŭs ĉsat(e) (vi estas)
jiĉ / jŭs yrà (ili estas)

Unufoja preterito

ăš buváu (mi estis)
tŭ buvá (ci estis)
jŭs/jŭ búvo (li/ŝi/ĝi estis)

mĕs búvom(e) (ni estis)
jŭs búvot(e) (vi estis)
jiĉ / jŭs búvo (ili estis)

Multfoja preterito

ăš būdavau (mi ofte estis)
tŭ būdava (ci ofte estis)
jŭs/jŭ būdavo (li/ŝi/ĝi ofte estis)

mĕs būdavom(e) (ni ofte estis)
jŭs būdavot(e) (vi ofte estis)
jiĉ/jŭs būdavo (ili ofte estis)

Futuro

ăš būsiu (mi estos)
tŭ būsi (ci estos)
jŭs / jŭ bŭs (li/ŝi/ĝi estos)

mĕs būsim(e) (ni estos)
jŭs būsit(e) (vi estos)
jiĉ / jŭs bŭs (ili estos)

Verboj havas tri konjugaciojn, sed ni ne enprofundiĝu en tiun ĝangalon. Krome, same kiel en Esperanto, verbo *būti* kun participoj konsistigas multajn kompleksajn tempojn. Ankoraŭ necesas substreki, ke participa sistemo preskaŭ koincidas kun tiu en Esperanto, do iuj eĉ opinias, ke L.Zamenhof prenis ĝin el la litova. Tiu aserto ne estas bazita, ĉar la aŭtoro de Esperanto ne sciis funde la litovan.

Jen la participoj:

skaitqs, skaitanti (= leganta)

skaitomas, skaitoma (= legata)

skaitqs, skaitčiusi (= leginta)

skaitýtas, skaitýta (= legita)

skaitýdaves, skaitýdavusi (= ofte leginta)

skaitýsiqs, skaitýsianti (= legonta)

skaitýsimas, skaitýsima (= legota)

Diference de Esperanto, pasivajn participojn havas ankaŭ netransitivaj verboj. Do litovoj diras: *sėdimà vietà* („sidata loko”, t.e. loko por sidado); *miegamàsis kambarýs* („dormata ĉambro”, t.e. ĉambro por dormado).

Diferencas ankaŭ uzado de reflektivaj verboj: se aganto aplikas la agon al si mem, por ĉiuj personoj estas uzata la refleksiva partikulo *s(i)*. Litovoj diras:

àš prausiúos(i) (mi lavas sin);

mės prausiamės (ni lavas sin)

tù prausies(i) (ci lavas sin);

jūs prausiatės (vi lavas sin)

jis/ji prausias(i) (li/ŝi/ĝi lavas sin);

jiŝ/još prausiasi (ili lavas sin)

Sub influo de la gepatra lingvo, litovaj esperantistoj faras analogajn erarojn dirante: *mi vizitis sian* (= mian) fraton; *vi iru en sian* (= vian) ĉambron; *ni amas sian* (= nian) patrujon.

Numeraloj:

Bazaj numeraloj 1 – 9 havas genrojn kaj specifajn formojn por pluralaj substantivoj. Kun 2 – 9 estas uzata plurala nominativo.

1 – *vienas nāmas* (= unu domo), *vienà dienà* (= unu tago); por pluralaj substantivoj – *vieneri mētai* (= unu jaro), *vienerios dūrys* (= unu pordo);

2 – *dù, dvi*; (*dvejì, dvėjös*);

3 – *trýs, trýs*; (*trejì, trėjös*);

4 – *keturi, kēturios*; (*ketveri, kētverios*);

5 – *penki, peñkios*; (*penkeri, peñkerios*);

6 – *šeši, šėšios*; (*šešeri, šėšerios*);

7 – *septyni, septýnios*; (*septyneri, septýnerios*);

8 – *aštuoni, aštúonios*; (*aštuoneri, aštúonerios*);

9 – *devyni, devýnios*; (*devyneri, devýnerios*).

Numeraloj 10 – 20 jam ne havas genrojn nek 4 diversajn formojn, sed kun ili estas uzata plurala genitivo:

10 – *dėšimt mėtų* (= dek jaroj, laŭvorte „dek da jaroj”).

11 – *vienúolika, 12 – dvýlika,*

13 – *trýlika, 14 – keturiólika,*

15 – *penkiólika, 16 – šešiólika,*

17 – *septyniólika, 18 – aštuoniólika,*

19 – *devyniólika, 20 – dvidešimt.*

Numeraloj 21 – 29, 31 – 39, 41 – 49, 51 – 59 ktp. ripetas la saman ordon, kiel tiuj 1 – 9, ĉar ili estas duvortaj kaj substantivon regas la lasta vorto de numeralo, do litovoj diras: *dvidešimt vienas nāmas* (dudek unu domo!); denove validas specifaj numeraloj por pluralaj substantivoj.

21 – *dvidešimt vienas / vienà / vieneri / vienerios*;

22 – *dvidešimt dù / dvi / dvejì / dvėjös*; ...

30 – *trisdešimt*; 40 – *kēturiasdešimt*

50 – *peñkiasdešimt*, 60 – *šėšiasdešimt*;
 70 – *septýniasdešimt*; 80 –
aštuoniasdešimt; 90 – *devýniasdešimt*;
 100 – *šimtas*; 175 – *šimtas*
septýniasdešimt penki / *peñkios*;
 200 – *dù šimtaĩ*; 203 – *dù šimtaĩ trỹs*;
 250 – *dù šimtaĩ peñkiasdešimt*;
 300 – *trỹs šimtaĩ*; 314 – *trỹs šimtaĩ*
keturiólíka; 1000 – *tūkstantis...*

Ordaj numeraloj, same kiel adjektivaj, havas tri genrojn:

unua – *pirmas*, *pirmá*, *pirma* (= unue);
 unuaj – *pirmi*, *pirmos*;
 dua – *añtras*, *antrá*, *añtra* (= due);
 duaj – *antri*, *añtros*;
 tria – *trėčias*, *trečia*, *trėčia* (= trie);
 triaj – *treti*, *trėčios*;
 kvara – *ketvirtas*, *ketvirtà*, *ketvirta*;
 kvaraj – *ketvirtì*, *ketvirtos*;
 kvina – *peñktas*, *penktà*, *peñkta*;
 kvinaj – *penkti*, *peñktos*;
 sesa – *šėštas*, *šeštà*, *šėšta*;
 sesaj – *šešti*, *šėštos*;
 sepa – *septiñtas*, *septintà*, *septiñta*;
 sepaj – *septinti*, *septiñtos...*

El ordaj numeraloj estas faritaj nomoj de semajnaj tagoj: lundo – *pirmàdienis* (el: *pirmà dienà* = unua tago), mardo – *antràdienis* (*antrà dienà* = dua tago) ktp.

Adverboj. Agmanieron esprimantaj adverboj estas derivataj el adjektivaj kaj havas gradojn de komparado:

gėras (bona) – *geraĩ* (bone), *geriaũ* (pli bone), *geriáusiai* (plej bone);
blėgas (malbona) – *blogaĩ* (malbone), *blogiaũ* (pli malbone), *blogiáusiai* (plej malbone);
gražũs (bela) – *gražiaĩ* (bele), *gražiaũ* (pli bele), *gražiáusiai* (plej bele).

En litova lingvo ekzistas preskaŭ kompleta sistemo de korelativoj, simila al tiu en Esperanto (vidu la paĝon 330).

Prepozicioj postulas diversajn kazojn depende de la senco, ekzemple *põ*:
 genitivon: *põ mėnesio* (post monato),
põ lietaũs (post pluvo);
 akuzativon: *põ dù óbuolius*
 (po du pomojn);
 instrumentalon: *põ stalũ* (sub la tablo).
 Prepozicioj en vortfarado estas uzataj kiel prefiksoj.

Diversaj rimarkoj.

Litova lingvo uzas multajn diminutivojn kaj karesvortojn, per sufiksoj farataj el propraj nomoj, ekzemple:

Jõnas (Johano) – *Jõnis*, *Jonėlis*, *Jonũkas*,
Jonytis...

Onà (Anna) – *Õnė*, *Ānė*, *Onėlė*, *Onutė*,
Onýtė...

Precipe multajn sinonimojn kaj diminutivojn havas la vorto *mótina* (patrino): *mótė*, *móčia*, *mamà*, *močiutė*, *motulė*, *motinėlė*, *motinytė*, *motutė*, *motušė*, *mamėlė*, *mamýtė*, *mamutė*, *mamũžė...*

En vortfarado abunde estas uzataj sufiksoj kaj prefiksoj, sed ilia signifo ne estas tiel strikte difinita, kiel en Esperanto. Ekzemple, ideon de profesio aŭ okupiĝo (en Esperanto **-ist-**) esprimas kelkaj sufiksoj:

mókyti (instrui) – *mókytojas* (instruisto),
mókytoja (instruistino);
siũti (kudri) – *siuvėjas* (kudristo, tajloro),
siuvėja (kudristino, tajlorino);
smuĩkas (violono) – *smuĩkininkas*
 (violonisto), *smuĩkininkė* (violonistino);
vėžti (veturigi) – *vėžikas* (veturigisto,
 koĉero), *vėžikė* (veturigistino, koĉerino);
dantis (dento) – *dantistas* (dentisto),
dantistė (dentistino).

Esperanta sufikso -il- en la litova havas eĉ 35 ekvivalentojn.

En frazo povas esti kelkaj neaj vortoj, ekz.: *jis niekadà niėko nežino* (laŭvorte: li neniam nenion ne scias, t.e. li neniam ion scias). Tamen du vortetoj ne nuligas neadon: *lakštiñgala neĝali nečiulbėti* (najtingalo ne



Informilo N-ro 2 pri BET-59

Gravaj praktikaj kaj teknikaj informoj

La alveno al Kaŭno okazos la 4-an kaj la 5-an de Julio, la forveturo – la 13-an de Julio.

Al BET-59 aliĝis jam 256 partoprenantoj el 31 landoj.

Partoprenantoj de BET-59 loĝos en jenaj lokoj:

1. **Studenta domo** de la Instrua centro (str. Jonavos 178)

2. **Tristela hotelo** “Metropolis” (str. S. Daukanto 21)

Ĉiuj programeroj de BET-59 okazos en du apudaj konstruaĵoj de la universitato (str. S. Daukanto 28 kaj str. S. Daukanto 27).

Inter la ĉefa BETejo, urbaj busa kaj fervoja stacidomoj, kaj studenta domo eblas veturi per urbaj busoj kaj trolebusoj. La urba transporto por ĉiuj



povas ne kanti, t.e. ĝi devas kanti). Sendube ankaŭ litova lingvo uzas multajn internaciajn vortojn (*telefonas, autobûsas, poetas, fizika, programà, kompiûteris...*), tamen ĝi strebas krei ankaŭ proprajn terminojn: *lygiagretûs* (paralela), *ritinÿs* (cilindro), *spausdintûvas* (printilo) k.t.p. Lingvistoj batalas kontraŭ troa uzado de internaciismoj.

Litova lingvo asimilas proprajn nomojn, ĉar tion postulas strukturo de la lingvo – la vortoj devas esti deklinacieblaj, do ili akiras litovajn finaĵojn: *Ėksspyras, Volteras, Dantë, Servantesas, Paryžiûs, Berlynas, Tokijas, Temzë, Dunojus...* Sed en gazetoj oni jam trovas miksitaĵajn formojn, ekzemple *Bushas, Saddamas Huseinas*, kvankam devus esti *Buŝas, Sadamas Huseinas*. Tiaj formoj estas deklinacieblaj, ekz.: *Volteras, Voltero, Volterui, Volterq...*, *Bushas, Busho, Bushui, Bushq*.

Petras Čeliauskas

partoprenantoj de BET-59 dum la tuta periodo de BET-59 estos senpaga. Ĉiu partoprenanto de BET-59 dum registrado ricevos identigan karteton, sur kies dorsa flanko estos gluita speciala kodo – en busoj kaj trolebusoj necesos almeti ĝin al bilet-identigiloj.

Partoprenantoj organizite komune tagmanĝos en la restoracio “Bistronomé” (avenuo Laisvės 37) – ĝi situas je kelkcent metroj de la ĉefa BETejo. La organizitaj komunaj tagmanĝoj okazos nur lunde, marde, ĵaŭde, vendrede kaj sabate, do, dum kvin tagoj, oni devos pagi ilin dum la registrado. Laŭdezire eblas ricevi vegetaran kaj veganan tagmanĝon. Dum aliaj tagoj la manĝado estos memstara laŭ bontrovo de la partoprenantoj.

En la ĉefa universitata BETejo (str. S. Daukanto 28) konstante funkcias la Organiza komitato de BET-59, akceptejo (registrado de partoprenantoj, informoj k. s.), redakcio de la ĉiutaga gazeto de BET-59 “Kunfluo”, riĉa libroservo kaj ĉiuj aŭditorioj kaj salonoj, krom la teatra.

Kaŭno estas atingebla aviadile, trajne, buse kaj aŭtomobile. Aŭtomobile oni rekte veturu al Kaŭno. Kiu trajne aŭ buse venos, de la busa aŭ trajna stacidomoj veturu plu al Kaŭno – busoj kaj trajnoj estas multaj (la trajna kaj busa stacidomoj en Vilno estas apude, de la flughaveno necesas veturi buse).

Ĉiuj partoprenantoj atingu la BETejon memstare. Ni ne havas eblon renkonti vin en la stacidomoj.

Ekde la 1-a de Julio la Organiza komitato de BET-59 funkcias en la ĉefa universitata konstruaĵo (str. S. Daukanto 28). La poŝtelefono de la prezidanto de la Organiza komitato Povilas Jegorovas estas +370 687 12219 . La retadreso

estas *pjedorovas@yahoo.com*. Ĉiujn aktualajn informojn pri BET-59 eblas trovi en ties retejo: <http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=bet59>.

La 4-an de Julio (vendrede) kaj la 5-an de Julio (sabate) ekde la 10-a ĝis la 22-a horo en la ĉefa universitata konstruaĵo (str. S. Daukanto 28) **funkcios registrado de partoprenantoj de BET-59**, loĝigo, eblos ricevi diversajn informojn. Dum la registrado vi registros vian alvenon, ricevos pakaĵon kun diversa materialo, “Libron por BETano”, faldfoliojn pri Kaŭno en Esperanto, karton kun viaj loĝdomo kaj ĉambro, kuponojn por manĝado k. s.

Ĉiuj, kiuj ne pagis anticipe la aliĝkotizon, loĝadon kaj manĝadon, aŭ pagis neplene, dum la registrado **devos pagi ĉion** konforme al siaj kategorio kaj periodo. Novaj anticipe nealiĝintaj personoj plenigos la aliĝilojn surloke kaj pagos ĉion adekvate. Malfruintoj povos registri sian partoprenon en BET-59 ankaŭ dum postaj tagoj. Registriĝo por la ekskursoj kaj pago okazos aparte sabate kaj dimanĉe dum anoncotaj horoj. Ĉiuj ekskursoj estas pagendaj aparte.

La 6-an de Julio (dimanĉe) komenciĝos la laboro de BET-59 laŭ la programo, kaj estas antaŭvidita organiza tempo por diversaj programeroj kaj por prepariĝo al la solena inaŭguro de BET-59.

La solena inaŭguro de BET-59 okazos la 6-an de Julio (dimanĉe) je la 15-a horo en la Granda salono de la universitato (str. S. Daukanto 28). Bonvolu veni kelkajn minutojn antaŭ la komenco de la inaŭguro.

La solena fermo de BET-59 okazos la 12-an de Julio (sabate) je la 15-a horo en la Senata salono de la universitato (str. S. Daukanto 28).

La 9-an de Julio (merkrede) estos ekskursoj dum la tuta tago. Dum aliaj tagoj okazos kelkaj duontagaj ekskursoj. **Legu pri la ekskursoj** ĉe <https://sezonoj.ru/2024/12/bet-160/>.

La programo estos tre intensa, riĉa kaj interesa; vidu ĝin ĉe <https://sezonoj.ru/2025/05/bet-194/>.

Ĉiutage aperos kvarpaĝa plenkolora gazeto de BET-59 “Kunfluo”. Ĝin kompilos kaj redaktos Pawel Fischer-Kotowski – lia retadreso estas *fiskot@gmail.com*. En “Kunfluo” aperos ĉiuj aktualizaĵoj, informoj, anoncoj pri salonoj de la programeroj, eventualaj ŝanĝoj de la programo, precizigoj, priskribo de BET-59, fotoj k. s.

Uzu la gazeton por anoncoj, proponoj, informu en ĝi pri la jam okazintaj programeroj. Ĝi estas via gazeto, tial bonvolu anticipe prepariĝi kunlabori kun ĝi. Entute aperos 8 numeroj de la gazeto – la unua jam la 5-an de Julio (sabate); la lasta – la 12-an de Julio (ankaŭ sabate). Ĝin ĉiutage povos preni ĉiu partoprenanto. La gazeto aperos ankaŭ rete en la retejo de BET-59. Aktualajn informojn eblos trovi ankaŭ sur la anonctabulo ĉe la akceptejo.

La laborlingvo de BET-59 estas Esperanto. Dum BET-59 eventuale funkcios kelkaj ekspozicioj.

Monon eblos ŝanĝi en urbaj bankoj. En Litovio funkcias eŭro.

La elektra tensio en Litovio ĝenerale estas 220-volta.

La listo de la partoprenantoj de BET-59 estas en ties retejo kaj en la “Libro por BETano”.

La Organiza komitato de BET-59 petas vin esti atentaj, toleremaj, disciplinmaj, akurataj kaj ĝustatempaj.

Prepariĝu aktive labori dum BET-59. Ĝia sukceso dependas de ĉiuj partoprenantoj.

Bonvenon al Kaŭno!
Organiza komitato de BET-59

Grava anonco: pasvorto de WI-Fi
de la universitato por gastoj:
9Un8eUPoP9C6tNb

Historio de la Unua BET kaj la 60-jara jubileo

En la baltiaj landoj – Estonio, Latvio kaj Litovio – ekde 1959 estas tradicio organizi Baltiajn Esperanto-Tagojn.

La nomo de la entrepreno dum jaroj iom estis ŝanĝita: Ĉeŭalta Studenta kaj Junulara Esperanto-Tendaro, Baltlanda Studenta kaj Junulara Esperanto-Tendaro, Baltia Esperanto-Tendaro, Baltia Esperanto-Kongreso, Baltiaj Esperanto-Tagoj. Nuntempe oni uzas la nomon Baltiaj Esperanto-Tagoj. Do, ĉi-jare pasis 50 jaroj post la unua BET. * Pro malpermesoj de sovetiaj instancoj dum kelkaj jaroj BET ne estis organizita.

Somere 1958 en Rigo (Latvio) okazis Gestudenta Kantfesto de Baltiaj Sovetaj Respublikoj. Samokaze la studento Ervins Mozerts, gvidanto de Esperanto-rondeto en Latvia Ŝtata Universitato (LŜU) organizis „kunflugon“ de studentoj-esperantistoj el Baltio. La kunflugon partoprenis:

1. Ervins Mozerts (Latvio, abituriento de LŜU),
 2. Birute Kondrate (nun Rozenfelde, tiam studentino de LŜU, Riga),
 3. Viktors Livzenieks (studento de LŜU, Riga),
 4. Mart Vabar (studento de Tartua Universitato, Estonio),
 5. Zenonas Sabalys (studento de Kauna Politeknika Instituto, Litovio),
 6. Rimantas Purtulis (litova studento de Kieva Politeknika Instituto, Ukrainio),
 7. Vasilij Molebnij (studento de Kieva Politika Instituto, Ukrainio),
- kaj ankaŭ kelkaj aliaj esperantistoj el Riga.

Dum la kunflugo E. Mozerts proponis organizi Esperanto-tendarojn por gestudentoj kaj junularo de niaj baltiaj respublikoj. Nia



gestudenta kunflugo decidis, ke ĉiusomere, laŭvice en unu el niaj Baltiaj respublikoj (Latvio, Estonio kaj Litovio) oni organizu Esperanto-tendaron de gestudentoj kaj junularo. Por organizado oni elektis koordinajn delegitojn (Lembe Hallop – Estonio, Ervins Mozerts – Latvio, Zenonas Sabalys – Litovio). La unuan tendaron oni decidis organizi en Latvio. E. Mozerts finis la universitaton kaj forveturis al la urbo Cesis, por labori en muzika mezlernejo kiel instruisto de la angla. Estis lia unua laborjaro, li estis tre okupita kaj fore de Riga, finfine li jam printempe rifuzis mem organizi la tendaron kaj dum E-rondeta kunveno li petis kaj persvadis min organizi la tendaron, ĉar mi ankoraŭ estis studentino, kaj konstante loĝis en Riga. Kvankam mi estis studentino de la 5-a (lasta) kurso de Fizika Fakultato en LŜU, sen sperto pri organizado de tendaroj, mi tamen konsentis, ĉar iu devis tion fari. Post tio mi lin nek vidis, nek aŭdis, ĝis la solena malfermo de la tendaro (E. Mozerts aktive kontribuis al organizado de pliaj BET-oj, li

estis ĉeforganizanto de multnombra BET en Drabeši, apud Cesis – Latvio).

Do, mi bezonis ne nur cerbumi, sed ankaŭ ion fari. Unue mi korespondis kun miaj geamikoj en Estonio kaj Litovio, studentino de Tartua Universitato Lembe Hallop (nun Laanest) kaj studento de Kaŭna Politeknika Instituto Zenonas Sabalys. Mi eksciis iliajn opiniojn, interkonsiliĝis pri nia tendaro, kia ĝi povus esti. Surloke helpantoj al mi mankis, gestudentoj havis printempan sesion kaj someran praktikon, tamen mi konsiliĝis iom kun Astra Kupre, ankaŭ studentino de nia universitato, sed baldaŭ ŝi havis studentan someran praktikon kaj forveturis for de Riga. Lokon por la tendaro mi elektis proksime de Riga apud la lago Baltezers. La loko estis bela, pinarbaro ĉirkaŭe, seka tero, herbejo, kanalo kaj lago. Apude estis somera ripoza tendaro por konstruistoj de Riga. Tie dum somero laboris nia esperantistino-studentino Anna Cimare, ŝi tie estis sporta instruitoro. Ŝi helpis al mi interkonsenti kun estroj ricevi permeson starigi niaj tendojn, uzi dancplankon, boatojn, elektran lumon, tualetojn. Tiam mi decidis pri tempo de la tendaro kaj sendis informilojn al Estonio kaj Litovio: al Lembe por Estonio, al Zenonas kaj Edis (Emanuelis Dvarionas) el Kaunas por Litovio, al Romas Juškevičius – litova studento en Moskvo, ankoraŭ al kelkaj esperantistoj. La informilo tekstis jene:

Riga, 6/7/1959

Karaj gesamideanoj!

Ni decidis organizi la tendaron proksime de Riga ĉe la lago de la 1-a ĝis la 14-a de aŭgusto.

Ĉiuj partoprenantoj devas esti en Riga la 1-an de aŭgusto, kaj kunveni en ejo de filologia fakto de la universitato, kiu siutas en Lenina strato 32. Poste ĉiuj kune veturos al la tendara loko. Se estos homoj, kiuj malfruigas, ili devas informi min, ke ni povus ilin renkonti poste.

Ĉiu partoprenanto devas preni kune ujojn por manĝado, t.e. supujon, kruĉon, tranĉilon, kuleron, ankaŭ litkovrilon, littukon ktp. Se iu scipovas muziki, prenu kune ankaŭ muzikilon. Fiŝkaptistoj povas preni fiŝkaptilojn.

Skribu al mi nomaron de la partoprenantoj kaj ankaŭ kiom da tendoj ili bezonas. Tion mi bezonas scii ĝis la 20-a de julio, por ke mi povu mendi tendojn.

Se vi havas mem tendon, prenu ĝin. Unu tendo dum tagnokto kostas 2,5 rublojn. En unu tendo povas kuŝi 3 homoj, por 15 noktoj unu homo devas pagi 13 rbl.

Ni konsentis fari komunan manĝadon. Dum tendara tempo ni organizos ankaŭ ekskursojn. La tendaro kostos por ĉiu persono proksimume 150-200 rublojn.

*Sincere
Esperant-tendara
organiza komitato
Mia adreso....*

Ankoraŭ printempe mi vizitis kunvenon de Riga Esperanto-Klubo, kaj informis tie pri la tendaro, tamen mi ricevis neniajn proponojn aŭ demandojn, estis nur malkredo, ke ĝi povus okazi, ĉar tio aspektis malserioze. Du semajnojn antaŭ la tendaro mi denove vizitis la klubon kaj informis klubanojn pri la loko kaj tempo, krome mi invitis ilin partopreni la malfermon de la tendaro kaj eĉ preni kune „korbeton“ – manĝaĵon kaj trinkaĵon por interkona vespero. Kaj nur nun anoj de Riga Esperanto-Klubo ekkredis, ke vere, en Latvio apud Riga, okazos la unua Esperanto-tendaro de niaj baltiaj respublikoj. Kaj tiam jam la plej maljunaj kaj malnovaj esperantistoj entuziasmiĝis kaj proponis al mi iamaniere helpi – renkonti alveturontojn, prepari bieron, limonadon, baki lardkuketojn kaj fari buterpanetojn por interkona vespero, akompani dum ekskursoj. Tamen estis kelkaj niaj esperantistoj, kiuj ektimis pri siaj altaj postenoj, pri Esperanto-movado, ĉar neniuj sciis, kia reago povus esti flanke de sovetiaj,

komunismaj, partiaj instancoj. Ekzemple nia plej sperta kaj eminenta esperantisto Eduards Jaunvalks, kies ŝtata posteno en nia respublika Ministerio de Interkomunikado estis estro de personara fako, laŭ mia opinio ektimis, ĉar li restis tre serioza, silenta kaj eĉ ne veturis al la tendaro. Mi petis al sinjoro Nikolao Lapinš, kiu estis lektoro de nia universitato, helpi min transporti tendojn al la tendara loko. Kelkajn tagojn antaŭ la komenco ni ambaŭ portis 7 tendojn, luitajn de turisma bazo, ĉar aŭton nek mi nek li posedis.

Frumatene la 1-an de aŭgusto ni komencis renkonti alveturantojn el busa stacio, fervoja stacio kaj flughaveno de Riga. Ni ĉiuj estis tre ĝojaj, plenemociaj, ĉar tiam renkontiĝoj inter ni, esperantistoj, okazis ankoraŭ tre malofte. Plej ĝojaj estis malnovaj esperantistoj: Čače, Arbergs, Gruike, Vētra, Grāvis, Ozola, Cins, ankaŭ mia patro Kondrats, Vebeliūnas, Varkauskas kaj aliaj. Ili rememoris Esperanto-renkontiĝojn antaŭ la milito kaj ankaŭ memoris la tempon, kiam pri Esperanto necesis silenti aŭ paroli kaŝe.

Kune kun la gastoj ni veturis al la tendara loko. Tie ni kune konstruis niajn tendojn, starigis foston por standarto, faris lokon por fajro kaj kuirejo. Tiam post somera praktiko alveturis Astra Kupre, kiu tiam al mi tre helpis en la tendaraj aferoj. Ni ĉiam kune zorgis pri ĉio, kaj, kiel poste al mi skribis Valter Toomsalu el Tallinn, ni „estis animoj de la tendaro“. Poste ni surloke elektis tendarestron Zenonas Sabalys, sed mi estis lia helpantino. Dum ekskursoj multe helpis N. Lapinš, li sentis sin respondeca kiel lektoro de LU.

Antaŭ la solena inaŭguro per sia skotero subite aperis ankaŭ Ervins Mozerts. Li, kiel ĉiam, estis tre energia, kaj tuj pretis gvidi la solenan inaŭguron. Mi tiam estis ne sufiĉe kuraĝa, kaj volonte prezentis al li tiun eblecon. Nian verdan Esperanto-standardon de la unua Baltlanda Tendaro hisis nia plej juna esperantisto el Riga, la 6-jaraĝa Aija Strautmane (malgranda Aija), kaj al ŝi helpis



La fama latva esperantistino, iniciatinto de la unua Balta Esperanta Tendaro Biruta Rozenfelde, vikle rakontas pri la unuaj dek BET-oj. Tre valoraj rememoroj pri la komenco de la sovetia Esperanto-movado fare de la tiama kaj ĝisnuna elstara agantino, spekteblas jutube ĉe: <https://www.youtube.com/watch?v=PVXkr0UPKGA>

nia lektoro de la universitato Nikolao Lapinš. Dum la inaŭguro parolis N. Lapinš, E. Mozerts, de Litovio Z. Sabalys kaj de Estonio E. Keskula. Aija deklamis. Poste ni aŭskultis per magnetofono solenan inaŭguron de la 44-a UK el Varsovio, kiu estis dediĉita al la 100-jara jubileo de Zamenhof. Poste komenciĝis interkona vespero ĉe fajro. La vetero estis belega, ni kantis, dancis, manĝis, trinkis kaj konversaciis apud fajro ĝis la mateno.

Partoprenantojn de la tendaro oni povas dividi en du partojn: veraj tendaranoj, kiuj noktumis en tendoj, kaj partoprenantoj – vizitantoj, kiuj noktumis en Riga, sed tage vizitis la tendaron kaj partoprenis en diversaj aranĝoj de la tendaro.

Veraj tendaranoj estis:

El Litovio:

1. Zenonas Sabalys , Kaŭna Politeknika instituto
2. Vytautas Aviža -II-
3. Riĉardas Karmaza -II-
4. Eleonora Vainoraite -II-
5. Albinas Vebeliūnas -II-
6. Petras Varkauskas -II-
7. Eva Švarcaite, Vilna Universitato



Biruta Rozenfelde

8. Leonas Petrauskas -II-
9. Romas Juškevičius, Kaunas (studento el Moskvo)

El Estonio:

1. Lembe Hallop (Laanest), Tartua Universitato
2. Endrik Kesküle, Rapla
3. Urmas Ra'ts, Tallinn
4. Linda Ra'ts -II-
5. Anni Kūbarsep -II-
6. A. La'll -II-
7. Maimo Kristian -II-
8. Helle Lepiksoo (Merisalu) -II-
9. Inga Masing -II-
10. Valter Toomsalu -II-

El Latvio:

1. Biruta Kondrate (Rozenfelde) Latvia Universitato (Riga)

La lago *Lielais Baltezers* („granda blanka lago“) situas en Latvio, nordoriente de la nacia ĉefurbo Rigo. Borde de la lago, en esperantlingvaj tekstoj kutime simple mallongigita *Baltezers*, en somero 1959 okazis la unua el serio de la kvar Ĉebaltaj Studentaj Esperanto-tendaroj (ĈET), el kiuj poste evoluis la Baltia Esperanto-Tendaro kaj ankoraŭ poste la Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET). Ĝia ĉeforganizanto estis la tiutempa studentino Biruta Kondrate (nun Rozenfelde). La unuan tendaron partoprenis esperantistoj nur el tri sovietigitaj baltmaraj respublikoj – Litovio, Latvio kaj Estonio.

2. Astra Kupre -II-
3. Anna Cimore -II-
4. Nikolao Lapinš -II-
5. Ludvigs Kondrats, Riga -II-
6. Ervins Mozerts, Cesis -II-

El Rusio:

1. Sergej Saričev, Moskvo

Aliaj partoprenantoj – vizitantoj el Latvio:

Aija Strautmane, Aleksandrs Strautmanis, Gunta Strautmane, Otilija Vētra, Amalija Gruike, Mirdza Burgmeistere, Ints Čāče, Teodors Arbergs, Ilona Bermane, Oskars Bauers, Dzintars, Cins, Z. Ozolnieks, Milbergs, Grāvis, P. Šmitmanis, Zile, Vika, Janis Andžans, Buklovskis, Garinš, Goldšteins, Tusedla Ozola, Haralds Lazdovskis.

Eble ĉeestis ankoraŭ kelkaj, sed mi ilin ne registris. Do, entute 50 partoprenantoj.

Dumtendare okazis ekskursoj al la urbo Riga, al Subĉiela Latvia Etnografia Muzeo en la urbo Jurmala (marbordo de Riga Golfo), al la urbo Cesis, vizito de kunveno en Esperanto-klubo de Riga, ŝipekskurso tra la lago Baltezers. Dum la tuta tempo ni estis en freŝa aero, ni mem priservis nin, mem kuiris sur fajro manĝaĵojn laŭvice, estis komuna manĝado apud la fajro. Estis tre bona vetero, sunbrila, varma. Humoro en la tendaro estis tre amika, romantika, gaja por ĉiuj. Ni multon faris kune, helpis unu al alia.

Biruta Rozenfelde



ĈET-3 en Molėtai (1961)

La Organiza Komitato de BET-52 en Birštonas (Litovio) decidis aperi en la novaĵretejo *La Balta Ondo* informojn pri ĉiuj BET-oj, kiuj okazis en Litovio. Jen kelkaj artikoloj kaj fotoj pri BET-oj en Litovio, kiuj aperis en Esperantaj kaj sovetiaj gazetoj.

Turisma tendaro en Molėtai

Al nia urbo por dek tagoj venis granda grupo de turistoj. Ĝi konsistas el 164 personoj. En ĉi tiu tendaro partoprenas reprezentantoj de Latva SSR, Estona SSR, Litova SSR kaj de aliaj gefrataj respublikoj. Venis turistoj eĉ el Moskvo, Leningrado, Rostov-na-Donu, Ĉeljabinsk, Taŝkent, el la regionoj de Kemerovo kaj Omsk.

Preskaŭ ĉiuj alvenintoj scipovas Esperanton, pro tio en la tendaro ne estas necesaj interpretistoj. Multaj homoj jam antaŭe partoprenis en turismaj vojaĝoj. La klajpedano Algirdas Petkūnas biciklis de Klaipėda ĝis Vladivostok. La plej juna turistino estas la okjara lernantino de la dua klaso, latvino Aija Strautmane. Ŝi jam la trian fojon partoprenas la tendaron.

Dum sia vizito en nia respubliko la turistoj konatiĝis kun la urboj Vilnius, Kaunas kaj Trakai. La turistoj tre ŝatas nian belan regionon. Viktor Gruško, docento de la Rostova Instituto pri konstruado, rakontas, ke li, veninta el brua granda industria urbo, en la ĉirkaŭaĵo de Molėtai trovas trankvilon kaj ripozon. La verkisto Ivan Sergejev el Moskvo (lia lernolibro de Esperanto estis eldonita ĉi-jare la 1-an de aŭgusto) diras, ke li estas ravita de nia regiono. La verkisto restos ĉi tie ankoraŭ por kelkaj tagoj post la tendaro.

En la tendaro partoprenas ankaŭ intelektuloj kiel Boris Sokolov

docento de la Agrikultura Mekanika Instituto de Ĉeljabinsk, Maks Aderkas, inĝeniero el Rostov-na-Donu, Lidija Suetova, instruistino de botaniko de la Moskva Universitato, Boris Tokarev, instruisto de la Moskva Forstkultura Instituto, Lamnel Bassin, respondeca sekretario de la revuo “Agrikulturo de Uzbekio”, eldonata en Taŝkent, profesoro Loja Janis, membro de la Latva Scienca Akademio kaj multaj aliaj.

Por tiuj tendaranoj, kiuj ne konas Esperanton, oni aranĝis kurson, kiun gvidas estona metodikisto Siitam.

Sendube post tiel bona ripozo en nia urbo la tendaranoj, reveninte al diversaj urboj de nia vasta Patrujo, ankoraŭ longe memoros malgrandan urbeton de Soveta Litovio – Molėtai.

A. Žagūnas

Fonto: *Tarybiniu keliu* (Molėtai), la 9-an de aŭgusto 1961, №62 (1030), p. 3.

Tradukis el la litova Rita Valčiukaitė



La litova grupo



Amika vespero de la turistoj

Neordinara koncerto okazis la pasintan jaŭdon en salono de la internulejo de Molėtai. Ne ĉiuj ĉeestantoj en la salono povis kompreni dum la amika vespero kantatajn kantojn kaj deklamatajn versojn, verŝajne kelkaj el ili la unuan fojon tiujn aŭdis. La adiaŭan koncerton aranĝis turistoj el diversaj lokoj de Sovetunio, kiuj tendumis en Molėtai. Ĉi tie estis homoj, kiuj scias aŭ lernas Esperanton, kaj la koncerto okazis en tiu ĉi lingvo. Krome, sur la scenejo sonis kantoj ankaŭ en la estona kaj aliaj lingvoj de sovetiaj landoj.

En la komenco de la amika vespero al la ĉeestantoj pri historio de Esperanto rakontis docento Valantavičius el la Vilna Ŝtata Universitato V. Kapsukas. Poste dum la koncerto la aŭskultantoj tre varme akceptis kantadon kaj dancadon de studentoj el Talino, pli ol 70-jaraĝan turistinon el Rostov-na-Donu



kaj solkantadon de studentinoj el la Vilnia Ŝtata Pedagogia Instituto. Per forta aplaŭdo estis akceptita A. Strautmane, ok-jara turistino el Latvio, kiu deklamis versaĵon kaj kantis latvan popolan kanton. La klajpedano A. Petkūnas tre interese rakontis pri sia turisma vojaĝo de Klaipėda ĝis Vladivostok. En la fino de la koncerto ĉiuj ĉeestantoj kantis la himnon de demokratia junularo.

En klasĉambroj de la internulejo estis aranĝita ekspozicio de eldonaĵoj en Esperanto kaj aliaj ekspoziciaĵoj rilataj al tiu lingvo.

Fonto: *Tarybiniu keliu* (Molėtai), la 16-an de aŭgusto 1961. №64 (1032), p. 2.

Tradukis el la litova
Rita Valčiukaitė

Esperantista tendaro en Litovio

Esperantistoj-studentoj en ĉebaltaj respublikoj de Sovet-Unio organizas ĉiusomere tendarojn, kiuj jam fariĝas tradiciaj. En la jaro 1959 tia tendaro okazis en Latvio, en la jaro 1960 en Estonio kaj ĉi-jare en Litovio. Ĝi okazis de la 1-a ĝis la 10-a de aŭgusto en litova regiona urbo Molėtai. La ĉi-jara tendaro estis la plej granda; en ĝi partoprenis ĉirkaŭ 200 personoj ne nur el ĉebaltaj respublikoj, sed venis samideanoj el preskaŭ tuta Sovet-Unio: Moskvo, Leningrado, Kiŝinevo, Rostovo-Don, Odeso, Ĉelabinsko, Kemerovo, Taŝkento. Inter ili estis multaj veteranoj de Esperanta movado.

Fonto: *Esperanto*, 1961, №10 (671), p. 179



BET-6 en Veisiejai (1964)

BET-6 okazis de la 1-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1964 en Veisiejai, kun 153 partoprenantoj. En Veisiejai L. L. Zamenhof en 1885 komencis kuracistan praktikon. En diversaj dokumentoj ĝi estas citata kiel la loko, kie estis kreita Esperanto.

La VI-a Ĉebaltia Konferenco de esperantistoj

Tian grandan aron da nekonataj homoj vejsejanoj vidis antaŭ longa tempo. Ili multas – ĉirkaŭ 150. Ĉi tie, en la belega arbara kaj laga angulo de Dzūkija, sabate kunvenis partoprenantoj de la VI-a Ĉebaltia Esperantista Konferenco-Tendaro.

Krom reprezentantoj de la baltiaj respublikoj, – diras K. Puodenas, komitatano de la tendaro, ekonomiisto de la Vilna urbestara fako pri popola klerigado, – la aranĝon partoprenas gastoj ankaŭ el Rusia Federacia Respubliko, Moldavio, Ukrainio, Belorusio. La tendaron organizis la Vilna esperantista klubo „Juneco“. En Veisiejai esperantistoj konatiĝos kun la vivo de L. Zamenhof, la kreinto de Esperanto, kun lia verkaro, ekzercos, eldonos murgazeton, organizos sportajn olimpiajn ludojn, ekskursos eksterurbe.

Vyt. Rimavičius

Tradukis el la litova Rita Valčiukaite



La instruistoj

Sovetunio

Ducent personoj el la tuta Sovetunio partoprenis Esperanto-tendaron komence de aŭgusto en Vejsejaj (Litovujo), urbeto, kie en 1885 komencis d-ro Zamenhof sian kuracistan karieron. Okaze de la renkontiĝo du stratoj ricevis nomon de d-ro Zamenhof aŭ de Esperanto. (Oni petas sendi gratulojn al prez. Petrauskas, D-ro Zamenhof gatve 10).

Fonto: *Esperanto*, 1964, №10 (707), p. 174.

Esperantistoj finis tendarumi

Ĉebalta Esperanto-Tendaro*. Ĉi tiu nomo estas jam bone konata de vejsejanoj: ja la partoprenantoj de la tendaro kunvenis en ilia urbo, la urbo, kie finkreis la lingvon Esperanto ties aŭtoro L. Zamenhof. Krom reprezentantoj de la baltaj respublikoj abundis ankaŭ gastoj el aliaj respublikoj – Rusia Federacio, Ukrainio, Moldavio, Bjelarusio. La plej fora gasto estis juna instruisto de geografio St. Kotljarov el Mejdureĉensk (Kemerova regiono en Siberio).



Komuna foto

Kiel rapide forpasis la tagoj! Komuna matena gimnastiko, laboro de apartaj sekcioj, sportaj konkursoj, diversaj prelegoj, artagadaj vesperoj – jena, ĝeneraltraite, estis la programo de la tendaro. Funkciis biblioteko de Esperanto-literaturo kaj ekspozicio. Oni prelegis pri problemoj de nuntempa genetiko, pri K. Donelaitis, pri romanidaj elementoj en la lingvo Esperanto, pri porpacaj metodoj de prof. Ĉaĥotin.

En la tendaro regis spirito de granda interpopola amikeco: amike kaj sincere interkomunikiĝis lernantino de la kvara klaso el Pasvalys Zinaida Kličnikova, docento de la Moskva universitato Boris Tokarev, ŝoforo el Volgogrado Pilučenko, merita litova kuracisto Markas Robinzonas – la sekretario de la tendara partia grupo.

Inter la esperantistoj tre popularas turismo. Multaj partoprenantoj venis al la tendaro petveture. Petveturadon uzos ankaŭ posttendare 22 esperantistoj el diversaj lokoj de Sovetunio. Ilin tra Karpatio gvidos Valdas Banaitis (prezidanto de la Esperanto-klubo “Amikeco”). Ĉirkaŭ 20 personoj vojaĝos tra



Statuo de Zamenhof
en Veisiejai, starigita en 1998

la baltaj respublikoj.

Ni ricevis multajn gratulojn el diversaj lokoj de Sovetunio kaj eĉ el eksterlando (Hungario kaj Germanio). Tre ĝojigis nin la gratulletero de la sovetunia delegitaro, partopreninta la 49-an Universalan Kongreson en Hago. Des pli, ke en ĝi estis Stepan, la patro de la kosmonaŭto Titov kaj reprezentanto de nia respubliko docento A. Vaitilavičius.

La sesa Ĉebalta Esperanto-Tendaro finis sian laboron. Ĉiuj disiris. Kelkaj amikoj venos al la unua esperantista tendaro en la Altaĵa Montaro apud Barnaul. Ili venigos tien niajn gratulojn.

Vytautas Šilas

studento de la Vilna

Universitato Kapsukas,

prezidanto de la Esperanto-klubo “Juneco”

Tradukis el la litova Vytautas Šilas

Fonto: *Darbo vėliava (Lazdija)*,

la 15-an de aŭgusto 1964, №97 (1983).

* En la publikigita teksto malaperis ĉi tiu frazo. Sen ĝi la enkonduko fariĝis nekomprenebla. Ankaŭ la originala titolo estis Ĉebalta Esperanto-Tendaro. (V. Š.)



Vytautas Šilas
kaj Markas Robinzonas salutas
la organizantinon de BET-6
– Biruta Kondrate (nun Rozenfelde).



Zamenhof-domo en Veisiejai

BET-9 en Vilno (1967)

BET-9 okazis de la 1-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1967 en Vilno, la ĉefurbo de Litovia SSR. Samtempe en Kaltanėnai (Švenčionysa distrikto, Litovia SSR) okazis samtitola tendaro, kiu transformiĝis al SEJT-9. La teksto pri BET-9 aperis sen subskribo en la samizdata bulteno *Unuiĝo*.

Revuo de laboro de la 9-a Baltlanda Esperanto-Tendaro en urbo Vilnius 1.-10.8.1967

(Legita dum la ferma kunsido la 10-an de aŭgusto 1967, redaktita kun konsidero de rimarkoj, faritaj dum ĝi.)

La 9-a BET prezentas grandan eventon en la soveta esperantista movado. Kvankam tradicia laŭ sia titolo kaj vicnumero, ĝi akiris tute novan aspekton kompare kun la estintaj tendaroj, anstataŭ provinco ĝi okazas en la ĉefurbo de Soveta Litovio, anstataŭ tendoj kaj provincaj lernejoj ĝi havas ejon en unu el la plej imponaj kulturpalacoj de la respubliko. Unuan fojon en la historio de la sovetlandaj Esperanto-tendaroj, eĉ en la historio de la tuta sovetlanda esperantista movado post la internacia kongreso en Leningrado en la jaro 1926, ni renkontiĝas dum ĝi kun granda nombro de eksterlandaj gesamideanoj. Laŭ nombro de partoprenantoj ĝi estas ankaŭ la plej impona el ĉiuj okazintaj sovetlandaj tendaroj. En ĝi partoprenis 432 personoj: 101 eksterlandanoj kaj 331 sovetianoj, ne enkalkulante kelkdekojn da gastoj, venintaj por kelkaj tagoj, kaj vilnanojn, vizitintajn la tendaron nur epizode.

La tendaron oficiale salutis reprezentantoj de registaraj, sociaj kaj sciencaj organizaĵoj, pri ĝi vaste

informis gazetaro kaj radio. Ni ne dubas, ke la IX-a BET havos grandan influon por esperantista movado ne nur en Litovio, sed ankaŭ en la tuta Sovetlando.

Ni devas konstati grandan meriton de la prezidanto de la prepara Komisiono Antanas Poška, kiu kun helpo de kelkaj aliaj vilniusaj samideanoj trovis novan, ĝis nun ne praktikitan vojon por inviti eksterlandanojn al nia lando. Tiu vojo estas pli simpla kaj pli malmultekosta ol la ĝisnunaj, kaj ĝi faciligos la internaciajn kontaktojn, se ĝi eniros en la konstantan praktikon. Ne al ĉiuj eksterlandaj amikoj ĝi helpis atingi nian tendaron, sed tamen ni povis bonvenigi konsiderindan nombron, nome: 71 el Hungario, 15 el Pollando, 8 el Bulgario, 4 el Jugoslavio, 2 el Germana DR, 1 el Finnlando.

La tendara programo enhavis tradiciajn punktojn pri prelegoj de somera universitato, libera tribuno, organizaĵaj demandoj, sekcia laboro, arta agado, oratora konkurso, kursoj de la lingvo, ekskursoj tra la urbo kaj ekster la urbo.



En la somera universitato estis tralegitaj entute 25 prelegoj, plejparte (16) pri esperantologiaj demandoj. Parto de la prelegoj estis destinita por historiaj temoj, lige kun la 50-jara jubileo de la Oktobra Revolucio.

Precipe ni devas mencii la kolektivajn prelegon pri esperantistoj en la revolucia movado. Ni nur bedaŭras, ke la promesitaj kontribuoj de niaj eksterlandaj amikoj laŭ tiu temo ne estis efektivigitaj. Nur malgrandan parton de la universitata programo okupis sciencopopularaj prelegoj. Estis ankaŭ temoj, ne aktualaj por la plejmulto de la aŭskultantoj, ekzemple tiu pri la urbo Kaunas. Similaj temoj devus esti evitotaj en programo de la sekvontaj SU. Aliaj temoj, ekzemple pri vojaĝimpresoj, kvankam interesaj, ne havas sciencan karakteron, kaj devus esti prezentataj ne en la kadro de SU.

La libera tribuno kaj la speciale antaŭviditaj kunvenoj por organizaj demandoj ne estis eluzitaj por pritrakto de tiuj ĉi demandoj en tia grado, kian postulas ilia graveco.

El la multaj sekcioj, antaŭviditaj en la programo, kunsidojn havis la medicina, pedagoga, tradukista kaj literatura. Ateisma sekcio ne estis organizita, tamen pri tiu temo okazis kontribuo de k-do K. Valaŝinas en SU.

La kaŭzo de nesufiĉa aktiveco en la sekcia laboro kaj pritrakto de esperantista movado estis manko de iniciato de la tendaranoj kaj pasiveco de la elektita estraro de la tendaro. La prepara komisiono ne povis ĉion movigi en deca amplekso, parte pro tio, ke kelkaj ĝiaj anoj devis labori en siaj oficejoj. Fortoj de lokaj esperantistoj estis disigitaj per samtempa organizo de alia tendaro en provinco de Litovio.

Partoprenantoj de la sekvontaj tendaroj devus konscii, ke ili ĉiuj estas mastroj, sed ne gastoj, kaj ĉiuj devas labori por sukcesa efektivigo de la celoj de la tendaroj. Nur la prepara komisiono, nur la lokaj samideanoj

ne povas perfekte gvidi la komplikajn mekanismojn de la tendaro. En la antaŭaj tendaroj la plej grandan ŝarĝon de la laboro transprenadis de la preparkomisiono la elektita estraro, kaj tio devus esti ĉiama tradicio.

Ni esprimas sinceran dankon por niaj hungaraj amikoj, precipe al la gvidantoj de Esperanto-kluboj en Debrecen L. Toth kaj D. Szilágyi, kiuj organizis ne nur tiel multnombrajn venon de ĝiaj anoj, sed ankaŭ tre altnivelan artan programon. Ankaŭ ni devas mencii penojn de latvaj, estonaj kaj litovaj gesamideanoj en organizo de naciaj artaj programoj. Bedaŭrinde la antaŭviditaj artaj vesperoj de aliaj nacioj ne okazis. Ni devus strebi al pli alta nivelo de nia arta programo, precipe kiam ni agas sub okuloj de la ĝenerala publiko.

En la oratora konkurso laŭ la temo “Problemo de patroj kaj filoj en Esperantujo” partoprenis 12 personoj, inter ili 3 eksterlandanoj. La unua loko estis aljuĝita al s-ino W. Włodarczyk (Varsovio), la dua – al J. Tamošiūnas (Vilnius), la tria – al J. Ojalo (Tallinn), la kvara – al L. Sobanskij (Ŝalĉininkai).

Dum la tendaraj tagoj en Respublika Biblioteko funkciis riĉa ekspozicio de Esperanta literaturo. Ĝin vizitis pli ol 1500 personoj. Por ĝia aranĝo multe kaj sindone laboris s-ano J. Petrulis.

Ni esperas, ke la nova tradicio – partopreno de eksterlandaj amikoj – komencita en ĉi tiu tendaro, estos daŭrigota. Ni transdonas la stafeton por aranĝi la 10-an BET al niaj amikoj en Latvio.

La baltlandaj Esperanto-tendaroj devas esti komunaj por ĉiuj esperantistoj, por ĉiuj aĝoj. Junularaj kaj aliaj specialaj Esperanto-tendaroj devus okazi dum alia tempo, por ne malhelpi viziti la komunajn, ĝeneralajn tendarojn.

V. Kalvaitis

BET-12 en Kretinga (1970)

La 12-a BET okazis de la 1-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1970 en Kretinga. La tekstoj pri BET-12 aperis en “Horizonto de Soveta Litovio”, en kiu ne povis manki mencioj pri Lenin (100 jaroj de la naskiĝo) kaj pri la Dua Mondmilito (25 jaroj de la fino), kutime nomata en Sovetunio “Granda Patruja Milito”.

Kolektiĝo

Kalendaro montras 31.7.1970. Estas bela kaj varma mezsomera tago, sunbrila kaj preskaŭ senventa. Sur stratoj de okcidentlitovia urbo Kretinga oni pli kaj pli ofte povas renkonti per verdstela brustsigno ornamitajn homojn: lernantojn, studentojn kaj aĝajn homojn. Nun ili ĉiuj alveturis por partopreni la 12-an Baltian Esperanto-Tendaron, kiun esperantistoj aranĝas tradicie ĉiujare laŭvice en tri baltiaj respublikoj. Tamen la tendarojn partoprenas ordinare ne nur litovoj, latvoj kaj estonoj, sed ankaŭ multnombraj iliaj gastoj el aliaj frataj sovetaj respublikoj.

Ĉi-jare la nombro de partoprenantoj de la tendaro atingis 319. Pli grandnombre la tendaron partoprenas, kompreneble, litovoj, efektivaj mastroj kaj aranĝantoj de tiu ĉi tendaro. Ilia nombro estas 129, el Estonio venis 64 esperantistoj, el Ukrainio – 48, el Rusio – 44. El aliaj respublikoj estas malpli da partoprenantoj. La plej malproksimaj gastoj estas el Novosibirsk, Omsk, Kazaĥio, Dagestano, subtropika urbo Batumi.

Estas notinde, ke pli ol 50% de la tendaranoj estis reprezentantoj de Esperanto-junularo, kvankam samtempe kiel BET-12 okazis en Baŝkirio Tutsoveta Junulara Esperanto-Tendaro. Antaŭtagmeze de la 1-a de aŭgusto okazis

ekskurso tra la urbo Kretinga. La ekskurson gvidis Sofia Rakiene, loka esperantistino-instruistino. Ŝi kondukis la tendaranojn tra sia hejmurbo, konatigante ĉion vidindan. Precipe kortuŝis la partoprenantojn memortabulo ĉe angulo de la stratoj Vilnius kaj Polejajkin. Polejajkin estis patrujmilita heroo, kiu perdis sian vivon, defendante la urbon Kretinga. Sub la memortabulo estas fiksita breteto, sur kiu staris florpoto kun ruĝaj begonioj.

Unua tago

Malfermo de BET-12 okazis la 1-an de aŭgusto je la 17-a horo en salono de la Agrikultura Teknikumo, kies ejoj estis en dispono de la tendaranoj. La salono estis plenplena de la tendaranoj. En la prezidantaro okupis lokojn reprezentantoj de 10 sovetaj respublikoj. Izabelė Ožiūnienė, ĉefaranĝintino de la tendaro, akcentis en siaj malfermaj vortoj diversajn jubileojn de la jaro 1970, ĉefe la jubileon de Lenin. Docento A. Vaitilavičius, prezidanto de Vilnusa Esperanto-klubo,



substrekiis du gravajn eventojn en esperantista vivo en la jaro 1970: en Litovio kaj Estonio okazis seminarioj de Esperanto por profesiaj instruistoj. Ambaŭ seminarioj estis aranĝitaj de institutoj por perfektigo de instruistoj.

La tendaron salutis G. Žulpaitė, sekretario de Kretinga Distrikta Partia Komitato, kaj S. Stropus, reprezentanto de Distrikta Kleriga Fakoj, kiu finis siajn salutajn vortojn per esperantlingva slogano: “Per Esperanto por paco kaj amikeco!”

En la salonon marŝis 12 reprezentantoj de junpioniroj, gvidataj de trumpetisto. Ĉiu el ili diris al la partoprenantoj de la tendaro unu salutan frazon, ĝenerale esprimantan, ke neniam estu plu milito.

Sekvis salutparoloj de reprezentantoj de diverslokaj esperantistoj, kiuj ĉefe akcentis, ke ni devas instrui Esperanton precipe al junularo, kiu portos antaŭen flamantan torĉon de la internacia lingvo. Ni devas agi kuraĝe kaj prudente, nur tiam ni atingos nian celon. Ĉiuj parolantoj deziras al la ĉeestantoj fruktadonan laboron, multajn sukcesojn.

Je la 19-a horo okazis mitingo ĉe monumento, starigita je memoro de viktimoj de la patrujmilito. S. Rakienė detale rakontis pri interrilatoj kaj korespondado de lokaj gelnantoj kun parencoj de la defendantoj de Kretinga, falintaj dum la milito. Nacivestitaj lernantoj prezentis parolĥore “Buĥnvaldan Sonorilon”.



Vespere prezentis al la tendaranoj tre belan koncerton loka amatora miksa koruso kaj dancgrupo. La koruso prezentis siajn kantojn en la litova lingvo, sed titolojn de la kantoj, iliajn aŭtorojn, komponistojn kaj mallongan enhavon anoncis al la spektantoj esperantlingve korusanino S. Rakienė, kiu diris, interalie, ke ŝi esperas esperantigi la tutan koruson. La XII-a Baltia Esperanto-Tendaro komencis sian dektagan laboron.

Laboro kaj ĝojo

Unu el la plej gravaj aranĝoj de la tendaro estis Somera Universitato, kiun gvidis prof. J. Dagys el Vilnius.

Ĉiutage okazis Esperanto-lecionoj por komencantoj, gvidataj de samideanoj Mandrik kaj Lukoševičius, kaj daŭriga kurso, gvidata de A. Rogov kaj V. Nočovkin. La daŭrigan kurson partoprenis 55 personoj: 20 el ili ekzamenigis ĉe tendara ekzamena komisiono kaj ricevis atestojn pri instrukapablo.

Dum la tendaro okazis multaj fakaj kunvenoj, kiel tiuj de instruistoj, veteranoj, medicinistoj, ĵurnalistoj literaturistoj kaj naturamikoj. Kolektiĝis esperantistoj de apartaj respublikoj. Okazis libera tribunalo kaj literatura vespero. Dum la lasta prezentis siajn originalajn kaj tradukitajn poemojn kaj prozaĵojn N. Andrianova (Kiev), B. Kärt (Tallinn), E. Lippe (Riga), H. Branzburg (Luga), I. Tamošiūnienė (Vilnius) kaj aliaj.

Tre varme akceptis la tendaranoj teatraĵeton de Amatora Pupteatro el Panevežys (Panevejis) “Tri porkidoj”, kie eĉ porkidoj kaj lupo parolis en Esperanto.

Okazis apartaj amatoraj koncertoj de estonoj, litovoj, latvoj kaj eksterbaltlandaj esperantistoj. Precipe bona estis koncerto de latvaj esperantistoj, kie plejparton de numeroj prezentis blindaj esperantistoj el Riga. La lasta koncerto kaj kelkaj elektitaj numeroj el antaŭaj koncertoj estis prezentitaj al loĝantaro de Kretinga.

Ekskursoj

Krom la ekskurso tra la urbo Kringa estis aranĝitaj ankaŭ aliaj ekskursoj. La plej interesa el ili estis ekskurso al la terkolo Neringa, situanta sur duoninsulo, laŭ sia aspekto longa kaj mallarĝa, simila al falĉilo. Tiun ekskurson partoprenis pli ol 100 personoj, al kies dispono estis tri aŭtobusoj. La duoninsulo apartiĝas de la kontinento per golfo, kaj estas alligita al la kontinento per sia suda fino, troviĝanta en Kaliningrada Provinco. La ekskursautobusoj estis veturigita al la duoninsulo per pramo.

Sekvis ekskursoj al la du marbordaj urboj. Palanga – urbo de ripozejoj, sanatorioj, floroj kaj plaĝoj kun blanka mola sablo. Klaipėda – havena kaj industria urbo. Ĉi tie en Urba Kulturpalaco Esperanto-klubo havas propran oficejon kun tri ĉambroj.

Kaj la lasta ekskurso – laŭ vojoj de bataloj de patrujmilito. Estis vizititaj du eksterurbaj muzeoj: iama koncentrejo por politikaj prizonuloj kaj komunaj tomboj de mortigitoj.

Lasta tago

Solena fermo de la tendaro okazis la 10-an de aŭgusto. Estis prezentita statistiko pri la tendaro. G. Grozmani legis projekton de rezolucio pri la tendaro. Krom atingoj estis notitaj ankaŭ negativaj flankoj. Kiel unu el ĉefaj mankoj estis substrekita, ke en la tendaro oni multe aŭdis diversajn naciajn lingvojn. Estas propono en estontaj tendaroj enkonduki devigan lernadon de Esperanto por ĉiuj tendaranoj en diversgradaj kursoj.

I. Bril (Ĥarkov) estis kortuŝita pri prezentadoj de infanoj, tamen li esprimis kritikon, ke en la tendaro ne estis organizita laboro kun infanoj.

A. Kilk (Tallinn) parolis, ke malmultaj tendaranoj prenis sur sin iajn organizajn taskojn, ankaŭ la estraro ne dividis inter tendaranoj taskojn.

A. Vaitilavičius (Vilnius) opiniis, ke ni devas pli bone prepari niajn artajn programojn, ni devas plialtigi nian lingvan nivelon, ĉar unu el plej gravaj celoj de tendaroj estas praktikado de Esperanto.

A. Rogov (Ĥmelnickij) proponas, ke oni ne aranĝu Baltiajn Tendarojn samtempe kun tiuj de junularo, ĉar junularo volus en ĝenerala tendaro raporti pri sia agado.

A. Rogov disdonis atestojn al ekzameniĝintoj. V. Nočovkin ĝojas, ke la unuan fojon dum la historio de la tendaroj okazis ekzamenoj, sed aldonas, ke necesas aktivigi junularon.

La ferma kunveno finiĝis per transdono de la tendara standardo al reprezentanto de Latvio, kie okazos la sekvonta tendaro.

Komenciĝas disveturo. Ĝis reveno sekvontjare!

B. Kärt

Somera Universitato

La programo de Somera Universitato konsistis el 22 prelegoj, kiuj estis aŭskultitaj dum 6 kunsidoj de la 3-a ĝis la 8-a de aŭgusto inter 9.30 kaj 12.00 h. Por prelego estis destinitaj 30 minutoj.

Laŭ temaro la programo konsistis el jenaj branĉoj: 1. Lingvaj demandoj. Estis 7 prelegoj. 2. Historio de popoloj kaj de Esperanto movado – 5 prelegoj. 3. Literaturo. Tiu fako havis prelegon de N. Andrianova pri unu forgesita Esperanta kanto “Kremla sonorado” de Sándor Szathmári (hungara revoluciulo). 4. Populara scienco. Tiu fako havis 6 prelegojn. Lektoroj venis el jenaj respublikoj: Litovio 4, Estonio 1, Ukrainio 2, Rusa Federacio 9. Kvanto de aŭskultantoj ŝancelis inter 12 kaj 75, meza kvanto 42. Tio estas relative malmulte, konsiderante, ke la tendaron partoprenis ĉirkaŭ 300 personoj.

Prof. J. Dagys

Rektoro de la Universitato

Horizonto de Soveta Litovio, 1970, №1.

BET-17 en Vieکشniai (1976)

En 1976, malgraŭ grandaj organizaj problemoj, BET-17 estis organizita de la 30-a de julio ĝis la 10-a de aŭgusto en la urbeto Vieکشniai, 17 km sud-oriente de Mažeikiai.

La riska BET-17 (Rememoroj pri la organizado)

Dum Zamenhof-Tagoj 1975 en Kaunas grupeto da E-aktivuloj preparolis organizadon de BET-17, kiu en 1976 devis okazi en Litovio. Antaŭ tri jaroj (en 1973) la vica BET ne povis okazi en Litovio, ĉar oficialuloj ne donis la permeson. Estis klare, ke ankaŭ nun la permeso ne estos ricevita. Tamen Esperanto ja ne estas oficiale malpermesita. Tial grupeto, kiun eniris Telesforas Lukoševičius, Albinas Vebeliūnas kaj mi, decidis proprariske komenci la organizadon de BET sen oficiala permeso.

Komence de la jaro 1976 A. Vebeliūnas kaj mi komencis serĉi lokon por la tendaro. Ni estis en Tytuvėnai, Šeduva, eĉ Žemaičių Naumiestis, sed vane. Finfine ni trafis al Vieکشniai, Nord-Litovia urbeto, kaj tie tre afabla direktoro de profesia lernejo konsentis akcepti la tendaron. Restis prizorgi nutradon de la tendaranoj – necesis ricevi permeson por pligrandigita kvanto da nutraĵ-produktoj.



Ankaŭ ĉi tiu problemo kun la lokaj komercaj entreprenoj estis facile solvita.

Pli poste T. Lukoševičius, veninta en Vieکشniai, faris oficialan skriban kontrakton, kiun la direktoro de la lernejo konfirmis per sigelo. T. Lukoševičius estis akceptita ĉe la distrikta partia sekretario, kaj tiu promesis ne nur subtenon, sed ankaŭ prelegon por tendaranoj. (Restas ne klare, ĉu la sekretario malatente legis la direktivon ne subteni esperantistojn, aŭ tute ne legis ĝin.)

La malfermo de BET-17 devis okazi la 31-an de julio. Kiam ĝis tiu dato restis kelkaj tagoj, mi kun kelkaj klubanoj el Klaipėda venis al Vieکشniai por ordigi la lokon. La direktoro de la lernejo donis la ŝlosilojn de komunloĝejoj kaj granda salono. Baldaŭ venis ankaŭ T. Lukoševičius. Ĉio iris glate. Tamen la 30-an de julio alkuris al mi la sekretario de la lernejo kaj diris, ke la direktoro bezonas ĉiujn ŝlosilojn. Mi konsterniĝis, ĉar antaŭ unu horo mi estis ricevinta telegramon, ke grupo da moskvaj esperantistoj jam forveturis kaj estos en Vieکشniai ĉi-nokte. Ni kun la

ŝlosiloj rapidis al la direktoro kaj tie ni eksciis, ke la Centra Partia Komitato en Vilnius malpermesis la tendaron. Ni sukcesis konvinki la direktoron, ke venintoj el Moskvo povos unu nokton pasigi en Vieکشniai. Telesforas kaj mi decidis sendi telegramon al A. Vaitilavičius en Vilnius. Baldaŭ venis lia respondo, ke “Centra Komitato diskutas, kion fari”. Tiu ruza telegramo sufiĉis, la direktoro

redonis la ŝlosilojn, tamen avertis, ke morgaŭ venos reprezentanto de la registaro, kiuj definitive decidis pri la sorto de la tendaro.

Tiutempe la nombro de la venintaj esperantistoj kreskis. Estis nia feliĉo, ke el 241 tendaranoj 20 estis membroj de la komunista partio, inter ili ankaŭ profesoro S. Podkaminer, veterano de la milito. Li kunvokis partianojn – kiamaniere kontraŭstari malpermeson de la tendaro.

La 31-an de julio al Vieĥŝniai venis prezidanto de respublika komitato de profesiaj lernejoj V. Morkūnas, kun akompanantoj el la ŝtata sekureco. Li renkontiĝis kun la partianoj, gvidataj de S. Podkaminer, sed iliaj argumentoj ne donis rezulton. Tiam la partianoj minacis, ke ili plendos antaŭ la Centra Komitato en Moskvo pro senbaza dispelo de la tendaro. Tio efikis – V. Morkūnas permesis malfermi la tendaron, sed post kvin tagoj ĝi devas finiĝi. Tio kontentigis nin, kaj posttagmeze BET-17 estis malfermita, kompreneble, sen partopreno de oficialuloj. Subulo de V. Morkūnas restis en Vieĥŝniai kaj kaŝe observis nian programon. Sekvontage mi venis al li kaj proponis malkaŝe partopreni en ĉiuj niaj programeroj. Li konsentis, kaj poste esprimis sian miron pri la ordo kaj disciplinemo de la tendaranoj, kiuj plenumis ĉiujn postulojn de la organizantoj. La postulo fini la tendaron post kvin tagoj estis forgesita, aŭ estis donita adekvata direktivo, do ni tendumadis ĉiujn planitajn dek tagojn. Tamen mi kaj Telesforas ĉie, eĉ en la urbeto, sentis sin atente observataj.

Ĉar estis malpermesite pendigi ekstere ian ajn ŝildon pri BET, ni decidis alimaniere manifestiĝi en la urbeto. Dum la Dua Mondmilito en 1944 apud Vieĥŝniai distingiĝis du sovetiaj militistoj, postmorte ricevintaj la titolon “Heroo de Sovetio”. Estis decidite meti florkronon ĉe ilia monumento – ja neniu povis malpermesi tion... Kaj vere – kiam vicoj da esperantistoj kun florkrono

eliris surstraten, milico haltigis la trafikon kaj eskortis nin tra la urbeto ĝis la monumento mem. Ĉe la monumento parolis profesoro S. Podkaminer kaj aliaj, ne preterlasante la ŝancon mencii ankaŭ la ideojn de esperantismo.

Venis la ferma tago, kaj post la lasta vespermanĝo komenciĝis la adiaŭo. Ni senpage ricevis kamionojn, kiuj veturigis la partoprenintojn al fervoja stacio. Sur lerneja korto svarmis agentoj de la ŝtata sekureco – ili ankoraŭ atendis: eble okazos ia eksceso. Sed nenio okazis, ĉiuj partoprenintoj estis akompanitaj kun kantoj. Ni kun Telesforas ekspiris pli facile.

Estis interkonsentite: se pli poste iu estos vokita en partian komitaton, tien iros Telesforas kaj konfesos, ke li estis la ĉefa organizanto, „ĉar mi estis persona non grata“ – estinta politika prizonulo kaj ekzilito, pasiginta preskaŭ naŭ jarojn en Siberio (Komio)*. Mi estis agrable mirigita pri lia konsento kaj elkore dankis lin.

Ni ne eraris: post kelka tempo Telesforas estis vokita en partian komitaton, riproĉata kaj minacata, sed li kuraĝe sin defendis kaj evitis grandan punon – li nur estis eksigita el la agrikultura lernejo. Poste li ekloĝis en Panevėžys kaj daŭrigis aktivan la E-agadon. Ankaŭ la direktoro de la profesia lernejo en Vieĥŝniai ricevis partian punon pro la politika miopeco. Min oni ne tuŝis, tamen mi ne ricevis permeson veturi eksterlanden, kvankam kelkfoje mi havis invitojn al UK-oj.

Kaj finfine la statistiko: en BET-17 partoprenis 100 rusoj, 51 litovoj, 27 estonoj, 20 latvoj, 16 ukrainoj, 8 hungaroj, 16 de aliaj 9 naciecoj, entute el 41 urboj de la tiama Sovetio.

Viktoras Baniulaitis

Fonto: *Litova stelo*, 1999, №3 (127), p 5–8.

* Komio estas ne en Siberio, sed en la eŭropa parto de Ruslando.

BET-20 apud Kaŭno (1983)

Post BET-18 en Latvio (1977) kaj BET-19 en Estonio (1978), la 20-a BET devis okazi en Litovio en 1979, sed oni ne permesis organizadon de BET en 1979, 1980, 1981 kaj 1982. BET-20 povis okazi nur de la 1-a ĝis la 10-a de julio 1983 en Noreikiškės, apudurbo de Kaŭno.

La 20-a Tendaro de Esperantistoj de Baltaj Landoj

De la 1-a ĝis la 10-a de julio 1983 en Noreikiškės [*Norejkiškes*] apud Kaŭno okazis la 20-a tendaro de esperantistoj de baltaj respublikoj. La devizo de la tendaro estis „Por paco kaj amikeco inter popoloj!“ Ĝin organizis Litovia Filio de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE), celante ne nur profundigon de la lingvoscio, sed ankaŭ plifortigon de la ideologia kaj politika rolo de Esperanto. Tia direkto de la tendaro konvenas al nia tempo, kiam la Esperanto-movado akiris novajn formojn kaj novan enhavon.

La tendaron partoprenis 307 reprezentantoj de 13 nacioj el 10 sovetiaj respublikoj. La organiza komitato de la tendaro (vicprezidanto de Litovia filio de ASE P. Jegorovas, membro de Klaipėda Esperanto-klubo V. Baniulaitis, prezidanto de Kaŭna Esperanto-klubo E. Laiconas kaj aliaj) faris grandan laboron.

La organizan komitaton efike helpis la Respublika Konsilantaro de Sindikatoj, Litova Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando, Centra Komitato de Lenina Komunista Junularunio (Komsomolo) de Litovio, Rektora Administracio de Litova Agrikultura Akademio (kiu gastame akceptis partoprenintojn de la tendaro) – ili ĉiuj aktive aliĝis al plena efektivigo de la planita programo.

La ceremonion de la malfermo de la tendaro partoprenis la prezidanto de Litova Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando R. Petrauskas, provizora rektoro de Litova Agrikultura Akademio P. Bėčius, membro de la estraro de ASE kaj funkciulo de Komitato de Junularaj Organizaĵoj de Sovetunio V. Verigin, funkciuloj de Litova Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando, reprezentantoj de Leningrada, Ukrainia, Latvia kaj Estonia filioj de ASE, prezidantoj de urbaj Esperanto-kluboj el Kujbiŝevo, Odeso, Tbiliso kaj aliaj.

Konforme al la programo de la tendaro estis organizitaj kelkaj amasaj politikaj aranĝoj. Unuavice estas notinda la pacdefenda mitingo la 6-an de julio, kiun ĉeestis ĉiuj partoprenantoj de la tendaro. Inter la parolintoj menciindas: docento V. Ĥromov



(Talino), inĝeniero V. Titov (Leningrado), instruistinoj E. Anosova (Seversk, Donecka regiono), T. Vasjanina (Ĉuvaŝio), M. Vaŝĉinina (Strij, Lvova regiono), Leningrada poeto M. Denisov, membro de la estraro de ASE J. Ojalo (Talino), kamarado M. Cuckiridze (Tbiliso). La mitingo finiĝis per komuna voĉdono, uzante specialajn bultenojn „Mi voĉdonas por paco“, kaj certe ĝi estis ideologie kaj politike altnivela.

En la tendaro estis aranĝita vespero dediĉita al la 30-jariĝo de la Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Dum la vespero membro de la Internacia Komitato de MEM, prezidanto de Litovia Filio de ASE, docento de Vilna Ŝtata Universitato L. Skūpas, prelegis pri la historio, taskoj kaj rezultoj de la movado. Ankaŭ interese pasis renkontiĝo kun partoprenintoj de la Granda Patria Milito: ili prezentis siajn rememorojn, aparte pri la Leningrada Blokado, substrekante la gravecon de gardado kaj plifortigo de paco. Fine de la renkontiĝo estis prezentitaj du filmoj, sonigitaj en Esperanto: “Viva Lenin” kaj “La tutpopola heroaĵo”. Ankaŭ menciindas la kvizo “Kion Vi scias pri la Soveta Litovio?” kiun partoprenis 90 personoj. En la komplika kvizo venkis V. Titov kaj J. Ojalo.

Al la tendaranoj estis prezentitaj diversaj prelegoj. Membro de la societo “Scio” A. Gulbinskienė prezentis prelegon “Karl Marx kaj la hodiaŭa mondo”, membro de la sama societo I. Korotkov prezentis prelegon “Batalo de la Komunista Partio de Soveta Unio kaj de la Sovetia Registaro por paco kaj senarmigo”, J. Ŝitov el Lvovo – prelegon “Historia graveco de la 2a Kongreso de Ruslanda Socialdemokrata Laborista Partio”, V. Verigin – prelegon “La internacia jaro de komunikado”.

Dum la tendaro funkciis somera universitato. En la tri fakoj de la universitato (lingvistika, literatura kaj sciencteknika) estis prezentitaj 40 prelegoj: 13 lingvistikaj, 9

literaturesploraj, 13 sciencteknikaj kaj 5 pri ĝeneralaj sciencaj temoj. La prelegojn ĉeestis ĉirkaŭ 160 aŭskultantoj. Inter la plej interesaj prelegoj menciindas „Pri la semantika signifo de refleksiva verbo en la franca kaj litova lingvoj kaj en Esperanto“ (L. Skūpas), „Idiomajoj en Esperanto“ (G. Noreikaitė), „Modernismo de la franca teatro de la dudeka jarcento“ (N. Korĵenevskaja, Ufa), „Pri litovaj kuracaj herboj“ (A. Inokaitienė).

Por la partoprenantoj estis aranĝitaj kursoj por perfektigo de Esperanto-scioj. Entute laboris ok grupoj, kiujn gvidis spertaj pedagogoj (doc. A. Kerner, V. Cvetkova kaj aliaj). 66 instruistoj partoprenis du seminariojn, kie estis diskutataj problemoj de metodoj de la lingvoinstruado kaj priparolita la neceso de eldono de lernolibroj kaj aliaj instrumaterialoj, pri atestado de instruistoj ktp.

Tre gravaj estis tri seminarioj por estraranoj de Esperanto-klubo. Prezidantino de Ukrainia filio de ASE, E. Majburova, tre interese rakontis pri la agado de Esperanto-klubo de la respubliko. E. Majburova substrekis gravecon de ideologia laboro en la kluboj, lige kun la efektivigo de la rezolucioj de la junio (1983) plenkunsido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Soveta Unio; ŝi kritikis la klubojn, kiuj praktikas nur distran aŭ turisman agadojn, rakontis pri la respublika seminario de klubprezidantoj kaj la seminario por Esperanto-instruistoj. J. Ojalo rakontis pri la agado de estoniaj kluboj, pri la lerneja



**Viktoras Baniulaitis
kaj Povilas Jegorovas**

konkurso ktp. Partoprenantoj de la seminarioj eksciis pri agado de la Esperanto-klubo en Vilno, Kaŭno, Kujbiŝevo kaj kelkaj aliaj urboj, pri la sabataj ordigoj de la teritorio, kiujn aranĝis moskvaj Esperanto-volontuloj, pri partopreno de leningradaj esperantistoj en marŝo por la paco, pri ciklo de publikaj prelegoj „Rolo de Esperanto en la batalo por paco“, prezentita en Kujbiŝevo, pri la internacia ekspozicio de infanaj desegnaĵoj, kiun aranĝis Esperanto-klubo de Pasvalys (Litovio). Estis interesaj raportoj pri internacia edukado (Kurŝenai, Lvovo, Panevežys, Samarkando k. a.), pri temaj vesperaranĝoj, dediĉitaj al diversaj landoj, pri internaciaj rilatoj, pri la ĝemeliĝoj de Esperanto-klubo de diversaj landoj: Minska Esperanto-klubo kun Potsdama Esperanto-klubo (GDR), Kieva Esperanto-klubo kun Esperanto-klubo en Kioto (Japanio), Klaipėda Esperanto-klubo kun Debrecena Esperanto-klubo (Hungara Popola Respubliko), ktp.

Estis aranĝitaj tri seminarioj por tradukistoj. Ilin gvidis la verkistino N. Andrianova (Ukrainio) kaj la instruisto P. Čeliaskas (Litovio). La partoprenantoj diskutis la malfacilaĵojn de tradukado, la problemon de eldono de literaturo en Esperanto en sovetiaj respublikoj (krom Estonio, kie la eldonado estis sufiĉe bone organizita).

Ankaŭ la kultura programo estis sufiĉe riĉenhava. Ĉiuvespere okazis koncertoj. Estis aranĝitaj konkursoj de politika kanto kaj arta legado. Interesaj programoj estis prezentitaj dum vesperoj de Ruslando, Ukrainio, Litovio.

Precipe menciindas la alta nivelo de lvova amatora grupo (Ukrainio) kaj de la grupo el Klaipėda Esperanto-klubo (Litovio). Tre interesa estis la teatraĵo „La ŝlosilo de abismo“ (de Krzysztof Gruszczyński) en Esperanto, kiun prezentis amatora grupo el Panevežisa Esperanto-klubo (ĝin reĝisoris profesia aktoro de Panevežisa drama teatro). Post la koncertoj estis bruligataj lignofajroj de amikeco, la junularo kantis kaj dancis. Dum ekskurso en Kaŭno la tendaranoj vizitis la muzeon de la 9-a fortikaĵo – la estinta koncentrejo, kie hitleranoj mortigis milojn da senkulpaj homoj.

La ceremonion de la fermo ĉeestis sekretario de la respublika konsilantaro de sindikatoj R. Baltrušaitis. La plej aktivaj esperantistoj (lokaj kaj gastantaj) ricevis memordonacetojn. La tendaro pruvis la neceson de tiaj renkontiĝoj en estonteco. Ili ne nur prezentas eblecon por profundigi la lingvoscion, sed ili estas ankaŭ lernejoj de ideologia-politika kaj organiza agado, ili helpas eduki sovetiajn esperantistojn en la spirito de sovetia patriotismo kaj proleta internaciismo, kaj kontribuas al aktivigo de la agado de Esperanto-klubo.

La stafeto de la tendaro estis transdonita al esperantistoj de Latvia SSR.

L. Skŭpas

membro de la Internacia Komitato de MEM
prezidanto de Litovia filio de ASE

Fonto: *Informa bulteno de ASE*
(Moskvo), 1983, №8-9.

Tradukis el la rusa Inita Tamošiūnienė



En la solena inaŭguro
parolas Talis Bercis el Rigo



Grupo el Armenio

BET-23: Amase en malgranda urbeto (1986)

La sepa Litovia BET, laŭvice la 23-a, okazis de la 10-a ĝis la 20-a de julio 1986 en la urbeto Smalininkai (12 km okcidente de Jurbarkas) kun rekorde multaj 472 partoprenantoj (estas notinde, ke tiutempe en la urbo estis nur ĉ. 800 konstantaj loĝantoj). Ĝi estis la antaŭlasta BET en la Litovia SSR.

La 23-a Baltia

Esperanto en nia lando pli kaj pli populariĝas. Tial ne hazarde la tradicia 23-a Baltia Esperantista Tendaro, okazinta inter la 10-a kaj la 20-a de julio 1986 en Smalininkai (Litovio), atingis rekordan nombron de la partoprenantoj – 472. Ne nur el la ĉebaltaj respublikoj – estis gastoj ankaŭ el 9 aliaj uniaj respublikoj. Eĉ reprezentantoj de Kamĉatko, Magadano kaj Vladivostoko. Absoluta plimulto inter la partoprenantaro – junularo. Renkonte al la 100-jariĝo de Esperanto tio precipe ĝojigas.

La jaro 1986 estis neordinara, riĉa de diversaj mondscale gravaj eventoj. Ĝi estis la jaro de la historia 27-a kongreso de Komunista Partio de Sovetunio, UN proklamis ĝin Internacia Jaro de Paco. Por esperantistoj 1986 estis la lasta antaŭjubilea jaro. Tiuj ĉi tri akcentoj konstante estis sentataj dum la 23-a BET. La tendaro estis dediĉita al tiuj tri eventoj.

La programo de la tendaro estis tradicia, tamen ĉi-jare kiel neniam antaŭe riĉa kaj streĉa. Soci-politikaj aranĝoj, prelegoj de somera universitato, perfektigaj kaj paroligaj kursoj de Esperanto, seminarioj de klubestroj kaj aktivuloj, abunda kultura programo, viktoriaj*, konkursoj. Okazis kelkdeko da diversaj aranĝoj.

La solenan malfermon de la tendaro partoprenis prezidanto de Litovia Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlandoj R. Petrauskas, prezidanto de junularaj organizaĵoj de Litovia SSR V. Zinkevičius kaj la unua sekretario de distrikta komsomola komitato de Jurbarkas A. Puškoriūtė. La venintojn gratulis kaj bondeziris sukcesan laboron kaj enhavoriĉan ripozon sekretario de distrikta partia komitato de Jurbarkas D. Rapševičienė. Atentostreĉa estis prelego de docento en Vilnusa* Supera Partia Lernejo P. Beniušis „La 27-a kongreso de KPSU pri la nuntempa ideologia batalo“.

En mitingo, dediĉita al Internacia Jaro de Paco, unu post la alia parolis, kantis, deklamis reprezentantoj de diversaj respublikoj kaj urboj, ili kondamnis la agreseman politikon de Vaŝingtono kaj „stelajn militojn“, postulis liberon al Nelson Mandela, solidariĝis kun heroa popolo de Nikaragvio. Sloganoj,



plakatoj, vortoj. Precipe ĉiujn kortuŝis parolo de kuracisto-radiologo el Minsk V. Prjaĥin, kiu partoprenis likvidon de postsekvoj de la ĉernobila kcidento. Al la mitingo venis gastinta tiutempe en Jurbarkas moskvano, vicprezidanto de Konsilio de Militveteranoj de la 39-a Armeo, partopreninto en liberigbataloj de la distrikto Jurbarkas Gennadij Kalaĉov. Li parolis pri la liberigaj bataloj apud Jurbarkas, interesiĝis pri laboro de la tendaro, vizitis tombejojn de soldatoj en Smalininkai kaj Jurbarkas, metis florojn. Inter la tendaranoj estis kelkaj grizharaj veteranoj de la Granda Patrolanda Milito*. Omaĝe al ili okazis speciala aranĝo-renkontiĝo. Parolis la estono J. Ojalo, gasto el Daugavpils L. Gorelovskij, veterano el Gomelĵ M. Mandrik kaj aliaj.

La 14-a de julio estis labortago por tendaranoj. Ne malhelpis ĝin eĉ eta pluvo. En apartaj grupoj esperantistoj laboris en kampo de sovjazo-teknikumo de Smalininkai, sarkis terpomojn, helpis al konstruistoj, ordigis teritorion. La perlaborita mono estis fordonita al la fonduso de helpo por Ĉernobil. Al la sama konto estis transdonita monsumo, aldone kolektita de la tendaranoj.

La tradicia somera universitato, krom plenkunsidoj, laboris en tri sekcioj: interlingvistika kaj esperantologia, medicina kaj ĝeneraltema. Oni aŭskultis pli ol 50 prelegojn kaj raportojn. Menciindaj estas tiu de minskano V. Prjaĥin “Sovetiaj kuracistoj kontraŭ nuklea milito”, tiu de moskvano B. Tokarev

“Lenin pri lingvoj”, prelegoj de tallinnano J. Ojalo pri originala literaturo en Esperanto, prelegoj de moskvano S. Kuznecov pri interlingvistiko kaj esperantologio, prelego de vilniusano A. Vaitilavičius pri psikologiaj trajtoj de esperantisto.

Funkciis 9 perfektigaj kaj paroligaj grupoj de Esperanto. La ekzamenon trapasis 90 tendaranoj. La instruistoj – spertaj pedagogoj O. Kopistjanska (Lvov), T. Auderskaja (Odesa), V. Virŝila (Panevėžys), I. Kulakov (Voronej) kaj aliaj – ĉiutage po tri horojn pacience klarigis al la kursanoj karakteron de la lingvo Esperanto.

Multaj diskutindaj demandoj akumuliĝis por klubestroj, kiuj en la tendaro estis ĉirkaŭ 60, kaj aktivuloj de Esperanto-movado. Okazis ses iliaj kunsidoj. Oni interŝanĝis agadsperton, konsiliĝis pri agado renkonte al la 100-jara jubileo, pri perfektigo de kluba agado, pri evoluo de sobraj kaj sanaj vivtradicioj.

Dum la lastaj jaroj en la lando kaj la respubliko komenciĝas pli vasta eldonado de literaturo en Esperanto, dediĉita al nia kaj eksterlanda leganto. Aperis bezono de kvalifikitaj tradukistoj. Tial dumtendare por tiu ĉi agadsfero estis dediĉita ankaŭ sufiĉe multe da tempo – 50-60 interesiĝantoj pri tradukado de beletra kaj soci-politika literaturo al Esperanto profundigis siajn sciojn kaj majstrecon en speciala seminario.

Kiel kutime, multan atenton havis metodiko de la instruado, plialtigo de instruista kvalifiko – por tio



Povilas Jegorovas

estis dediĉitaj kvar programaj okupiĝoj.

Estis aranĝitaj du „viktorinoj“. En la unua – “Kion Vi scias pri Soveta Litovio?” – plej bone sin montris moskvano V. Ĥmelinskij kaj dagestanano A. Junusov. La dua viktorino kontrolis la klerecon pri historio de la movado, lige kun la proksimiĝanta 100-jara jubileo. Ĉi tie gajnis estonino A. Laur, moskvanoj kaj leningradanoj. La unuan fojon dum BET estis organizita forumo de esperantistoj – al demandoj de partoprenantoj respondis gvidantoj de ASE kaj ties respublikaj filioj. La aranĝo estis interesa kaj havis grandan sukceson.

Aparta vespero estis dediĉita por demonstrado de filmoj kaj diapozitivoj. Ni vidis filmojn sonigitajn en Esperanto – „Lecionoj de historio“, „La popoloj deziras pacon“, „La viva akvo de Litovio“ kaj ankaŭ amatorajn filmojn pri la antaŭaj tendaroj. Esperantistoj el Vladivostoko venigis kolorajn lumbildojn pri la tragedio de Hiroŝimo kaj Nagasaki, donacitajn de japanaj esperantistoj. Neniu povis resti indiferenta, spektante tiujn terurajn bildojn.

Kultura programo de la tendaro estis abunda kaj interesa. Ĉiu vespero estis dediĉita al amatoraj koncertoj de esperantistoj el apartaj respublikoj. Precipe restis en memoro la ensemblo de antikva kanto „Eterna muziko“ el Leningrado, speciale veninta por koncerti en Smalininkai, gajninto de diversaj konkursoj ensemblo de internacia kanto „Inspiro“ sub la gvido de V. Soroka el Kieva provinco. Sendube, plej bone sin montris ukrainaj* esperantistoj, kiuj preparis vere interesan, diversflankan kaj humoran koncerton. Atenton kaptis ankaŭ kantado de minskano V. Viĥarev. Laŭdinda estas amatora koncerto de la klubo el la litovia urbo Panevėžys. Latvajn popolojn kantojn en Esperanto bonege plenumis ensemblo sub gvido de A. Pumpure el Liepaja. Gaje pasis klubo de gajaj kaj spritaj, vespero de

poezio kaj humoro. La programo, preparita de esperantistoj el la urbo Jelec de Lipecka provinco, estis bazo de la vespero de politika kanto. Al loĝantoj de la urbo kaj distrikto Jurbarkas la tendaranoj montris sian komunan koncerton.

Multajn gajajn momentojn prezentis al niaj gastoj ekskursoj tra la urbo kaj distrikto Jurbarkas kaj al kasteloj apud la rivero Nemunas.

La tendaro komenciĝis per interkona vespero, finiĝis per adiaŭa vespero. Estis organizita sporta programo por junularo – ludoj de korbopilko, retpilko, konkurso de ŝako kun loka teamo de Smalininkai. La lokaj ŝakistoj estis pli fortaj. Krom tio funkciis diversaj ekspozicioj, butikoj de esperantaĵoj, riĉa libroservo, instruado de kantoj. Dum vesperoj longe lumis tendara fajro, sonis kantoj kaj dancmuziko.

La tendaro sendube havis grandan impulson por esperantista agado en nia respubliko, kie nun estas 39 kluboj kaj rondetoj. Absoluta plejmulto de la tendaranoj laŭ speciala demandilo taksis la tendaron tre bone.

Tre rapide pasis la dek tendaraj tagoj. Jen venis la solena fermo. Sumiĝas rezultoj de la tendara laboro, estas enmanigitaj donacoj al la plej aktivaj partoprenantoj. Sonas sinceraĵ dankvortoj al ĉiuj kontribuintoj en aranĝo de tiu ĉi vere interesa kaj grava tendaro. Solenan fermon partoprenis sekretario de la distrikta partia komitato Jurbarkas D. Rapševičienė.

Ĝis revido en la 24-a Baltia Esperantista Tendaro en Latvio!

Fonto: *Horizonto de Soveta Litovio*, 1986, №10, p. 57-60

Notoj: Vilniuso: Vilno. Viktorino: Kvizo.

Granda Patrolanda Milito: Ĉi tiel oni nomas la militon de USSR kontraŭ la invadintaj armeoj de la nazia Germanio kaj ties aliancanoj (22 jun 1941 – 9 maj 1945) kadre de la Dua Mondmilito. Ukrainoj: Ukrainio.

La plej granda BET kun pli ol 600 partoprenantoj (1989)

Enkonduko de la ĉeforganizinto

La 26-a BET, okazinta en aŭgusto 1989 en Noreikiškės apud Kaŭno, per kelkaj siaj trajtoj estis tre grava, tial ĝi bezonas apartan enkondukon. Unue, ĝi estis la lasta BET dum la sovetia periodo en Litovio. Due, ĝi estis la plej granda en la historio de BET-oj – ĝin partoprenis 608 esperantistoj. Trie, ĝi estis vere internacia, ĉar krom sovetianoj ĝin partoprenis esperantistoj el Bulgario, GDR, FRG, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Hungario kaj Belgio. Post la disfalo de Sovetunio la partoprenantaro de BET-oj draste falis pro aperintaj limoj, bezonataj vizoj, signifa altiĝo de prezoj k.s. Nur post kelkaj jaroj la kvanto de esperantistoj dum BET-oj rekreskis.

La jaro 1989 estis tre maltrankvila jaro, plena da multaj gravegaj kaj skuaj historiaj politikaj eventoj en tiutempaj baltiaj respublikoj de Sovetunio. Proksimiĝis sendependiĝo de Litovio. Ĉiutage kreskis kaj forte evoluis naciliberiga movado en Litovio. Proksimiĝis disfalo de Sovetunio. Tia situacio, kompreneble, ne povis ne tuŝi esperantistojn. Fine de 1988 en la 24-a restariga kongreso de Litova Esperanto-Asocio estis likvidita Litovia Filio de ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj) kaj estis restarigita la memstara Litova Esperanto-Asocio, funkciinta inter 1919 kaj 1940. Tiamanere Litova Esperanto-Asocio rompis la subiĝajn rilatojn kun ASE kaj komencis kunlaborajn rilatojn kun ASE kiel kun egalrajta asocio de la najbara lando. En la 74-a Universala Kongreso de Esperanto en Brighton (Britio) somere de

1989 la komitato de UEA kuraĝe akceptis kiel aliĝintajn landajn asociojn Litovan Esperanto-Asocion kaj Latvian Esperanto-Asocion, kvankam tiutempe Litovio kaj Latvio ankoraŭ ne estis sendependaj landoj.

Eventuale pro tio pri la 26-a BET, malgraŭ ĝia elstareco, ni ne trovis multajn publikaĵojn en la tiutempa gazetaro. Ni trovis nur unu mallongan artikoleon en loka litova gazeto kaj iom pli longan artikolon en latva porjunulara gazeto. *Horizonto de Soveta Litovio* ne plu aperadis, ankaŭ *Litovio hodiaŭ*, kiu estis sovetieca propagandilo, ĉesis ekzisti. *Litova stelo* ankoraŭ ne estis restarigita. Pro la streĉitaj rilatoj inter ASE kaj Litova Esperanto-Asocio jam ne eblis kaj ne estis deziro uzi la tribunon de „Informa bulteno de ASE“. Sendube devis aperi eble eĉ multaj publikaĵoj pri BET-26 en loka gazetaro de tiutempa vastega Sovetunio, sed nun trovi ilin estas tre malfacila kaj temporaba afero.

Povilas Jegorovas

Esperantistoj en Noreikiškės

Ĉirkaŭ 600 esperantistoj el 11 sovetuniaj respublikoj kaj ankaŭ el GDR, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Pollando, Bulgario, Belgio kaj FRG renkontiĝis en la 26-a Baltia Tendaro. En diversaj sekcioj kaj seminarioj estis traktitaj aktualaj demandoj de la movado, oni parolis pri medicinaj kaj ideologiaj, sciencaj kaj teknikaj, sociaj demandoj. Ankaŭ estis enhavoriĉa kultura programo. Koncertis koruso de bulgaraj esperantistoj, spektaklon en Esperanto ludis pupteatro de Panevėžys.

Dum la tendaro estis eldonata bulteno, en kiu kune kun esperantistaj problemoj estis prezentita la socia vivo de nia respubliko.

T. Ž.

Fonto: *Tėviškės žinios* (Distrikta gazeto de Kaunas), 29 aŭg 1989, №104.

Tradukis el la litova Povilas Jegorovas

Esperantista forumo en Kaŭnas

Ekde la 11-a ĝis la 20-a de aŭgusto en Kaŭno okazis BET-26 (Baltia Esperanto-Tendaro). La unuan fojon ĝin partoprenis 60 eksterlandaj esperantistoj el sep landoj. La partoprenantoj venis el 131 urboj de USSR kaj el 28 eksterlandaj urboj.

De la tribuno sonis opinio, ke tiajn forumojn oni ne plu konsideru tendaroj, sed kongresoj. Do – ne BET, sed BEK? Por la vasta komunumo de esperantistoj pordojn gastame malfermis Litovia Agrikultura Akademio, kiu disponigis al la organizantoj de la aranĝo studentajn komunloĝejojn, manĝejojn, bufedojn, salonojn, ankaŭ teknikon por demonstrado, aŭdioaparataron kaj eĉ busojn por veturigi partoprenantojn al manĝejoj kaj ekskursoj. Ambicie! Nun ni devas pensi, kiel tian aranĝon realigi ĉe ni. Antaŭ du jaroj ni sukcese aranĝis ĝin surbaze de la teknikumo en Saulaine kun 406 partoprenantoj. Sekvontjare denove estos nia vico... Ĉu al simila ago pretas nia LAA aŭ alia alternejo? Eble teknikumo, novkonstruita mezlernejo kaj baltia eksperimenta stacio de maŝinoj en Priekulji? Sed eble ankoraŭ iu alia en alia loko? Karaj mastroj, vian komplezemon volonte akceptus Litovia Esperanto-Asocio! Ĝi fondiĝis surbaze de la Litvia Filio de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj kaj fine de la pasinta jaro iĝis sendependa unuo. Ankaŭ la Esperanto-asocioj de Litovio kaj Estonio fine de la pasinta jaro deklaris sian suverenecon. Tial

kun daŭraj aplaŭdoj estis akceptita informo de P. Jegorovas – delegito de la Universala Kongreso de Esperanto – ke la Litovia kaj Litvia asocioj estas akceptitaj kiel membroj de Universala Esperanto Asocio.

Dum ĉiuj tagoj de la tendaro okazis intensa laboro en sekcioj. En la grupo de komencantoj grandan amon kaj respekton akiris la pollanda esperantistino Ewa Bondar, kiu montris elstaran talenton, instruante laŭ tiel nomata Cseh-metodo. Sukcese laboris grupoj de paroliga perfektigo, sekcio de tradukantoj kaj Somera Universitato. Lecionojn prezentis altnivelaj instruistoj, profesoroj kaj kandidatoj de sciencoj. La unuan fojon por la plejmulto de la partoprenantoj estis ebleco partopreni Diservon en Esperanto. Elĉerpajn respondojn al ĉiuj demandoj dum speciale organizita renkontiĝo donis E. Klumbys – reprezentanto de la estraro de „Sajūdis“, deputito de la Supera Soveto de USSR.

La lingvo Esperanto estas kaj restas fenomeno. Esperantistoj ĝin lernas ĉeeste kaj koresponde. Unufoje semajne ili kolektiĝas en siaj kluboj. Ĉiumonate okazas iu granda aranĝo, internaciaj korespondadoj kaj turismaj interŝanĝoj. Nun eblas aboni periodaĵojn kaj dum la lastaj tri jaroj akiri literaturon en Esperanto. Tio ligas kaj tenas kune la entuziasmulojn. Ĉi-aŭtune rekomenciĝos ĉeestaj kaj korespondaj kursoj. Se vi ekinteresiĝas – sekvu reklamon!

Jāzeps Šlars

Tradukis el la latva Margarita Želve
Fonto: *Padomju Jaunatne*, 12 sep 1989.



La plej nekutima BET, aŭ SAT-kongreso en Litovio

Laŭ la kutima land-ordo de la Baltiaj Esperanto-Tagoj, post la 28-a BET, okazinta en 1991 en Tartu (Estonio), la 29-a BET devus okazi en Litovio. Tamen ankoraŭ en 1990 Litova Esperanto-Asocio (LEA) ricevis de SAT proponon gastigi en 1992 la 65-an Kongreson de SAT. Estus ege malfacile aŭ tute neeble okazigi en Litovio du grandajn internaciajn aranĝojn en la sama jaro. LEA do decidis kunigi tiujn du aranĝojn kaj en la programo de la 65-a kongreso de SAT konservi laŭeble ĉiujn tradiciajn programerojn de BET. Kaj tio estis realigita. Ankaŭ la partoprenantaro de la 65-a kongreso de SAT estis esence BET-a. Tial oni povas konkludi, ke reale la tradicio de BET-oj daŭris kaj ne estis rompita, kvankam la 29-a BET okazis nur en 1993 en Priekuli (Latvio). Pro tio la 65-a kongreso de SAT ĉiam aperas en la statistiko de BET-oj kaj ankaŭ en nia serio pri la Litoviaj BET-oj.

65-a Kongreso de SAT

Okazis en urbeto de Litova Agrikultura Akademio apud la urbo Kaunas la 5-an –15-an de aŭgusto 1992. La Akademio disponigis al la kongresanoj sufiĉe da vastaj aŭditorioj, apude situantaj studentajn hejmojn por loĝado, studentajn manĝejojn kun relative bonaj pladoj por relative malalta prezo. Ŝatantoj de komforto loĝis en hoteloj de Kaunas.

Al la Kongreso aliĝis 617 personoj, venis 452, 165 personojn detenis diversaj kaŭzoj,

plej verŝajne psikologiaj – la timo de supozata nestabila situacio en la lando, antaŭnelonge akirinta sendependecon, ankoraŭ kun multaj garnizonoj de la soveta armeo. Certe, la timon spertis pleje okcidentanoj. Tamen, kiuj venis, estis ĝojigitaj per malaltaj por ili prezoj: „Per tri markoj aŭ dek frankoj oni povis en restoracion inviti kaj duope bone kaj abunde festeni”, – skribis pri siaj impresoj en Kaunas la kongresano Vilhelmo Lutermano (supozeble Wilhelm Luthermann el Germanio) en la septembra (9-a) numero de „Sennaciulo“. Certe neniu ian malagrablaĵon spertis pro la supozata nestabileco.

Kontraŭe, al kongresanoj el la najbaraj landoj, precipe el la tute antaŭnelonge estintaj kun Litovio en la sama kaldrono, nomita Sovetunio, la prezoj kaj baroj estis pli malfacile venkeblaj. Ekzemple el Ukrainio (verŝajne ankaŭ el aliaj ekssovetiaj respublikoj) oni ne rajtis sendi perpoŝte aliĝkotizon. Ĝin oni „kontrabandis“ helpe de personoj, veturantaj al Litovio, eĉ ne esperantistoj. Malgraŭ tio el Ukrainio venis 57 personoj, el Rusia Federacio 109, Tatarstano 2, Kazahstano 1, Belorusio 12, Latvio 14, Estonio 7. Certe la plej facila aliĝo estis por

Fragmento el la komuna foto
(Sendis Gražina Opulskienė)



litovoj, tamen da ili (registritaj) estis relative malmulte – nur 100. El okcidentanoj rekordis francoj – da ili per aŭtobuso kaj aliaj rimedoj venis 38. Laŭvice ni menciuj Svedion – 10, Germanion – 8, Nederlandon – 8. Interesan buntan prezentas aliaj landoj, „sendintaj“ nur po 1 ĝis 5 delegitojn: Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Britio, Bulgario, Ĉeĥio-Slovakio, Ĉinio, Hindio, Hispanio, Hungario, Kroatio, Portugalio, Svislando, Usono. Entute estis reprezentitaj 28 landoj el 4 kontinentoj.

La ĉiutaga kongresa gazeto „Kongresvoĉo“, redaktata de Petras Čeliauskas, donis precizan laŭprocentan statistikon de la kongresanoj laŭ sekso (virinoj, kiel ĉie, dominis), laŭ aĝo (superis 25-50-jaruloj), laŭ profesio (superis oficistoj). Bedaŭrinde mankas sciigoj, kian profesion okupis membroj de SAT. Tiun demandon iom neube tuŝas ankaŭ la estimata Vilhelmo: „la plej granda parto de la alvenintoj ne venis pro SAT kaj ties celoj, sed simple por renkontiĝi en Esperanta etoso“. Li bedaŭras ankaŭ malabundan partoprenon en ĝeneralaj kunvenoj de SAT. Da ili laŭ la programo estis kvin, krom kunsidoj de diversaj sekcioj: pacista, naturista, amikeca reto, sindikatista, liberecana, liberpensula, landa komitato. Kunvenoj kaj prelegoj de vegetaranoj, medicinistoj, diplomatoj, literaturistoj, historiistoj, politikistoj, etnistoj kaj iuj aliaj okazis supozeble ekster programo de SAT mem. Preskaŭ ĉiutage okazis prelegoj pri ekologio, inter ili tiaj specifaj kiel „Vera kaj falsa ekologio“ de Gilbert R. Ledon el

Brazilo, „Ekologia pasportado de transporto“ de Tatjana Bočkova el Moskvo.

El la ĉiuvesperaj koncertoj kaj teatraĵoj ni emfazuj tiun de la revivigita centjara Sankt-Peterburga societo „Espero“, kies violonistino 12-jara Tatjana Kojevratova estis tondre aplaŭdata. Ŝi estas invitita por perfektigi al muzika lernejo en Strasburgo. El la sama rusa urbo nin ravis solisto Djalil Begišev per italaj kantoj kaj la ensemblo „Prima“ per religiaj kantoj sub gvidado de esperantistino Jelena Petrenko. Precipe litovojn surprizis interpreto de poezio de Eduardas Mieželaitis en teatra prezentado „Virino – kvar bildoj“ de polo Jerzy Fornal kaj en „Ponto“ de kroatino Vida Jerman. Pupteatro el Ternopil prezentis „Bonan tagon, tigro“, grupo el Slavjansk (ambaŭ el Ukrainio) – „Historio kun metranpaĵo“ (la francdevena vorto „metranpaĵo“, transprenita el la rusa lingvo, signifas laboriston de presejo, en Esperanto – enpaĝigisto, paĝopreparisto. A.V.). Litovoj ne nur prezentis siajn kantojn, eĉ instruis ilin. Estis instruata ankaŭ la litova lingvo. Komuna diversnacia koncerto de kongresanoj okazis lastan ĵaŭdon, la 13-an de aŭgusto.

La kongresanoj konatiĝis ne nur kun Kaunas – la ĉefurbo de Esperanto en Litovio, sed ĝuis tuttagajn ekskursojn ankaŭ al la politika nuntempa ĉefurbo Vilnius kaj la antikva ĉefurbo Trakai, al la subĉiela etnografia muzeo Rumšiškės kun aŭtentikaj vilaĝoj el diversaj regionoj de Litovio, la perŝipan sur la rivero Nemunas al la Kurša Terlango. Ĉiutage funkciis perfektigaj kaj paroligaj kursoj, okazis kelkaj prelegoj pri metodiko de instruado.

La malfermo estis multe pli impona ol la fermo. Dum la inaŭgura himno staris en la prezido (atentu la foton) administranto de Kaunas-a distrikto Povilas Vengeliauskas, prezidanto de Kaunas-a distrikto Vidmantas

En la solena malfermo, la kongreson salutas nia rusa peranto, kamarado Leo Vulfoviĉ



Vitkauskas, urbestro de Kaunas esperantisto Arimantas Račkauskas, la ĉefa organizanto de la Kongreso, vicprezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas, vicprezidanto de Supera Konsilio de Litova Respubliko Kazimieras Motieka, prezidanto de LEA Algimantas Laurynas Skūpas, ĝenerala sekretario de SAT Krešimir Barkoviĉ, membroj de la Plenumkomitato de SAT: Guy Cavalier kaj Jacques Bannier.

En la Deklaracio, plene presita en „Kongresvoĉo“ №11 kaj en „Sennaciulo“ №9, la kongreso alvokas ĉiujn landojn observi homrajtojn sendepende de nacieco kaj al solidareco kun laboruloj de ekssocialismaj landoj, trafintaj en malbonajn kondiĉojn dum transiro al merkatekonomio.

La Kongreso estis vaste kaj detale lumigita en televido, radio kaj gazetaro de Litovio, precipe dank' al la energia organizanto de la Kongreso Povilas Jegorovas. La redakcion [de *Litova Stelo*] atingis 14 gazetoj kun priskriboj de la kongreso, inter ili tiel prestiĝaj kaj popularaj kiel la ŝtata „Lietuvos aidas“, la ĉefurbaj „Respublika“, „Vakarinės Naujienos“, „Gimtasīs Kraštas“, ne menciante tiujn de Kaunas mem. Longajn raportojn presis ankaŭ gazetoj de relative malproksimaj lokoj, ekz. en Klaipėda kaj Pasvalys.

Adomas Vaitilavičius

Fonto: *Litova Stelo*, 1992, №4, p. 5-8.

La supran materialon kompilis kaj redaktis Povilas Jegorovas kaj Aleksander Korĵenkov.



Slavjanskanoj tuj post la koncerto

Du komentoj

Nikolao Gudskov:

Jes, mi memoras la kongreson – ĝi estis, eble, la plej brila internacia Esperanto-aranĝo (inkluzive UK-ojn!), en kiuj mi partoprenis – reale estis kunigo de karakteroj kaj de la SAT-kongresoj, kaj de la „neŭtralaj“ kun sinergia rezulto. Nu, ankaŭ la epoko estis entuziasmiga pri ĉio, ankaŭ por perspektivoj de Esperanto, kiu donis al la partoprenantoj aldonan vervon. En la raporto ne estis menciitaj pluraj interesaj aferoj (duonnokta kafejo, kelkaj interesaj artistoj...), sed ĝenerale mi kun granda nostalgio rememoras la aranĝon... kiel ĉiujn aliajn el la unua duono de la 1990-aj, la plej optimisma kaj movade aktiva periodo.

Nikolao

Gražina:

Dum multaj jaroj post tiu kongreso, partoprenante en SAT kongresoj, mi aŭdis belajn rememorojn de SAT-anoj pri la kongreso, kie ili estis riĉuloj pro malaltaj prezoj, kie ili perdis kelkajn kilogramojn pro nekutimaj al ili porcioj de tamen bongusta manĝo, kaj kie precipe imponis ilin „soveta“ maniero pasigi noktojn ĉe la fajro kun gitaro kaj kantoj. „Ni havis nenion krom teo kaj tamen la etoso kaj sento ĉe tiu lignofajro estis bonega“ – rakontis al mi tiama ĝenerala sekretario de SAT K. Barkoviĉ.

Estas la kongreso, kiu plej bone restas ĉizita en mia memoro, ja estis mia unua kongreso post Esperanto-kurso. Nun, post tiom da jaroj en Esperantujo, mi konscias, ke mi estis tre bonŝanca trafi bonege organizitan kongreson, kie cirkonstancoj kaj fremdlandaj kongresanoj devigis min ekde la unua minuto paroli Esperanton. Tie mi renkontis miajn plej karajn Esperantajn amikojn, kun kiuj la amikeco daŭras ĝis nun. Post 10 tagoj en tiu etoso mi revenis hejmen jam vere konvinkita esperantistino, kiu sufiĉe flue parolas la lingvon.

BET-31 en Girionys (1995)

La 31-a BET, okazinta la 8-16-an de julio 1995 apud Kaŭno kun 203 partoprenantoj, estis negranda kompare kun la tri antaŭaj Litoviaj BET-oj (358 partoprenantoj en BET-20, 1983; 472 partoprenantoj en BET-23, 1986; 608 partoprenantoj en BET-26, 1989) kaj kun la 65-a Kongreso de SAT (452 partoprenantoj, 1992), kaj ĝi unuafoje ne havis gravan programkontribuon de esperantistoj el Ruslando kaj Ukrainio.

Sed danke al la Litoviaj kaj alilandaj instruistoj, prelegantoj kaj artistoj la programo estis ne malpli riĉa kaj interesa ol antaŭe. La suba artikolo el Litova Stelo koncize prezentas la 31an BET. La artikolon akompanas la rezolucio, akceptita fine de BET-31

BET-31 pasis sukcese

Ducent tri samideanoj el dek ses landoj kunvenis por pasigi kelkajn tagojn en Esperanta medio. La tradicia, jam 31-a BET okazis de la 8-a ĝis la 16-a de julio en Girionys, en Arbarista Lernejo, situanta surborde de Kaunasa Maro, 17 km sudoriente de la urbo. Plej multe da homoj venis el Litovio (153) kaj Latvio (26); po tri el Estonio, Ĉinio, Germanio, Pollando; po du el Brazilo kaj Rusio; po unu el Belorusio, Britio, Ĉeĥio, Danio, Italio, Norvegio, Svedio, Svislando. Dek ok estis geknaboj ĝis 10-jara aĝo. La programo de BET-oj jam fariĝis tradicia. En Somera Universitato prelegis: Kirsten-Tove Thuro (Danio) pri „La nova mondbildo de Martinus“; Margarete Bettmann (Germanio) – „Tempa trakto“, pri spuro de utera periodo sur homa spino; Telesforas Lukoševičius (Litovio) pri litova Esperanta literaturo; Povilas Stašys (Litovio) pri „Kolektado kaj Esperanto“; Valdas Banaitis (Litovio) parolis pri „Fremdlingva edukado kaj Eŭropa regiona integriĝo“. Paroligajn kaj

perfektigajn kursojn gvidis Aristophio Alves (Brazilo) kaj Aldis Bušs (Latvio). Organiziludojn kun infanoj afable konsentis Monika Bilnik (Pollando). Dezirantoj povis konatiĝi kun la historio kaj karaktero de la litova lingvo (gvidis Petras Čeliauskas). Krome kunvenadis kaj siajn problemojn pridiskutis instruistoj de Esperanto, tradukistoj, klubestroj kaj aktivuloj, medicinistoj. Ĉiutage aperadis dupaĝa informilo „BETulo“ (red. P. Čeliauskas). Estis organizitaj ekspozicietoj de pentraĵoj kaj man-faritaĵoj (A. Šidlauskienė, I. Jaloveckytė, B. Šernienė, O. Jarušaitienė), funkciis libroservo (V. Tumėnas), estis vendataj insignoj kaj aliaj esperantaĵoj.

Dimanĉe en Kaunasa preĝejo de karmelanoj okazis Sankta Meso en Esperanto. Merkrede la partoprenantoj povis ekskursi tra Kaunas kaj al muzeo de popola vivmaniero (skanseno) en Rumšiškės, kiun ili atingis per ŝipo. Okazis ankaŭ ekskurso tra la loka parko, kiu okupas 210 hektarojn, kaj en ĝi kreskas ĉ. 350 specioj da arboj. Vespere okazadis artaj prezentiĝoj: kantis konata litova kantisto Valentinas Čepkus, Esperanta koruso el Panevėžys, gvidata de Monika Vasiliauskienė. Komponisto Mieczysław Litwinski kaj aktorino Gabija Vileniškienė prezentis sintezan vesperon de muziko kaj poezio. Kaunasaj Esperant o-kluboj montris spektakleton “Kreo de homo”.

BET-34 en Veisiejai (1998)

De la 17-a ĝis la 24-a de julio 1998 en Agrikultura Lernejo de Veisiejai gastis kaj laboris 253 esperantistoj el 14 landoj, partoprenantoj en la 34-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj.

La partoprenantoj estis: el Litovio – 157, el Pollando – 56, el Finnlando – 13, el Latvio – 9, el Estonio – 5, el Svedio – 3, el Belorusio – 3, el Aŭstralio, Britio, Danio, Francio, Germanio, Nederlando, Ukrainio – po 1. Kiel kutime, dominis virinoj (64 procentoj).

Laŭ la aĝo la statistiko estas jena: junuloj ĝis 18 jaroj: el Litovio 22, el eksterlandoj 7, entute 29; 19-25-jaruloj: el Litovio 24, el eksterlandoj 8, entute 32; 26-60-jaruloj: el Litovio 94, el eksterlandoj 44, entute 138; pli ol 60-jaraĝaj: el Litovio 17, el eksterlandoj 37, entute 54.

La programo estis tradicia: diversnivela E-kursoj (ilin gvidis Trevor Steele, Nina Pietuchowska, Danuta Kowalska kaj Monika Bilnik); somera universitato; seminarioj por klubestroj kaj por E-instruistoj; debatoj pri situacio de E-movado; ekskursoj al Druskininkai kaj Liŝkiava; spektaklo de filmoj; koncertoj de vilaĝa kapelo el Lazdijai kaj de esperantistoj el Panevėžys; spektaklo Sigutė de Kaunasa junulara E-klubo; ekspozicio de florkomponaĵoj de Algimantas Raižys. Okazis ankaŭ katolika meso kaj ekumena diservo. La partoprenantoj

vizitis lokan muzeeton, kie estas ankaŭ anguleto, dediĉita al L. Zamenhof. La partoprenantoj ĉiutage senpage ricevadis informilon *Laga Ondo*.

Tamen la ĉefa evento sendube estis inaŭguro de nova monumento al la kreinto de Esperanto. La iniciatintoj de la monumento estis pastro Pranas Gavėnas kaj Alfonsas Vitkauskas el la regiona centro Alytus. La buston de Ludoviko Zamenhof el granito ĉizis skulptisto Julius Narušis. La inaŭguron, kiu okazis la 22-an de julio en urba parko, honoris nepo de la aŭtoro de Esperanto L. Zaleski-Zamenhof, veninta el Parizo. Lia parolado estas publikigita aparte. Salut-mesaĝon sendis ŝtatprezidento de Litovio. En la inaŭguro partoprenis oficialaj reprezentantoj de distrikta kaj loka administracio, du parlamentanoj, multaj loĝantoj de Veisiejai. Ĉe la nova monumento oni metis florojn...

Surskribo en la litova kaj en Esperanto tekstas:

*Kreinto de Esperanto
Ludoviko Zamenhof
en 1885 verkis en Veisiejai
unuan lernolibron de la Internacia Lingvo.*



Sur la flankaj platoj de la piedestalo oni povas tralegi en ambaŭ lingvoj citaĵon el parolo de L. Zamenhof en Londono dum Universala Kongreso en 1907, kie li mencias Litovion:

Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi, kvankam mi forlasis vin kiel juna knabo. Vi, kiun mi ofte vidas en miaj

sonĝoj, vi, kiun nenia alia parto de la tero iam povos anstataŭi en mia koro...

La monumento en la urbeto, kie Zamenhof iam loĝis, dece kompletigos liston de ZEO-j en la tuta mondo.

Alvoko de la partoprenantoj al Klerigministerioj de Estonio, Latvio, Litovio



La internacia kunlaboro tutmonde kaj en baltiaj landoj konstante pliintensigas. Nuntempe en lernejoj de baltiaj respublikoj gelnantoj devas lerni kelkajn lingvojn. Lernado de la dua nacia fremda lingvo estas granda ŝarĝo por lernantoj, ankaŭ por niaj ŝtatoj.

Ni proponas solvon, kiu permesas ŝpari monon kaj donas eblecon pli bone ellerni gepatrajn lingvojn kaj aliajn pli necesajn studobjektojn. Jam pli ol 110 jarojn en la mondo sukcese funkcias neŭtrala internacia lingvo Esperanto, agnoskata kaj rekomendata de Unesko. Logika gramatiko, klara fonetiko kaj konstanta loko de akcento en vortoj ebligas multfoje pli rapide ĝin ellerni ol naciajn lingvojn. Ĝi estas ankaŭ fleksebla kaj esprimriĉa. Ĉiujare okazas tutmondaj kongresoj de esperantistoj, kie miloj da diversnaciaj partoprenantoj interkomunikiĝas sen interpretistoj. Uzado de Esperanto pli kaj

pli disvastiĝas en la mondo. Pri tio atestas ankaŭ riĉaj paĝoj en Interneto.

Instruado de Esperanto en baltiaj landoj plivastiĝas. Ekzemple, oni fakultative instruas Esperanton en Litovio: en universitatoj de Klaipėda kaj Šiauliai. Kiel elekteblan studobjekton oni lernas Esperanton en Pedagogia lernejo de Marijampolė, en 37-a lernejo de Kaunas. Kiel elektitan lingvon oni studas ĝin en Latvio: en Ekonomika kaj Kultura Altlernejo en Riga kaj aliloke.

En 1997 direktorino de Kleriga departemento de Litovia Klerigministerio jam subskribis dokumenton, laŭ kiu estas oficiale permesita instruado de Esperanto en litoviaj lernejoj kiel libere elektita studobjekto kun deviga vizitado de lecionoj.

Ni afable petas Klerigministeriojn de Estonio, Latvia kaj Litovia Respublikoj rekomendi instruadon de Esperanto kiel de la dua libere elektita fremda lingvo en niaj ŝtatoj. Ni opinias, ke tio efektive kaj praktike plifortigos kunlaboradon inter niaj popoloj.

Je la nomo de partoprenantoj de la koncernaj Esperanto-Asocioj:

Prezidanto de Estona Asocio de Esperanto

Aŭgusto Kilk

Prezidanto de Latvia Esperanto-Asocio

Alida Zigmunde

Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

Povilas Jegorovas

La 23-an de julio 1998



BET-37 apud Kaŭno (2001)

Litova Agrikultura Universitato apud Kaunas jam kelkfoje disponigis siajn ejojn por kunvenoj de esperantistoj. Ĉi-jare de la 7-a ĝis la 15-a de julio ĉi tie okazis la 37-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj.

Por pasigi semajnon en amika etoso, por praktiki la lingvon, por konatiĝi kun la urbo kaj Litovio, kolektiĝis 303 samideanoj el 18 landoj.

Post kelkjara interrompo ni denove ekvidis esperantistojn el Rusio, Ukrainio, Belorusio, inter ili estis veteranoj de iamaj BET-oj kaj SEJT-oj – M. Bronŝtejn, A. Gonĉarov, A. Belov, M. Lineckij – kiuj pliriĉigis la programon per siaj kontribuaĵoj.

La programo de BET-oj fariĝis jam tradicia kaj iomete similas al tiu de Universalaj Esperanto-Kongresoj: prelegoj en Somera Universitato, diversnivelaĵoj kursoj de la lingvo internacia, seminarioj por E-instruistoj kaj aktivuloj, ekskursoj, distraĵoj vesperoj. Krome okazis diservoj en la universitata kapelo, dum kiu Esperante kantis infana koruso gvidata de L. Katilienė. Interesiĝantoj povis konatiĝi kun la litova lingvo, ĝiaj historio kaj literaturo.

En la Somera Universitato prelegis M. Bronŝtejn („Postnikov kaj Zamenhof – aventuristo kaj idealisto“, „Josif Brodskij – poeto de la jarcento“, „A. Puŝkin – vivo, poezio, tradukoj“). A. Gonĉarov („Fascina riĉiĝo de E-pensokosmo“, „Biokampo de

la homoj kaj ties influo al la ĉirkaŭaĵo“, „Instruado de Esperanto en la moderna tempo“, „E-klubo – degenero aŭ nova vidpunkto“, „E-movado el la vidpunkto de la sistemteorio“, J. Petrovskaja („Popola verkisto Jakub Kolas“, N. Caragea („Fama infanlibro – interesa aŭtoro“, V. Banaitis („Idealismo sur la sojlo de Eŭropa Unio“, J. Parzyszek („Ŝapiro – gvidanto de Esperanto-movado en Bjalistoko“, „La bazaj reguloj de merkato. Ĉu ni apliki ilin en E-agado“, E. Karczewska („Esperanto-mono kaj medaloj“, L. Filipova („Ĉeĥio kaj ĉeĥa E-movado“, K. Tove Thuro („Ĉu reklamo aŭ informado pri Esperanto“, „Signifo de la laboro de Martinus al la homaro kaj mondopaco“, Z. Garbaravičienė („Ajurveda“, V. Batijevskij („Mineralo ŝungito por la sano“, I. Enghart („Praktika mikologio – mirindaĵo de Indonezio“, V. Matuzevičienė („Pri sana vivmaniero“, S. Staišiūnaitė („Yumeiho-terapio“, W. Posthuma („La organizo de Lingva Festivalo“).

Precipe necesas mencii varian, abundan kaj profesinivelan artan programon, kiu estis merito de Aida Čižikaitė: ŝi sukcesis venigi sur scenejon konatajn kolektivojn. Post la

oficiala inaŭguro la Ĉambra Orkestro de Kaunas, gvidata de la fama dirigento Pavel Berman, majstre plenumis Seksteton por kordaj instrumentoj de P. I. Ĉajkovskij (Opus 40), konsistantan el kvar partoj.

Por la BET-anoj koncertis la virina ensemblo Elegija



kaj infana dancgrupo Sūkury, la blovorkestro Ažuolynas, la koruso de Vytautas-preĝejo kaj grupo de popolaj dancistoj Ainiai, la folkloro ensemblo Žaisa, la grupo Asorti el Visaginas, infana estrado DND; pupteatro prezentis esperantlingve la spektaklon “La ora ovo”. En la programo partoprenis ankaŭ polaj kaj ukrainaj esperantistoj. Post la fermo la aktorino B. Prekevičiūtė deklamis tradukojn de litova poezio, kantis la solistino O. Matusėvičiūtė.

Por la partoprenantoj estis organizitaj senpagaj ekskursoj tra la urbo Kaunas kaj al la fama arkitektura ensemblo de Pažaislis-monaĥejo. Dum la tutaga ekskurso estis vizitita Parko de Grūtas kaj la urbeto Veisiejai, kie en 1885 loĝis L. Zamenhof.

Albinas Pečelis

Fonto: *Litova Stelo*, 2001, №4.

La 37-an fojon en Baltio

Tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-37) okazis la 7–15-an de julio en Litovio. Por pasigi unu semajnon en amika etoso kaj praktiki nian lingvon venis 303 esperantistoj el 18 landoj. En ĉirkaŭaĵo de Kaunas ili povis ne nur ĝui la belan veteron, sed ankaŭ partopreni abundan programon de la aranĝo.

Dum la solena inaŭguro de BET-37 post enkondukaj vortoj de la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas, estis tralegitaj salutmesaĝoj de Valdas Adamkus, prezidento de Litovio, kaj de L. C. Zaleski-Zamenhof. Salutis ankaŭ reprezentantoj de landoj, kaj poste sekvis la koncerto de la Ĉambra Orkestro de Kaunas, gvidata de Pavel Berman.

Ĉiutage dezirantoj komune kuradis kaj naĝis en la apuda artefarita lago. Post la matenmanĝo eksterlandanoj povis konatiĝi kun la litova lingvo. Por lernemuloj funkciis paroligaj kaj perfektigaj kursoj. La somera universitato estis riĉa je diversaj prelegoj. Gastoj kaj lokaj esperantistoj prelegis pri la E-movado, literaturo, sana vivmaniero ktp.



Biruta Rozenfelde (Latvio), Povilas Jegorovas (Litovio) kaj August Kilk (Estonio)

Se iu trovis prelegojn neinteresaj, li/ŝi povis spekti videofilmojn, viziti la libroservon aŭ „krokodilejon“, kie troviĝis gaja kolekto da krokodiloj kaj aliaj ekspoziciaĵoj.

Ĉiuvespere okazis prezentado de popolaj metioj (ceramiko, ligna skulptarto, teksaĵoj ktp.), diversaj koncertoj, instruado de balaj dancoj kaj diskotekoj. La pupteatro speciale por BET-37 preparis spektaklon en Esperanto laŭ litova popola fabelo *La Ora Ovo*.

Dikredantoj povis partopreni en loka kapelo la katolikan meson kaj Ekumenan Diservon. La infanoj havis proprajn programerojn. La etoson varmigis aŭkcio kaj diversaj ludoj, kiujn prezentis gastoj el Ukrainio, Ruslando kaj Germanio. Ĉiutage aperis informilo *BETago*.

Dezirantoj ekskursi vizitis la malnovan urboparton de Kaunas kaj monaĥejon Pažaislis, kaj ili havis tutagan ekskurson al la parko Grėtas apud Druskininkai, kie estas kolektitaj kaj starigitaj 70 diversaj monumentoj de sovetaj „idoloj“. Survoje oni vizitis la urbeton Veisiejai, kie Ludoviko Zamenhof loĝis kaj kie estas monumento al li.

BET-37 finiĝis, sed al la Organiza Komitato daŭre venas kaj kritiko kaj dankvortoj. La unua helpas rimarki erarojn kaj mankojn en nia laboro, kaj la dua ĝojigas niajn korojn.

Rita Valčiukaitė

Fonto: *La Ondo de Esperanto*, №2001, 8-9.

BET-40 en Birŝtonas (2004)

La 10-18-an de julio 2004 en la litova banurbo Birŝtonas, apud ĉefa litovia rivero Nemunas, okazis vicaj jubileaj someraj tradiciaj la 40-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiujn organizis Litova Esperanto-Asocio.

Por pasigi semajnon en amika etoso, por praktiki la lingvon, por konatiĝi kun la urbo kaj Litovio, kolektiĝis 303 samideanoj el 18 landoj.

Tiuj ĉi tagoj okazas laŭvice en Latvio, Estonio kaj Litovio ekde 1959. Estis kelkaj jaroj, kiam BET ne okazis. En BET-40 partoprenis 257 registritaj esperantistoj el 17 landoj, sed efektive la aranĝon entute partoprenis ĉirkaŭ 300 personoj, ĉar multaj litovaj esperantistoj venis nur por ambaŭ semajnfinoj kaj oficiale ne aliĝis al BET. Krome, estis kelkaj dekoj da aliĝintoj, kiuj reale ne venis (interalie, el Francio, Ganao, Islando k.a.).

Al la aranĝo salutmesaĝojn sendis tiutempa provizora prezidento de Litovio Arturas Paulauskas, prezidanto de UEA Renato Corsetti, ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller, nepo de Ludoviko Zamenhof Ludoviko Zaleski-Zamenhof. En la solena

inaŭguro de la kongreso partoprenis kaj parolis vicurbestro de Birŝtonas Jozas Aleksandravicius, parlamentano kaj esperantisto Stasys Kruzinauskas, en la solena fermo de la aranĝo partoprenis kaj parolis urbestro de Birŝtonas Antanas Zenkevicius.

Ĉiutage aperis kvarpaĝa grandformata gazeto „Meandro“, kiun redaktis Petras Celiauskas kaj Choe Taesok. Entute aperis 7 numeroj.

Programo de la aranĝo estis kutima – eblis aŭskulti multajn prelegojn en Somera Universitato, enkadre de la aranĝo okazis diplomiga seminario de IEL, gvidata de Atilio Orellana Rojas kaj Ana Montesinos, ankaŭ okazis vica Balta Esperanto-Forumo, gvidata de Aleksander Korĵenkov kaj Halina Gorecka.

Oni povis aŭskulti kelkajn prelegojn pri la tradukita literaturo en Esperanto, estis tri grupoj de diversnivela Esperanto-kursoj, kiujn gvidis Sabina Trenner, Ewa Bondar,



Nina Pietuchowska. Petras Celiauskas ĉiutage prelegis pri litovaj lingvo kaj literaturo, estis prezentita nova libro de Sezonoj „Ĉeriza ĝardeno“, okazis seminario pri problemoj de Esperanto-movado en baltiaj landoj, tre riĉa estis kultura programo de la aranĝo.

Ĉiuvespere okazis koncertoj de diversaj litovaj ensembloj, latva vespero, nacia kaj internacia vesperoj, estis aranĝita sankta Meso en Esperanto en loka katolika preĝejo, estis organizita ankaŭ ekumena diservo, okazis tre interesa tuttaga ekskurso per ŝipo al etnografia subĉiela muzeo en Rumsiskes, dum la tuta semajno funkciis riĉa libroservo, okazis kvizo pri Esperanto-movado, instruado de kantoj, kelkaj ekspozicioj (filatela ekspozicio de Marius Dyglys, fotoekspozicioj de Andrzej Sochacki kaj Ilona Ejsmont), renkontiĝo kun legantoj de „Litova stelo“, oni povis spekti kelkajn videofilmojn en Esperanto, okazis poezia vespero.

Ĉiumatene eblis gimnastiki laŭ jogo-maniero, ĉiuvespere eblis distri sin en dancsalono, estis prezentitaj litovaj popolaj metioj, funkciis fotoservo.

Pri la aranĝo vaste informis litova respublika kaj loka gazetaro, radioj, televido, novaĵagentejoj, retgazetoj. Estis filmitaj multaj aranĝoj por kvin regionaj litovaj televido, tiuj ĉi materialoj ankoraŭ aperos.

Al la gazetaro, radioj, televido, novaĵagentejoj antaŭ BET-40 estis dissendita ampleksa informo pri la aranĝo, multaj ĝin uzis. Fine de la aranĝo Litova Esperanto-Asocio donacis al urba publika biblioteko ĉirkaŭ 100 librojn en litova lingvo kaj en Esperanto, tio estis anoncita dum la solena fermo de BET-40, post la fermo urbestro de Birŝtonas en biblioteko akceptis la donacon, ceremonio estis filmita de televido kaj estos montrota estonte.

Dum la registriĝo ĉiu partoprenanto ricevis tre riĉan sakon (programo de BET-40, speciala leterpapiro, speciala koverto, speciala



notlibreto, libreto pri Birŝtonas en Esperanto, broŝuro kun tekstoj de litovaj kantoj, broŝuro kun tekstoj por katolika diservo, turisma kolora eldonaĵo „Litovio. Jarmilo en Eŭropa centro“, turisma kolora eldonaĵo „Vilnius. Neforgesebla harmonio kaj ĉarmo“, Unua Bulteno de la 90-a UK en Vilnius en 2005, aliĝilo al UK en Vilnius, informa folieto de La Ondo de Esperanto, invito al BET-40). Estis farita speciala metala insigno de BET-40. Fine de la aranĝo ĉiu ricevis Adresaron de partoprenantoj de BET-40. Estis farita komuna foto de la partoprenantoj de BET-40.

Litova Esperanto-Asocio pro diversflanka helpo al BET-40 dankas al municipo de urbo Birŝtonas, al sanatorio „Versme“, kultura centro de Birŝtonas, sakrala muzeo de Birŝtonas, administracio de sportista komunloĝejo, katolika komunumo de la urbo. Speciala danko al litovaj esperantistoj, kiuj multe laboris por sukcesigo de BET-40, kaj multaj eksterlandaj esperantistoj, kiuj esence kontribuis al programo de BET-40 per diversaj eroj.

Pli detale pri BET-40 eblas legi en la retejo de Litova Esperanto-Asocio <http://www.esperanto.lt> (informiloj unua kaj dua, aliĝilo, litovlingva teksto por gazetaro, ĉiutaga programo de BET-40, ĉiuj sep numeroj de la gazeto „Meandro“, multaj fotoj k.s.).

Organizan komitaton de BET-40 gvidis Povilas Jegorovas.

Povilas Jegorovas

BET-43 en Šiauliai: la plej granda BET ĉi-jarmile



La 43-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en la nordlitovia urbo Šiauliai, kun 322 partoprenantoj el 18 landoj, iĝis la plej amasa BET en tiu ĉi jardeko (jarcento kaj jarmilo).

BET-43 pasis de la 14-a ĝis la 22-a de julio 2007 en modernaj ejoj de la fakultato de sociaj sciencoj de la urba universitato. Esperantistoj senpage uzis teknikajojn, inkluzive de pluraj komputiloj kun retaliro.

La urbaj aŭtoritatoj montris grandan interesiĝon kaj helpemon. La urbestro Genadijus Mikšys faris malferman paroladon; li ankaŭ akceptis tridekon da diverslandaj esperantistoj en la urbodomo. Sed en gastamo lin superis la dekano, d-ro Teodoras Tamošiūnas, kiu abunde regalis ĉiujn partoprenantojn. La urbaj turisma kaj informa oficejoj helpis per eldono de gvidlibro en Esperanto, disponigo de materialo, preparo de ekskursoj. Subteno al la kultura programo ebligis fari ĝin varia kaj riĉa.

BET-43 iĝis grava ankaŭ landskale, kaj la prezidanto de la litovia parlamento Viktoras Muntianas en sia salutmesaĝo emfazis, ke „agado de esperantistoj donas signifan impulson al la reciproka kompreno kaj kunlaboro de la popoloj“. Kun duedeke da prelegoj funkciis Somera Universitato,

kies programon Osmo Buller salutmesaĝe konstatis supera al la Internacia Kongresa Universitato en Jokohamo. Dunivelaj kursoj kun kvar instruistoj en bona etoso progresigis lernemulojn. Al la 80-jariĝo de la movado en Šiauliai estis dediĉita la libro *Ruto levis Esperon*, lanĉita en BET. Alia librolanĉo prezentis la longe atenditan reeldonon de *La Mastro de l' Ringoj* de Tolkien. Streĉa konkurado okazis en la literatura kvizo de *La Ondo de Esperanto*, en kiu venkis Petras Čeliaskas. Li ĉiutage enkondukis alilandanojn en la litovajn lingvon, literaturon kaj kulturon. Post longa paŭzo reokazis la belarta konkurso Muzo. Ĉiutage sub la redaktado de Choe Taesok aperis *Sagisto*, kies titolo aludas la simbolon de la urbo.

Populareco de ekskursoj eĉ iom damaĝis la programon, dezertiginte la ejojn. Esperantistoj svarmis ne nur en la universitato, sed ankaŭ en kafejoj en la urbocentra promenstrato. Gražina Opulskienė konstatis tion kaj eksterplane persvadis pli ol kvindekon da diverslandaj esperantistoj kune pasigi vesperon en subĉiela gastejo, kie vigla muziko ne dancigis nur lamulojn. La sukceso de BET-43 estas rezulto de longa preparlaboro, al kiu kontribuis la prezidanto de la landa asocio Povilas Jegorovas kaj multaj litoviaj aktivuloj, precipe, honora civitano de Šiauliai Zenonas Sabalys kaj la sekretario de LitEA Jūratė Pupškaitė.

Halina Gorecka



BET-46 en Visaginas: la plej nova urbo de Litovio

Interkomunika kaj kleriga aranĝo

La 27-an de junio, rande de la orientnorda urbo Visaginas, en la urba Profesia Studcentro pri Teknologioj kaj Entreprenado, okazis solena inaŭguro de la 46-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj. La 3-an de julio pasis ties fermo. Kio estis BET? Stranga estas la demando, ĉu ne? Oni diras – ĝi estas aranĝo. Aranĝoj ekzistas diversaj. Kiu, se pli precize? BET, precipe la litovaj BET-oj laŭ sia programo imitas Universalajn Kongresojn. Ĉu BET estas kongreso, almenaŭ kongreseto? La vicprezidanto de UEA Claude Nourmont, partopreninta nian BET-on, diris kategorie: „Ne, BET ne estas kongreso!“. Povas esti, ke aliaj partoprenintoj de BET havas aliajn respondojn. Elektro inter diversaj aranĝoj ja estas granda: lingvofoiro, seminario, konferenco, festo, festivalo, universitato, praktikejo, tendaro, somerumado ktp. La ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller en sia gratula mesaĝo al BET-anoj imagis BET-on fenomeno (eksterordinara?), aranĝo kun eduka valoro. Ĉu BET estas edukejo? Kio finfine estas BET? Respondi la demandon povos finlege ankaŭ la legantoj.



Lingva lernejo kaj Somera Universitato

En la programo de BET estis Esperanto-kursoj (komencaj kaj konversacia), konatiga kurso pri litova lingvo kaj litova kulturo (prelegis Petras Čeliasukas), vesperumoj, ekskursoj kaj Somera Universitato. Dominis Somera Universitato kun pli ol 20 prelegoj. Prelegis 13 lektoroj. Eĉ po kvar prelegojn legis Mikaelo Bronŝtejn kaj la duopo Peter Baláz kun Jevgenij Gaus. La plej grandan intereson elvokis la didaktaj prelegoj de la retuma duopo Peter kaj Jevgenij pri komputumaj temoj. Same la historiaj prelegoj de Aleksander Korĵenkov „L. L. Zamenhof en Grodno“ kaj de M. Bronŝtejn „Zamenhof kaj Postnikov“. Ĝenerale, la lekcioj estis bone vizitataj – la aŭditorioj ĉiam estis plenplenaj. Rektoris la Someran Universitaton estrarano de Litova Esperanto-Asocio, doktoro pri teknikaj sciencoj, docento Arimantas Račkauskas. Ĉiumatene (krom merkredo, la ekskursita tago) okazis lecionoj en ĉiunivelaj Esperanto-kursoj. La komencantojn instruis litova instruista teamo Stanislova Adomauskienė, Stanislava Sobanska kaj, kiel ĉiam, Gražina Opulskienė. Dum kelkaj tagoj instruis ankaŭ Stano Marček (li ankaŭ prelegis pri metodiko de kursgvidado). La konversacian kurson por progresantoj gvidis Svetlana Smetanina. Ŝajnus (naive!), ke ĉiuj venis al BET por



La 46-a BET okazis en la profesia studcentro pri teknologioj kaj entreprenado de Visaginas.

partopreni aŭ eniri la movadon, por praktiki, por maksimume utiligi Esperanton. Tamen, kiel ĉiujare, venis ankaŭ eternaj komencantoj – tiuj, kiuj de jaro al jaro ne progresas en alproprigo de la internacia lingvo. Tiujn oni admonis – krokodilu mallaŭte!

Ekskursoj

La 30-a de junio (merkredo), same kiel dum UK-oj, estis ekskursita tago. Pli ol 45 BET-anoj partoprenis la busan ekskurson tra superba nacia parko „Aukštaitija“ (poloj aparte ekskursis aŭte por vidi vidindaĵojn de norda Litovio). La busanoj unue vizitis muzeon pri abelbredado en Stripeikiai. Tie estas prezentitaj multaj specoj da abelujoj de la plej malnovaj ĝis nunaj – modernaj. Unu funkcia abelujo estis en ligna skulptaĵo de Bubilas (antikva litova abela kaj miela dio). Kelkaj esperantistoj aĉetis produktojn de abeloj – ĉefe mielon, peĉon kaj polenon.

Sekvis aŭtenta rivera muelejo ĉe la vilaĝo Ginučiai kaj la turisma centro Palūšė kun preĝejo, konstruita en la jaro 1570 nur pere de hakilo kaj segilo kaj eĉ sen unu najlo. Poste banado ĉe cignoj en apuda lago Lūšiai. Revenvoje al Visaginas oni vizitis kafejon-muzeon „Romnesa“ en la vilaĝo Strigailišiai, kie estas produktataj, eksponataj kaj vendataj tradiciaj litovaj branĉkukoj, litove nomataj „šakotis“.

Vendrede kelkaj grupoj de esperantistoj ekskursis al la proksima fermita nuklea centralo. Verdire, la centralo povis funkcii ankoraŭ dum 10-15 jaroj, sed EU starigis la eniran kondiĉon por akcepto de Litovio – fermi la centralon jam ĝis la jaro 2010. La centralo estis definitive fermita la 31-an de decembro 2009 kaj tie nun okazas dismuntaj laboroj (grandan parton de la bezonata elektro produktas modernigita hejtelektrejo, plian elektron Litovio aĉetas ĉe Rusio).

Ekspromptaĵoj

Ne ĉiuj antaŭviditaj distraj programeroj de BET okazis. Neatendite mortis eksprezidento de Litovio M. Brazauskas, kaj estis deklarita tritaga funebro. Dum unu el la vesperoj V. Šilas okazigis diskutadon pri problemoj en Esperantujo. Alian vesperon lerte “savis” Mikaelo Bronštejn. Anstataŭ antaŭvidita koncerto li proponis kvizon kaj oni interese pasigis la vesperon. Komence Mikaelo rakontis pri iam populara en Rusio televida ludo kiu nomiĝas “Kio? Kie? Kiam?”. Poste sekvis liaj demandoj kaj tiu, kiu opiniis scii la respondon devis levi la manon kaj diri ĝin. Se la respondo ne estis taŭga tiam alia homo povis respondi. Tiu, kiu prezentis plej multe da trafaj respondoj ricevis ĉefan premion. La demandoj estis diversaj: pri Esperanto kaj Zamenhof, pri historio, pri religio, pri literaturo, eĉ pri diamantoj.

En la kadro de BET okazis kunveno de TEĴA kaj arta konkurso MUZO. La anoncita arta konkurso „MUZO“ ne okazis en antaŭplanita maniero. La libervola organizaĵo Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio havas 110 membrojn en 38 landoj. Partoprenis en BET dek, sed en tiea ĵurnalista kunveno nur 6 el ili. Sekve, pritrakto de internaj, teknikaj aferoj de TEĴA estis superflua.

Ĝenerala sekretario de TEĴA Vytautas Šilas (Litovio, Vilno) prezentis historion de TEĴA, kiu komenciĝis jam en 1946, kaj kiu havis



„Sanktaj Petroj kaj Paŭloj“

eĉ kvin reorganizojn. La lasta komenciĝis dum la Tutmonda Kongreso de Ĵurnalistoj-Esperantistoj en Vilno (2008) kaj finiĝis en 2009 dum la UK en Roterdamo. La organizaĵo kiel jura persono estas registrita en Vilno (2009). Laŭ la statuto ĝi rajtas kaj povas agi en tre multaj sferoj. Pri eblaj ontaj aktivecoj de TEĴA parolis redaktoro de la revuo „Esperanto“ Stano Marček, vicprezidanto de UEA Claude Normont, unu el la gvidantoj de la fama retejo E@I Peter Baláž, latva aktivulo Aivars Kalniņš, litova pedagogo Algimantas Piliponis. La resuma konkludo estis: aktiva TEĴA povus multe kontribui la komunan aspiron pri diskonigo de Esperanto. Por informiĝi pri TEĴA venis 19 BET-anoj. Sekve pri ĵurnalista agado interesiĝas sufiĉe multaj.

La Arĝenta Gruo

La arĝenta gruo estas emblemo de la urbo Visaginas. „La arĝenta gruo“ estis la titolo de ĉiutaga informilo redaktata de d-ro Vilius Šidlauskas, estrarano de Litova E-Asocio. La kvarpaĝa ilustrita informilo (kun koloraj fotoj!) venadis el presejo diligente ĉiumatene dum la matenmanĝa horo. Ĝi prezentis gratulon de la Alta reprezentanto de la 46aj Baltiaj E-Tagoj la urbestro de Visaginas Vytautas Račkauskas, publikigis mesaĝojn de Probal Dasgupta, prezidanto de UEA kaj de Osmo Buller, Ĝenerala direktoro de UEA. En ĉiu numero de „La arĝenta gruo“ aperadis aktuala precizigita tagordo de BET, raportetoj

kaj impresaĵoj de BET-anoj pri la okazintaj aranĝoj. Ilustre el la informilo ni represas verkaĵeton de D. Manionienė kaj A. Plerpienė „Taga anekdoto“: «Tri komencantinoj el la litova urbo Panevėžys ekvidis en la programo de BET-46 informon pri la kunveno de TEĴA kaj ne sciante signifon de tiu mallongigo kaj ne rimarkinte supersignon sur la litero “J” ili legis la vorton TEĴA kiel “teja” kaj supozis, ke okazos kunveno ĉe teo. Ili plibeliĝis, prenis iomete da dolĉaĵoj kaj rapidis en la kunvenon. En la salono ili ekvidis lektoron Vytautas Šilas ĉe komputilo kaj seriozvizaĝajn aŭskultantojn... Dum mallonga tempo la komencantinoj komprenis, ke ĉi tie okazas kunveno de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio. Do, iliaj sukerajoj kaj dolĉaĵoj restis en sakoj...»

Aperis entute sep numeroj de la ĉiutaga informilo „La arĝenta gruo“. Ili ĉiuj estas elŝuteblaj ĉe retejo de Litova Eesperanto-asocio www.esperanto.lt.

Fota galerio

Vi foliumas fotojn pri iu Esperanto-aranĝo kaj „rememoroj aperas pri la tagoj pasintaj“. La okazon por refreŝigi memoron prezentas bonega fotisto el Belgio Mikaelo Cwik (Michael@Cwik-online.net). Li jam iom ordigis siajn fotomemoraĵojn kaj proponas 201 bildojn de BET-46 en Visaginas, kiuj prezentiĝas post la kliko al la sekva adreso: <http://gallery.me.com/cwikbe#100252>; <http://gallery.me.com/cwikbe#10023> kaj <http://barelo.blogspot.com/> – Tie sub la rubriko „Fotoj“ maldekstre de la komputila ekrano estas lokitaj eĉ kvin blokoj da fotoj (de Joanna Filipowicz, Mikaelo Bronŝtejn, Paŭlo Branko, Michael Cwik kaj ankaŭ de la ruslingva retejo en Visaginas). Poste tie aperos ankaŭ pliaj fotoj. En „Barelo“ estas trovebla ankaŭ ĝeneraliga artikolo pri BET-46.

Vytautas Šilas
redaktoro de *Litova Stelo*, 2010, №4.



BET-49 (2013): Interesaj kaj agrablaj tagoj en Utena

La 49-a BET estis mia kvara BET en la moderna (postsovetia) epoko. Laŭ ĉiuj aspektoj, kiuj gravas al mi, la 49-a BET, okazinta de la 6-a ĝis la 14-a de julio 2013 en Utena, estis la plej bona. Ĉu ideala? Probable jes!

La urbo Utena situas en la nord-orienta parto de Litovio. Sed, havante iom pli ol 750 jarojn, ĝi havas nur kelkajn malnovajn konstruaĵojn el la 19-a jarcento. Sed la ĉirkaŭa naturo kun river(et)oj kaj multnombraj lagoj allogas ŝatantojn de ekologia turismo. Utena kun ĉ. 30 mil loĝantoj estas tre ĉarma, trankvila, bone prizorgita urbo.

La urbaj gvidantoj (ni konatiĝis kun la urbestro kaj vicurbestro dum BET) sukcesis konservi ĉe transiro al la libermerkata ekonomio la ĉefajn entreprenojn de Utena. La plej gravaj estas la bierproduktejo „Utenos alus“ kien iris du ekskursoj (unu kun gustumado de kvin bierspecoj) kaj la trikotaja fabriko „Utenos trikotažas“, kies firmaan vendejon kun favoraj prezoj multaj vizitis aĉetocelo. Ili kaj aliaj entreprenoj grave kontribuas al la urba buĝeto. Danke al tio Utena havas multajn allogaĵojn, urbajn skulptaĵojn, fontanojn, florbedojn, bonajn

vojojn por aŭtoj kaj vojetojn por piedirantoj kaj biciklantoj, kajojn ktp.

Ĉe la malfermo de BET-49 bonvenige parolis la urbestro de Utena Alvydas Katinas. Sian saluton al la partoprenantoj sendis la prezidanto de Sejmo, la Litovia parlamento, Vydas Gedvilas.

Nia kongresejo estis la kolegio de Utena, kies oportunaj ejoj, provizitaj per komputiloj kaj projekciiloj, perfekte taŭgis por ĉiuj eroj; estis libere uzebla komputila ĉambro kun konstanta ret-aliro, ankaŭ sendrata. La koncerta programo okazis en la granda salono de la muzika lernejo, en la urba kulturcentro kaj sur la subĉiela scenejo ĉe la lago Dauniškis.

Aparte riĉa estis la folkloro programo. Kutime oni organizas unu nacian vesperon, sed dum la 49-a BET estis kvar vesperaj programoj, en kiuj ni konatiĝis kun la lokaj kantoj, muziko kaj dancoj. Gaje



kaj vige pasis koncerto-diskoteko kun la blovensemblo Indrāja.

En sia salutmesaĝo la prezidanto de UEA Probal Dasgupta emfazis, ke la Baltiaj Esperanto-Tagoj estas unu el la gravaj eventoj sur la esperantista kalendaro, kaj deziris al ĝi longan kaj buntan vivon. BET estas kiel malgranda UK, kaj UEA nature donas al ĝi sian aŭspicion. Kaj la programo de la 49-aj Tagoj konfirmis tion. Memorante pri la dumviva lernado, kiu estas nuntempe tre populara en Eŭropa Unio (ankaŭ esperantistoj sukcesas ricevi monon por tiaspecaj projektoj), en BET funkciis divers-tipaj kaj divers-nivelaj kursoj, gvidataj de elstaraj instruantoj: Stano Marček, Svetlana Smetanina kaj Miĥail Lineckij.

Novaĵo de ĉi tiu BET estis du kursoj. La kvarprelega ciklo de tradukisto, eseisto, historiisto Petras Čeliaskas temis pri „Kelkaj faktoj pri la litovaj lingvo kaj kulturo“. La litova lingvo estas la plej arkaika vivanta hindeŭropa lingvo, prezenton de ĝiaj kuriozaĵoj sekvis nemalofte rideksplodoj de la aŭskultantoj.

La ruslanda ĵurnalistoj kaj esploristoj Aleksander Korĵenkov per kvin prelegoj prezentis la ĉefajn etapojn de la historio de Esperanto kaj senvualigis kelkajn historiajn misterojn.

La Somera Universitato proponis por la kleriĝema publiko nekredeble abundan 30-eran sortimenton de prelegoj kaj prezentoj. Oni serĉis respondojn, ekzemple, pri kio

okazas en Skotlando kun Ed Robertson, el kio konsistas niaj manĝaĵoj kun Tōnu Hirsik, konatiĝis kun la vivo, agado kaj verkado de Ludmila Jevsejeva (Margarita Želve) kaj Pulgis Andriušis (Gražina Opulskienė). La eldonejoj Sezonoj kaj Impeto prezentiĝis, sonlibrojn en Esperanto konigis Stano Marček, pri diversaj retaj projektoj, interalie sociaj retoj, parolis Dima Ševĉenko. Anna Striganova ekspoziciigis propramane faritajn pupojn kaj parolis pri „Fabelaj mondoj“.

Pri la plej juna ĉefurbo Astana rakontis kaj bildojn montris la subskribinto de ĉi tiu artikolo. Mikaelo Bronŝtejn kontribuis al la programo prelege kaj koncerte.

Cetere, la oferto de la esperantista arta programo estis varia kaj riĉa. Koncertis Asorti, Solotronik, Mikaelo Bronŝtejn, Nataŝa Bertse kaj Miĥail Povorin. Emanuele Rovere (Manŭel) kantis ankaŭ por la urbanoj en la subĉiela koncertejo ĉe la lago Dauniŝkis. Sume dek du koncertoj esperantistaj kaj folkloraj en la ĝenerala (ne arta festivalo) esperantista kongreseto estas malofaĵo, eble eĉ unikaĵo.

Kelkfoje dum BET eblis spekti admirindajn unuhorajn prezentadojn de lum-muzika fontano, vera allogaĵo por turistoj kaj lokanoj.

Ĉiutage aperis *Heroldo de Utena*, la riĉe ilustrita gazeto de BET-49, prizorgita de Vytautas Šilas. Cetere, partoprenis pluraj esperantistaj ĵurnalistoj, inkluzive de la prezidanto de TEĴA Audrys Antanaitis, kiu gvidis neformalan TEĴA-kunvenon en la



En unu el la 30 programeroj de la Somera Universitato



La folkloro ensemblo



apudkongresa kafejo Žarija, kie dum la BET-a semajno oni ĉiam povis aŭdi esperantistojn, kiuj babilis Zamenhof-lingve kaj krokodile.

Ankaŭ per la nepra ekskursita tago, merkredo, BET similas al UK-oj. Ankaŭ ĉi-foje Antanas Vysockas modele planis kaj efektivigis la tuttagan ekskurson en la lagregiono de la orienta Aŭkštajtio. Unue la ekskursantoj venis al la muzeo de ceramiko en Leliūnai, kie nin bonvenigis la „reĝo de potistoj“ Vytautas Valiušis, fondinta la klerigan centron kun muzeo en 2001. Ĉirkaŭ 700 eroj troviĝas en la muzeo, ne nur ceramikaj potoj, teleroj, tasoj, kruĉoj kaj fajfiloj, sed ankaŭ ĉiutagaj objektoj de kamparanoj, por variigi la ekspozicion. La mastro evoluigas la ceramikan arton, organizante renkontiĝojn por kolegoj, instruante al junuloj kaj infanoj. Ĉio ĉi estas ebla en la iama duetaĝa lernejo kun korto.

En la ekskursita itinero troviĝis la biendomo de la familio Tyzenhaus, interesa ekspozicio de la popola ligna skulptisto Lionginas Šepka, kies naŭva arto kaj malfacila vivo neniun lasis indiferenta. En Rokiškis estis vizitita la novgotika preĝejo de Sankta Mateo. Ni ĉirkaŭiris la plej aĝan kaj dikan en Litovio kverkon, kies aĝon oni taksas ĉ. 1500 jaroj.

En Zarasai esperantistoj uzis kuriozan promenradon por atingi la lagobordon kaj ĉirkaŭrigardi. La akvomuelejo Šlyninka aĝas 300 jarojn kaj enloĝas ĝin petolemaj diabloj, historiojn pri ili konigis la muelisto, kiu

montris la procedon de muelado kaj baptis nin per faruno. Poste venis vico por gustumi la muelejan specialaĵon – sekalajn flanojn, bakitajn laŭ malnovaj receptoj. Bone gustis ankaŭ pano kaj kvaso. Laste estis promeno per ŝipoj sur la lago Alaušas, kun fiŝsupo sur eta insulo (al- kaj debordiĝo okazis gaje). Nepre menciindas bonega interpretado dum la tuta ekskurso kiun faris Gražina Opulskienė.

Ĉe la urbestra akcepto pro ekferiado de la urbestro, sesdekda esperantistoj en la kafejo Abubonvenigis la vicurbestro Vidmantas Valinčius. En neformalaj paroloj li rakontis pri la laboro de la urbestro, kiu malavare subtenis la organizadon de BET-49, pri la projekto lagregiono (kune kun Latvio kaj Bjelorusio) subtenita de Eŭropa Unio, ankaŭ pri sia hobbio – vojaĝoj kaj konatiĝo kun novaj lokoj, ja li estas eksa instruisto pri historio. Ne mankis bongustaj manĝaĵoj, trinkaĵoj, gitaro kaj kantado.

216 efektivaj partoprenantoj el dudeko da landoj travivis interesajn kaj agrablajn tagojn en la urbo Utena, flegante daŭran amikecon, konatiĝante kun la lokaj folkloro kaj historio, perfektigante en Somera Universitato, promenante kaj kantante, ĝuante agrablan veteron, kiu estis nek tro malvarma nek varmaga – ideala por laboro kaj ripozo, eĉ pluvo prokrastiĝis ĝis la ferma tago. Dankon al la organizantoj – Povilas Jegorovas kaj la teamo de helpantoj, dankon al la kursgvidantoj, prelegantoj, artistoj, kaj al la partoprenantoj!

Halina Gorecka

La Ondo de Esperanto, 2013, №8–9.



BET-52: Pli ol tricent verdstelanoj en la verda urbo

La 52-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj okazis de la 2-a ĝis la 10-a de julio 2016 en la Litovia kuracurbo Birŝtonas, ĉe la rivero Nemano. Pro ĉirkaŭantaj pin-arbaroj eĉ nuraj promenoj kaj profunda spirado estas bonefikaj por la sano.

Ĉi tiu negranda urbo estis invadita de pli ol tricent verdlingvanoj, venintaj el trideko da landoj; kien ajn oni iris, ĉie eblis renkonti esperantistojn – ĉe la longa kajo de Nemano aŭ sur la monteto apud ĝi, en kafejo, bierejo aŭ vendejo, ĉe minaralakva trinkejo kaj en la parko – dum deko da tagoj Esperanto sonis ĉie en la urbo. Tamen esperantistoj ne estis la sola internacia grupo – samtempe en Birŝtonas okazis internacia balonkonkurso, kaj oni ĝue spektis aernavigadon de buntaj balonoj, kaj kelkaj kuraĝuloj eluzis la eblecon leviĝi al la ĉielo kaj ricevi diplomon.

Antaŭ dek du jaroj ĉi tie jam okazis BET-40. Estis interese pasi tra urbaj stratoj kaj trovi konatajn lokojn. Jen la eksa episkopa domo, kie estas organizita gastejo. Jen la placo, ĉe kiu estis populara bierejo – ha, la bierejo ne plu ekzistas. Agrable surprizis nove faritaj vojoj kaj trotuaroj. Plimultiĝis floroj kaj skulptaĵoj. En la parko multas sportaj placetoj. Jen bela banurbo destinita por ĝui la vivon, resaniĝi kaj refortiĝi.



La Tagoj estas nomataj Baltiaj pro la laŭvica okazigo en Estonio, Latvio kaj Litovio. Programe la 52-a BET estis tute internacia, kun forta domino de la kontribuoj el Litovio, Ruslando kaj Pollando. Verŝajne esperantistoj el Latvio kaj Estonio ŝparis siajn fortojn por siaj propraj BET-oj en 2017 kaj 2018.

Oni foje komparas BET kun Universala Kongreso, ĉar la Litoviaj BET-oj kultivas la tradiciajn UK-erojn, kiel Somera Universitato, diversnivelaĵoj de Esperanto, ekskursoj, artaj aranĝoj k.s. Sed kontraste al UK-oj, kie okazas pagataj lingvokursoj, la tuta diversnivela instruado dum BET estas tute senkosta por la partoprenantoj. Ĉiutage spertaj instruantoj realigis por ĉiu nivelo po du sesiojn daŭrantaj sume tri horojn. Stano Marček (Slovakio), Aida Čižikaitė (Litovio), Nina Pietuchowska (Pollando), Mikaelo Lineckij (Ukrainio) kaj tri ruslandanoj (Irina Gončarova, Svetlana Smetanina kaj Abdurahman Junusov) gvidis diversagaĵojn





al lingva perfektigo, sub la kunordigado de Gražina Opulskienė.

Per la prelegaro de profesoro Aloyzas Gudavičius sciemuloj konatiĝis kun la litovaj lingvo, kulturo kaj historio. Sian kurson „Esperanto en interkultura komunikado“ prezentis profesorino Ilona Koutny el la Poznana Universitato Adam Mickiewicz (Pollando). Profesoro Walter Ŝelazny el la Bjalistoka Universitato faris ciklon pri bazaj elementoj de judaismo, kiu estas grava por kompreni la iniciatoron de Esperanto.

La klerigan programon kompletigis pluraj apartaj prelegoj pri variaj temoj, iuj rilatis al la fenomeno Esperanto, aliaj al ĝeneralaj temoj, kiel kosmo kaj astronomio, kulturo de Pakistano kaj Nepalo, rilatoj inter homo kaj besto, defendaj konstruaĵoj de la 19-a jarcento, fabeloj kaj historiaj eventoj ktp. Oni ne nur multe instruis, sed ankaŭ raportis pri modernaj eblecoj lerni ĉe Duolingo, distancaj kaj retaj kursoj, pri loko de Esperanto en



societa epoko. Sed Esperanto utilas ne nur al esperantistoj. Tion trafe pruvis Maria Pokrzywnicka, konigante sperton de la Etnografia muzeo en Toruń (Pollando).

Esperanto restas tradici-libra fenomeno, kvankam elektronikaj libroj jam penetris ĝian merkaton, pri kio rakontis Dmitrij Ŝevĉenko. Apartajn prezentojn havis la eldonejo Impeto, la krimromano *La aventuroj de Ŝerloko Holms*, *Historio de la Esperanta Literaturo*. Funkciis riĉa libroservo de LitEA.

Preskaŭ ĉiu esperantista renkontiĝo povas envii la riĉecon de la realigita kultura programo. Jerzy Dobrzyński, profesoro de la Varsovia Muzika Universitato, multe aplaŭdata de danka publiko, pianludis verkojn de Fryderyk Chopin. Bone kongruis al la humoro ankaŭ la famega polonezo *Adiaŭo al patrujo* de Ogiński, ege ŝatata en Ruslando, virtuoze plenumita de la majstro.

Pliparto de la arta programo okazis en la malnova distrejo Kurhaus, tipa por





kuracurboj, kie same bone eblas okazigi koncerton aŭ balon. En la urba kulturcentro koncertis por la BET-anoj lokaj folkloraj ensembloj Lendrūnas kaj Raskila. La altnivela plenumo de kantoj, muziko kaj dancoj, interesaj instrumentoj kaj belaj naciaj kostumoj ravis la internacian publikon.

Koncertis ankaŭ JoMo, Sepa kaj Asorti, Ĵomart kaj Nataŝa kaj kelkaj „gitarkantistoj“. Duaktora Teatro Verda Banano kun Saŝa Pilipović kaj Georgo Handzlik prezentis modernan historion *La kredito*.

Same kiel en UK, ankaŭ en BET estas ekskursita tago, kiam neniu alia programero okazas. La tuttaga ekskurso ebligis ekkoni la plej belajn bienpalacojn de la etnografia regiono Sūduva.

Krome duontaga ekskurso ŝipe veturigis la partoprenantojn al Kaŭno, kaj pieda ekskurso konigis interesaĵojn de Birŝtonas. Grupo da frandemuloj vizitis produktejon de medo „Lietuviŝkas Midus“ en Stakliškės



kaj gustumis ĉi tiun tradician litovan drinkaĵon. La modela organizado de Antanas Visockas havis unusolan mankon – li ne sukcesis antaŭmendi pli trafan veteron. Post la unuaj (tro)varmegaj tagoj venis pluveta kaj malvarmeta vetero, eble tipa por loko, kiun ĉirkaŭiras granda rivero kaj arbaroj, vastiĝantaj ĉiudirekten.

Ne ĉiu UK havas tiom altan „Altan Protektanton“ kiel la 52-a BET – la ĉefministro de Litovia Respubliko Algirdas Butkevičius en sia salutmesaĝo akcentis i.a., ke la ideo de Zamenhof „restas aktuala ankaŭ en la nuntempa vivo“.

Ankaŭ atento de oficialuloj de la urbo estas grava atesto pri serioza rialto al niaj lingvo kaj komunumo. En la solena malfermo parolis la urbeŝtrino Nijolė Dirginčienė, kiu bondeziris, ke oni „enhavoriĉe pasigu la tempon, uzu sanigajn servojn kaj distraĵojn da aktiva ripozo“. En la urbestra akcepto la rolon de mastro plenumis la vicurbestro.



La ĉiutaga plenkolora gazeto *Balenido*, redaktata de Stano Marček (entute aperis ok kajeroj kvarpaĝaj), informis pri la taga programo, donis detalajn informojn pri personoj kaj aranĝoj, aperigis fotojn kaj raport(et)ojn. La partoprenantoj laŭdis senprecedencan informan agadon por BET en la novaĵretejo *La Balta Ondo*, kie regule aperis abunda materialo.

Por la unua fojo en la moderna historio de BET okazis granda kvizo, kiun lerte gvidis la nesuperebla kvizmajstro Marian Zdankowski el Pollando. Partoprenis deko da konkursemuloj el diversaj landoj, kiuj dum unu horo devis solvi 16 kvizojn po 10 demandoj en ĉiu, do entute ili devis trovi respondojn por 160 demandoj! La plej sukcesa kvizano Wolfgang Loose el Germanio solvis duonon da taskoj. La plej sukcesaj kvizanoj ricevis diplomojn, librojn kaj (por la unua fojo en BET!) monpremiojn. La publiko aktive partoprenis la kvizon kaj la plej aktiva spektanto Svetlana Smetanina (Ruslando) – ankaŭ ricevis monpremion; aliaj aktivaj geesperantistoj dum kvizo ricevis diplomojn kaj librojn.

Ekster la oficiala programo okazis celebrado de la 25-jariĝo de *La Ondo de Esperanto*. En hejmeca etoso de la kafejo Banginuko vaiŝes la eldonanto, redaktoro, perantoj kaj redakcianoj rememoris la kvaronarcentan vojon de ĉi tiu internacia magazino. Estis farita grava anonco – *La Ondo* ekde 2017 aperos nur elektronike.

Esperantistoj partoprenis en la litova ŝtata festo – Tago de la Ŝtato, de kelkaj jaroj festata la 6-an de julio je la 21-a horo, samtempe en diversaj lokoj de la mondo, kie litovoj loĝas. En la parko de Vytautas kolektiĝis urbanoj kaj gastoj de Birŝtonas, por kune kanti la litovan himnon. Estis aranĝita partopreno de

esperantistoj kaj internacia grupo kantis la Nacian Glorkanton en Esperanto.

Ĉu ĉio estis tiom perfekta, kiom mi priskribas? Vere, la organiza teamo laboris modele kaj faris sian plejblon, ke la partoprenantoj ĝuu la aranĝon – interesa programo por ĉiuj gustoj estis garantiita. La sola problemo estis tio, ke la kunvenejoj kaj tranoktejoj situis en kelkaj disaj konstruaĵoj. Esperanto-kursoj funkciis en la urba gimnazio, kiu, cetere, ebligis senpagan uzadon de sia komputila klaso kun la reto. Prelegoj okazis en diversaj konstruaĵoj, bonŝance la programo antaŭvidis 15-minutajn paŭzojn, dum kiuj eblis iri de unu loko al la alia. Parto da BET-anoj loĝis sur la transa bordo de Nemano kaj devis uzi pramon, kiun luis kaj pagis la organizantoj.

En la lastaj jaroj oni notas la malkreskon de intereso al la Universalaj Kongresoj, kies partoprenantaro ŝrumpas. La Litoviaj BET-oj estas amasaj kaj, kiel montris la 52-a, en ili amase partoprenas nealbanoj. BET-52 estis iusence rekorda – post la malapero de Sovetunio neniam tiel multaj personoj aliĝis al BET (334) kaj partoprenis (322, inter ili pluraj nealiĝintaj litovianoj) en ĝi. Oni ŝerce demandas: ĉu UK malkreskos ĝis la nivelo de BET, aŭ BET daŭre kreskos al la nivelo de UK?

Halina Gorecka

Pliaj informoj pri BET-52 kaj pri BET-oj ĝenerale estas legeblaj en la retejoj
<http://sezonoj.ru/2016/06/bet-52/> kaj
<http://sezonoj.ru/tag/baltiaj-esperanto-tagoj/>



BET-55: “Malgranda UK” en Litovio

Grandaj kaj internaciaj 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj

La 6-an ĝis la 14-an de Julio 2019 en Litovion venis multaj esperantistoj por partopreni la 55-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn en la urbo Panevėžys. Al la aranĝo aliĝis 450 partoprenantoj, reale venis pli ol 400. BET estis vere internacia – estis reprezentitaj 33 landoj. Antaŭe tiom alta kvanto da partoprenantoj estis en la jaro 1992. La plej multaj partoprenantoj venis el Litovio, Pollando, Koreio, Latvio, Rusio, Francio kaj Germanio.



La programo de BET laŭ sia strukturo kaj varieco similas al tiu de UK: prelegoj, seminarioj, rondaj tabloj, prezentadoj, aŭtoraj horoj, akceptoj, koncertoj, ekskursoj kaj multo alia. Nepre menciindas altnivele organizitaj Esperanto-kursoj: ĉiunivelaj, gvidataj de tre spertaj profesiaj instruistoj.

La partoprenantoj tre laŭdis la ekskursojn, kiuj okazis dum la ekskursita tago.



Ankaŭ la neekskursantoj ne enuis. Matene ili povis partopreni Meson en Esperanto en la Katedralo, tage BET-anojn akceptis la loka Esperanto-klubo “REVO”, kiu preparis riĉan kulturen kaj distran programon: prezenton de dresitaj hundoj, nacia koncerto, konkursojn, gustumadon de lokaj manĝoj, ludojn kaj multon alian, inkluzive solenan plantadon de arbo, omaĝe al la 55-aj BET.



Tradicie la koncerta programo estis tre varia. Koncertis Sepa kaj Asorti, Kaŝi, Amira Chun, Jogaile Ĉojute, Nataŝa Bertse, Mikaelo Bronŝtejn, Sergej Straŝnenko, Zuzana Kornicka, Françoise Noireau kaj aliaj.

Tute kutime por BET-oj la programo ne limiĝis per la taga programo: la neformala parto daŭris malfruvespere kaj nokte: kun amikaj konversacioj, komuna kantado, promenadoj, neformalaj noktaj koncertoj ktp.

Tiu ĉi BET estis subtenata de la lokaj aŭtoritatoj. Siajn salutmesaĝojn sendis multaj litovaj gravuloj, inter ili interalie Vytenis Povilas Andriukaitis, Membro de la Eŭropa Komisiono kaj prof. Viktoras Pranckietis, la Prezidanto de la Litova Sejmo. La solenan inaŭguron ĉeestis la urbestro de Panevėžys s-ro Rytis Račkauskas,



kiu invitis ĉiujn partoprenantojn de BET al la urba akcepto, kiu okazis tuj post la inaŭguro en la urba kultura centro.

Same kiel dum UK, dum BET aperis ĉiutaga gazeto pri la aranĝo. Ĉi-foje oni decidis elekti por ĝi la nomon *Abelo*. Ĝin profesie preparis la sperta Esperanto-ĵurnalistino Stano Marček. Por BET estis eldonita pli ol 150-paĝa “kongresa libro” – *Libro por BET-*



ano, kiu enhavas detalan priskribon de la 55-a BET kaj ankaŭ enhavas historiajn artikolojn pri la antaŭaj BET-oj.

Post BET okazis ekskurso tra la baltiaj landoj, kombinita kun vojaĝo al la Universala Kongreso en Lahtio. Dum 7 tagoj la ekskursantoj vojaĝis tra Litovio, Latvio kaj Estonio. Tiu ekskurso iĝis “postkongreso” de BET kaj antaŭkongreso de UK.

Sendube la ĉi-jaraj Baltiaj Esperanto-Tagoj portis ege gravan kontribuon al la Esperanto-Movado kaj Esperanto-kulturo kaj lasis signifan spuron en la historio de nia lingvo.

Dima Ŝevĉenko

Fonto: *Esperanto*, 2019, №10.



BET-56 en Klaipėda, Litovio

La 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56) okazis en la urbo Klaipėda, Litovio, de la 9-a ĝis la 17-a de Julio 2022.

En la jaro 1959 Biruta Rozenfelde invitis esperantistojn el la baltiaj landoj Estonio, Litovio kaj Latvio al Baltia Esperanto-Tendaro por renkontiĝi, ĉar landaj asocioj dum tiu tempo en Sovetunio ne estis permesitaj. Ŝi ankaŭ partoprenis la 56-an BET-on.

Kvarfoje oni malpermesis BET-on. Poste ĝi iĝis tut-sovetia kunveno de SEJM (sovetia Esperanta junulara movado) ĝis la disfalo de Sovetunio.

Ni alvojaĝis triope per giganta pramŝipo, rekte de Kiel ĝis Klaipėda; envojaĝante en la grandan havenon, du modernaj altaj konstruaĵoj okulfrapis nin, kiuj dum la preterveturado kungelis.

Klaipėda havas ĉ. 200, Kaŭno 400 kaj la ĉefurbo Vilnius 600 mil da enloĝantoj. 250 homoj aliĝis al BET-56: el 19 landoj inter Koreio, Pakistano, Serbio, pluraj EU-landoj, Islando kaj Usono; bedaŭrinde preskaŭ 20 el Rusio kaj Belorusio ne povis veni; eĉ ne el la proksima urbo kaj rusia provinco Kaliningrado (germane Königsberg).

La kongreso estis dediĉita al la 770-jariĝo de Klaipėda (germane Memel), kaj 135-jariĝo de Esperanto.



La kongresa libro sur 146 paĝoj montras, krom la organizajn informojn, multajn historiajn kaj geografiajn raportojn pri Litovio kaj pri unuopaj BET-oj, la litovan lingvon, 13 litovajn Esperanto-poetojn; vidindaĵojn de la urbo kaj informojn pri la prelegoj.

La solena malfermo okazis en la koncerta salono de la urbo.

Pli ol 16 prelegoj (parte seriaj), 5 SUS-prelegoj de AIS (Somera Universitato – organizite de Amri Wandel) kaj pli ol 10 kulturaj aranĝoj okazis en diversaj konstruaĵoj de la Universitato de Klaipėda. Tute proksime ni hazarde vidis kaj vizitis grandan tombejon por germanaj soldatoj el la du mondmilitoj, flegata de germana asocio por soldato-tombejoj.

Instruistoj por Esperanto-kursoj:

Aida Čižikaitė, Nina Petuchovska, Abdurahman Junusov, Mikaelo Linekij, Gražina Opulskienė, Dalia Pileckienė (paroliga kurso).

Kleriga kaj eduka programo:

Ulrich Brandenburg: 99-a Germana-Nederlanda Esperanto-Kongreso pri daŭripovo; Nina Danylyuk: Historiaj kaj kulturaj rilatoj inter Litovio kaj Ukrainio; Aida Čižikaitė: Litovaj lingvo kaj kulturo; Degiminas Degėsys: Nigra Afriko – kulturo kaj filozofio; Stefan McGill: Aktivula Maturigo, AMO-Seminario pri Baltio; Jozef Reinart: Ŝanco por nia movado – neesperantista kompanio VERTERA Organic; Nijolė Žambaitė: Mitoj pri diplomatio kaj diplomatoj; István Ertl: ateliero pri tradukado.



SUS-Prelegoj:

Amri Wandel: la nova James Webb kaj aliaj spac-teleskopoj; Carlo Nicola Colacino: Gravitaj ondoj; Duncan Charters, prezidento de UEA: Ciklo pri komunikado; Alfred Heiligenbrunner: Imunologio; Manfred Westermayer: Marĉoj – por stoki CO2 kaj subteni biodiversecon; Bruĉjo Kasini: „30 Oraj Horoj“ – instruado en italaj superaj lernejoj; Ilona Koutny: 5 prelegoj pri Esperantologio;

Ryszard Rokicki: morfologio de Esperanto – alternativa vortformado;

Kultura Programo:

Sepa kaj Asorti: skuis la koncert-salonon, instigis al (preskaŭ) tut-salona polonezo; Anjo Amika: kantis preĝejajn kantojn; Tuomo Grundström: finnaj-estonaj verkistinoj Hella-Maria Wuolijoki kaj Aino Julia Maria Kallas; Suzana (Kornicka): kantoj el diversaj landoj; Saša Pilipović el Serbio: aktoris kaj kantis; Margarita Želve: kvar granddamoj de latvia Esperanto-poezio; Mikaelo Lineckij kune kun Mikaelo Bronštejn (virtuale): rakontoj kaj kantoj el SEJM-a epoko; Mikaelo Bronštejn (virtuale): prezento de judaj bardoj, viktimoj de nazia teroro, Mordeĥaj Gebirtig kaj Iĉhok Kacenelson; kaj lia nova libro pri Simeono (Podkaminer), soveta Esperanto-aktivulo.

Necesas aldoni, ke la LKK-anoj ege bone preparis ĉion; la libroservo estis alirebla dum ĉiuj tagoj. La matenmanĝo kaj tagmanĝo en la universitato estis provizitaj de studenta teamo – ĉiufoje bona en vegetara (kun fiŝoj) kaj vianda versioj; matene kutime estis kaĉo kun aldonajo.

Indus prezenti la nomojn de la LKK-anoj, el tiuj 27 mi nur citas Povilas Jegorovas (prezidanto de LEA) kaj Aleksander Korjenkov (La Ondo, Kaliningrado), kiu subtenis informadon kaj kompostis la kongreslibron, Asta Nastaravičiūtė (sekretariino de LEA), Irena Jagminaitė (konstanta libroservo) kaj Taesok Choe (redaktis la Lumturon, ĵurnalon de BET-56);

Bedaŭrinde la kunvenoj komenciĝis nur je la 11-a antaŭtagmeze, tial necesis tro ofte decidi inter la paralelaj.

Serio da prelegoj estis pri la litova lingvo, kulturo kaj historio. Kelkaj vortoj de la litova similas per du komunaj konsonantoj, parte per vokalo, al germanaj vortoj, aparte se oni pripensas moligon: ekzemple: rukti = rauchen. La litova alfabeto konsistas el 32 literoj, prononco parte similas al Esperanto: ĉ = ĉ; ĵ = ĵ; ch = ĥ; interesa estas la distingo inter du diversaj „e“: malferma kiel en Esperanto „e“ kaj ferma „ė“ kiel „Emil“ en la germana.

Litova etno en tiu regiono ekloĝis jam 3000 jarojn a.K. La unuafoja dokumento pri litova ŝtato estis en 1009 en la Jarlibroj de Quedlinburg, kaj poste en 1253, kiam la Papo kronigis reĝon Mindaugas. Ek de tiu tempo Litovio estis ligita kun germanoj (i. a. Germana Ordeno), poloj (komuna regado) kaj rusoj (1795 – 1918, kaj 1944 – 1990); sed ĉiam restis la etna popolo de litovoj, kiuj sukcesis konservi sian lingvon kaj parte ankaŭ natur-religian kulturon, simile al la etnoj en Latvio kaj Estonio. Ili lernis el sia historio, ke necesas komunuma spirito por la patrio, ĉar la grandaj najbaroj ĉiam pretus regi super ili. La ĉeno de kantantaj homoj je 600 km trans tiuj 3 ŝtatoj „La Baltia Vojo“ en Aŭgusto 1989 estis la videbla komenco de nuna sendependeco de la 3 baltiaj



ŝtatoj. Litovio la 11-an de Marto 1990 kiel unua soveta lando deklaris sian sendependiĝon.

Du ekskursoj okazis duontage – piede konatiĝi kun la urbo Klaipėda, kaj Japana Ĝardeno.

La centro de la urbo kuŝas sude de rivereto Danė, je la alia flanko estas parko, kiu laŭlonge de la vojo montras la ĉefajn datojn de Litovio laŭlonge de pluraj reloj – tre interesa ideo montri la historion. La vojoj en la malnova urbocentro estas originale pavimitaj, domoj plejparte originale restaŭritaj.

Meze de la Teatra Placo staras monumento de „Ännchen von Tharau“, ĉar Simon Dach, la verkisto de tiu poemo, naskiĝis en Memel – interesa por germanaj vizitantoj. La Historia Muzeo pri la urba kulturo kaj historio montras plurajn originalajn mapojn, meblojn, folklorajn vestaĵojn, ktp. La klarigoj estas en la litova, angla kaj germana.

En la proksima regiono Ŝilutė troviĝas kelkaj protestantaj preĝejoj, sed Litovio plejparte estas katolika. Tio estas sekvo de la subteno de la pola reĝo je la bataloj (ĝis 1410 – Tannenberg

/ Grundwald) kontraŭ la Germana Ordeno. En Litovio ankaŭ ekzistas oficiala nov-pagana religio Romuva. Pri ili mi vidis sanktejon kun paganaj simboloj en la regiono de Kaŭno.

Du ekskursoj okazis tuttage: Mi partoprenis tuttagan ekskurson en la regiono Ŝilutė, en tiel nomata Malgranda Litovio – kiu estis la plej nordorienta parto de Germanio ĝis 1919 – laŭlonge de la laguno ĝis Memel, inkluzive de la delto de Nemunas. Tiu estas granda naturprotektata regiono,

bone ekipita per lignaj padoj super la marĉoj por eko-turismo. Ni vizitis la kabon Windenburg (nun Ventė) – vere ventumita loko, je fino de malgranda duoninsulo, kie staras lumturo, kaj tie vizitis instituton por protekti migrantajn birdojn, ĉar tie estas bona loko kapti ilin, mezuri kaj ringumi ilin – kaj poste ili rajtas daŭrigi. La unua birdo-stacio ek de 1901 troviĝas en Rossitten (nun Rybaĉij aŭ Rasytė, Kaliningrada regiono), je bordo de Balta Maro. Poste ni veturis per boato sur la delto de Nemunas, por vidi tiun specialan naturon, ĝis la malferma laguno, kie relative altaj ondoj iom movigis la boaton, kaj alboardis en Ruĝ (nun Rusnė), kie komenciĝas la delto – kaj la limo al Rusio.

Mirinde, je la river-bordo ĉe limo al Rusio, ni trovis monumenton por Mahatma Gandhi kaj Hermann Kallenbach, kiu naskiĝis en tiu regiono, kaj subtenis Gandhi 1910 en Sudafriko.

Post BET ni vizitis Kaŭnon, dum 2022 unu el la tri kulturaj ĉefurboj de Eŭropo. Indas viziti ĉiam – ekzemple la muzeon pri la litova komponisto kaj pentristo Ĉiurlionis; pri liaj pentraĵoj ekzistas poemoj de Salomėja Nėris – kiujn ni ricevis kun ilia traduko al Esperanto en la libroservo de BET. Danke al Asta ni povis viziti la historian muzeon en la IX-a Fortikaĵo. Aparte interesis nin la detala ekspozicio pri la nazia tempo. Ni ankaŭ vidis la domon de familio Zilbernik en la Zamenhof Gatvė 5, kiu bezonus riparon – sed ne klaras, kiu respondecas.

(Aŭtoro: Manfred Westermayer,
El *Esperanto aktuell* 5/2022)



Programo de BET-59

La 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-59) okazos de la 5-a ĝis la 13-a de Julio 2025 en la universitato Vytautas la Granda (Kaŭno, Litovio) sub la aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio. La suba programo estas provizora, la neta programo por ĉiu tago aperos en la BET-a gazeto "Kunfluo".



La 4-an de Julio (vendredo)

10.00–21.00 Registrado de partoprenantoj, loĝigo, informoj (en la ĉefa universitata konstruaĵo, str. S. Daukanto 28).

La 5-an de Julio (sabato)

9.00–22.00 Registrado de partoprenantoj, loĝigo, informoj (samloke kiel vendrede!).

13.00–14.00 Tagmanĝo (memstare).

18.00–19.00 Vespermanĝo (memstare).

19.30–20.00 Komuna organiza kunveno de BET-anoj (en la Senata salono de la ĉefa konstruaĵo de la universitato, str. Daukanto 28).

20.00–21.00 Violona koncerto de Sigita Railaitė-Sičiūnienė (en la Senata salono).

La 6-an de Julio (dimanĉo)

9.00–10.30 Matenmanĝo (memstare).

10.30–11.00 Organizaj kunvenoj de gvidantoj kaj vizitantoj de ĉiunivelaj Esperato-kursoj, de gvidantoj kaj prelegantoj de la Somera universitato, de gvidantoj kaj prelegantoj de SUS de AIS, de gvidantoj kaj vizitantoj de aliaj konstantaj programeroj (en la Senata salono).

11.00–12.00 Malfermo de la Somera universitato. La unua prelego "Multaj lingvoj, unu homaro?" el la prelegserio de prof. Mark Fettes "Lingvo kaj mondo. Kelkaj meditoj el esperantista angulo" (en la Senata salono).

11.00–12.00 Inaŭguro de la SUS de AIS. La unua prelego de prof. Amri Wandel "Pri astrofiziko".

11.00–13.00 La unuaj lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj.

12.00–13.00 Prelego el ciklo pri esperantologio de prof. Ilona Koutny. La unua prelego "Esperanta kulturo – ĉu propra, ĉu transprenita, ĉu internacia?".

12.00–13.00 Prelego el la ciklo de Aida Čižikaitė pri Litovio, ties kulturo, lingvo. La unua prelego "Jara rado – popolaj festoj kaj tradicioj".

13.00–14.30 Tagmanĝo (memstare)

15.00–16.00 **Solena inaŭguro de BET-59** (en la Granda salono de la ĉefa konstruaĵo de la universitato, str. Daukanto 28).

16.30–17.30 Inaŭgura koncerto de la koruso "Gintaras" (en la Granda salono).

18.00–19.00 Eventuala akcepto por partoprenantoj de BET-59 (apud la Granda salono).

19.30–20.30 Vespermanĝo (memstare).

21.00–21.30 Komuna kantado de Litovia nacia kaj ŝtata himno okaze de ŝtata festo (ĉiuloke).

La 7-an de Julio (lundo)

9.00–10.30 Matenmanĝo (memstare).

11.00–12.00 Prelego de prof. Mark Fettes “Lingva demokratio, en nedemokratia modo” (en la Senata salono).

11.00–12.00 Prelego de prof. Ilona Koutny “Interkultura komunikado per Esperanto”.

11.00–13.00 Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj.

12.00–13.00 Prelego de Aida Čižikaitė “Koncize pri la litova lingvo”.

12.00–13.00 Baza kurso de la litova lingvo. Gvidas Severija Marija Banaitytė.

12.00–13.00 Giorgio Silfer prezentas proprajn originalajn kamiŝibajojn laŭ japana tradicio (en la Teatra salono, str. Daukanto 27).

13.00–14.30 Komuna organizita tagmanĝo.

15.00–16.00 Daŭrigo de SUS de AIS. Prelego de prof. Karlo Spinola “Fascinitaj de la steloj: Ekde Sumero ĝis James Webb serĉantaj nian lokon en la kosmo”.

15.00–16.00 Prelego de d-ro Nijolė Žambaitė “Mitoj pri diplomatio kaj diplomatoj”.

16.30–17.30 Prelego de prof. Giorgio Silfer “Perspektivoj de la nuna Esperanto”.

16.30–17.30 Prelego de Eŭheno Kovtonjuk “La vivo kaj verkado de blinda ukraina esperantisto Vasyl Eroŝenko”.

16.30–17.30 “Ŝaknovelo” de Stefan Zweig. Ludas Arno Lagrange (en la Teatra salono, str. Daukanto 27).

17.30–19.00 Vespermanĝo (memstare).

19.00–21.00 Koncerto de Ĵomart kaj Nataŝa. >>>



La 8-an de Julio (mardo)

9.00–10.30 Mastenmanĝo (memstare).

11.00–12.00 Prelego de prof. Mark Fettes “Lingvo kaj Tero” (en la Senata salono).

11.00–12.00 Prelego de prof. Ilona Koutny “Pri kio ni parolas kaj kiel?

Ĝentileco internacie tra Esperanto”.

11.00–13.00 Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj.

12.00–13.00 Prelego de Aida Čižikaitė “Zamenhof kaj Litovio”.

12.00–13.00 Baza kurso de la litova lingvo. Gvidas Severija Marija Banaitytė.

13.00–14.30 Komuna organizita tagmanĝo.

15.00–16.00 Prelego de Tim Owen “Simboloj de Esperantujo”.

15.00–16.00 Prelego de Istvan Ertl “Spertoj de tradukisto – Kiel mi fariĝis maŝino”.

16.30–17.30 Prelego de d-ro Gediminas Degėsys “Nigra Afriko”.

16.30–17.30 Prelego de Sakari Kauppinen

“Tove Jansson – la patrino de Mumintroj”.

16.30–17.30 Koncerto de Marina Moritz.

17.30–19.00 Vespermanĝo (memstare).

19.00–21.00 Koncerto de JoMo. >>>



La 9-an de Julio (merkredo)

9.00–10.30 Matenmanĝo (memstare).

9.00–18.00 Tuttagaj ekskursoj.

13.00–14.30 Tagmanĝo (dum ekskursoj aŭ en la urbo por restintoj en la BETejo).

17.30–19.00 Vespermanĝo (memstare).
 19.00–20.00 Koncerto de Lucio Avitabile.
 20.00–21.00 Koncerto de SuMi.

La 10-an de Julio (ĵaŭdo)

9.00–10.30 Matenmanĝo (memstare).
 11.00–12.00 Prelego de prof. Mark Fettes “La konsoloj de lingvo-amanto” (en la Senata salono).
 11.00–12.00 Prelego de prof. Ilona Koutny “Kolora lingva bildo de la mondo”.
 11.00–12.00 Prelego de Arno Lagrange “Stefan Zweig –Eŭropa verkisto”.
 11.00–13.00 Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj.
 12.00–13.00 Prelego de Aida Čižikaitė “Litovio dum jarcentoj”.
 12.00–13.00 Baza kurso de la litova lingvo. Gvidas Severija Marija Banaitytė.
 13.00–14.30 Komuna organizita tagmanĝo.
 15.00–16.00 Prelego de prof. Laura Brazzabeni “Instruado de Esperanto en sinkronaj kaj nesinkronaj kursoj”.
 15.00–16.00 Prelego de Ulrich Matthias “Esperanto kaj anima frateco”.
 16.30–17.30 Prelego de prof. Perla Martinelli “Lastaj eldonaĵoj de la kooperativo Literatura foiro”.
 16.30–17.30 Prelego de Ed Robertson “Neresponditaj demandoj”.
 16.30–17.30 Spektaklo de Mario Migliucci “Doktoro Esperanto” (en la Teatra salono, str. Daukanto 27).
 17.30–19.00 Vespermanĝo (memstare).
 19.00–21.00 Koncerto de Kĵara. >>>



La 11-an de Julio (vendredo)

9.00–10.30 Matenmanĝo (memstare).
 11.00–12.00 Invito al interlingvistiko. Gvidas prof. Mark Fettes (en la Senata salono).
 11.00–12.00 Prelego de prof. Ilona Koutny “Universitata instruado de esperantologio: spertoj kaj perspektivoj”.
 11.00–13.00 Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj.
 12.00–13.00 Prelego de Aida Čižikaitė “Famaj nomoj de la litova kulturo”.
 12.00–13.00 Baza kurso de la litova lingvo. Gvidas Severija Marija Banaitytė.
 13.00–14.30 Komuna organizita tagmanĝo.
 15.00–16.00 Prelego de prof. Laura Brazzabeni “Disvastigo de Esperanto pere de radio”.
 15.00–16.00 Prelego de Ulrich Matthias “Esperanto en Afriko”.
 16.30–17.30 Prelego de Ite Tytgat “Vitaminoj – esencaj eroj en nia nutrado”.
 16.30–17.30 Prelego de Manfred Westermayer “Marĉoj”.
 16.30–17.30 Spektaklo de Birutė Prekevičiūtė “Litovio de Barbora” (en la Teatra salono, str. Daukanto 27).
 17.30–19.00 Vespermanĝo (memstare).
 19.00–21.00 Prezentaĵo de Mario Migliucci >>> kaj Kĵara.



La 12-an de Julio (sabato)

9.00–10.00 Matenmanĝo (memstare).
 11.00–12.00 Poezia anguleto: La sonetoj de Orfeo de



Rainer Maria Rilke. Prezentas prof. Mark Fettes (en la Senata salono).

11.00–12.00 Prelego de Kristin Tytgat “Diversaj aspektoj de interkultura komunikado”.

11.00–13.00 Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj.

12.00–13.00 Prelego de Manfred Westermayer “Milito kaj Klimato kun Ekologio”.

12.00–13.00 Prelego de Nina Pietuchowska “Homoj skribas kartetojn, poŝtkartojn, bildkartojn”.

13.00–14.30 Komuna organizita tagmanĝo.

15.00–16.00 Solena fermo de BET-59

(en la Senata salono).

16.30–17.30 Kantas Valdas Striužas (en la Senata salono). >>>

17.30–19.00 Vespermanĝo (memstare).

19.00–21.00 Adiaŭa vespero.



La 13-an de Julio (dimanĉo)

9.00–10.30 Matenmanĝo (memstare).

11.00–18.00 Disveturo.

La definitiva precizigita programo ĉiutage aperos en la gazeto de BET-59 “Kunfluo” kun indiko de la loko por ĉiu programero.

Krome okazos jenaj programeroj:

1. La 10-an de Julio (ĵaŭde)

dum la tuta tago okazos Lingvotesta sesio gvidata de Giorgio Silfer kaj Perla Martinelli. >>>

2. La tempo de la kvar duontagaj ekskursoj estos anoncita komence de BET-59.

3. Ĉiutage aperos la gazeto de BET-59 “Kunfluo”. Ĝia redaktoro estas Pawel Fischer-Kotowski, kontaktebla retpoŝte per fiskot@gmail.com.

Bonvolu kunlabori kun “Kunfluo”.

4. Ĉiutage funkcios riĉa libroservo.

5. La Organiza komitato laŭbezone rajtas ŝanĝi la programon.

La ŝanĝojn, precizigojn, informojn pri salonoj k. s. serĉu en la ĉiutaga gazeto de BET-59 “Kunfluo”.



Scienca Universitata Sesio de AIS (SUS-41) en BET-59

Jam la trian fojon okazas la Scienca Universitata Sesio (SUS) de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kadre de la Baltiaj E-Tragoj (BET) en Litovio. La unuan fojon AIS gastis en BET en 2019, kiam SUS-36 okazis en Panevėžys, kaj la duan fojon en 2022, kiam SUS-38 okazis en Klaipėda.

Kiel en la antaŭaj jaroj, okazos inaŭguro de SUS, kun gustumoj pri la prelegoj okazantaj dum la cetera semajno. Ĉi-foje okazos kadre de SUS kvar kursoj kaj prelegoj:

1. Enkonduka kurso „Astrofiziko por ĉiuj“ de Amri Wandel. Fine de tiu ĉi kurso estos ebleco ekzameniĝi kaj ricevi AIS-ateston.
2. „Kolora lingva bildo de la mondo“ de Ilona Koutney, kiu prezentos ankaŭ kvar aliajn prelegojn pri Esperanto-kulturo.
3. Carlos Spinola prelegos pri “Fascinataj de la steloj: Ekde Sumero ĝis James Webb serĉantaj nian lokon en la kosmo”.
4. Ite Tytgat prelegos pri “Vitaminaj eroj en nia nutrado”.

Kiel antaŭe, dum BET aĉeteblas por speciala prezo la IKU-SUS-Libro, kiu enhavas krom la tekstoj de la SUS-kursoj ankaŭ la tekstojn de 17 prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato kaj la Scienca Kafejo, okazantaj dum la UK en Brno, Ĉeĥio.

Amri Wandel

Prezidanto de AIS, Vicprezidanto de UEA



Amri Wandel

estas profesoro pri astrofiziko en la Universitato de Jerusalemo, prezidanto de la Israela societo por Astrobiologio kaj membro de la Internacia Astronomia Unio. Li instruis astrofizikon al ĉ. kvar mil studentoj, publikigis pli ol cent sciencajn artikolojn kaj du lernolibrojn pri astrofiziko en la hebrea (Magnus 2021) kaj la angla (Springer 2024).

En Esperantujo li estas vicprezidanto de UEA kaj pli ol 30 jarojn respondecas pri scienca agado kaj la Internacia Kongresa Universitato. Amri Wandel estas prezidanto de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), membro de la Akademio de Esperanto ekde 1992, iama prezidanto de TEJO, aŭtoro de tri astronomiaj libroj en Esperanto: La kosmo kaj ni (2001, 2005, 2017, 2022), Ekstertera vivo (2023) kaj Astrofiziko por laikoj (2024)

En la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-59) profesoro Amri Wandel prezentas enkondukan kurson pri astrofiziko, moderna branĉo de astronomio, kiu evoluiĝis dum la dudeka jarcento kaj esploras la kvalitojn de steloj kaj la strukturon de la universo. Amri uzas sian multjaran sperton en instruado de astrofiziko, por klarigi en simpla kaj facila maniero pri astronomiaj distancoj, planedoj, steloj, galaksioj kaj la moderna kompreno de la universo. Per ekzemploj facile komprenblaj al ĉiu, ni lernos pri astronomiaj distancoj kaj la kosma distanco-eskalo. Ni komprenos kial la steloj aspektas kiel feblaj lumpunktoj en la ĉielo, dum ili efektive estas ardaĵoj sunoj, foje multe pli grandaj ol la nia. Ni vidos, ke la steloj ne estas eternaj: ili naskiĝas, evoluiĝas kaj mortas. Ni eĉ respondos la demandojn, kial ne ekzistas verdaj steloj kaj kiom aĝas la universo.



Ilona Koutny

doktoriĝis pri lingvistiko en la Budapeŝta Eötvös-Universitato, kie ŝi instruis dum jardeko ĉe la Esperanto-fako post prof. Szerdahelyi. Ŝi habilitiĝis ĉe la universitato Adam Mickiewicz en Poznano, kie ŝi gvidis la Hungaran Katedron kaj la internaciajn postdiplomajn Interlingvistikajn Studojn (1998-2024). En 2022 ŝi fondis magistrajn studojn pri interlingvistiko. Nun Koutny estas emerita profesoro de AMU.

Esplorterenoj: lingvo kaj kulturo, internacia kaj interkultura komunikadoj, Esperanta lingvistiko kaj leksikografio. Vidu pli ĉe <http://interl.amu.edu.pl/>

Prelegoj de Ilona Koutny por BET-2025

1. Esperanta kulturo – ĉu propra, ĉu transprenita, ĉu internacia. Esploras la aperon de kulturo en Esperanto, kiomgrade ĝi ĉerpas el la fontolingvoj, kiomgrade spegulas la internacian amaskulturon, levas la demandon, kiel Esperanto kreis sian specifan kulturon, kaj kiomgrade ĝi estas inkluda.

Vd. Ĉu lingvo povas krei kulturon? Dum Arkones (2018): https://www.youtube.com/watch?v=9lb5Hg5UHKg&list=PL5pobZq7woF2S4bFPLrP-q_EdUquv_FIP

Enkonduko al Esperanta kulturo. En: Esperanta kulturo (red. I. Koutny, 2022, elŝutebla)

Prelego pri Esperanta kulturo: <https://www.youtube.com/watch?v=5JsiDTXNiYg>

2. Interkultura komunikado per Esperanto. Prezentas problemojn de interkultura komunikado kaj Esperanton kiel ponton inter diversaj kulturoj, serĉas elementojn de komunaj normoj lingvaj kaj konduataj, komparas la rolon de Esperanto en interkultura komunikado kun tiu de la angla.

Vd. *Interkultura komunikado en Eŭropo: la angla kaj esperanto kiel alternativaj komunikiloj.* En: Symposium on Communication Across Cultural Boundaries. Ed. Ch. Kiselman. Dobrichovice: Kava-Pech. 2005: 115-132. Prelego dum Arkones (2018): <https://www.youtube.com/watch?v=xokbMbm6fAs&t=131s>

Interkultura komunikado kaj Esperanto. En: I. Koutny (red.) 2023: Komunikado kaj Esperanto. Poznań: Interlingvistikaj Studoj & Rys. 247-260. (elŝutebla)

3. Pri kio ni parolas kaj kiel? Ĝentileco internacie tra Esperanto. Prezentas kiel funkcias ĝentileco, ĉu estas internaciaj normoj, kiel tio manifestiĝas en Esperantio – surbaze de enketo, komparas la komunikadon per Eo kun la angla kiel lingvafrankao. Esploras, pri kio esperantistoj interparolas, ĉu ekzistas tabuoj. Vd. *Ĝentileco en internacia uzo per esperanto.* En: Koutny I. (red.) 2023: Komunikado kaj Esperanto. Poznano: Interlingvistikaj Studoj AMU & Rys (Elŝutebla el la retejo de la Interlingvistikaj Studoj). Prelego dum Arkones (2023): <https://www.youtube.com/watch?v=5sosVJfBqOU&t=3245s4>

4. Kolora lingva bildo de la mondo. Koloroj aperas en nia vivo kaj en diversaj



esprimoj laŭ lingvoj, ili havas simbolajn signifojn (ekz., la ruĝa povas simboli amon, sed ankaŭ malpermeson; la nigra malĝojon, malpermesitan aferon, la verda esperon kaj nematurecon ktp). Ni esploras, ĉu al Esperanto ni portas ilian signifon el niaj naciaj kulturoj aŭ ekzistas io komuna.

5. Universitata instruado de esperantologio: spertoj kaj perspektivoj.

Analizas la spertojn de 26-jara funkciado de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj en AMU (Poznano, Pollando) kaj skizas novajn perspektivojn.

Karlo Spinola

estas fizikisto kaj doktoro inĝeniero pri komputikaj sciencoj, hab. profesoro de la Universitato de Málaga (Hispanio) kaj kunfondinto de la informadikaj studoj en tiu universitato, kie li instruis kaj estris esplorajn projektojn kune kun industriaj entreprenoj. Nuntempe li estas honora profesoro en la elektronika departemento de la Malaga Universitato.



Ekde sia universitata studenta periodo pri fiziko li ĉiam interesiĝis pri astronomio kaj spaca esplorado. Li esperantistiĝis en 2013. Esperante li prelegas pri astronomiaj temoj. Jam en 2014 en Herzberg li prezentis la projekton “Gaia” de la ESA.

Ankaŭ li prelegis pri aktualaj, interesvekaj astronomiaj temoj en la Trilanda Kongreso en Indonezio (2016), en la Kongreso de ILEI en Madrido (2018), en KAEST (2018, 2020, 2024), en la kongreso de IFEF (2019), en la Virtuala Kongreso (VK-2020), en la Hispana Kongreso (2023), en la Eŭropa Esperanto-Kongreso (2024) k. a.

En BET-59 Spinola prelegos pri la temo “Fascinitaj de la steloj: Ekde Sumero ĝis James Webb serĉantaj nian lokon en la kosmo”.

Ni estis ĉiam fascinitaj de la steloj. Jam el Sumero niaj prauloj zorge rigardis la ĉielon, provante kompreni ĝin. Tamen ni bezonis jarcentojn por progresi iom post iom en tiu serĉado de nia loko en la Universo.

En ĉi tiu prezento ni vojaĝos tra la tempo kaj paŭzos ĉe la momentoj kaj homoj, kiuj elpensis novajn modelojn de la Tero kaj de la Kosmo, kiuj, kvankam kontraŭis al nia tuja sperto, pelis nin al la steloj.

Ni traĭros la helenajn filozofojn kaj astronomojn, la burĝonadon post la Renesanco kaj la impetan puŝon faritan en la lastaj tempoj.

Karlo Spinola



Ite Tytgat

naskiĝis la 8-an de Aŭgusto 1957 en Ekeren, Belgio. Kiel nepino de esperantisto de la 20-aj jaroj de la pasinta jarcento, ŝi kreskis en Esperanta familio kaj edziniĝis al kataluna esperantisto, Alex Humet, kun kiu ŝi konatiĝis en unu de la pluraj aranĝoj, kiujn ŝi partoprenis. Kun li ŝi formis Esperantan familion kun tri infanoj, kiuj parolas Esperanton. Ŝi loĝas en Antverpeno.

Tytgat studis biomedicinajn sciencojn en Loveno, laboris en diversaj laboratorioj en hospitalo kaj esplorinstituto dum kelkaj jaroj. Poste ŝi iĝis docento en altlernejo pri mikrobiologio, molekula biologio kaj klinika biokemio.

Nuntempe ŝi emeritas kaj ŝi klopodas ĉiujare fari prelegon en Esperanto pri scienca temo por disvastigi en esperanto tiajn sciencajn temojn.



En BET-59 Ite Tytgat prelegos pri la temo “Vitaminoj, esencaj eroj en nia nutrado”.

En tiu ĉi prelego ŝi donos superrigardon pri la aro da vitaminoj, kiujn oni povas akiri pere de diversaj legomoj kaj aliaj produktoj. Por bone kompreni la digestadon, ŝi mallonge parolos pri ties funkciado. Ŝi ne nur koncentriĝos je la vitaminoj mem, sed ankaŭ je la diversaj nutraĵoj. Pri la patologioj, kiuj povas ekesti pro manko de ili, ŝi parolos nur supraje.



István Ertl

naskiĝis en Budapeŝto en 1965, en familio legema kaj amplena. Li esperas ke li gardis tiujn ecojn. Esperanton li alproprigis memlerne ekde infana aĝo, kaj poste plibonigis siajn sciojn en la Esperanto-fako de Universitato ELTE, kie li diplomiĝis kiel instruisto de lingvoj. De 1992 ĝis 2001 li redaktis la revuon “Esperanto” de UEA en Roterdamo. Post Brusela interludo (2002-03) kiel oficisto ĉe kontraŭrasisma organizaĵo, li dungis kiel tradukisto en Luksemburgo ĉe Eŭropa Revizora Kortumo, kaj laboras tie ĝis nun.

Kun Fabienne Berthelot (1965-2018) István Ertl kreis familion de tri gedenaskuloj. En 2023 li edzinigis la estoninon Liina Vahtrik, kaj tiel fariĝis bo-balto, pli BET-ema ol antaŭe.

Liaj lastaj tradukoj beletraj: “Elu” (rakonto, en la estona, el Esperanto kaj la hispana, kun Liina Vahtrik); “La edzino de l’ tempvojaĝanto” (romano, el la angla), “Pri la eta talpo, kiu volis scii kiu faris tion sur lian kapon” (infanlibro, el la germana), “Maigret és az éjjeli utas” (romano, hungare, el la franca).

En Scienc-teknika programo de BET-59 prelegos ankaŭ István Ertl pri la spertoj de tradukisto faka kaj beletra en la nuna mondo de aŭtomataj tradukiloj (“Kiel mi fariĝis maŝino”).

Instruado dum BET-59

En 59-a BET ĉiutage, krom la ekskursa tago, okazos lecionoj de Esperanto. La kursoj okazos matene inter 11.00 kaj 13.00 horoj. Eblos elekti inter 4 niveloj kaj 5 geinstruistoj: Mikaelo Lineckij B1; Nina Petuchowska B2; Alex Humet C1; Dalia Pileckienė kaj Vida Kulikauskienė – konversacia rondo. La instruan programon gvidos Gražina Opulskienė, vicprezidanto de LEA.

Gražina Opulskienė

naskiĝis en la jaro 1958 en la urbo Mažeikiai en Litovio kaj tie plu loĝas. Ŝi estis bibliotekistino en la gimnazia biblioteko kaj instruis Esperanton kiel nedevidan kurson al 14-19-jaraj gejunuloj, ekde 2000 ankaŭ en aliaj landoj, dum E-renkontiĝoj kaj -kongresoj en Kroatio, Japanio, Latvio, Aŭstralio, Francio, Novzelando, Italio, Hispanio kaj Finnlando.

La tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj estas por Gražina “deviga memelektro”, kiam ili okazas en Litovio, kaj ŝi ĝojas helpeti al la kolegoj-instruistoj kaj zorgi pri diversaj taskoj en la organiza teamo.



Dalia Pileckienė



esperantiĝis en 1994 kaj diplomiĝis kiel Ĉe-instruistino en 2004. En 2000 ŝi magistriĝis pri „administrado de komerco“ en Teknologia Universitato de Kaunas kaj en 2000-2004 studis en Eduka centro de Geŝtalt-psikoterapio en Kaunas. En 2007 magistriĝo pri „sociala laboro kaj administrado de socialaj organizoj“ en Pedagogia Universitato de Vilnius kaj en 2020 diplomiĝo pri mediado ĉe Ministerio de Justeco. Ŝi laboras kiel mediatorino pri divorc-procedoj kaj kiel konsilantino kun diversaj „sociale damaĝitaj“ personoj.

Ŝi gvidis E-kursojn B1 kaj A en SES (Slovakio), progresigajn E-kursojn en M.E.S. (Italio) kaj „aktivigajn seminariojn“ en Kleriga Lundo dum Universalaj Kongresoj de UEA. En la konversacia rondo dum BET-59 ŝi strebos apliki la metodojn „komuniki lernante aŭ lerni komunikante“.

Vida Kulikauskienė

profesie estas informatikistino kaj ankaŭ longjara kaj aktiva esperantistino. Estante studentino de Vilniaus Universitato ŝi vizitis tie lingvan kurson kaj lernis la lingvon Esperanto. Vida estas multjara prezidantino de la klubo „REVO“ en sia urbo Panevėžys kaj klopodas, ke klubanoj havu rektajn kontaktojn kun aliaj E-klubo en Litovio kaj eksterlando. Ŝi apartenas al la estraro de LEA kaj en 2019 ŝi estis unu el la ĉefmotoroj dum la organizado de BET-55 en sia urbo Panevėžys, rekorde kvanta kaj kvalita, kun 450 partoprenantoj el 37 landoj. Vida multege vojaĝas per Esperanto, ofte gastigas Esperantajn amikojn kaj sincere kontribuas al la projekto „Ekparolu“ de Edukado.net. Ŝi estas inter la 10 plej aktivaj „geonkloj“. Vida spertas instrui komencantojn en sia klubo kaj BET 59 estas la okazo utiligi sian scion en la internacia grupo.



Mikaelo Lineckij



Mi estas esperantisto ekde Aprilo 1969. En 1973 mi iniciatis kaj fondis en mia urbo – la ĉefurbo de Ukrainio Kievo (Kijivo) – Esperanto-klubon “Ora pordego”, en 1986 – iniciatis kaj fondis la klubon KARE (Kijiva Arta Rondo Esperantista). En 2009-2010 mi estis prezidanto de Ukrainia Esperanto-Asocio. Dum mia aktivado mi estis inicianto, organizanto aŭ kun-organizanto de multaj Esperanto-renkontiĝoj: OkSEJT-21 en 1979, OkSEJT-24 en 1982, InterSEJT-2 en 1990, EoLA – 1999, IJK-67 en 2011, Kongreso de blindaj esperantistoj en 2012 kaj multaj negrandaj renkontiĝoj.

Mi estis aktiva partoprenanto kaj kunorganizanto de Esperanto-renkontiĝoj en Sovetunio, en Ukrainio, Armenio, Litovio, Bjelorusio, Rusio, ankaŭ en Pollando, Slovakio, Ĉeĥio, Hungario, Germanio, Svedio, Francio. En tri SEJToj pro la aktiveco mi estis elektita “Mister Esperanto”: en 1978, 1979 kaj 1986.

Mi konstante ekde 1970 jaro instruis en Esperanto-kursoj. De 1993 ĝis 2010 mi estis la sola en Ukrainio oficiala instruisto de Esperanto – en la kijiva liceo №38. Kun la liceanoj dum tiu periodo mi partoprenis en pli ol 20 Esperanto-renkontiĝoj.

Mi ĉiam strebis al tio, ke Esperanto fariĝu socie utila. En 2002 mi iniciatis kaj fondis Societon por subteno kaj defendo de ukraina kulturo “ЕСПЕРО”, en kiu Esperanto estas la dua laborlingvo. La nocion “subteno” necesas kompreni tiel, ke pere de Esperanto en Esperanto-renkontiĝoj estis konatigo kun la ukrainaj kulturo kaj lingvo. “Defendo” signifas atentigi pri minaco pro la troa uzo de la angla en Ukrainio. Grava atingo de la Societo estas studia registro de kompakt-disko “Ukrainaj kantoj en Esperanto”, en kiu estas registritaj 20 ukrainaj popolaj kantoj kaj “Arkeo de Noa” – 20 kantoj de 20 popoloj. Dank’ al Esperanto-renkontiĝoj ili disvastiĝis jam tra la tuta mondo.

En 2006 mi preparis 160-paĝan informlibron “Ora libro Esperanto” kaj en la 2008 mi tradukis ukrainlingven kaj proprakoste eldonis la faman lernolibron de S. Marček “Esperanto per rekta metodo”. Krome mi okupiĝis pri eldono de diversaj informaj broŝuroj en la ukraina, rusa kaj Esperanto.

Nun mi en Israelo daŭrigas mian aktivadon – fine de la 2017 mi estis elektita en la estraron de ELI (Esperanto-Ligo de Israelo), ekde 2018 mi redaktas la revueton “Israela Esperantisto” kaj en 2020 mi estis elektita kiel vicprezidanto de ELI.

Por la programo de BET-59, mi pretas kontribui per jam tradicia gvido de paroliga kurso (nivelo B), en kiu ni interparolante provos solvi diversajn logikajn taskojn, kaj, se estos la eblo, mi pretas instrui iom da kantoj el SEJMa epoko.

Memkompreneble mi kun miaj delongaj kungeaktivuloj planas partopreni en diversaj kulturaj aranĝoj.



Nina Pietuchowska

mi estas esperantisto ekde Aprilo 1969. En 1973 mi iniciatis kaj fondis en mia urbo – la Mi estas esperantistino de 1988. Dum multaj jaroj mi laboris kiel instruistino pri fiziko kaj kemio. Nun mi estas pensiulino kaj mi havas pli multe da tempo por Esperanto kaj miaj ŝatokupoj: manlaboroj, vojaĝoj kaj fotado de naturo. Dum multaj jaroj en diversaj landoj mi gvidas Esperanto-kursojn: en Bjalistoko (kie mi loĝas), dum BET en Latvio kaj Litovio, dum JES en Pollando kaj Germanio, dum SES en Slovakio, ankaŭ en Italio, Francio.

Dum miaj Esperanto-kursoj en internaciaj grupoj mi uzas diversajn metodojn kaj materialojn, kiuj permesas pli facile konatiĝi en la grupo. Diversmaniere mi aktivigas homojn, por ke ili ne timu paroli, interparoli, diskuti.

Bonvolu partopreni mian kurseton – certe ion novan vi ekscios, lernos kaj ofte gaje ridos pro diversaj ŝercoj, vortludoj, ludoj...

Prelegeto: “Homoj skribas kartetojn, poŝtkartojn, bildkartojn...”

En nia moderna mondo malmultaj personoj nun sendas paperajn poŝtkartojn, bildkartojn. Poŝtelefonoj permesas facile foti interesajn objektojn kaj tuj sendi la foton por familianoj, geamikoj... Ankaŭ somosoj permesas rapide sendi informojn. Kaj kiel estis ekzemple en la 18a jarcento aŭ pli frue?

Bonvolu veni por aŭskulti mian prelegeton pri la historio de korespondado, por vidi diversajn malnovajn poŝtkartojn, bildkartojn...



Alex Humet

naskiĝis la 16-an de Majo 1955. Li estas kataluna esperantisto, origine el Barcelono, kiu post kelkaj jaroj en Roterdamo, ekde la 1980-aj jaroj vivas en la distrikto Berchem de la belga urbo Antverpeno. Ekde Novembro 1984 li estas edzo de la flandra esperantistino Ite Tytgat, kun kiu li havas tri denaske esperantistajn infanojn.

Matematikisto, li faris sian karieron en internaciaj asekurkompanioj en Bruselo kaj Luksemburgo, ĝis la pensiigo en 2020.

Krom pluraj funkcioj en TEJO kaj Flandra Esperanto-Ligo, dum 20 jaroj li profesie instruis Esperanton en Antverpena lingvo-lernejo, kaj li ofte estas petata kiel instruisto de Esperanto dum aranĝoj en ĉiuj niveloj, en Belgio kaj eksterlande.



Nun kiel emerito, li ankaŭ instruas la katalunan lingvon en Luksemburgo kaj ofertas sian instrusperton al la organizantoj de Esperanto-renkontiĝoj.

◀ Alex Humet gvidis Esperanto-kurson por komencintoj dum Belga Esperanto-studsemajnfino (BEST) 2025 en De Iep en Ipro, de vendredo 21/2/2025 vespere ĝis dimanĉo 23/2/2025 posttagmeze. (El: <https://eventaservoo.org/e/BEST2025>)



Laura Brazzabeni

estas instruistino pri fremdaj lingvoj kaj pri Esperanto. Ŝi doktoriĝis pri fremdaj lingvoj per eseo pri instruado de fremdaj lingvoj kaj literaturo kaj poste pri itala beletro. Ŝi oficiale rajtas instrui la anglan, la germanan, la hispanan kaj Esperanton kaj bone regas ankaŭ la francan.

Laura Brazzabeni laboris por la kreado de la reta kurso KIREK de Itala Esperanto-Federacio preparante la ekzercojn de la lecionoj. La kurso havas dek lecionojn, kaj oni proponas ĝin rete kun helpantoj. Ŝi estas administranto de la reta kurso KAPE por Italio. Nun ŝi estas estrarano pri kongresoj en ILEI, prezidanto de Itala Esperanto-Federacio kaj ĝenerala direktoro de Itala Instituto de Esperanto.

En BET-59 Laura Brazzabeni prelegos pri instruado de Esperanto en kursoj sinkronaj kaj nesinkronaj kaj pri disvastigo de Esperanto pere de radio.



Severija Marija Banaitytė

Kvankam Severija Marija Banaitytė venas de esperantista familio, ŝi lernis Esperanton antaŭ sep jaroj, en 2018. Ŝi estas unu de fondintoj de junulara esperantista asocio en Litovio (LEJO) kaj unu el la ĉefaj organizintoj de la 80a Internacia Junulara Kongreso de TEJO (Ŝventoj, 2024) kaj de pluraj aliaj eventoj kaj projektoj. Kiam Severija ne esperantumas, ŝi studas en Universitato de Vilno kaj pretiĝas iĝi instruisto de la litova lingvo.

Dum BET-59 Severija Marija Banaitytė prezentos kurson de la litova lingvo. Ŝi jene prezentas sian kontribuon:

Ĉu vi aŭdis diraĵon, ke la litova lingvo estas unu el la plej “arĥaikaj lingvoj” en Eŭropo? Venu al la kurso kaj lernu, ĉu ĝi veras; ni komparos la litovan lingvon kun aliaj lingvoj de la regiono kaj de la mondo, retrorigardos al lingva historio. Aldone dum la kurso ni fokusigos je la plej utilaj frazoj, kiujn la partoprenantoj de BET-59 povos uzi en la urbo, kafejoj, muzeoj kaj aliaj lokoj.

Se vi ŝatas lerni lingvojn (kiel vera esperantisto), interesiĝas pri la litova kulturo kaj volas profundigi viajn sciojn en lingvistiko, la kurso estos ĝuste por vi!



Lingvotesta sesio por ses niveloj dum BET-59

Kadre de BET-59 en Kaŭno la 10-an de Julio 2025 eblos akiri diplomojn laŭ la ses niveloj de la LingvoTesta Sistemo de la Esperanta Civito, inspirita de la Komuna Eŭropa Framo de Referenco kaj administrata de Kultura Centro Esperantista, asocia membro de Association of Language Testers in Europe (ALTE, Cambridge).

Por kandidatiĝi necesis aliĝi tra <https://kulturservo.esperantio.net/sekcio/lingvotestado>. Por la lingvotestado ne gravas aparta studtitolo: oni mezuras viajn “verdajn globulojn” kaj vi ricevas diplomon konforme al via nivelo. La niveloj estas: enira (A1), fundamenta (A2), intera (B1), kapableca (B2), bakalaŭra (C1), majstra (C2).

La LTSEC-diplomoj estas pli kaj pli bezonataj por aspirantoj al postenoj en la konsorcio de la Esperanta Civito. Lingvotestistoj estos prof. Giorgio Silfer kaj Perla Martinelli.



Kleriga kaj eduka programoj dum BET-59

En 59-a BET okazos klerigaj kaj edukaj programoj. Jen kelkaj prelegantoj kaj resumoj de iliaj prelegoj:

Mark Fettes

Ĉi-sube mem prezentas sin kaj sian ampleksan kontribuon al BET-59.

Mark Fettes (1961–) eklernis Esperanton antaŭ kvindek jaroj, kiel adoleskulo en Novzelando. Li kontribuis al la movado diversmaniere, interalie, kiel redaktoro de la revuo Esperanto (1986-92), estrarano de UEA (1992-98), direktoro kaj estrarano de la usona fondaĵo ESF (2000-22), prezidanto de UEA (2013-19), kaj lastatempe direktoro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (2020 ĝis nun). Profesie li estas profesoro pri edukado en la okcidentkanada universitato Simon Fraser. Li (kun)aŭtoris kaj (kun)redaktis kelkajn librojn en Esperanto kaj la angla, aldone al aro de sciencaj kaj popularaj artikoloj, prelegoj k. s. Kolekto de verkoj el la periodo de lia prezidanteco aperis en la libro *Ne estas fido nur* (2020). Samjare aperis lia traduko de La sonetoj al Orfeo de la germana poeto Rainer Maria Rilke (2020).



Prelegserio “Lingvo kaj mondo: Kelkaj meditoj el esperantista angulo”

1. Multaj lingvoj, unu homaro?

Gvida ideo tra la historio de Esperanto estas la insisto de Zamenhof, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj neŭtrala lingvo estas rimedo por komuniki kaj praktiki tiun fratecon. La realo montriĝis pli komplikita.

2. Lingva demokratio, en nedemokratia mondo

Lingva demokratio estas unu el la bazaj konceptoj de la Manifesto de Prago, nun preskaŭ 30-jara. Sed demokratio mem estas tutmonde kontestata, en teorio kaj praktiko. Kien do la streboj al lingva justeco?

3. Lingvo kaj tero

En la epoko de Zamenhof, la dimensioj de la ekologia krizo estas ankoraŭ ne videblaj. Nun nepras demandi, kiel niaj lingvaj elektoj kaj kondutoj influas nian rilaton al la naturo – kaj inverse.

4. La konsoloj de lingvo-amanto

Fronte al la morto, Boecio trovis konsolon en filozofio. Jam dekomence, la esperantistoj, fronte al “la batoj de l’ sorto, la moko de l’ homoj”, kreis kaj malkovris proprajn konsolojn en kaj per la lingvo. Ni rigardu, kiel.

Invit’ al interlingvistiko

La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj estas unu el la gravaj kunordigaj centoj de esploroj pri Esperanto kaj rilataj lingvaj demandoj. Ĝia

direktoro Mark Fettes resumos ĝian historion kaj nuntempan agadon, kaj elstarigos kelkajn gravajn evoluojn sur la kampo de interlingvistiko.

Poezia angulo: La sonetoj al Orfeo de Rainer Maria Rilke

En 2020 aperis Esperanta traduko de malfrua majstroverko de la germana poeto Rainer Maria Rilke: *Die Sonetten an Orpheus* (1923). La tradukinto Mark Fettes parolos pri la ekesto kaj signifo de la verko, kaj legos kelkajn elektitajn sonetojn el la Unua kaj Dua Partoj. Bonvenos demandoj kaj diskuto pri tio, kion la poezio de Rilke proponas al ni nuntempuloj.

Aida Čižikaitė

estas lingvisto, specialisto pri la litova lingvo. Ŝi lernis Esperanton en 1999 en kurso de Trevor Steele. Studis ĉe IEI kaj iĝis diplomita Cseh-instruisto; studis interlingvistikon ĉe la universitato Adam Mickiewicz en Poznań.

Aida Čižikaitė kunorganizis kelkajn BETojn en Litovio, kongreson de IKYE, UKon en Vilno, kelkajn konferencojn de ILEI; estis estrarano de ILEI pri scienco, universitata kunlaboro kaj organizado de konferencoj. Kunlaboris en “Litova stelo” kaj “Nova vojo”. Volontulis kaj gvidis Esperanto-kurson en la Kaŭna gimnazio S. Darius kaj S. Girėnas, gvidis Esperanto-kurson en la Kaŭna fakultato de la Vilna universitato, nun ŝi gvidas kurson de Esperanto en la Litovia universitato pri sansciencoj

Dum la 59-a BET en Kaŭno Čižikaitė tradukos dum ekskursoj kaj prezentos kelkajn prelegojn pri Litovio, ties kuluro, lingvo k. s.

“Jara rado” – trarigardo de popolaj festoj kaj tradicioj.

“Koncize pri la litova lingvo” – trarigardo de ĉefaj trajtoj kaj lernado de kelkaj frazoj.

“Zamenhof kaj Litovio” – ligoj de L. L. Zamenhof kaj Litovio.

“Litovio dum jarcentoj” – mallonga prezento de la historio antaŭ 1990 kaj poste.

“Famaj nomoj de litova kulturo” – konciza prezento de famaj litovaj artistoj.



Gediminas Degėsys

estas la litova filozofo, poligloto, fakulo pri Afriko, poeto kaj esperantisto. Ĉi-sube li mem prezentas sin kaj sian kontribuadon al BET-59.

Gediminas Degėsys naskiĝis la 30-an de Majo 1980 en laborista familio, en Alito (Alytus). Li lernis en la gimnazio A. Ramanauskas-Vanagas en Alito kaj en la liceo de la Episkopejo de Telŝoj (Telšiai), studis en la Fakultato de Katolika Teologio ĉe la Universitato de Grandduko Vytautas. Poste li studis en Laterana Universitato en Romo kaj en Asizo. En 2006 li magistriĝis en la Litovia Edukada Universitato. En 2011 en la Universitato de Grandduko Vytautas li defendis la disertacion “Malkovro de estetikaj principoj en la skulptarto de Sub-Sahara Afriko”. En la Vilna Universitato li instruis filozofion, Afrikajn studojn, fremdajn lingvojn. Danke al li Esperanto disvastiĝas inter la studentoj. En la scienca gazetaro li publikigis artikolojn, eldonis dek lernolibrojn pri fremdaj lingvoj kaj unu poemlibron en la lingvoj litova, rusa kaj Esperanto.



En 1993 Degėsys hazarde konatiĝis kun Esperanto, eklernis ĝin kaj organizis Esperanto-kurson. Poste li partoprenis en kelkaj Universalaj Kongresoj de Esperanto. Li publikigis kelkajn sciencajn artikolojn pri la internacia lingvo, konstante verkis por Esperantaj eldonaĵoj, tradukis kelkajn librojn. Ĉiujare li organizas interretajn kursojn de Esperanto, interalie, en la Vilna Universitato kaj multaj lernejoj de Vilno.

Gediminas Degėsys estas aktiva subtenanto de la bibliotekoj de Litovio. Danke al li en la biblioteko de Vilna Universitato kaj en tiu de lia naskiĝurbo Alito kreskas la Esperanto-kolektoj. En 2001 li eldonis sian lernolibron de Esperanto por litovoj, en 2015 – sian unuan Esperanto-litovan vortaron (ĉirkaŭ 10 mil vortoj). En 2022 estis eldonita lia vortaro “ESLI 2022. Esperanta-litova vortaro” kun ĉ. 40 mil vortoj”.

En BET-59 Gediminas Degėsys prezentos prelegon pri la Nigra Afriko.

Chajm Antonia Hillel Langholf

Mi estas 40-jara agronomo kaj fakulo pri ekologia agrikulturo. Mi loĝas en malgranda ruldomo en arbaro en la regiono de Norda Eriko en nordo de Germanio, proksime de Hamburgo. Mi laboras iomete kiel zorganto de infano handikapita kaj mi estas membro en Solidara agrikulturo.

Mi estas membro de UEA, SAT kaj TEVA (vegetaranoj), verkas artikolojn por Kontakto kaj Sennaciulo.

Mi ricevas pension pro mia sindromo de Asperger handikapo.

Pro tio mi ege interesiĝis pri la senperforta komunikado kiel rimedo por klarigi la komunikadon inter homoj. Mi kredas, ke la bazo de la granda plejmulto de konfliktoj sur la tero estas nur tragikaj miskomprenoj kaj manko de empatio por la aliaj. Preskaŭ ĉiam estas ebleco por trovi solvon aŭ kompromison por ĉiuj.

La senperforta komunikado estas fondita de Marshall Bertram Rosenberg (1934-2015), kiu pro sia juda deveno spertis diskriminacion kaj malunuecon pro diversaj devenoj kaj trajtoj. Same kiel Zamenhof...

La senperforta komunikado estas la temo de mia prelego en BET-59 en Kaŭno.




Tim Owen

Direktoro de Esperanto-Asocio de Britio. Tiam eble dek-jara, li eksciis pri Esperanto, foliumante porinfanan enciklopedion, kaj tuj opiniis la lingvon bona ideo. Ĝin li eklernis tamen unu kaj duonan jardekojn poste. Nun 46-jara, li estas direktoro de Esperanto-Asocio de Britio (EAB) kaj membro de la Akademio de Esperanto. Li verkis la lernolibrojn “Complete Esperanto” kaj “Enjoy Esperanto” por prestiĝa brita eldonejo, ricevis diplomon de UEA pri elstara arta agado en 2024 pro la eldon-agado de EAB, kaj diplomiĝis samjare ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, kadre de ties Interlingvistikaj Studoj. Li plu opinias Esperanton bona ideo.

En BET-59 Tim Owen parolos pri tio, ke Esperantujo prezentiĝas plursimbole, klarigante, kiel estiĝis la konkretiĝintaj simboloj, kiujn ni nun ĉiuj konas. En dua parto li esploros, kia estu nuntempa emblemo por io rilata al Esperanto, montrante, kial la tradicia verda stelo ne vere taŭgas. Unulinie, do: Tim Owen prezentos la originon de nia simbolaro, kaj prilumos tion, kion hodiaŭulo priatentu kreante simbolon uzotan plurmaniere por sia organizaĵo.



Kultura programo de BET-59



Lucio Avitabile

Lucio Avitabile, kies koncerton povos ĝui la partoprenantoj de BET-59, estas 42-jaraĝa itala kantisto, kiu nun loĝas en Romo.

Liaj spertoj en la artista kampo:

2002-04: ĥoristo ĉe “Domenica in” (ĉiudimanĉa posttagmeza spektaklo ĉe Itala Televido, la unua kanalo).

2003: festivalo de Castrocaro Terme, finalisto.

2005: premio “Mia martini”, la dua loko.

2010: Premio de la kritiko “Mia martini”.

2010-13: Kantinstruisto ĉe la lernejo Stemma.

Aŭtoro de tekstoj por pluraj famaj kantistoj. Partopreno en kelkaj programoj ĉe la nacia televido. Eldono de kelkaj KD-albumoj. Frontman tributo al Queen “Farrokh”. 2024 premio de la kritiko en la konkurso “Premio Gino Santercole”. 2024 la unua premio por reludversio (angle: cover) en la sama konkurso.

Lucio Avitabile mem prezentas sian koncerton:

Dum la koncerto, kiu daŭros unu horon, mi kantas kelkajn miajn verkojn en Esperanto kaj parte en la itala, kaj ankaŭ tradukojn de italaj furoraĵoj, ĉiam en dulingva formo. Multaj el tiuj kantoj estas prezentitaj sur KD, kiu estos publikigita baldaŭ.

Mi komencis proksimiĝi al Esperanto, kiam mi renkontiĝis kun Roberto Pigro, itala esperantisto loĝanta en Kipro. Nia kunlaboro komenciĝis per Fejsbuko en 2013, kiam li komisiis al mi verki nepublikigitan kanton en Esperanto “La forto de ĉiu viro”.

Ekde tiam mi kantis plurajn el liaj originalaj verkoj kaj tradukojn de konataj kantoj (ĉiam en dulingvaj versioj), inkluzive de kantoj en la greka, albana, franca kaj aliaj lingvoj. Plurlingveco estas interesa aspekto de mia muziko.

ĴomArt kaj Nataŝa koncertos en BET-59

La sveda muzika duopo “ĴomArt kaj Nataŝa” (Ĵ&N) aperis en la jaro 1987-a en Kazahio. Ilia unua oficiala koncerto en Esperanto okazis en jaro 1987 en Samarkando (Uzbekio), kie Ĵ&N kantis nur kvar Esperanto-kantojn, sed kun granda sukceso, kio instigis ilin daŭrigi.

En 1991 post la vojaĝo al la Universala Kongreso en Bergen (Norvegio) kaj Internacia Junulara Kongreso en Karlskoga (Svedio) la paro translokiĝis al Svedio. Ili havas la filinon Carina, kiu kantis kun la gepatroj ekde sia sesjara aĝo. Speciale por ŝi ĴomArt verkis plurajn infanajn kantojn kiuj estis eldonitaj kiel KD “Carina kantas por vi en Esperanto” (2009).

Dum 37 jaroj la duopo verkis pli ol 100 originajn Esperanto-kantojn kaj la kvanto de kantoj konstante kreskas. Post la unua vinila disko “Somerla Mondo” (1989), aperis tri kasedoj kaj kvar K-diskoj. Ĵ&N koncertis dum multaj Universalaj, Junularaj kaj naciaj kongresoj, internaciaj Esperanto-festivaloj kaj aliaj Esperanto-renkontiĝoj, interalie en BET-52 (Birŝtonas, 2016)



Dum la pandemia periodo “ĴomArt kaj Nataŝa” partoprenis en pluraj Esperanto-aranĝoj kaj kongresoj interrete. La duopo havas melodiajn kaj lirikajn kantojn, sed ankaŭ kantojn pli energiajn, eĉ rokecajn. La enhavo de la kantoj ĉiam estas influita de gravaj eventoj kaj ŝanĝoj en la vivo, personaj travivaĵoj kaj respegulas temojn aktualajn por la artistoj.

ĴomArt kaj Nataŝa havas en sia repertuaro ankaŭ kelkajn tradukitajn (de ĴomArt) famajn kantojn, adaptitajn al ilia speciala stilo.

La duopo estas ŝatata en Esperantujo. En 2016 Ĵ&N ricevis Diplomon de UEA pri Elstara Arta Agado kaj en 2022 la plej prestiĝan premion en Esperantujo – la Esperanto-Kulturpremion de la Urbo Aalen kaj la FAME-Fondaĵo.



Arno Lagrange

Naskita la 1-an de Septembro 1956, kreskis en esperantista familio: la gepatroj (franca patro kaj germandevena patrino) kaj la fratoj estas esperantistoj. De 1975 li aktivis en Esperanto-teatraj trupoj: TESPА (Teatro Esperanto de Parizo), Krizalido, Kallima, TTT (Teatro Trupo de Tuluzo) kun dekoj da surscenigoj nur en Esperanto aŭ dulingve (en la franca kaj Esperanto) de originalaj tekstoj kaj de tradukaĵoj el la franca aŭ el iu alia lingvo (detalojn vidu je <http://arnolag.free.fr/eo/Teatro.php>).

De 2002 Lagrange aktive partoprenas en Vikipedio. Laste li redaktis la vikipediajn artikolojn pri Stefan Zweig kaj pri liaj edzinoj Friderike Winternitz kaj Lotte Altmann, kiuj estas la baza materialo por la prelego en BET-59. Lagrange aktivas de 1999 en EKC (Esperanto Kultur Centro en Tuluzo), kiu en 2000 okazigis la Kulturartan Festivalon de Esperanto en 2000 en Tuluzo (KAFE) kaj partoprenas en diversaj *Erasmus+*-projektoj. En 2011 li partoprenis la organizadon de IREM (Interasocia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo). En 2017 li diplomiĝis pri Lingvoscienco en la Universitato de Tuluzo.

En Kaŭno Arno Lagrange prezentos solspektaklon *La Ŝaknovelo* laŭ la samtitola ĉefverko de Stefan Zweig, lia plej lasta verko eldonita en 1943 post lia morto, kvazaŭ la testamento de la aŭstra aŭtoro, kiun li redaktis antaŭ li mortigis sin.

Lagrange ankaŭ prelegos pri la temo “Stefan Zweig, eŭropa verkisto” por konigi la verkiston Stefan Zweig, lian vivon, lian verkaron kaj liajn ecojn homajn psikologiajn, filozofiajn, kun emfazo de lia humanisma sinteno.

Ed Robertson

Naskiĝis en 1952 en Dumfries (Skotlando) de germana patrino kaj skota patro. Li magistriĝis ĉe la Universitato de Edinburgo (1974) pri la germana kaj la rusa. Poste li laboris kiel instruisto pri lingvoj. Tamen post kelkaj jaroj li ekinteresiĝis pri komputiloj, kiam ili unue komencis ludi rolon en komerco, kaj kun kolego li evoluigis programaron specife por la estrado de veterinaraj praktikejoj, kaj lia programaro daŭre estas uzata en veterinaraj praktikejoj en Britio, Irlando, Portugalio kaj Norvegio.

Unu tagon en biblioteko Robertson trovis flugfolion, kiu varbis por “Senpaga Kurso de Esperanto”, publikigita de la Esperanto Asocio de Britio. “Kaj la cetero”, kiel oni diras, “estas historio”. Ed servis dum pluraj jaroj en la estraroj de la



Esperanto-Asocioj de Skotlando kaj de Britio. La du organizoj estas sendependaj unu de la alia, kaj kunlaboras gefratece unu kun la alia. Dum pluraj jaroj li redaktis la revuon “Esperanto en Skotlando”.

En BET-59 Ed Robertson prelegos pri “Neresponditaj demandoj: Onklo Helmuth (1914-1943), la skeleto en la familia ŝranko”.

Mi estas duone germana kaj duone skota. La germana duono venas de la patrino flanko, la skota duono de la patro flanko. Miaj gepatroj konatiĝis en Germanio post la Dua Mondmilito. Ili renkontiĝis, laŭ la originala porinfana versio de tiu historio, en bazo de la Brita Armeo, en la vilaĝo Neugraben, tiam urbeto ekster la granda havenurbo Hamburgo, nun parto de la urbego mem. Tiu “bazo de la brita armeo” nomita en la rakontoj de miaj gepatroj, fakte estis eksa nazia koncentrejo, filio de la pli fama koncentrejo Neuengamme, postmilita reuzata por loĝado de rifuĝintoj, kaj miaj estontaj gepatroj renkontiĝis tie.

Tamen la sorto de la pli aĝa frato de mia patrino estis pli malfeliĉa. Li mortis mil kilometrojn pli for, en koncentrejo en Aŭstrio (Gusen-1), pro iaj kontraŭnaziaj sloganoj, kiujn li farbis sur muroj. Sed pri tiu heroo onklo mia patrino la tutan vivon menciis al mi nenion. Oni povas kompreni, ke oni volas ŝirmi infanojn disde la hororoj de vivo. Tamen mi estis 45-jaraĝa, kiam mortis mia patrino, kaj ŝi diris al mi nenion pri sia karmemora frato. Tiu informo devis atendi la modernan eblecon rekonstrui familiajn arbojn pere de DNA kaj la sukceso de mia fratino retrovi informon pri parenco, pri kiu ni sciis nenion, la pli aĝa frato de nia patrino. Mia opinio Onklo Helmuth estis heroo, kaj li estis mortigita en koncentrejo en Aŭstrio, eble nur pro iu skribaĉo lia sur muro, kiu mokis iun nazian gvidanton.



jOmO BETumos en Kaŭno

Jean-Marc Leclercq, pli konata en Esperantujo kiel JoMo kaj jOmO, eble la plej populara nuntempa Esperanto-kantisto.

Li komencis muziki en jaro 1977a kaj eklernis Esperanton en 1988. Tute nature li do decidis kanti kaj verki en la lingvo internacia. Li surpiedigis sian propran grupon La Rozmariaj Beboj, kiu diskoniĝis komence de la 1990aj jaroj en la franca alternativa rok-

medio. La grupo turneis en diversaj landoj, inkluzive de Ĉinio, produktis du albumojn kaj eĉ koncertis sur la scenejo de la fama Pariza salono Olympia.

Post disiĝo de la Beboj, jOmO kreis novan grupon Liberecanoj, kun kiu li registris septitolan liberecanan albumon ĉe Vinilkosmo kaj kreis la unuan rekordon de multlingva koncerto (22 kanzonoj en 22 lingvoj), kiu aperis en 2000 en la libro Guinness.

Poste li sole registris en la studioj de Vinilkosmo tutesperantan albumon jOmO friponas, kiu aperis fine de 2001. La sekva K-disko jOmO slavumas aperis printempe de 2006 kun multaj muzikistoj slavstilaj, kun kiuj jOmO kunludas. Poste aperis albumo dediĉita al tradicia okcitana muziko kun tradicia instrumento ŝalmsako bodego. jOmO koncertis kun tuta grupo de bodegoj dum la 100a Universala Kongreso en Lille (2015).

En 2021 aperis albumo, en kiu li kaj lia finilo Marta kantas komponaĵojn de Théophile Mayoma Diankembo el Kinŝaso, inter kiuj estas kanzono duone Esperanta duone lingallingva Nakozonga. Mi revenos.

Li daŭre koncertas Esperante kaj multlingve, sola kun gitaro kaj sonbukla pedalo, kantante ĝojajn kaj dancigajn kantojn. Li celas ampleksigi la esperantistaron per ekamoro

inter spektantoj en danca, vigla kaj multkultura etoso. Li vojaĝas en la tuta mondo, oni vidis lin en Japanio, Brazilo, Kanado kaj Aŭstralio.

Flanke de muziko, li eldonis ĉe franca eldonfirmao konversacilibron pri la gaskona lingvo, en kiu li ankaŭ verkas. En Majo 2006 aperis lia unua romano Ukrainio en la okcitana lingvo, pro kiu li ricevis literaturan premion. En 2012 li aperigis rimvortaron de la okcitana.

Krom tio, li havas polan edzinon, filinon kaj nepon, li ne fumas, ne trinkas alkoholon, ne manĝas viandon sed havas unu malvirton: li multe parolas.

Ne maltrafu lian venontjaran koncerton en Kaŭno!

Kjara koncertos en BET-59!

Kjara (Chiara Raggi) estas kantaŭtorino, gitar-istino, kantistino, komponistino kaj diskprodukt-antino, la fondintino kaj direktorino de *Musica di Seta*, muzikeldonejo dediĉita al inaj kantaŭtorinoj. Ŝi havas ses muzikajn albumojn: “Molo 22” (2009), “Disordine” (2015), “Blua Horizonte” (2019, en Esperanto), “La Natura e la Pazienza” (2020), “Nuda” (2023, en Esperanto), “In punta di corde” (2023).



Ŝi estas finalisto ĉe “Targhe Tenco 2024” kune kun Giovanna Famulari en la kategorio “Plej bona Interpretista Albumo” kun la albumo “In punta di corde – live alla RSI”, naskita el la radioprogramo, verkita kaj gastigita de ŝi por RETE2 de RSI (Svisa Itala Radio Televido).

En Oktobro 2024 ŝi ricevis la 18-an Kulturpremion de la FAME-Fondaĵo kaj la urbo Aalen, la plej gravan rekonon por la disvastigo de la Esperanto-kulturo, kaj ŝi estas la plej juna laŭreato, kiu ricevis ĝin. Gajninto de multnombraj premioj, inkluzive de Eŭrovido de Minoritataj Lingvoj 2022 kun la kanto “Mozaiko” en Esperanto, la Premio Suoni dall'Italia ĉe la Nacia Premio Bianca d'Aponte (2018), la Premio Castrovillari d'Autore (2019) kaj la diplomo de UEA “Pro elstara arta agado” (2020).

Kjara ludis sur la plej gravaj italaj kaj internaciaj scenejoj kaj festivaloj, alportante sian muzikon al Francio, Germanio, Hispanio, Belgio, Svislando kaj Usono.

Kjara kontribuos al la programo de BET-59 en Kaŭno per solkoncerto kaj per rakonto-koncerto.

Blua horizonto 1. En la Kaŭna solkoncerto Kjara prezentos sian muzikon en Esperanto el la albumoj “Blua Horizonte” kaj “Nuda”. La kantoj de Chiara Raggi parolas pri korinklino, kundivido kaj ekvilibroj samtempe konservindaj kaj rompitaĵoj, farigitaj ‘malpezaĵoj’ de la voĉo de Kjara, kiu ŝajnas karesi la vortojn. Ĉi tiu koncerto, kiu eniras la inan mondon, kaj ne nur, pritraktas gravajn temojn: memakcepto, konscio, legitimigo de sia laboro.

Rafinita kaj eleganta kantaŭtorino, Kjara proponas vojaĝon de muziko kaj vortoj por serĉi belecon kaj kundividon, transirante de la kantaŭtora tradicio al la sonoj de ĵazo. Por kompletigi la bildon, ŝi reinterpretas kelkajn kantojn el la historio de itala muziko.

2. La rakonto-koncerto “Blua Horizonte: Zamenhof, idealo kiu fariĝas muziko” prezentas Esperanton kaj la historion de ĝia fondinto Zamenhof en nekutima maniero, moviĝante laŭ duobla fadeno de vortoj kaj muziko.

La leteroj kaj paroladoj de Zamenhof dialogos kun la Esperantaj kantoj de Kjara. Tiel eblos ekscii pri la historio de la Varsovia kuracisto kaj lia idealo de frateco per liaj propraj

vortoj kaj samtempe aŭskulti lian universalan lingvon resoni en sia tuta esprimforto kaj moderna muzikeco.

Ĉi tiu rakonto-konzerto por gitaro kaj du voĉoj volas ankaŭ rakonti la historion de la renkonto de la du artistoj kun Esperanto kaj ilia vojaĝo sur ĉi tiu neesplorita planedo, plena de ekscitaj malkovroj.

Dramaturgio kaj aktora voĉo: Mario Migliucci

Muziko kaj kantoj: Chiara Raggi

Suzana kaj Mirek koncertos en Kaŭno

Suzana (Zuzanna Natalia Kornicka) naskiĝis en Poznano (Pollando), kie ŝi nun laboras kiel busŝoforino. Jam dum liceaj jaroj ŝi forte interesiĝis pri muziko kaj kantis en paroĥa koruso, kiu turneis, interalie, en Italio kaj Germanio. Nun ŝi studas internan sekurecon kaj estas patrino de 14-jara filino.

Ekde 1996 ŝi ĉiujare kantas kun gitaro dum la festivalo ARKONES en Poznano kaj en aliaj esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj; interalie, ŝi koncertis en BET-55 (Paneveĵo, 2019) kaj BET-56 (Klajpedo, 2022). En ŝia repertuaro estas verkoj de popmuziko, bluso, folkmuziko, religiaj aŭ revoluciaj kantoj, tradukitaj ĉefe de sia patro Zbigniew Kornicki kaj de Zbigniew Galor, laŭ kies instigo kaj financa helpo en 2015 aperis ŝia debuta kompaktdisko Malsato de Espero.

Mirek Bartkowiak profesie estas busŝoforo, sed pasie – muzikisto. Li enamiĝis al muziko kiel adoleskanto, kaj tiu amo restis kun li ĝis nun, kaj ĝi krucigis liajn vojojn kun Suzana, kiu formas kun li ne nur muzikan sed ankaŭ intiman tandemon.

En BET-59 Suzana kaj Mirek prezentos sian koncerton kun la titolo “SuMi – 30 jaroj pasis”.



Sakari Kauppinen prelegos pri Tove Jansson

Sakari Kauppinen (Finnlando), emerita ŝtata funkciulo, esperantisto ekde la 1970-aj jaroj, prezidanto de la Esperanto-klubo de Helsinki, estrarano de Fondumo Esperanto. Ĉi-sube li mem prezentas sian kontribuon al BET-59.

La titolo de mia prelego estas “Tove Jansson – patrino de Mumintrolaj”. Tove Jansson estas unu el la plej konataj finnaj verkistinoj internacie. Ŝi estas konata unuavice pro Muminvalo, fantazia mondo, kie ĉefrolas diversaj figuroj kreitaj de ŝi, inter ili la familio de mumintrolaj kaj iliaj amikoj. Unue ili aperis en libroj, poste ankaŭ en gazetaj bildstrioj. Nuntempe ili estas tutmonde konataj el multaj animaciaj filmoj.

Tamen Tove Jansson rigardis sin antaŭ ĉio pentroartisto. Ŝi pentris plurajn murpentraĵojn en publikaj ejoj kiel lernejoj, restoracioj kaj porinfanaj malsanulejoj. Ŝi estis ankaŭ ilustristo. Ŝi mem faris la ilustraĵojn al siaj libroj kaj al verkoj de aliaj aŭtoroj.

Ŝiaj libroj, ĉefe la serio pri Muminvalo, estas tradukitaj al 45 lingvoj. Ĉi-jare pasis 80 jaroj de la apero de la unua libroforma rakonto. Estas bona okazo prezenti ŝin ankaŭ pro tio, ke Esperanto-Asocio de Britio eldonis, kun financa helpo de Fondumo Esperanto, tutan serion da muminlibroj en Esperanto. Entute aperis sep libroj, la lastaj en 2024.



Ulrich Matthias prelegos

Ulrich Matthias (Germanio), kiu en Kaŭno prelegos pri du temoj. Ĉi-sube legu pli pri li kaj pri liaj prelegoj prezentotaj en BET-59.

Ulrich Matthias naskiĝis en 1966 en Germanio kaj lernis Esperanton en 1986 kiel studento pri matematiko en Heidelberg. Li doktoriĝis tie en 1994 kaj nuntempe laboras kiel matematikisto en granda asekura konzerno. Ekde sia esperantistiĝo, li seninterrompe aktivas en la movado ekzemple per verkado, informado kaj kunorganizado de esperantaj aranĝoj. Lastatempe li kunlaboras aparte kun esperantistoj en Malagasio.

En BET-59 Ulrich Matthias prezentos du prelegojn:

1. Esperanto en Afriko

Kunlaboro inter eŭropaj kaj afrikaj esperantistoj povas esti multrilate tre utila: Ĝi povas helpi superi malriĉon kaj samtempe popularigi nian lingvon en Afriko. Nelaste, tia kunlaboro povas ankaŭ helpi plialtigi la reputacion de Esperanto en Eŭropo. Post du vojaĝoj al Malagasio en 2024 kaj 2025 kaj jardekoj da amikaj kontaktoj kun afrikaj esperantistoj, Ulrich Matthias rakontos pri siaj spertoj pri tia kunlaboro. Li parolos, interalie, pri helpaj projektoj kaj aparte pri la ideo organizi pli da internaciaj Esperanto-aranĝoj en Afriko.

2. Esperanto kaj anima frateco

“Anima frateco” (en naciaj lingvoj oni parolas ankaŭ pri “animaj parencoj”, “animaj kunuloj” aŭ “animaj ĝemeloj”) estas profunda ligo inter du homoj. En malfacilaj tempoj de soleco, deprimado aŭ konfliktoj, la ekzisto de anima frato aŭ fratino povas doni gravan konsolon. Ni parolos pri la karakterizaĵoj de anima frateco. En la Esperanto-movado, ni kutimas paroli pri “samideanoj”, dum la koncepto de anima frateco trovis ĝis nun malmulte da atento. Ĉu la fakto, ke multaj esperantistoj sentas animan fratecon kun Zamenhof, povas helpi al ni trovi animajn gefratojn en nia movado?

Libroj de U. Matthias en la libroservo de UEA: <https://mallonge.net/matthias>
Lia retejo en Fejsbuko: <https://www.facebook.com/umatthias>

Konatiĝu kun Giorgio Silfer

Giorgio Silfer, konata Esperanto-kulturaganto, ĉi-sube mem prezentas sin kaj siajn kontribuaĵojn al BET-59.

Giorgio Silfer estas pedagogo kaj andragogo edukita en la itala. En 1970 li kunfondis la kulturalan revuon “Literatura Foiro”, kiun li ĉefredaktis ĝis 1980: la revuo aperas jam la 56an jaron. Iniciatis la Esperantan PEN en 1991 (kun István Nemere kaj Perla Martinelli) kaj en 1993 akiris la agnoskon pri esperanto kiel literatura lingvo fare de la verkistara mondkongreso. En 1996 li estis unu el la gravaj subskribintoj de la Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj. Ĉefa teoriulo de raŭmismo, li kontribuis al la kreo de la Esperanta Civito, modelita kiel subjekto de internacia juro, kun tute novaj organiza kaj jura koncepto, ne nur por Esperantio.



Silfer estis politike aktiva (ĝis membreco en la nacia konsilantaro) en la Itala Respublikana Partio, maldekstrema sed ne socialisma. Li oficis dum tri mandatoj kiel funkciulo de la Parlamento de Lombardio. Kiel instruisto kaj trejnistoj li aktivis en Italio, Finnlando, Svislando, Bulgario, Hispanio, Meksiko kaj afrikaj landoj.

Giorgio Silfer estas la plej grava vivanta dramverkisto en Esperanto, en kies teatron li enkondukis diversajn ĝenrojn. Krom pli ol dudek dramoj kaj tri poemaroj en esperanto, li publikigis romanon en la itala kaj ĉirkaŭ du mil artikolojn, eseojn kaj alion en diversaj lingvoj. Li verkis/tradukis/adaptis ankaŭ la tekstojn de kvindeko da kanzonoj, precipe por Gianfranco Molle, Nikolin' kaj Anjo Amika. "Mestre de gai saber" en la Internaciaj Floraj Ludoj (Katalunio).

Li editoris la ĉapitron "Lingue internazionali" por "Grande Dizionario Enciclopedico" UTET. Li reviziis la referencan enciklopedion pri inventitaj lingvoj "Aga Magéra Difúra", eldonitan de Zanichelli. Kun Carlo Minnaja li aŭtoris la 748-paĝan "Historio de la esperanta literaturo" (2015). Per Grañén Porrua en Meksiko li eldonis "Breve historia cultural de la comunidad esperantófono", tradukitan de María Elena Ruiz Cruz (2019). En Meksiko li publikigis ankaŭ "La casa del enterrador y otros cuentos hispánicos" (originale en la kastilia).

Dum BET-59 Giorgio Silfer prelegos pri "Perspektivoj de la nuna Esperantio", surbaze de dokumentoj el la simpozio, organizita de Kultura Centro Esperantista en Svislando (2024). Li ankaŭ prezentos proprajn originalajn kamiŝibajojn, tio estas mallongaj teatraĵoj rakonte kaj kastelede, laŭ japana tradicio, kiun li tre bone konas, kvankam li neniam vizitis Japanion.

Konatiĝu kun Perla Martinelli

Perla Martinelli, doktoro pri modernaj lingvoj kaj literaturoj, aktivis ekde 1972 en la medio de *La Patrolo*, kaj en 1980 transprenis la ĉefredaktadon de *Literatura Foiro*, kiun ŝi lasis por ekrespondeci pri *Heroldo de Esperanto* kaj ekde 2006 pri la kunfondita revuo *Femina*, organo de Feminisma Esperanta Movado. Ekde 2019 ŝi reprenis kaj plu tenas la gvidadon de *Literatura Foiro*.

Akademiano de Esperanto ekde 1988, ŝi estis elektita ĝenerala sekretario en 1996. Prezidanto de Svisa Esperanto-Societo (1994-97), de Kultura Centro Esperantista (2009-11 kaj 2017-23), komitatano de Kooperativo de Literatura Foiro. Ekde 2020 prezidanto de la Lingva Komitato de la Esperanta Civito.



Kun sia edzo Giorgio Silfer, ŝi partoprenis la fondon de pluraj gravaj iniciatoj, interalie la Esperanta PEN-Centro, kies akcepton ĉe PEN-Klubo Internacia ŝi atingis en 1993.

Kun Gaston Waringhien ŝi tradukis la unuajn *Tri Tagojn* de Dekameron. Aliaj plej gravaj tradukoj: *La ruza vidvino* de Carlo Goldoni, *Finalo de partio* de Samuel Beckett, *Asertas Pereira* de Antonio Tabucchi.

Dum BET-59 Perla Martinelli prezentos la lastajn eldonaĵojn de LF-koop (Kooperativo de Literatura Foiro).





Birutė Prekevičiūtė kaj ŝia spektaklo

Birutė Prekevičiūtė – litova aktorino, teatra pedagogino, kaj direktorino de la publika institucio “Bravo teatro”. Ĉi-sube ŝi rakontas pri si kaj pri sia kontribuo al la arta programo de BET-59.

Dum pli ol dek kvin jaroj en mia vivo estas multaj laboraj agadoj. Mi ludas en spektakloj por infanoj kaj plenkreskuloj, instruas al infanoj arton de aktorado, kudras kostumojn por spektakloj. Ĉi-lasta agado evoluis el mia ŝatokupo.

Dum la lastaj kvin jaroj, mi plejparte aktoras por infanoj. Mi tre ĝojas, ĉar mi kvazaŭ trovis klaran, fortan ligon kun junaj spektantoj. Infanoj estas bonega publiko. Ili estas kiel lakmusa papero – ili tuj montras, ĉu spektaklo estas bona aŭ ne.

Mi ankaŭ instruas en lernejo. Mi gvidas dramstudion. Mi povas ĝoji, ke la nombro de infanoj, kiuj volas aktori, daŭre kreskas. Ĉi-jare mi havas kvar grupojn kun sume pli ol 80 lernantoj. Se tiom estus en la tuta urbo, tiu nombro eble ne ŝajnus granda, sed en unu sola lernejo tiu kvanto de infanoj, kiuj volas sin prezenti sur la scenejo, estas impona.

Unu el la interesaj projektoj estis la lernado de Esperanto. Tio kulminis en la kreado kaj realigo de la teatra projekto “Barbora Radvilaitė” en Esperanto. Barbora Radvilaitė estis unu el la plej belaj virinoj de Litovio, ikono de sia epoko, kiu sidiĝis sur la reĝina trono pro amo kaj ankaŭ pro politikaj intrigoj.

Litovio de Barbora

Barbora Radvilaitė (1520-1551) estis membro de la fama litova nobela familio Radvilos. La reĝo de Pollando, Sigismondo Aŭgusto, estis profunde enamiĝinta al ŝi. Malgraŭ la forta kontraŭo de lia patrino, Bona Sforza, kaj la pola nobelaro, ili finfine geedziĝis. Antaŭe, lia unua edzino estis Elizabeta de Aŭstrio.

Barbora Radvilaitė estis konata pro sia granda beleco, saĝeco, nobeleco kaj sentemo. Bedaŭrinde, nur tridekjara ŝi mortis baldaŭ post sia kronado. La reĝo Sigismondo Aŭgusto profunde funebris ŝian forpason.

Verkita laŭ la dramo “Barbora Radvilaitė” de J. Grušas

Aktoras Birutė Prekevičiūtė

Tradukis Aida Čižikaitė

Foto: Remis Ščerbauskas



Konatiĝu kun Eŭheno Kovtonjuk

Eŭheno Kovtonjuk naskiĝis en Podolia vilaĝo de Ukrainio, diplomiĝis en Nacia akademio pri nutrajaj teknologioj en Odeso kaj en la universitato de Kansaso (Usono). Laboris en uzinoj, bankoj, gvidis tutlandan asocion de grenproduktantoj, finis la karieron kiel vicministro pri grenproduktado en Ukrainio. Dum la lastaj 25 jaroj Kovtonjuk laboras kiel fotoesploranto sub aŭspicio de Unesko. Liaj personaj fotoekspozicioj estas montritaj en Kijivo, Novjorko, Londono, Ĝenevo (ĉe UN) k. a. Li estas honora profesoro de Ukrainia Industria Akademio kaj Svisa internacia akademio pri juro, ekonomio kaj lingvoj (Montreux, Svislando).

Eŭheno Kovtonjuk esperantistiĝis en 1979, prezidis la ĉefurban Esperanto-klubon “Ora Pordego”, estis kunfondinto de Ukrainia Esperanta Asocio (UkrEA) en 1989 kaj

ties unua prezidanto, honora prezidanto de UkrEA. A-komitatano de UEA, fondinto kaj prezidanto de la bonfara fonduso nome de Vasil Eroŝenko “Espero” de 2007, kiu esploras kaj popularigas la vivon kaj verkaron de V. Eroŝenko. Li estas redaktoro de ukraina-Esperanta vortaro-minimumo (1998) kaj kunaŭtoro de granda Esperanta-ukraina vortaro (2007).

Al la programo de BET-59 Eŭheno Kovtonjuk kontribuos per prelego “La vivo kaj verkado de la blinda ukraina esperantisto Vasilij Eroŝenko”.

Sigita Railaitė-Sičiūnienė koncertos en Kaŭno



La litova muzikistino ĉi-sube mem prezentas sin kaj sian kontribuon al la arta programo de BET-59.

Mi estis muzikkapabla ekde la infanaj tagoj. En la aĝo de ses jaroj mi eniris la klason de violono en la muzika lernejo de Panevėžys, poste mi studis en la muzika kolegio. En 1988 mi diplomiĝis ĉe la klaso de aldo en la Litova Muzika Akademio. Ekde tiam mi laboris en la muzika lernejo de Panevėžys instruante violonon kaj ludis en la Simfonia Orkestro de Panevėžys.

Mia konatiĝo kun Esperanto okazis pere de mia karmemora patrino Janina Railienė. Ŝi frue emeritiĝis kaj ekstudis Esperanton. Lerninte la lingvon ŝi partoprenis en la Esperanto-movado, en esperantistaj renkontiĝoj kaj kongresoj en Litovio kaj en eksterlando. Estante romkatolika, ŝi partoprenis ankaŭ en la agado de romkatolikaj esperantistoj.

Mia patrino klopodis altri min al lernado de Esperanto kaj al partopreno en aranĝoj. Mia unua vojaĝo per Esperanto okazis en 1988, kiam mi post diplomiĝo en Muzika Akademio partoprenis en la festivalo de Esperantaj ĥoroj en Bulgario, kiun organizis Dimitar Terziev. En 2016 mi muzikis en katolika Esperanto-kongreso. En 2019 mi partoprenis kaj ludis en la 55aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiuj okazis en mia naskiĝurbo Panevėžys. En Majo 2023 mi prezentis muzikan programon dum la printempa renkontiĝo de litovaj esperantistoj, kiu okazis en Antalkiai de Kaŭna distrikto.

Nuntempe mi jam kelkajn jarojn loĝas en Islando. Mi ĝojas ke mi povas kontribui al Esperantaj kulturaj aranĝoj, kiuj okazas en mia patrujo Litovio.

En la muzika programo, kiun mi prezentos en BET-59, sonos klasika kaj popola muziko de diversaj popoloj.

Spektu “Doktoron Esperanto” de Mario Migliucci

Mario Migliucci naskiĝis en 1975 kaj doktoriĝis pri historio kaj filma kritiko ĉe Universitato “La Sapienza” en Romo; li entreprenas irvojon cele al teatra muldiĝo pere de multnombraj kaj heterogenaj laboratoriaj spertoj. Ekde 1998 li laboras kiel teatra aŭtoro kaj aktoro, surscenigante kiel aŭtoro kaj interpretisto la spektaklojn “Doktoro Esperanto”, “Primo Sguardo” (Unua Rigardo), “Diario Elettorale” (Balota Taglibro)



Li laboras, interalie, por teatra adapto de la romano “La ragazza e il professore” (La Knabino kaj la instruisto) de Jean-Claude Carrière, realigante la spektaklon “Bussando alla porta” (Frapante ĉe pordo de Einstein), reĝisorado de Giles Smith, kies interpretisto li ankaŭ estas. En 2018 enscenigas “Il bambino sogna”



(La infano sonĝas) de Hanoch Levin, reĝisorata de Claudia della Seta.

En BET-59 Mario Migliucci prezentos sian spektaklon “Doktoro Esperanto”. Doktoro Esperanto estas Lejzer Ludvik Zamenhof kaj ĉi tiu estas lia vivrakonto. La rakonto pri homo, kiu volas doni al la mondo unikan voĉon, homan voĉon. Kiel laborema metiisto, doktoro Esperanto, la vireto kun okulvitroj, fabrikas sian instrumenton kaj ĝin

proponas al kiu ajn ĝin volas utiligi.

Sed lingvo estas aparta instrumento, ne kreebla de la hodiaŭo al morgaŭo. Tiu ĉi rakonto konsistas el turoj kaj el homoj, kiuj ilin konstruas. Kiel aliaj homoj antaŭ li, Lejzer neglektas la ŝtonon kaj preferas la brikon. La brikoj de Lejzer estas vortoj kaj lia lingvo estas Esperanto.

Konatiĝu kun Valdas Striužas

Valdas Striužas el Litovio. Legu lian memprezenton: Mi devenas de la provinca distrikto Biržai kaj nun loĝas en Vilno. Mi finis la klason pri kantado en la supera muzika lernejo Tallat-Kelpša (nun konservatorio), studis kaj diplomigis kiel historiisto ĉe la fakultato de historio de la Vilna Universitato, kaj laboras kiel heredaĵprotektanto. Mi kantas diversajn klasikajn kantojn, operajn ariojn, preĝkantas kristanajn kantikojn.



Mia frato Vidmantas estis bonega esperantisto. Ni kune vojaĝis al pluraj Esperantaj kunvenoj, partoprenis en vesperaj amuzprogramoj. Ankaŭ min interesas Esperanto. Mi iomete parolas, verkas, legas en Esperanto. Mi ŝatas kanti konatajn, klasikajn kantojn en Esperanto.

En BET-59 mi kantas en Esperanto la konatajn kantojn de litovaj kaj eksterlandaj komponistoj: “Nia mateno” de Lionginas Abarius kaj Kazys Bradunas, “Tiel bele min kreskigis” de Vytautas Mikalauskas kaj Justinas Marcinkevičius, “Vin renkonti ree mi deziras” de Konradas Kaveckas kaj Vaidotas Spudas, napolan serenadon de Salvatore Gambardella kaj Gennaro Ottaviano “Maristeto”, “Ho, suno mia” de Eduardo di Capua kaj Giovanni Capuro, “Serenado” de Franz Schubert kaj aliajn kantojn. Min akompanos la profesia akompanistino Jurgita Umaraitė.

Miksita ĥoro “Gintaras” koncertos en BET-59



La ĥoro “Gintaras”, koncertos dum la solena malfermo de BET-59. La historio de la miksita ĥoro de Kaŭna Kultura Centro “Gintaras” (Sukceno) komenciĝis en 1936, kiam la kulturaganto Antanas Olšauskas kune kun koncertestro prof. Balyš Dvarionas invitis ariĝi ok virojn kaj la saman nombron da virinoj por

kunveni. Tiel naskiĝis miksa ĥoro kaj eksonis la unuaj kantoj.

Ekde 1976 la kolektivon gvidis Leokadija Januškienė. “Gintaras” plurfoje gajnis premiajn lokojn en respublikaj konkursoj: en 1985, en la konkurso dum la respublika Festo de Kantoj, “Gintaras” estis agnoskita kiel la plej bona miksita ĥoro en Litovio; en

la jaro 2000 la ĥoro ricevis en la respublika konkurso “Ora Birdo” la titolon “La Plej Brila Stelo de Litovio” pro siaj meritoj al la Litova kulturo.

Ekde 2009 la ĥoron “Gintaras” gvidas Jovita Kulakauskienė. “Gintaras” reprezentas la arton de la litova ĥora muziko en eksterlandaj konkursoj kaj festivaloj, kaj aktive koncertas en litovaj urboj kaj distriktoj.

La ĥoro vizitis Germanion, Kartvelion, Bulgarien, Kubon, Francion, Aŭstrion, Kroation, Italion, Pollandon, Ĉeĥion. En ĝia repertuaro estas multaj kantoj “a’capella” de litovaj kaj eksterlandaj komponistoj, litovaj popolkantoj, klasikaj kaj nuntempaj muzikaj verkoj el Litovio kaj aliaj landoj. La ĥoro “Gintaras” kunlaboras kun la Kaŭna Simfonia Orkestro kaj solistoj, kun kiuj ĝi prezentis multajn grandskalajn verkojn.

Laŭ iniciato de la gvidantino ekde 2014 en la Kaŭna Kultura Centro estas organizata la respublika festivalo “Atendante la Tri Reĝojn”.

Konatiĝu kun Kristin Tytgat

Kristin Tytgat estas Esperanto-aktivulino el Belgio. Ŝi naskiĝis la 22an de Septembro 1955 en Ekeren, Belgio. Ŝi estas la pli aĝa fratino de Ite Tytgat kaj ankaŭ loĝas en Antverpeno. Kristin naskiĝis en Esperanta familio kaj estas aktiva esperantisto dum 50 jaroj. De 2018 ĝis 2024 ŝi estis la prezidanto de Belga Esperanto-Federacio.

Kristin studis lingvojn kaj ilian kulturon. Dum la profesia vivo ŝi instruis al tradukistoj kaj interpretistoj en la Libera Universitato de Bruselo.

Parte pro tiu laboro, parte pro la kontaktoj en Esperantujo ŝi spertiĝis pri interkulturaj rilatoj. Ankaŭ la multjara organizo de universitataj programoj pri interŝanĝoj de studentoj kaj docentoj inter Okcidenta kaj Orienta Eŭropo donis al ŝi multe da valoraj spertoj de interkultura komunikado.

En Esperantujo ŝi ofte gvidas seminariojn pri tiu temo. En la 109a Universala Kongreso en Aruŝo ŝi pasintjare organizis seminarion kun prelego kaj ekzercoj pri interkultura komunikado kunlabore kun la prezidanto de UEA, Duncan Charters.

En BET-59 Kristin Tytgat intencas prelegi pri diversaj aspektoj de interkultura komunikado. Esperantistoj havas komunan lingvon sed ne komunan referenckadron de normoj kaj valoroj por bone kaj klare komunikiĝi. En la prelego ŝi precizigos tiun elirpunkton kaj serĉos kune kun la partoprenantoj vojon por sukcese kaj efike komunikiĝi lingve kaj nelingve. Tio ebligos bone kompreni kaj respekti unu la alian. Dum la diskutado la partoprenantoj estas petataj aktive partopreni kaj kontribui surbaze de siaj vivspertoj.



Konatiĝu kun Manfred Westermayer

Manfred Westermayer el Germanio. Jen lia memprezento: En 1980 mi komencis lerni Esperanton. Mi estas membro de la Verda Partio “Die Grünen”. La interna ideo de Zamenhof bone kongruis kun mia politika konvinko. Mi tradukis la “Paroladon de Tribestro Seattle” (de 1860) pri la respondeco kontraŭ la natura medio.

Mi aliĝis al UEA, GEA kaj AIS. Mia unua UK estis en 1982 en Antverpeno. Mia edzino (ŝi mortis 2020) nur iomete komprenis Esperanton, tamen ŝi akompanis min al kongresoj de EEU en Verona kaj Oostende. Ni ofte havis eksterlandajn gastojn. En 1985 dum UK en Augsburg mi renkontiĝis kun Billy



Waldon (Seqvojah) el Usono, kiu pro politikaj kialoj estis kondamnita al mortpuno, ĉefe ĉar li informis internacie pri la malbona ŝtata konduto kontraŭ indiĝenoj. En 1997 mi partoprenis la internacian renkontiĝon Eŭropo-Azio en Jakaterinburgo, de tie mi iris al Samarkando kaj proksime al la Arala Maro; kaj al Irano. Mi partoprenis esperantistajn aranĝojn en Baltio kaj plurajn UKojn en Eŭropo, ankaŭ en Pekino (2004).

Mi studis kemion, kolektis kemiajn terminojn en Esperanto de diversaj fontoj kaj eldonis trilingvan terminaron. Mi interesiĝas pri naturprotektado, kulturas en ĝardeno. Ekde 1992 mi estas sekretario de Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE), kiu informas Verdajn Partiojn pri Esperanto. Ekde 2006 mi subtenas evolu-helpajn projektojn ĉefe en Tanzanio, DR Kongo kaj Burundo. Pliajn informojn pri AVE legu en nia retejo: <https://verduloj.org/>.

Priskribo de miaj proponitaj temoj por prezentado en BET-59:

Marĉoj: naturaj kondiĉoj kaj rilato kun la klimato, ĉar tutmonde ĝi estas la plej urĝa temo: La influo de homaj agadoj: sekigi marĉojn eligas CO₂. Krome, marĉoj subtenas altan biodiversecon, tamen eblas utiliĝi ilin.

Milito kaj Klimato & Ekologio: ekzemple, la milito de Putin kontraŭ Ukrainio: historiaj kaŭzoj ekde 1991, la rolo de la "Okcidento", de UN kaj de aliaj regantoj. Kiel eblas fini ĉi tiun militon inter la gefrataj nacioj? Kiom granda estas la efiko al la klimata trovarmiĝo.

Nijolė Žambaitė: Mitoj pri diplomatio kaj diplomatoj

Nijolė Žambaitė, Litovia ekonomikistino kaj diplomatino. Ŝi studis ekonomian kibernetikon en la Vilna Universitato kaj magistriĝis en 1977. Ŝi laboris en la Instituto pri Ekonomiko de la Litova Akademio de Sciencoj kaj doktoriĝis pri aplika matematiko. Samtempe ŝi instruis en Vilna Universitato.



Ekde 1987 en Litovio komenciĝis movado por retiriĝi el Sovetunio, kaj dum 1988-1993 ŝi aktive partoprenis en tiu agado en la Litova Akademio de Sciencoj kaj en la komitato de ekonomika reformo en la Litova Parlamento. En 1989 ŝi kunaŭtoris la unuan merktekonomian lernolibron en Litovio kaj en 1990 kunfondis Instituton de libera merkato, kiu daŭre aktivas hodiaŭ. Dum 1993–94 ŝi laboris kiel ekonomia konsilisto ĉe la reprezentejo de Internacia Mona Fonduso en Litovio.

Žambaitė komencis sian diplomatan karieron fine de 1994 en Londono ĉe la Ambasado de Litovio en Britio kaj Nord-Irlando, kiel ekonomia konsilisto, kaj poste kiel aferŝarĝito ĉe la sama ambasado. De 1999 ĝis 2003 ŝi estis ministro-konsilisto pri ekonomiaj rilatoj ĉe la Litovia ambasado en Usono, respondeca, interalie, pri intertraktadoj kun Usono pri membreco en la Monda Komerca Organizo.

En 2004-05 Žambaitė servis kiel konsilisto de la prezidento de Litovio V. Adamkus, kaj poste kiel direktoro de departemento pri ekonomia sekurecpolitiko ĉe la ministerio de eksteraj aferoj. Ekde 2006 ŝi estis ambasadoro de Litovio en Belgio, kaj ekde 2007 en Luksemburgio. Ŝi lernis Esperanton kiel 14-jara lernantino en kurso gvidata de la eminenta litova esperantisto V. Ŝilas. Jam dum siaj lernejaraj jaroj ŝi estis en la estraro de la Vilna junulara Esperanto-klubo "Juneco". Kiel studentino, kaj poste dum sia scienca esplorado, ŝi partoprenis en multaj Esperanto-aranĝoj, tendaroj kaj renkontiĝoj. Nun d-rino Nijolė Žambaitė estas prezidanto de Vilna Esperanto-Societo. En BET-59 ŝi prelegos ne tre serioze pri serioza profesio: "Mitoj pri diplomatio kaj diplomatoj".

Ekskursa programo BET-59

En la programo de la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-59), kiuj okazos la 5-an kaj la 13-an de Julio 2025 en Kaŭno (Litovio), estas planitaj kvar duontagaj kaj du tagtagaj ekskursoj. Ĉi-sube estas konciza priskribo de la ekskursa programo.

Duontagaj ekskursoj

I. Panoramoj de Kaŭno

Bonvenon al Kaŭno (lit.: *Kaunas*), la urbo de arkitekturo, historio, naturo, personecoj, sonoj, koloroj kaj gustoj. Ĉiuj urboj estas pitoreskaj de alteco de birda flugo. Pro tio ke Kaŭno situas en la valoj de du kunfluantaj riveroj, eblas de la terasoj ĉe la rivero kaj ankaŭ en la terasoj de la famaj konstruaĵoj admiri la urbon desupre.



Komence ni ĝuos de la teraso sur la tegmento de la Kaŭna ĉefdioceza palaco la kunfluan de la du plej grandaj riveroj de Litovio: Nemano (lit.: *Nemunas*) kaj Neris. De la observejo sur la monto Aleksotas la tuta malnova urbo videblas kvazaŭ sur manplato. Kaŭno estas fama pro sia natura diverseco. Kiam ni venos al la Artefarita maro de Kaŭno, ni de la kastelmonto Papiliakalnis ekvidos la maron de Kaŭno kaj la barokan ĉefverkon en la malproksimo – la monaĥejon Pažaislis. Reveninte al la urbo, ni prenos la lifton al la tegmento de la preĝejo de Resurekto de Kristo, kaj ni vidos la urbon el alia angulo, kaj por la fino de la ekskurso, en kafejo, situanta sur la tegmenta teraso de malnova konstruaĵo, rigardante al la koro de la urbo – la Katedralo – ni trinkos kafon aŭ teon kun deserto.

II. Ensemblo de la Palaco Raudondvaris

Monumento de la litova renesanca arkitekturo de la 17-a jarcento situas apud Kaŭno, sur la supra teraso de la dekstra bordo de la rivero Nevėžis, proksime al la kunfluo de Nevėžis kaj Nemano. La palaco kune kun du oficejaj konstruaĵoj, oranĝerio, ĉevalejoj kaj glaciaĵejo situantaj sur la parka areo (3,8 ha), formas unuecan grandbieran ensemblon. Dum la teatrigita ekskurso, danke al la sinjorino de la Renesanco, ni ekkonos la historion de la grandbieno kaj de ĝiaj plej elstaraj posedantoj. Ni konatiĝos kun la fama amhistorio de Barbora Radvilaitė (Barbara Radziwiłówna) kaj grandduko Žygimantas Aŭgustas (Zygmunt II August), kaj kiel ili rilatis al ĉi tiu bieno. Por la fino de la ekskurso, ni estos invititaj al la plej luksa salonego de la grandbieno – la Blanka Gastoĉambro kiu memoras bankedojn kaj muzikon de orkestro de la grafo, kie ni lernetos la paŝetojn de renesancaj dancoj.



III. La monaĥejo de Pažaislis

Dum ĉi tiu ekskurso ni vizitos la monaĥejon de Pažaislis, konstruitan en la 17a jarcento kaj la preĝejon de la vizito de la Virgulino Maria al Elizabeto, kiuj situas ĉe la Kaŭna maro. Tio estas unu el la plej belaj ensembloj de malfrua baroko en nordorienta Eŭropo. Tiu ĉi ensemblo havis multajn posedantojn, kaj por ĝia fondinto Kristupas Zigmantas Pacas ĝi estis loko netuŝita de civilizacio, kie oni kreas la iluzion de paco kaj disiĝo de la mondo. La familio Pacas estas fama kaj influa familio, kiu lasis la rimarkeblajn spurojn en la historio de Litovio.



La monaĥejo havas jam pli ol tricent-jaran historion; ĉirkaŭplektita per legendoj, ĝi estas fascina pro siaj unika baroka aspekto kaj kolorplena ĉirkaŭaĵo.

Nuntempe, monaĥinoj de la Kazimira ordeno loĝas en la monaĥejo, parto de la monaĥejo estas luigita al la restoracio kaj hotelo. Ĉiujare sur la teritorio de la monaĥejo okazas la fama muzika festivalo de Pažaislis.

IV. La Padoj de Anĝeloj

Se vi volas eksenti vin en nekutima mondo, ni invitas vin iri al la muzeo de la fama litova pentristo kaj komponisto Mikalojus Konstantinas Čiurlionis, kie ni surmetos okulvitrojn de virtuala realeco kaj vojaĝos en la “Padoj de Anĝeloj” tra la magia mondo de Čiurlionis.



La artistoj Kristina Buožytė, Vitalijus Žukas kaj Mindaugas Urbaitis kreis la unikan sperton, kie la videbla mondo de Čiurlionis unuiĝas kun muziko kaj kun 60 bildoj kaj fragmentoj de la bildoj. En la virtuala spaco unuiĝas muziko kaj pentraĵoj, tio rekreas harmonian mondon, kiun, danke al virtuala realeco, ni povos sperti de interne. Dum 20 minutoj de la filmo la medio reagas al la rigardo de la spektanto – la rakontanto tiel gvidas nin tra la “Padoj de Anĝeloj” montrante simbolojn, permesante al ni mem sperti kaj travivi la vojaĝon.

Tuttagaj ekskursoj

I. Regiono Vilkaviškis, kie Esperanta Glaciaĵo estas produktata

La regiono Vilkaviškis situas ĉe la landlimo kun Pollando kaj Kaliningrada regiono de Ruslando. Survoje al la regiono de Sūduva, kiu famas pro la entreprenemo de la loĝantaj tie suvalkianoj, ni haltos ĉe unu el ses naturaj rezervejoj de Litovio – la biosfera rezervejo Žuvintas, kiu troviĝas en la plej granda marĉo en Litovio. En 2011 ĉi tiu rezervejo estis inkluzivita en la tutmondan reton de biosferaj rezervejoj ĉe Unesko. Multaj birdoj nestas ĉi tie, oni observis ĝis 231 speciojn de birdoj, estis trovitaj 239 speciojn de fungoj, estas registritaj ĉirkaŭ 2000 specioj de insektoj, ktp. Dum la ekskurso ni vizitos la informcentron, promenos sur 500-metra natura vojo.



Survoje al Vilkaviškis, ni haltos ĉe la ruinoj de la klasikisma preĝejo Bartninkai, kiu estis parte detruita dum la Dua Mondmilito. Veninte en Vilkaviškis, ni havos mallongan konatiĝon kun la urbo, gustumos Esperantan glaciaĵon. La fabriko de glaciaĵo en Vilkaviškis, kiu havas Esperantan nomon “Artglacio”, produktas ĉirkaŭ 200 specojn de glaciaĵo. Eĉ koŝera glaciaĵo por la merkato de Israelo estas farata, kaj la produktado estas kontrolata de rabeno. La glaciaĵo, produktita ĉi tie, elstaras pro sia kvalito. La glaciaĵo de Vilkaviškis atingas eĉ Kanadon, Usonon, Brition, Germanion kaj aliajn landojn de la mondo.

Fine de la vojaĝo ni vizitos la grandbienon Paežeriai. Ĝi estas ne nur la fieraĵo de la loĝantoj de Vilkaviškis, ne nur la disvastigejo de kulturo kaj historio, sed ankaŭ la loko de doloraj turnoj en la destinoj. Ni ekscios pri tio de la rakontoj de la grandbiena gvidisto, kaj la protagonistoj de la grandbienaj legendoj renaskiĝis kiel kverkaj skulptaĵoj en la parko.

II. Trakai – la malnova ĉefurbo de Litovio

Ni invitas vin al la malnova ĉefurbo de Litovio – Trakai, kie interplektiĝas jarcentoj da historio, kulturo kaj mirinda naturo. Ni vizitos la rezidejon de la regantoj de la Granda Duklando Litovio – la insulan kastelon Trakai. Trakai estas ne nur ĉarma insula kastelo en la lago Galvė, sed ankaŭ la grandbienoj, komunumo de karaimoj kaj ties kultura kaj kuirarta heredaĵoj. Ni agrable plilongigos konatiĝon kun la kulturo de ĉi tiu popolo gustumante pladon de la karaima kulinara heredaĵo – kibinai.



Ni boatos sur la lago Galvė al unu de la plej belaj parkoj de Litovio – Užutrakis. La iama rezidejo de la grafoj Tiškevičiai post la restaŭrado ekbrilis per novaj koloroj. Ni ekscios pri la familio Tiškevičiai, vizitos la palacon de la grandbieno Užutrakis kaj promenos en la grandbiena parko.

La finon de la vojaĝo kronos la Monteto de Anĝeloj, kie pli ol 40 kverkaj kapeletfostoj salutas la ĉielon en la areo de 4,3 hektaroj. En la formo de anĝeloj estas prezentitaj Vivo, Vero, Paco, Anima trankvilo, Kompato, Sinoferemo, Amo, Dankemo, Espero... La monteton ornamas ankaŭ via anĝelo, kiun vi devos trovi kaj viziti. **Antanas Visockas**

Senpaga publika trafiko en Kaŭno

La 15-an de Januaro en la urba municipo de Kaŭno okazis organiza kunsido, kiun partoprenis la vicurbestro Mantas Jurgutis, la vicdirektoroj de la urba administracio



Gediminas Barčauskas kaj Eglė Andriuškienė kaj la prezidanto de LEA Povilas Jegorovas.

La urbo konsentis provizi senpagan veturadon per urbaj busoj kaj trolebusoj por la partoprenantoj de BET-59 kun la nomŝildoj dum tuta la periodo, ekde la 5-a ĝis la 13-a de Julio. Informojn pri tio ricevos ĉiu partoprenanto de BET-59 ĉe la registrado. Tio estas tre grava kontribuo al BET-59 flanke de la urbo.

Laŭlanda statistiko de la aliĝintoj al BET-59

Laŭ la stato de la 14-a de Junio 2025 aliĝis 256 BET-partoprenantoj el 31 landoj.

La aliĝado daŭras, nombro de la aliĝintoj kreskos.

Litovio – 78

Pollando – 35

Koreio – 16

Germanio, Italio, Latvio – po 15

Francio – 12

Rusio – 9

Belgio – 7

Estonio, Finnlando, Ukrainio – po 6


Ukrainio – 5

Svedio, Svislando – po 4

Hungario, Komoroj, Nederlando, Pakistano – po 3

Hispanio, Israelo, Katalunio – po 2

Australio, Britio, Burundo, Ĉeĥio, Kanado, Kongo, Luksemburgo, Skotlando, Turkio,
Ugando – po 1



Listo de la aliĝintoj al BET-59

1. Povilas JEGOROVAS – Kaunas, Litovio
2. Asta NASTARAVIČIŪTĖ – Kaunas, Litovio
3. Irena JAGMINAITĖ – Kaunas, Litovio
4. Gražvydas JURGELEVIČIUS – Kaunas, Litovio
5. Gražina OPULSKIENĖ – Mažeikiai, Litovio
6. Tetiana KOLOMIIEC – Kijivo, Ukrainio
7. Taesok CHOE – Vilnius, Litovio
8. Jolanta BULOTĖ – Vilnius, Litovio
9. Vita PETRONYTĖ – Vilnius, Litovio

10. Olga STROJEVA – Vilnius, Litovio
11. Jolita RUŽAUSKIENĖ – Vilnius, Litovio
12. Inesa BALAIKIENĖ – Vilnius, Litovio
13. Vera VALENTAITĖ – Jonava, Litovio
14. Tonu HIRSIK – Patika, Estonio
15. Mian Salam SHANY – Pakistano
16. Shagufta SALAM – Pakistano
17. Raja Altaf Gohar KHAN – Pakistano
18. Valdas KUBILIUS – Kaunas, Litovio

19. Virginija JOKUBKAITĖ – Kaunas, Litovio
20. Ada NAVICKIENĖ – Kaunas, Litovio
21. Vida KULIKAUSKIENĖ – Panevėžys, Litovio
22. Ulrich MATTHIAS – Wiesbaden, Germanio
23. Mikaelo LINECKIJ – Haifo, Israelo
24. Irina GONČAROVA – Odincovo, Rusio
25. Prof. Laura BRAZZABENI – Compitello, Italio
26. Arno LAGRANGE – Plaisance-du-Touch, Francio
27. Michela LIPARI – Roma, Italio
28. Mario MIGLIUCCI – Roma, Italio
29. Prof. Amri WANDEL – Modin, Israelo
30. Rein ZUBSBERG – Tartu, Estonio
31. Jean-Claude ROY – Chantepie, Francio
32. Suzana KORNICKA – Poznan, Pollando
33. Mirosław BARTKOWIAK – Poznan, Pollando
34. Marina MORITZ – Kista, Svedio
35. Kari PYYKKO – Rusko, Finnlando
36. Jeremie SABIYUMVA – Rumonge, Burundo
37. Giorgio SILFER – La Chaux-de-Fonds, Svislando
38. Živilė MACKEVIČIŪTĖ – Skuodas, Litovio.
39. Prof. Juozas AUGUTIS – Kaunas, Litovio
40. D-ro Teresė RINGAILIENĖ – Kaunas, Litovio
41. Janis DZELME – Priekuli, Latvio
42. Valdas STRIUŽAS – Vilnius, Litovio
43. Sigitas SIDARAVIČIUS – Kaunas, Litovio
44. Chajm A LANGHOLF – Visselhovede, Germanio
45. Sigita SIČIŪNIENĖ – Panevėžys, Litovio
46. Imre KEMENYFI – Szentendre, Hungario
47. Euheno KOVTONJUK – Kyjivo, Ukrainio
48. Natalja GERLACH – Hasselby, Svedio
49. JomArt AMZEYEV – Hasselby, Svedio
50. Manfred WESTERMAYER – Bonn, Germanio
51. Antanas VISOCKAS – Kaunas, Litovio
52. Algimantas PILIPONIS – Vilnius, Litovio
53. Dr. Vilma BIJEIKIENĖ – Kaunas, Litovio
54. Agnė AUGONĖ – Kaunas, Litovio
55. Aida ČIŽIKAITĖ – Kaunas, Litovio
56. Dalia PILECKIENĖ – Kaunas, Litovio
57. Vladimiras BERESNIOVAS – Kaunas, Litovio
58. Aleksander KORJHENKOV – Kaliningrad, Rusio
59. Aušrinė TAMOŠIŪNAITĖ – Kaunas, Litovio
60. Solveiga SADAUSKAITĖ – Vilnius, Litovio
61. Darius KUBILIUS – Kaunas, Litovio
62. Ramūnas NARBUTAS – Kaunas, Litovio
63. Jean-Marc LECLERQ (JOMO) – Tournefeuille, Francio
64. Virginija GURSKIENĖ – Kaunas, Litovio
65. Paulo MELIZ IRACHE – Monzon, Hispanio
66. Aleksander ZDECHLIK – Zabrze, Pollando
67. Raita Johanna PYHALA – Hyvinkaa, Finnlando
68. Inita TAMOŠIŪNIENĖ – Vilnius, Litovio
69. Karlo SPINOLA – Malaga, Hispanio
70. Rianne SANDERS – Wijchen, Nederlando
71. Ronald van BUUREN – Leeuwarden, Nederlando
72. Konde Fataki GLODY – Kinshasa, R. D. Kongo
73. Dalia POŠKIENĖ – Kaunas, Litovio
74. Kazimierz NOCULAK – Bobrowko, Pollando
75. Franciska TOUBALE – Victoria, Australio
76. Danutė STATKUVIENĖ – Kaunas, Litovio
77. Aleksandro SMIŠLAJEV – Riga, Latvio
78. Viktorija SMIŠLAJEVA – Riga, Latvio
79. Aleksandras KARPOVAS – Vilnius, Litovio
80. Vaida MATUZEVIČIENĖ – Kaunas, Litovio

81. Virginija BUDGINAITĖ – Šiauliai, Litovio
82. Virginija VENSLOVIENĖ – Kaunas, Litovio
83. Aleksejus KARPOVAS – Vilnius, Litovio
84. Liuda NARBUTIENĖ – Panevėžys, Litovio
85. Antanina FOKAITĖ – Kuršėnai, Litovio
86. Gražina NARBUTIENĖ – Panevėžys, Litovio
87. Jūrijus NARBUTAS – Panevėžys, Litovio
88. Vilija VYZIENĖ – Vilnius, Litovio
89. Nijolė STAKĖNIENĖ – Ukmergė, Litovio
90. Nijolė PETRAITYTĖ-JURKOVIC – Šiauliai, Litovio
91. Arimantas RAČKAUSKAS – Vilnius, Litovio
92. Irena ŠUKIENĖ – Kaunas, Litovio
93. Audronė MAKSIMAITIENĖ – Vilnius, Litovio
94. Gražvyda ŠKIKIENĖ – Kaunas, Litovio
95. Rimas ŠUOPYS – Kaunas, Litovio
96. Janis KALNINŠ – Rīga, Latvija
97. Biruta ROZENFELDE – Rīga, Latvija
98. Ite TYTGAT – Berchem, Belgija
99. Alex HUMET – Berchem, Belgija
100. Volodimir HURTOVENKO – Kijivo, Ukrainio
101. Lesja MELNICHUK – Kijivo, Ukrainio
102. Nina PIETUCHOWSKA – Bjalistoko, Pollando
103. Lee CHUNGWON – Seulo, Koreio
104. Han SUGHEUI – Seulo, Koreio
105. Lee MEE JEE – Seulo, Koreio
106. Younghee CHOI – Seulo, Koreio
107. Patrick HAERICK – Gent, Belgija
108. Kim TAEHEE – Seulo, Koreio
109. Aleksej SALOMATOV – Moskvo, Rusio
110. Iza WALENTYNOWICZ – Bjalistoko, Pollando
111. Istvan SZABOLCS – Budapešt, Hungario
112. Agnes SZABOLCSNE SAS – Budapešt, Hungario
113. Jeonghi AN – Seulo, Koreio
114. Park YOUNGHOON – Seulo, Koreio
115. Petra SEDIMEIER – Aalen, Germanio
116. Hariolf TRAUB – Aalen, Germanio
117. Utho MAIER – Aalen, Germanio
118. Ulla GALLE – Aalen, Germanio
119. Li HYONSUK – Seulo, Koreio
120. Youngran LEE – Seulo, Koreio
121. Sumi CHANG – Yong-city, Koreio
122. Mara TIMERMANE – Rīga, Latvija
123. Aija JOUNG – Seulo, Koreio
124. Kyongdok JEON – Seulo, Koreio
125. Diemantė ANIČIENĖ – Vilnius, Litovio
126. Elzbieta KRAWIEC – Szczecin, Pollando
127. Hoseop LEE – Keonggido, Koreio
128. Margarita ŽELVE – Rīga, Latvija
129. Anita ŽELVE – Rīga, Latvija
130. Liga SILINA – Cesis, Latvija
131. Janis KARKLINŠ – Vaidava, Latvija
132. Aina JANUŠEVSKA – Rīga, Latvija
133. Aldis BUŠS – Rīga, Latvija
134. Daina UNTULE – Rīga, Latvija
135. Genovefa TAMANE – Rīga, Latvija
136. Vija JANSONE – Rīga, Latvija
137. Janina BOROWIECKA – Szczecin, Pollando
138. Jan BOROWIECKI – Szczecin, Pollando
139. Bernarda WIEWIORSKA – Szczecin, Pollando
140. Andrzej JABLONSKI – Szczecin, Pollando
141. Edward BIALAS – Szczecin, Pollando
142. Gisook O – Busan, Koreio

143. Joel FONTAINE – Strasbourg, Francio
144. Laure WOLFF – Strasbourg, Francio
145. Irena GRIGALIŪNIENĖ – Šiauliai, Litovio
146. Natalija IVANOVA – Kijivo, Ukrainio
147. Vladimir KONONIUK – Osnabrueck, Germanio
148. Teresa POMORSKA – Wrocław, Pollando
149. Willem RASSCHAERT – Gent, Belgio
150. Swietosław FORTUNA – Kalisz, Pollando
151. Danuta BIADACZ – Wrocław, Pollando
152. Ewa REWERS – Wrocław, Pollando
153. Barbara SZEWCZYK – Wrocław, Pollando
154. Krystyna GLOGOWSKA – Wrocław, Pollando
155. Ewa FISCHER DE FISCHERING – Wrocław, Pollando
156. Vida ČOJIENĖ – Vilnius, Litovio
157. Perla MARTINELLI – La Chaux-de-Fonds, Svislando
158. Sakari KAUPPINEN – Helsinki, Finnlando
159. Sirkka MATTLIN – Hyvinkaa, Finnlando
160. Ewa KACZOR – Wrocław, Pollando
161. Janina LOTYSZ – Wrocław, Pollando
162. Istvan ERTL – Helmdange, Luksemburgo
163. Liina ERTL – Tallinn, Estonio
164. Vytenis Povilas ANDRIUKAITIS – Vilnius, Litovio
165. D-ro Gediminas DEGĖSYS – Vilnius, Litovio
166. Prof. Ilona KOUTNY – Poznań, Pollando
167. Prof. Mark FETTES – Kanado
168. Severija Marija BANAITYTĖ – Vilnius, Litovio
169. Andrzej SOCHACKI – Staszów, Pollando
170. Lydia LINDLA – Tartu, Estonio
171. Jacek WARDA – Lublin, Pollando
172. Jurgita UMARAITĖ – Vilnius, Litovio
173. Lise GOLOMB – Bourg de Peage, Francio
174. Isabelle MICHIELS – Bourg de Peage, Francio
175. Dominique BLONDET – Bourg de Peage, Francio
176. Paul-Henri LESPRIT – Suresnes, Francio
177. Magoola SCANLEIN DERRICK – Anum, Ugando
178. Heli TAMMIK – Haapsalu, Estonio
179. Jonathan SCHNEIDER – Guyancourt, Francio
180. Chiara RAGGI – Rimini, Italio
181. Gabija VILĖNIŠKIENĖ – Kaunas, Litovio
182. Tim OWEN – Nuneaton, Britio
183. Roman ROMANNA – Ternopil, Ukrainio
184. Halina GORECKA – Kaliningrad, Rusio
185. Onni KAUPPINEN – Lapinlahti, Finnlando
186. Paweł FISCHER-KOTOWSKI – Rotterdam, Nederlando
187. Jozefa GREGOROWICZ – Wrocław, Pollando
188. Malgorzata GREGOROWICZ – Wrocław, Pollando
189. Kristin TYTGAT – Antwerpen, Belgio
190. Bogusław UBIK-PERSKI – Weil am Rhein, Germanio
191. Katarzyna UBIK-PERSKA – Weil am Rhein, Germanio
192. Lucio AVITABILE – Romo, Italio
193. Amra OMEROVIC – Romo, Italio
194. Rukijat UZALOVA – Mahackala, Rusio
195. Abdurahman JUNUSOV – Mahackala, Rusio
196. Youngsoon KIM – Koreio
197. Mikaelo BRONŠTEJN – Tihvin, Rusio
198. Elena CHAPLIGINA – Mahackala, Rusio
199. Ulrich BRANDENBURG – Berlin, Germanio
200. D-ro Nijolė ŽAMBAITĖ – Vilnius, Litovio
201. Jadwiga GREGER – Sopot, Pollando
202. Alicja POTRYKUS – Gdansk, Pollando
203. Sungsoon KANG – Seulo, Koreio

204. Paola TOSATO – Padova, Italia
205. Gerd JACQUES – Antwerpen, Belgio
206. Franz KRUSE – Lemwerden, Germanio
207. Elisabeth KUHL-KRUSE – Lemwerden, Germanio
208. Ester PUTSEPP – Viimsi, Estonio
209. Natalia JANKOWSKA – Poznan, Pollando
210. Raimo TUISKU – Tampere, Finnlando
211. Ed ROBERTSON – Edinburgh, Skotlando
212. Dorota SZCZYGIEL – Krakovo, Pollando
213. Anna MOCARSKA – Wasilkow, Pollando
214. Michela CONCIALDI – Bolonio, Italia
215. Ilse JACQUES – Antwerpen, Belgio
216. Dominique PELTIER – Paris, Francio
217. David DICHELLE – Leipzig, Germanio
218. Rasa MIŠEIKYTĖ – Elstertrebnitz, Germanio
219. Laure PATAS DILLIERS – Paris, Francio
220. Vytautas ŠILAS – Vilnius, Litovio
221. Teresė DAMBINSKYTĖ – Šiauliai, Litovio
222. Gianfranca GASTALDI – Torino, Italia
223. Arūnas KAZLAUSKAS – Klaipėda, Litovio
224. Xon Vilahur GODAY – Katalunio
225. Gualdini LEONARDO – Abano Terme, Italia
226. Marina SOLOVEVA – Moskvo, Rusio
227. Daniel GUBLER – Carouge, Svislando
228. Raimonda GŽIMAILĖ – Šiauliai, Litovio
229. Isabel Ilinas COSTA – Girona, Italia
230. Samanta JAKOVLOVAITĖ – Kaunas, Litovio
231. Daiva RUPŠIENĖ – Šiauliai, Litovio
232. Angelė STUMBRIENĖ – Šiauliai, Litovio
233. Niccolo COZZA – Rimini, Italia
234. Olimpia Costanza COZZA – Rimini, Italia
235. Marco MENICHETTI – Italia
236. Gediminas KAZLAUSKAS – Šiauliai, Litovio
237. Reda KAZLAUSKIENĖ – Šiauliai, Litovio
238. Ieva – Kaunas, Litovio
239. Guillem PORTELL – Katalunio
240. Alice LIOTTO – Italia
241. Elisabeth COUDRY – Lausanne, Svislando
242. Roukia HAMIDOU – Komoroj
243. Mohamed SAADI – Komoroj
244. Ismael SAADI – Komoroj
245. Rita VALČIUKAITĖ – Kelmė, Litovio
246. Elżbieta KARCZEWSKA – Bjalistoko, Pollando
247. Janina BARANOWSKA – Bjalistoko, Pollando
248. Barbara PODOLSKA – Bjalistoko, Pollando
249. Zofia KEPKA – Poznan, Pollando
250. Juozas OLEKAS – Vilnius, Litovio
251. Prof. Ineta DABAŠINSKIENĖ – Kaunas, Litovio
252. Eglė ANDRIUŠKIENĖ – Kaunas, Litovio
253. Marek PAVLOVSKY – Brno, Ĉeĥio
254. Ake NASHOLM – Svedio
255. Basak ARAY – Istanbul, Turkio
256. Ona VISMINIENĖ – Šiauliai, Litovio

(Stato 14.06.2025)

Krucenigma konkurso

[illegible]

Miaj notoj pri BET-59 

◄◄ La solvon de la krucenigmo bv. sendi al la aŭtoro: stano.marcek@gmail.com
Unu el la solvintoj (decidos loto) ricevos la libron **107 krucenigmoj en Esperanto**.

59-ųjų Baltijos esperantininkų dienų dalyvio knyga

LIBRO POR BET-ano

Pentristo Vladimiras Beresniovas

2025 06 19. 9,75 sp. l. Tiražas 300 egz. Užsakymas

Leidžia Lietuvos esperantininkų sąjunga,

L. Zamenhofo 5, Kaunas.

Spaustuvė „Morkūnas ir Ko“, Draugystės 17, LT-51229 Kaunas



ISBN 978-609-96316-0-8



9 786099 631608